




LITOVA ALMANAKO

*El litova
literaturo, penso
kaj vivo*

*Rekomendita
de Esperantista Literatura Asocio*



LITOVA ALMANAKO

El litova literaturo, penso
kaj vivo



1923

Eldono de Litova Esperanto Asocio

KAUNAS

D. Vilniaus g. 34

547190



82-3

(082.2)



Litova arto kaj literaturo.

Litova arto.

Oni povas litovan arton dividi je arto popola kaj arto kultura.

Popola arto.

Ĝi montriĝas plej multe sur la objektoj de ĉiutaga uzo, ĉu kiel eltranĉaĵoj sur la objektoj de ĉiutaga uzo, ĉu kiel eltranĉaĵoj sur ŝpiniloj, lavobatiloj, bastonoj, ĉu kiel desegnaĵoj sur tabloj por gastoj, virinaj kestoj, teksitaj zonoj, ĉu kiel skulptaĵoj, precipe de sanktfiguroj. La plej disvastigita specimeno de litova popola arto estas litovaj lignaj krucoj. La vilaĝanoj litovaj metas ilin ne sole en la tombejoj, sed ankaŭ en la kampoj, ĉe la vojoj kaj ĉe la propraj domoj. Modeloj de tiuj ĉi krucoj estas la plej diversformaj. La societo litova de arto en Vilno en 1912 eldonis belegan verkon pri litovaj krucoj kun klarigoj en lingvoj litova kaj franca (Croix lithuaniennes recueillies et dessinées d'après nature par Antoine Jaroševičius. Essai archéologique sur les Croix lithuaniennes par J. Basanovičius. Encadrements et vignettes d'après des motifs de l'art national composées par A. Zmuidzinavičius.

Vilno, A. Zawadzki 1912. Edition de la Société Lithuanienne des Beaux Arts. (vol. in-4). En tiu ĉi albumo sin trovas preskaŭ 200 desegnaĵoj de diversaj krucoj kaj ĝiaj ornamaĵoj.

Arto kultura.

Publike aperi ĝi povis nur post la 1904 jaro. En 1906 en Vilno estis fondita la supre dirita „Litova Societo de arto“. Ĝi komencis aranĝadi ĉiujare ekspoziciojn de la arto litova. Ĝis 1914 estis de ĝi aranĝitaj 6 ekspozicioj en Vilno, 3 en Kaunas, 1 en Riga. En la nunjara maja ekspozicio en Kaunas estis eksponitaj 203 artaj kreiĵoj (pentraĵoj, skulptaĵoj, k. t. p.). Kiel la plej genia pentristo litova estas konsiderata K. Čiurlionis († 1911), mortinta tre juna. Liaj pentraĵoj havas karakteron simbole fantastikan. Ne unu serion da siaj pentraĵoj li dediĉis al la pentrado de ... muzikaĵoj (sonatoj, preludoj k.s.). Originaleco de tiuj pentraĵoj estas granda, sed ilia beleco — duba. Litovoj entuziasmoj proklamis lin nacia genio kaj komencis kolektadi liajn pentraĵojn por la estonta litova nacia domo de arto kaj de scienco. La necesa mono por ĝia konstruo estis kolektata en Litovujo. En 1912 jaro du delegitoj (Dro. J. Basanovičius kaj membro de l' Rusa Dumo s-ro M. Ičas) por tiu doma celo estis senditaj en Amerikon kaj tie inter la litovoj amerikanoj kolektis ĉirkaŭ 23000 da dolaroj. En Vilno por tiu ĉi domomuzeo estis aĉetita bela placo, sed okazinta milito malhelpis efektiviĝi la diritan projekton. Nune la registaro de Litovujo aĉetinta la plej multon da Čiurlionisaj pentraĵoj projektas en la proksima estonteco konstrui en Kaunas domon por nacia muzeo, kaj en ĝi meti la tutan produktadon de Čiurlionis. El aliaj li-

toĵaj pentristoj pli konataj estas A. Zmuidzinavičius (pejzaĝisto), Kalpokas, Varnas (bonaj portretistoj, K. Šimonis (simbolisto), kaj pli junaj Galdikas, Kulvietis, Janulis Didžiokas k. a.; el skulptistoj memorindaj P. Rimša, Škleris, Aleksandravičius, k. a. Eĉ la aŭtoro de Krakova monumento de Jagiello Vivulski estas ankaŭ poliĝinta litovo.

Krom „Litova Societo de arto“ ekzistas ankaŭ similaj kelkaj aliaj, ekz. „Gabija“, „Dajna“, sed ili sin okupas pri muziko, kanto kaj dramatika arto.

Litova literaturo.

En Eŭropo oni ofte eĉ nun ne diferencas litovojn de rusoj aŭ de poloj. Sed tio estas grandega eraro. La lingvo de trimiliona litova nacio estas pli proksima al antikvaj lingvoj greka, latina kaj eĉ sanskrita, ol al iu ajn el okcident-eŭropaj aŭ slavaj.

En tiu lingvo, superanta multajn aliajn per la riĉeco de siaj gramatikaj formoj, ekzistas sufiĉe vasta, nuntempe rapide kreskiĝanta literaturo. Mi ĝin ankaŭ dividos je popola kaj presata.

Popola literaturo.

Ĝi konsistas el grandega nombro da popolaj kantoj (dainos), fabloj (pasokos), popoldiroj (patarlès), enigmoj (mislès). En la pasinta jarcento oni komencis kolektadi kaj eldonadi litovajn „dajnojn“, komence po kelkdekoj (Rheza, Staneviĉe, Daukantas), poste eĉ po miloj. El tiuj lastaj kolektoj de „dajnoj“ estas notindaj: 1. 2 volumoj eldonitaj en 1880 de l' Kazana universitato, enhavantaj 1023 dajnoj; 2. unu volumo

eldonita en 1883 de l' Peterburga Akademio de Sciencoj kaj enhavanta 1100 da edziĝfestaj dajnoj; 3. la kolekto de litovaj dajnaj melodioj (1785), eldonita de Krakova Akademio de Sciencoj en 1900 kun klariga teksto en pola kaj germana lingvo. La materialo por tiuj ĉi tri lastaj kolektoj estis kolektita de granda litova folkloristo pastro A. Juškevičė. Fine en 1912 la Finna Akademio de Sciencoj eldonis unu volumon de (1145) dajnoj, kolektitaj de Prof. Niemi kaj pastro A. Sabaliauskas..

Laŭ sia enhavo dajnoj dividiĝas je mitologiaj, historiaj, militaj, hejmaj, edziĝfestaj kaj funebraj. Tiuj lastaj havas sian propran nomon "raŭdoj" (raudos). Ĝenerala eco de dajnoj estas ilia melankolieco, seriozeco, modesteco. Dajnoj malcastaj, senhontaj preskaŭ neekzistas. Poezian valoron de dajnoj tre alte ŝatis eĉ tiaj famekonataj poetoj kiel Herder, Goethe k. a.

La fabloj litovaj estas ankaŭ tre multaj. Grandan nombron da ili kolektis Dro. J. Basanovičius kaj eldonis en Chicago (1902-1904) en 5 volumoj. Dum la milito aperis la 6-a, dediĉita speciale al fabloj pri leonoj. Nuntempe pri la kolektado da fabloj sin okupas la studentaro kaj instruistaro litova. Parto da tiu ĉi kolektita materialo (precipe dajnoj, raŭdoj, popoldiroj, enigmoj, estis publikigata en antaŭmilitaj jurnalaj de litova junularo ("Ateitis", "Aušrinė", "Pavasaris"). La neeluzita materialo estas konservata en la arĥivoj de Litova Societo de Sciencoj en Vilno.

Jus estas elirinta luksa eldono de litovaj dajnoj belege ilustrita de litova pentristo K. Šimonis (Dainos. Žmonių poezijos antologija. Kaunas, 1923, 196 p. in-4.)

Presata literaturo.

Kun la unua litova libro aperinta en 1547 jaro komenciĝis litova presata literaturo. Ĝi estis komence nur religia (protestanta kaj katolika) kaj konsistis el katekismoj, predikoj, preĝaroj kaj religiaj kantoj. En 1585—1590 la luterano Bretkunas tradukas litovlingve la tutan Bibliion, sed longan tempon tiu traduko restas en manuskripto. En 1660 la kalvinistoj litovoj komencas en Londono presadi litovlinge tradukitan Malnovan Testamenton, sed ĝin pro manko da mono ne finas. La Nova Testamento (tuta) aperas en 1701 (eĉ en du tradukoj luterana kaj kalvinista). La tutan litovan Bibliion oni aperigas nur en 1735. El katolika flanko kanoniko Daukša en 1595 eldonas litovlingvan katekismon de Ledesma kaj en 1599 grandegan Predikaron (Postilla) de Vujek. Jezuito Širvydas en 1644 elirigas siajn "Punktojn de predikoj." La Nova Testamento (tuta sed sen komentarioj (por katolikoj aperas nur en 1816. Daniel Klein en 1653 verkas la unuan litovan gramatikon en lingvo latina. Vere nacia literaturo litova komenciĝas je la fino de XVIII jarcento, kiam la glora litova poeto Duonelaitis verkas la unuan nacian poemon "Kvar jartempoj" (en litovaj heksametroj). Ĝi aperas en 1818: Duonaleitis naskiĝis en 1714 en Prusujo kaj estis protestanta pastro. En 1914 estis intencite festi lian 200-jaran jubileon kaj starigi al li monumenton, sed la mondmilito tion ĉi malhelpis. Tamen plimultaj litovaj verkistoj estas katolikoj: El ili la plej memorindaj estas S. Daukantas aŭtoro de „Historio de Litovujo“, episkopo Valančius verkinta multajn tre ŝatatajn religiajn kaj eĉ kelkajn beletristikajn libretojn, episkopo A. Baranauskas aŭtoro de l' bela poemo "Arbareto de Anykščiai", Dro

Pietaris verkinta la unuan grandan historian romanon "Algimuntas aŭ Litovoj en la XIII^a jarcento", Dro. Kudirka bona tradukisto de klasikaj Eŭropaj verkoj kaj la unua talentplena ĵurnalisto. La ĵus memoritaj verkistoj vivis kaj mortis en la XIX jarcento. El nune vivantaj litovaj literaturistoj estas notindaj antaŭ ĉio la plej glora nuntempa litova poeto Maironis (prelato Maĉulis), aŭtoro de belaj poemoj "La juna Litovujo", "Niaj mizeroj", "Kie estas la savo?" kaj de belaj lirikaĵoj versajoj. En la pasinta jaro estis solene festata la sesdekjara datreveno de lia naskiĝo. Multaj litovaj ĵurnaloj kaj gazetoj dediĉis al li specialajn artikolojn. Lia ĉefa merito konsistas en tio, ke li jam de 25 jaroj profetadis la nacian reviviĝon de litova nacio, kio nun vere efektiviĝis. El aliaj litovaj nuntempaj verkistoj memorindaj estas pastro M. Vaitkus, aŭtoro de multaj versajoj kaj poemoj. En la nunjara konkurso lia dramo "Filino de l' Stelo" estas ricevinta la unuan premion; plue, poetoj L. Gira, pastro Putinas, pastro M. Gustaitis, A. Vaiĉiunas k. a., beletristoj — Kanoniko G. Tumas, Vienuolis, Penkaitis, Šeinius, L. Pelėda, Š. Ragana, Žemaitė k. a.; kiel dramaturgoj konataj estas Vyduonas, V. Krėvė, Puida, k. a.

La ĵurnalismo litova ankaŭ rapide elvolviĝas. En 1846 la litovoj posedis nur unu litovan gazeton. Hodiaŭ ilia nombro atingas ĉirkaŭ cent. Ili eliradas ne sole en Litovujo, sed ankaŭ en Memela regiona kaj en Ameriko. En Kaunas nuntempe eliradas 4 ĉiutagaj gazetoj ("Lietuva" oficiala registara organo, "Laisvė" — katolika, "Liet. Zinios" — socialista, "Krašto Balsas" — opozicia organo de s-ro Smetona kaj de Prof. Valdemaras. El ĉiusemajnaj organoj la plej dis-

vastigitaj estas "Vienybe" destinata al popolo katolika, "Tėvynės Sargas" organo de kristanaj demokratoj, "Lietuvos Ukininkas" — popola-socialista k. a. Krom tio eliradas multaj specialaj monataj jurnalaj literaturaj, pedagogiaj, virinaj, junularaj k. a.

Por la eldonado de litovaj verkoj estas fonditaj kelkaj societoj. Inter ili memorindaj St. Kazimira Societo (litova "La Bonne Presse") fondita en Kaunas en 1905 kaj disvastiginta amason da bonaj libroj kaj gazetoj en milionoj da ekzempleroj, "Švyturys", "Kultura", "Vaiva", "Atžala" k. a.

Prof. A. Dombrovski.



Litova kaj esperantista eminentulo.

Prof. prelato Aleksandro Dambrauskas
(Dombrovski)

naskiĝis la 26 de aŭgusto 1860 jaro en vilaĝo Kuroniai, distrikto de Ukmerge. De 1872 ĝis 1881 li absolvis gimnazion en Šiauliai kaj vizitadis matematikan fakultaton de Petrograda universitato. Poste, dum la jaroj 1881—1888, li absolvis pastran akademion en Petrogrado. Pastrigan benon akceptis la 29 de aprilo 1889.

Estante instruisto de religio en reala gimnazio de Panevėžys, li malpermesis al katolikaj lernantoj obei rusan ordonon pri vizitado de rusa-ortodoksa preĝejo kaj pro tio estis ekzilita el sia patrujo en Rusujon (Ustjuna, gubernio de Novgorod), kie li devis resti de 1889 ĝis 1895.

Reveninte el ekzilo, li fariĝas (1895—1907) profesoro de Kauna pastra seminario kaj de Petrograda pastra akademio, kelkan tempon estante ankaŭ sekretario de Kauna episkopo.

De la jaro 1907 Dambrauskas fariĝas prezidanto de katolika libroeldona societo sankta Kazimiro kaj redaktoro de diversaj ĵurnaloj.

Subskribante per sia alnomo A. Jakŝtas, nia eminenta samideano eldonas diversajn verkojn pri teologio, scienco, politiko kaj poezio en lingvoj litova, pola, rusa, latina kaj esperanto. Ne parolante pri liaj multenombraj artikoloj en diversaj esperanto-ĵurnaloj, ĝis nun li eldonis jenajn Esperanto verkojn: Versajareto, paĝ. 29 (S. Peterburgo 1905). Pri novaj trigonometriaj sistemoj, paĝ. 35 (Berlin 1906). Pri unu speco de kurbaj linioj, paĝ. 23 (Berlin 1905). Lernolibro de Esperanto por litovoj, paĝ. 70 (Tilsit 1890, du eldonoj). Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj, paĝ. 215 (Kovno 1908), Esperanto, kiel scienca helpilo, paĝ. 5 Kovno 1910. Estante unu el plej malnovaj esperantistoj (de la jaro 1887) li ĝis nun kun junula energio laboras por nia kara ideo, estante

Lingva Komitatano,
Prezidanto de Litova Esperanto Asocio,
Direktoro de IKA por Litovujo,
redaktoro de „Litova Stelo“.

El „Litova Albumo“.

El litova poezio

Mia patrujo.

Versaĵo de konata litova poeto Maironis.

| | |
|-------------------------------------|----------------------|
| Kie Nemunas ¹⁾ tra valoj | Arbaregoj tie bruis |
| Siajn ondojn sendas, | Pri epoko granda, |
| Miaj fratoj lacaj, palaj | Kiam vivo ĝoje fluis |
| Pro mizero plendas. | En libera lando. |

| | |
|--------------------------|------------------------|
| Tie per malgajaj kantoj | Tie nune de kasteloj |
| Min patrino lulis, | Nur ruinoj restas, |
| Kaj de ŝi al la ĝemantoj | Pri herooj nur fabeloj |
| En mi am' ekbrulis. | Kaj ĉiel' atestas. |

Tie kreskis mi premata
De dolor' ĉiama,
Tial estas al mi frata
Ĉiu kor' fratama.

Libere tradukis R. Blažys.

¹⁾ La plej granda rivero de Litovujo.



Biruto.

Apud Palango, ĉe la Balta Maro,
En verdiĝanta alta pinarbaro
Staras monteto Biruto nomata,
Ĝi de ĵemajtoj¹⁾ estas tre amata.
Antikvatempe ĉe gepatroj siaj,
En tiu lando de praavoj niaj,
Bela modesta, kvazaŭ rozo, ruto,²⁾
Vivis la juna belulin' Biruto.

Ho, ŝi ne estis ia reĝidino,
Sed el Palango malriĉa knabino;
Per manfarita ĉemiz' sin vestadis,
La multkoloran jupeton portadis.
Per krono ruta kapon ŝi ornamis,
Sur ŝia kolo nur sukcenoj flamis;
Sen orelingoj kaj sen braceletoj
Ŝi promenadis laŭ ĉemarvojetoj.

Al fiŝkaptantaj siaj fratoj fojon
Ŝi portis manĝi . . . jen subite vojon
De la knabino baras princ' Kejstuto,
Li surprizita estas je Biruto.
Tiam teŭtonoj volis nin malŝati,
Princo Kejstuto rajdis ilin bati;
Sur grizĉevalo en luksega selo
Li hela sidis en la ursa felo.

Per la kirasoj estis li vestita,
Per akra glavo kaj pafark' armita.
Dum ĉevalviro teron priedŝiris,
La princa Moŝto al Biruto diris:

¹⁾ okcidentaj litovoj.

²⁾ florkreskajo plej amata en Litovujo.

„Vi estu homo, ĉu Jurate³⁾ dia,
Nur ne rifuzu ĉiam resti mia:
Pro via amo ardas mi, ho kora!
Al mia peto estu vi favora“.

— Jes, mi konsentus, sed al koro spite
De longe estas mi ja vaidelite⁴⁾
Antaŭ Perkuno⁵⁾ mi ĉastecon ĵuris.
Princo paliĝis, sed tuj ekmurmuris:

— Mi rekompencos al la di' Perkuno,
Kaj alkondukos vin ĉe mi, ho suno!
Humiliĝante ŝi al princo diras:
„Efektiviĝu kiel vi deziras.“

Tuj princ' proklamas: „Do pro la memoro
Pri la okazo de ĉi tiu horo
Monto ĉemara portu vian nomon;
Pro vi mi fondos tie kasteldomon.“

Tiel Biruto restis la princino,
Del l' princ' amata nobla beledzino
Vitaŭton Grandan ŝi al li naskigis,
Krucmilitistojn tiu pereigis.

Laŭ litova popolkanto tradukis Pr. Ŝaulys.

³⁾ Diino de maro

⁴⁾ Gardistino de sankta fajro de antikvaj idolanoj litovoj.

⁵⁾ Plejsupra dio de idolanoj litovoj.



El litovaj popolkantoj.

I.

Ĉe tabl' ni sidas,
Kaj tra l' fenestro
Rigardas, aŭdas:
La maro bruas.

Profundaakva
Estas la maro.
Tie elkreskis
Verda acero.

Sub la acero
Tiu centbranĉa
Staris du junaj
Tie fratinoj.

Ili starante,
Malgajplorante,
Al si parolis,
Penson pensadis.

Per ki' ni lavos
Blankajn vizaĝojn?
Per ki' ni kombos
Flavajn harligojn?

Ni per marŝaŭmo
Vizaĝojn lavos,
Per la marperĉo
Ni harojn kombos.

II.

Flugis la falko
De malaltaĵo.
Jen tie estas
Verda herbejo.

Tra la herbejo
Fluas rivero,
Ĉe ĝi jen estas
Ruta¹⁾ ĝardeno.

En ĝi troviĝas
La bed' de l' ruto,
Tie fraŭlino
Kombas la harojn.

Kombas la harojn,
Malgaje plendas . . .
— Pro ki' Vi plendas,
Juna fraŭlino?

— Patrin' malestas
Por zorgi doton.
Malestas patro
Por doni parton.

Malestas fratoj
Por akompani,
Kaj la fratinoj
Por kune sidi.

1) Nacia litova planto.

La Sun-Patrino
Prizorgis doton,
La Luno-Patro
Difinis parton.

Steloj fratinoj
En seĝo sidis,
Frato - Kriblilo ²⁾
Ŝin akompanis.

III.

En la kampo
Prunarb' kreskis,
Blankaj floroj floris;
Blankaj floroj,
Nigraj beroj,
Branĉoj ekkliniĝis.

Kaj alflugis
Nigra korvo,
La nigrul' korveto,

Kaj alportis
Blankan manon
Kun ringeto ora.

Ho, ci, korvo,
Ho, nigrulo,
Ho nigrul' korveto,
Kie trovis ci
Blankmanon
Kun ringeto ora?

Apud Riga,
La urbeto
Grandbatalo estis,
Tie glav'
Detranĉis manon
Kun ringeto ora.

Tie falis
Via frato
Militist' kuraĝa,
Mi alportis
Blankan manon
Al gepatroj liaj.

Esperantigis Pr. A. Dombrovski.

²⁾ Popola nomo por la stelaro de Plejadoj.



Litova nacia himno.

(Verkita de V. Kudirka.)

Litovuj', patrujo nia,
Ter' de heroeco!
Viaj filoj ĉerpu forton
El la estinteco.
Iru ili nur per vojoj
De la virt' konstante,
Por la bon' de vi kaj homoj'
Ĉiam laborante.
Ho vi, sun' de Litovuj',
Pelu la mallumojn for!
Kaj klerec' kaj justec'
Niajn paŝojn oru,
Kaj de Litovujo am'
Ekbruligu nin per flam'
Kaj je l'nom' de Litovuj'
L' unuig' ekfloru! . . .

Esperantigis A. Dombrovski



La malliberulo.

(Litova popola kanto.)

Ho, en la verda, verda arbaro,
Estas malluma malliberejo;
Kaj en tiu ĉi malliberejo.
Oni enŝlosis junan frateton.
Tie li povas neniam scii,
Ĉu venis vintro jam aŭ printempo;
Neniam vidi la brilan sunon
Nek leviĝantan, nek subirantan.
Mi oran ringon je l' muro metis,
Eble mi farus tie fenestron;

Eble mi farus tie fenestron,
Por ke la frato ekvidu sunon.
Mi metus pecon da blanka neĝo,
Por ke li sciu pri frosta vintro;
Mi freŝajn florojn je l' muro metus
Por lin sciigi pri la somero.



Mia mizero.

(Litova popola kanto.)

Mia mizero, mia mizero!
Ĉu mi vin finos iam suferi?
Kiam mi iris je l' granda vojo,
Mia mizero min akompanis.
Sed jen alrajdas cento da fratoj,
Kvarcent piedoj estas ĉevalaj,
Fratoj! Vi batu mian mizeron,
Per la piedoj de la ĉevaloj.
Per la piedoj de la ĉevaloj.
Kaj per brilantaj glavetoj viaj!
La junaj fratoj longe ĝin batis,
Sed la mizero nenion timas.
Mia mizero nenion timas,
Kreskas, vastiĝas kaj pligrandiĝas.
Mia mizero nenion timas,
Elmetas verdajn foliojn, branĉojn.
Mia mizero tiam finiĝos,
Kiam mi venos al la patrino.
Mia patrino loĝas monteton,
Altan monteton, novan ĉerketon . . .

Kun afabla permeso de aŭtoro ni ĉi sube represas „Versa-
jareton“ de P-ro. A. Dombrovski, aperintan en S. Peterburgo
1905 kaj lasas sekvi la antaŭparolon, nomitan:

Al la legantoj.

Anstataŭ kutima antaŭparolo mi kuraĝas tie ĉi prezenti al la instruita legantaro kelkajn vortojn pri „matematika kriterio de poezieco“.

Ĉiuj amantoj de la poezio bone scias, ke unu poemo aŭ versaĵo ŝajnas pli poezia ol la alia. De kio tio ĉi devenas? Jen estas tre grava, sed bedaŭrinde ne sufiĉe klarigita demando. Ĝis nun oni ĝin solvadis pli aŭ malpli subjektive. La glora verkisto pola B. Prus penis la unua starigi absolute objektivan, t. e. matematikan kriterion de poezieco. Lia argumentado redukiĝas al la sekvantaĵo:

Ĉiu poemo aŭ versaĵo konsistas el vortoj. Vortoj do estas duspecaj: aliaj havas la econ ekvokadi en nia animo imagojn kaj ideojn (tiaj estas substantivoj, adjektivoj kaj verboj); la ceteraj tiun ĉi econ ne havas (ekz. la vortoj: kaj, ke, kiam, el, en, ankaŭ k. t. p., se estas solaj, ekscitas en ni nenian imagon); el tiu ĉi kaŭzo ili devas esti rigardataj kiel surŝarĝa, sed bedaŭrinde neevitebla balasto de nia parolo.

Teorie parolante, oni povas diri, ke la grado de poezieco estas en la rekta rilato je la nombro da vortoj signifaj en versaĵo, aŭ alivorte, ke ia versaĵo nur tiam atingos la plej altan gradon de poezieco, kiam la nombro da regule ordigitaj en ĝi vortoj signifaj (substantivoj, adjektivoj, kaj verboj) atingos sian maksimumon. Sed kiel difini tiun maksimumon da vortoj signifaj, ekscitantan en la leganto maksimumon da imagoj kaj ideoj?

Sciante, ke estas ne eble ĝin trovi a priori, s-ro Prus ekuzis la metodon experimentan. Li prenis unu el la plej poeziaj versaĵoj de Mickiewicz „Farys'on“ kaj ekkalkulis en ĝi la nombrojn da substantivoj, da adjektivoj, da verboj k. c. La rezultato estis jena: por 100 vortoj, uzitaj de Mickiewicz en lia versaĵo,

sin trovas 33—39 da substantivoj, 8—12 da adjektivoj, 12—21 da verboj, aŭ ĉirkaŭ 38% da substantivoj, 9% da adjektivoj, 15% da verboj — kune ĉirkaŭ 62% da vortoj signifaj kaj 38% da vorta balasto.

Trarigardante pli atente tiujn nombrojn, s-ro Prus ekrimarkis, ke ili precize respondas al la tiel nomata „ora proporcio“, konsistanta en la divido de ia grandaĵo en du malegalaj partoj tiamaniere, ke la tutaĵo rilatu la pli grandan parton, kiel la pli granda parto rilatas la pli malgrandan. Matematike tio ĉi esprimiĝas per ekvacio:

$$a : x = x : a - x \quad . \quad . \quad . \quad (1)$$

el kiu oni ricevas:

$$\left. \begin{aligned} x &= \frac{a}{2} \left(-1 + \sqrt{5} \right) = a \times 0,62 \\ a - x &= \frac{a}{2} \left(3 - \sqrt{5} \right) = a \times 0,38 \end{aligned} \right\} \quad . \quad (2)$$

Efektive, se ni dividos 100 laŭ formulo (1) ni el (2) trovos la nombrojn 62 kaj 38; la nombro 62 dividita tiel same donos la nombrojn 38 kaj 24; fine la nombro 24 dividita simile donos la nombrojn 15 kaj 9. El tio ĉi s-ro Prus konkludas, ke la „ora proporcio“, reĝanta en la muziko kaj arĥitekturo, reĝas ankaŭ en la poezio.¹⁾ Tial la skemo:

¹⁾ Neniu devas miradi trovante legojn nombrojn en la poezio. Pri la Dia kreado la Skribo Sankta ja diris: Omnia in mensura, et numero et pondere disposuisti (Sap. XI, 21). Io simila devas ankaŭ sin trovi en la poezio, kiu estas homa kreado; tiun similecon de efektoj postulas la simileco de kaŭzoj. Estante kreita je simileco kaj imago de l'Dio kreinto, la homo nature estas malgranda kreanto kaj tial la legoj de lia kreado devas esti iom similaj al la legoj de Dia kreado, kaj efektive tio ĉi veriĝas, kiel ni ĵus vidis.

$$100 \left\{ \begin{array}{l} 62 \left\{ \begin{array}{l} 38 \text{ da substantivoj} \\ 24 \left\{ \begin{array}{l} 15 \text{ da verboj} \\ 9 \text{ da adjektivoj} \end{array} \right. \\ 38 \text{ da vorta balasto} \end{array} \right. \end{array} \right.$$

devas esti kosiderata kiel unu el nemalŝatindaj objektivaj kriterioj de poezieco.

Mi invitas la estiimatajn legantojn, kiujn la suprenmontrita kalkulo ne timigas, konvinkiĝi persone, ĉu la „ora proporcio“ sin trovas ankaŭ en aliaj la plej gloraj poeziaj verkoj de l'mondo.

La aŭtoro.



Himno.

Dediĉita al la internacia esperantista kongresanaro
en Boulogne-sur-mer.

El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj,
Ni kunvenintaj Vin adoras Di'!
Al vi sin turnas niaj piaj sentoj,
Kaj nia kanto sonas nur al Vi!

Vi -- nia patro, ni ja -- Viaj ido;
Kaj reciproke — fratoj al ni mem;
Venu do amo, estu for dividoj,
Venu frateco kaj pereu prem'!

Per la donita al ni krea forto,
Via, Kreinto, estas ni imag'.
Vi kreis mondon tutan per la Vorto,
Ni Vin imitas per la Vort' kaj ag'.

De ni kreitaj estas art', scienco,
Nun celas mondon ni de ideal';
Tre malfacila estis krekomenco,
Hodiaŭ kreas ni en granda skal'.

Laŭ Via diro: ekposedu teron!
Ni ĝin okupis kaj posedas nun;
Transnaĝas marojn, sondas atmosferon,
Kaj ĉie loĝas, kie brilas sun'.

Al ni obeas fortoj de naturo.
Al ni jam servas elektrec', vapor';
Nur peka sekvo de Babela turo
Nin malhelpadis en la krelabor'.

Sed jen ĉi tiu baro forigita:
Homon kompreni povas ĉiu hom',
Ĉar estas lingva komprenil' kreita
Kaj ĉie sonas ĝia bela nom'.

Ĝin al Vi, Dio, ni kun preĝ' oferas, —
Volu el alta beni ĝin ĉiel'!
Kun ĝia helpo baldaŭ, ni esperas,
Plej sankta estos atingita cel':

Sub la konduko civilizacia
Kuniĝos granda de nacioj ar';
Kaj — antaŭsigno de la regno Dia —
Aperos unu jam ĉiuhomar'.

Kaj ĝi ne estos plu estaĵo muta,
Ĉar propran lingvon havas kun konsci';
Kaj tiun voĉon de l' homaro tuta
Atentos reĝoj kaj ĉiu naci' . . .

Ho, venu tiu hor' de unueco!
Rompon, dividon amas nur satan' . . .
Patro, ni preĝas Vin pri la frateco,
Nian laboron benu Via man'! . . .

6. 5. 1905.



Al Lia plej sankta Moŝto, noveelektita Papo Pio X.

Ĉesis jam viva malgajo publika,
Dio ĝoigis la Kristeklezion:
Ĉe trono Petra la mond' katolika
Salutas Pion.

Grincu per dentoj infera serpento!
Nin ne timigas jam via envio:
Tra l' maraj ondoj kaj forta la vento
Nin gvidos Pio! ...

Oni diradu, ke Petra la Ŝtono,
Jam detruigis, fariĝas nenio ...
Granda mensogo! Jen sankta la trono
Kaj sur ĝi Pio! ...

Tial laboru sen tim', kristanaro,
Ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio,
Unu paŝtanta kaj unu ŝafaro ...
Gvidu ĝin Pio ...

18. 9. 1903.



Estu! Estu!*)

Laudate Dominum omnes gentes,
laudate eum omnes populi.
(Psalm. 116, 1.)

Laŭdu vi Dion, ĉiuj gentoj teraj,
Ĉiuj popoloj, laŭdu la Sinjoron!
Levu jam supren feran vian koron,
Kaj ekrekonu, ke vi fratoj veraj.

*) Tiun ĉi versaĵon s-ro de Beaufront tradukis en lingvon francan kaj presigis ĝin en sia „Pregareto por katolikoj“.

Unu vi havas civilizacion,
Teron, aeron havas ja komunan,
Super la kapoj unu globon sunan,
En la ĉielo — unu Patron — Dion.

Kial do Lian voĉon ne aŭskultas?
Kial vi Patran ne plenumas volon?
Kial ne rompas la Baalidolon?
Unu alian kial vi insultas?!

Kristo ja diris: mia jen ordono:
Kiel mi agis, tiel vi agadu,
Unu alian kore ekamadu,
Ĉar la malamo venas de malbono. —

Kaj — por la savo de la mondo tuta —
Li, Diŝafido, pezan krucon portis,
Por vi suferis, por vi ĉiuj mortis,
Verŝante sangon ĝis la lasta guto.

Kaj Li elsendis siajn apostolojn,
Dirante: Bonan semu la novaĵon,
Sciigu ĉiun pri ĝi kreitaĵon
Ĉiujn instrui iru vi popolojn!

Iru kaj ĉiujn voku al la pento —
Kaj fortan Romon, kaj malfortan Judon,
Kaj neĝan Nordon, kaj florantan Sudon,
Kaj Orienton kun la Okcidento! . . .

Kaj mira fakto! ĉie tuj ekaŭdis
Evangelian vorton la homaro,
Ekvidis Greko fraton en barbaro,
Kaj ambaŭ Kriston la Savinton laŭdis.

Sed nune, kion faras, vi popoloj,
Vi kristamemaj, tiel instruitaj?! . . .

Anstataŭ paco — inter vi militoj,
Anstataŭ amo — belaj nur paroloj! . . .

Unu alian vi senkore ŝiras,
Gentojn malfortajn premas ja konstante,
Ilian nomon detruu penante,
Kaj tiel ĉiuj al pereco iras . . .

Pri religio tute vi forgesis,
Dion, animon nomas neniaĵojn;
Krias: progreso! ĉiuj, ve, regresis!
Krias: scienco! sekvas sensencaĵojn . . .

Ho prudentiĝu ĉiuj gentoj teraj,
Ĉiuj, popoloj, laŭdu la Sinjoron!
Levu, ho! levu supren Vian koron,
Kaj ekrekonu, ke vi fratoj veraj.

Kaj jam ne estu inter vi bataloj,
Unu elektu por vi sanktan celon:
Sole serĉadi veron, bonon, belon,
Ĉiam flugadi nur al idealoj.

Kaj venu plena regno jam de Dio,
Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta,
Ĉiujn popolojn en si enhavanta
Unu kristana Ĉiueklezio! . . .

19. 11. 1893.



Dio.

La tuta mondo kun belaĵoj siaj:
Bruo arbara, dolĉaj birdaj kantoj,
Verdaj herbetoj, ludoj papiliaj,
Nuboj migruloj, per ĉiel' flugantaj;
Kaj taga lumo kaj la noktmistero,
Freŝa herbejo plena je odoro --
Ĉio murmuras al ni sur la tero:
Homo: memoru, estas Di' Sinjoro!

Suna radio, eĉ sur tomb' malvarma,
Vivajn printempe florojn kreskiganta;
Kaj luno, tera amikino ĉarma,
El profundaĵoj marojn leviganta;
Granda Ursino, Lakta Voj' mistera,
Kaj miliona la stelar' plenmova, --
Ĉio predikas al homar' fiera:
Vi genufleksu antaŭ Ĉiupova! ...

Miloj aperas al ni en naturo
Da mirindaĵoj neelparoleblaj:
Jen pikas nubojn alta monta muro,
Jen estaĵetoj preskaŭ nevideblaj ...
Se do netaŭgas via plu okulo, --
Per sia vitro al vi miran landon
En akva guto montros scienculo, --
Tiel vi ĉie trovos Dian grandon ...

Kaj la sennombra ĉiuivantaro,
Kio ajn movas sin en tera rondo
Birdoj, skaraboj, bestoj kaj homaro,
Dion, predikas Reĝon de la mondo,
Ĉar kreis ĉion Li per mano Sia,
Ĉion plenigas per la mirornamo,
Sen Lia volo falas har' nenia,
Ĉar Li ja estas: Povo, Belo, Amo ...

18. 4. 1904.

La homo.

Homo, kreanta ion per genia ago,
Vi estas Dia imago!
Se teron forgesante servas al ĉielo,
Vi ekfariĝas anĝelo!
Premata de mizero, se ploras en domo,
Vi restas simpla la homo;
Zorgante nur pri manĝo, kaj bona digesto
Vi egaliĝas al besto!
Se ideon nenian havas en la cerbo --
Vi malaltiĝas ĝis herbo!
Se vin ne altiradas vero, belo, bono, --
Vi similiĝas al ŝtono.
Tentante do aliajn por sia agrablo,
Vi kaptas pli ol diablo,
Nur unu vi ne povas esti -- vera Dio,
Nek ekfariĝi -- nenio.

1905.



Poeto.

Sentante la inspiran lumon,
Poeto kanti ekdeziris;
Sidiĝis, prenis sian plumon
Por verki, sed . . . afer' ne iris.

Ho muzo, li ekplendis bola, --
Pro kio do vi min turmentas?
Kial per via voĉo mola
Min vanajn sonojn kapti tentas?

Kial al kanto min vokinte,
Ekpunas per la helprifuzo?
Kial ideon ek trovinte,
Ne trovas vortojn mi, ho muzo?! . . .

Kaj li silentis pripensanta,
Kaj silentadis lia liro . . .
Sed jen en la anim' revanta
Aŭdiĝis ia forta diro.

Poet', forĵetu vanajn revojn!
Malnova for dirmaniero!
Mi Di' difinas viajn devojn,
Ne la antikva muz' ĥimero!

Mi la verkisto de l' mondaro,
Mi sola fonto de la belo, —
Elsendas vin al la homaro,
Por alta, glora, sankta celo.

Jen mia vol': en kanta sono,
En tuta via vivekzisto, —
Vi estu en la sampersono,
Poet', profet' kaj predikisto.

Krom la vidita per okulo,
En mond' la belo ekzistanta,
Vi kantu, mia senditulo,
Pri idealo naskiĝanta!

Kaj kian ajn vi prenos temon,
Eviti penu pekajn tentojn, —
Nur bonan semu vortan semon,
Nur bonajn vi ekscitu sentojn.

27. 11. 1905.



La vorto.

In principio erat verbum.
Ioan. 1, 1.

La Divort' estis en la komenco,
Kun senfina saĝec' kaj potenco.
Kaj la mondo laŭ Vorto ordona,
Ekfariĝis kaj estis tre bona.

Homa vort', vi imitu Divorton,
Lian agon, saĝecon, kaj forton!
Forigadu ĥaosan la denson,
Kreu lumon kaj vivon kaj penson! —

7. 12. 1905.



Al. I. C. 1798.

Al mi skribis el Manilo
Iu: vivu la Rusland'!
Vivu krista religio,
Vivu blankarasa grand'!

Ho amiko, bonan koron,
Noblajn sentojn havas vi;
Bedaŭrinde vi forgesis,
Kio estas religi'.

Vi forgesis, ke laŭ Kristo,
Homo estas Diimag'
Ne per sia blanka haŭto,
Sed per krea vort' kaj ag'.

Vi forgesis, ke ŝatinda
Por Di' estas nur anim',
Ke blankigas ĝin nur virto,
Ke nigrigas ĝin nur krim'! . . .

15. 11. 1905.

Plendo.

Ho veraĵo absoluta,
Vi ekbrilu kiel stelo!
Daŭre nia vivo tuta,
Nin konduku al ĉielo!

Malfeliĉaj duonhomoj,
Ni ne zorgas pri la vero;
Nin trompigas la fantomoj
De feliĉ' kaj de mizero.

Malgraŭ jaroj de la aĝo,
Malgraŭ lumo de esploro, —
Ne klariĝas nia saĝo,
Ne vastiĝas nia koro.

Revoj kaptas nin absurdaj,
Nin vanaĵoj interesas;
Al Divoĉo ofte surdaj,
Devan amon ni forgesas.

Jen ni kvazaŭ la infanoj,
Amuzigas nin per pupoj;
Jen ni homoj kaj kristanoj,
Mordas fratojn, kiel lupoj.

Aŭ trankvile ekdormetas,
Dum atendas nin la agoj;
Aŭ — „li diris ĝin“ ripetas
Ni sen pens' kiel papagoj.

Se do vero malagrabra
Pikas nin kiel per forkoj, —
Ni ĝin sendas al diablo
Aŭ forĵetas antaŭ porkoj.

Tial vivo nia tuta
Estas kiel krim' sencela —
Bruta, muta kaj servuta,
Kaj malhela kaj kruela.

29. 1. 1905.



La Kristimitado.

Pertransiit benefaciendo Act.
Ap. 10, 38.

Kristo trairis bonefarante . . .
Se vi ĝin kredas, kristano pia,
Fari rapidu bonon konstante,
Kriston imitu en vivo via!

Faru vi bonon al ĉiu homo
Ĉiun helpadu nedemandante
Pri lia kredo, pri lia nomo,
Iru kun Kristo bonefarante!

Tre multekosta perl' estas kredo,
Jam eĉ montojn grandajn movigas;
Sed ĝi al Dia venas posedo,
Nur kiam amo ĝin eksanktigas . . .

19. 11. 1905.



Protesto.

Al germanaj studentoj de Jenao,
Predikadis doktoro Häckelo
Pri natura la „homodeveno“,
Pri malver' de „Biblia fabelo“.

Foriginte la kreon de Dio,
Traktis multe li pri la scienco,

• Pri la leĝoj de evolucio,
Pri la mira natura potenco . . .

Per la ĉel' kaj unua „Monero“,
Per la „memnaskiĝadaksiomo“
Montris li, ke anim' ja „himer“,
Ke simi' estas avo de homo . . .

Plu el haŭt' kaj intesto la blinda,
Li certegan konkludon eltiris,
Ke hom' „rein zoologisch“ traktinda . . .
La studentoj aplaudis kaj miris . . .

* * *

Ho! Doktoro de zoologio!
Multe scias vi pri la intesto . . .
Sed al via hombestteorio,
La tutmondo ekkrias: protesto!

Krias laŭte ĉielo milstela:
Hom' sekretojn jam miajn ektrovis!
Krias tero kaj maro ŝancela:
De hom' kaŝi nenion mi povis!

Krias tuta civilizacio —
Vojoj, pontoj, maŝinoj, pentraĵoj:
Ni faritaj de l' homa genio,
Liaj estas ja ni kreitaĵoj . . .

Lia saĝo, parolo kaj ago,
Hele brilas per kreo majesta;
Vere estas li Dia imago,
Simileco Kreinta, ne besta! . . .

27. 3. 1905.



Nia celo.

Al la celo alta kaj tre glora,
Ni antaŭen iru jam kuraĝe!
Per la volo forta kaj fervora,
La estonton preparadu saĝe!

Tre malbone, se hom' estas unu,
Malgrandigas fortojn aparteco . . .
Di' saĝigu nin kaj plu ne punu! . . .
Fratoj krii: vivu, ho frateco!

Per ligilo nia tre mirinda,
Per belega nia Esperanto,
Ni montradu, ke am' — pli laŭdinda,
Ol la gloro de militvenkanto.

Nin nenia sorto ektimigas,
Al ni vento jam favora blovas.
Di' nin vivi, agi, krei igas . . .
Ni ĝin faras, fari pli ne povas.

21. 3. 1905.



Solvita demando.

Dank' al Dio sonas mia kanto,
Dank' al voĉo mi ne estas muta,
Sed dank' al la bela Esperanto
Mi parolas kun la mondo tuta.

Anglo, franco, ruso, polo, svedo,
Dano, sviso, belgo kaj hungaro,
Min komprenas sen tradukrimedo,
Parolantan al ĉiuhomaro.

Jes, ĉu hejme, ĉu en eksterlando,
Ĉie fratojn mi jam multajn trovas;
Ĉar solviĝis monda la demando,
Homo homon ekkompreni povas.

29. 3. 1905.



Kanto.

Ho eksonu nova Kanto,
Pri la lingvo Esperanto,
Pri ligil' internacia,
Revo nia, amo nia!
Kreitaj' la plej mirinda.
Vere estas ĝi laŭdinda
De verkistoj kaj poetoj
En poemoj kaj odetoj
Pli ol tondroj de bataloj,
Pli ol dolĉaj najtingaloj,
Pli ol ĉarmoj de feinoj,
Pli ol nubaj milkombinoj,
Pli ol oro la plej brila,
Pli ol gloro senutila,
Pli ol ĉiu, pli ol ĉio
Krom la amo kaj la Dio.

Dum venonta la centjaro,
Kredu, esperantistaro,
En Eŭropo, Ameriko,
En Azio kaj Afriko
Kie ajn vi veturados,
Esperanton ektrovados,
Sur la strato, en vagono,

En hotelo, en salono,
Kaj eĉ en privata domo,
Ĝin parolos ĉiu homo,
Predikisto, profesoro,
Komercento kaj doktoro,
Kaj hebreo kaj kristano,
Kaj litovo, kaj japano;
Kaj pereos la plendado:
„Mi vin ne komprenas, frato!“

Por ke venu tiu horo —
Kune, fratoj, al laboro!
Jen per kanto, jen per vorto,
Jen agante ĝis la morto,
Servu ni al la afero,
Plej ŝatinda sur la tero;
Gardu ĝin de la forgeso,
Per parolo en la preso;
Iru, kiel apostoloj
Ĝin anonci por popoloj,
Kaj eksonu nia voko,
Sur la ter' en ĉiu loko,
En vilaĝoj, en urbetoj,
En lernejoj, en gazetoj,
Kaj servantajn al la vero
Nin fortigu la Espero.

14. 1. 1902.



Amiko, frato mia . . .

(El Nadson.)

Amiko, frato mia, laca doloranta,
Fortigu la animon per la sanktespero!
Ne plendu, ke nun estas la malbon' reĝanta
Sur nia eklavita per larmondoj tero.

Ne plendu vi, ke oni rompas idealon,
Ke la senkulpa saŭgo fluas nun tioma!
La temp' estonta, kredu, fendos la Baalon!
Kaj ree venos amo al la gento homa!

Ho, jam ne pezan krucon kun la ĉen' portanta,
Ne kun la kor' vundita per la fer' ĝi venos.
Sed montros sin per forto kaj per glor' brilanta
Kaj torĉon de feliĉo en la mano tenos.

Kaj sur la ter' ne estos plu malamikemoj,
Nek da malliberuloj malfeliĉaj miloj;
Nek la senkrucaj tomboj, malsatulaj ĝemoj,
Nek glavoj, nek vipadoj, nek la pendigiloj.

Kaj tiu ĉi alveno, kredu, kara frato,
Ne estas antaŭsento aŭ revet' vanega;
Ĉar mond' ja de malbono estas tro premata,
Ĉar nokto ĉirkaŭigis nin tro mallumega.

Jes, fine la homaro, je turmentoj sata,
La sangon trinki ĉesos, ĵetos for batalojn,
Kaj levos la okulojn je la Am' benata
Kaj eksoifos kove sanktajn idealojn.

Kaj la popoloj diros unu al alia:
Ni estu la amikaj eroj de l' homaro,
Kaj la frateca himno de la preĝo nia
Eksonu jam en unu ĉiu kristanaro!*)

*) La lasta strofo estas almetita de la tradukinto.



Ĉu vivis mi?

(El Nadson.)

Cu vivis mi? Jen la respondo:
Mi dormis . . . ĉiuj, ve dormadis . . .
Ĉar kion faris ni por mondo,
Ideon kian ni celadis?!

„Antaŭen?!“ vana trompa vorto!
Ni iru je l' pasintajn aĝojn!
Tie de l' duboj sorĉa forto
Ne turmentadis homajn saĝojn.

Tie predikon Petro diris
Pri Krista tomb', pri Dia amo;
Tie batali Tello iris,
Tie sin ludis Husa dramo . . .

Tie anstataŭ sentaŭgulaj
Malĝojoj brulis la flameco;
Kaj eĉ el faroj malbonulaj
Tie elbrilas majesteco!

Sed ni? Ho, kiel nesimila
Al fera antikveco tia,
Nun estas formikejo nia
Pigmea, besta, senutila! . . .



Post legado de gazetoj

(El A. N. Pleŝĉejev.)

Turmentas min la vido de ĉagrenvizaĝoj
En familio, kie regnas malkonsentoj;
Ankoraŭ pli — la lego de la sangaj paĝoj,
Kiuj al ni predikas pri malpacoj gentaj,

Mi amas la patrujon flame kaj sen limo,
Deziri al ĝi gloron kun potenc' necesas;
Sed al malamikemoj en mia animo
Esti je l' fremdaj gentoj tute malpermesas.

Ĉe la rakont' pri venkoj, pri batalkrueloj
Ne brulas en mi sango per la rava flamo:
Mi sendas la plej varmajn preĝojn al ĉieloj;
Por ke en homajn korojn venu ree amo.

Mi preĝas, por ke tagoj pasu jam militaj,
Por ke forgesu gentoj la malamon sian
Kaj per Evangelia vorto instruitaj
Kuniĝu jam en unu aron familian.




Kanto de junularo.

(El „Jaunimo Giesmĉ“ de Maironis.)

Melodio de Naujalis




1. Ek - so - nu, fra - toj, no - va kan - to Ju -



nu - lo ĝin kom - pre - nos nur, Pen - sa - don ĝo -



jan mi - li - tan - to El ĝi ĉer - pa - du kun ple -



zur'. Ku - ra - ĝe do sur - por - tos ni La



kan - ton ĝis nu - ba - joj La - bo - roj kres - kas



ja per ĝi Kaj nas - kas he - ro - a - ĵoj.

2. Ĉiela ruĝ' en oriento
Epokon montras sen dolor',
Ĉar tiel nia antaŭsento
Klarvoĉe diktas al la kor'.
Kuraĝe do surportos ni
La kanton ĝis nubajoj ...

3. Forlasu jam Patrujo nia
Malnovan veston de fremdul',
Ĉar ĉiu nun infano via
Ekkonas vin, mia karul'.
Kuraĝe do surportos ni . . .

4. Labori do la fratoj karaj
Obstine iru sen laciĝ',
Sciencoriĉaj, solidaraj
Al la litova liberiĝ'.
Kuraĝe do surportos ni . . .

Tradukis R. Blažys.



Himno de Esperantistoj-Katolikoj.

En la nom' de Dio, kun la am' al homo,
Fratoj, ni la Veron serĉu, skribu, diru! . . .
Plenaj de espero, dank' al ben' de Romo,
Sub la verda stelo ni antaŭen iru! . . .

Moku, kiu volas, nin pro strangideoj,
Ni ĝin ne atentu kaj eĉ ĝin ne miru! . . .
Estas ja proksimaj niaj venktrofeoj,
Tial ni batalu kaj antaŭen iru!

For malsaĝa timo, klara estas devo, —
Novajn la plej multajn anojn ni altiru;
Baldaŭ enkorpiĝos nia kara revo,
Nur ni laboradu kaj antaŭen iru! . . .

Kun la kred' en koroj per la plenscienco
Servu Idealon, la idolojn ŝiru! . . .
Jen la Esperanto — sepa mondpotenco . . .
Sciu ĝin, ho fratoj, kaj antaŭen iru! . . .

Pr-o A. Dombrovski.

Tombejo de herooj.

De Vincas Krèvè.

I.

En nia patrujo estas multe da belaj kaj ĉarmaj lokoj, estas multaj regionoj, fariĝintaj famaj pro gloraj agoj de niaj praavoj, sed inter ili ĉiuj la plej bela kaj plej fama estas Kantolando. Ĝi ravas nin per siaj altaj montetoj, per siaj malaltaj valoj, per siaj mallumaj arbaroj kun iliaj densaĵoj, kie nek homo povas trairi, nek besto trarampi, nur malgrandaj birdetoj-pepaduloj povas traflugi, nur diverskoloraj kukoloj kaj najtingaletoj, kiuj frumatene kaj malfruvespere kantfajfadas, nur ili ĝojplenigas la malserenan arbaron.

Sed pli bele ol malgrandaj birdetoj-pepaduloj, pli laŭte ol najtingaloj tie kantas junaj fratinetoj, de Kantolando belaj virgulinetoj . . .

Frumatene kaj malfrue vespere sonas iliaj kantoj en mallumaj arbaroj, en verdaj herbejoj, kiam ili rastas fojnon, kaj en larĝaj kampoj, kiam ili junulinoj la sekalon falĉas, kaj en verda ĉerizgardeno, kiam ili je junulo sopiras . . .

Kaj kion nur ili ne priparolas, primencias en siaj sonaj Kantoj! En ili respeguliĝas la luma printempo kaj nebula aŭtuno, la doloro de junulo, forrajdanta al milito, kaj la sentoj de juna knabino, enamiginta je brava junulo . . .

Ili rakontas pri gloraj pasintaj tempoj, pri grandaj faroj de praavoj kaj pri hodiaŭaj malfeliĉoj, je kiuj suferas nia Litova lando. Kaj iliaj

kantoj estas tiel belaj, sonaj kaj sentoplenaj, ke oni ne tediĝas ilin tage kaj nokte aŭskultadi . . .

Sed el ĉiuj ĉi kantoj-kantetoj la plej kortuŝa estas tiu, en kiu virgino funebrsone prikantas altan tombejon, kie kuŝas niaj patroj-herooj kaj — ripozas . . .

Mi aŭdis unu similan kanton kaj ĝin al vi rakontos . . .

II.

. Tie, kie rapidflua Merkys¹⁾, kurante-fluante tra verdaj herbejoj, tra alno-arbaroj, tra arbustkovritaj deklivoj portas sian puran akvon en larĝan Nenumas, tie estas alta kaj kruta monto, pli alta ol ĉiuj ĉirkaŭaj montoj, kaj sur tiu monto estas firma kastelo, la fama Merkine, el ĉiuj kasteloj la plej forta. Ĝin grandeguloj konstruis, ne homoj; kvindek kilometrojn de sudo kaj okcidento kaj de aliaj flankoj ili portadis ŝtonojn, kiujn ili metis en fundamenton de kastelo.

Pli alte ol la balanciĝantaj arbaroj, brilis en blua ĉielo ĝiaj turoj, kie tage kaj nokte gardistoj gardostaris. La muroj, kiujn grandeguloj kunmetis el grandaj ŝtonoj, kovriĝintaj per griza musko, severe ĉirkaŭen rigardis, kvazaŭ malserena, kolera lupo dum malvarma vintra nokto, ĉu ili ne ekvidos ie kontraŭulon-malamikon . . .

Multe-multe da malamikoj ili vidis: rusojn, polojn kaj sangtrinkantojn-krucmilitistojn. Ĉiuj ili ne unufoje vizitis Merkine, ĉiuj ili ŝiris-rompis ĝian ŝtonan bruston, kaj tamen ĝi staris fortika, malserena kaj teruriga por ili, kiel ĝi staris la unuan tagon . . .

¹⁾ Merkys estas alflurivero de Nenumas, ĉefa rivero de Litovujo, en ĝia suda parto.

Multe da sango fluis tie: ne unu ruso, kiu elinside atakas, ne unu polo, kiu estas ne tiel kuraĝa, kiel li sin gloras, ne unu krucmilitisto, kiu estas pli malbona, ol li tion pensas, kuŝigis tie sian kapon . . .

Silenta kaj trankvila estas la fortikajo. Nur Stange-rivereto, fluanta ĉirkaŭ la monto en profundaj ravinoj, sen interrompo rakontis al maljuna kastelo, kion ĝi vidis kaj aŭdis en mallumaj arbaroj, en verdaj herbejoj kaj profundaj lagoj . . .

Ĝi rakontis al kastelo multe da misteroj, kiujn nek vidis, nek iam ekvidos la homa okulo, kiujn nek aŭdis, nek iam ekaŭdos la homa orelo.

La maljuna kastelo aŭskultadis la parolojn de rapidfluanta rivereto, kiel serioza viro aŭskultas la parolon de malgranda infano aŭ de juna knabineto.

Ĝi aŭskultis kaj kvazaŭ ĉirkaŭrigardadis, ĉu ne vidiĝas ie malproksime krucmilitistoj aŭ iuj aliaj kontraŭuloj-malamikoj de nia gepatra lando, kiel ili trahakadas en densaj arbaroj larĝan por si vojon en Kantolandon.

Tiamaniere, longajn, longajn jarojn la kastelo defendis la patrojn, kiel la patrino defendas sian infaneton ne zorgante pri propra vivo, defendas de malbonokazoj, de suferoj . . .

La malamikoj ne unufoje malbenadis Merkinen, ne unufoje ili penadis detrui ĝiajn ŝtonajn murojn, elrompi kuprajn pordegojn, renversi altajn turojn, kiuj malproksimen vidas . . .

Grandajn regimentojn kondukis ĉi tien la rusoj, kiuj atakas elinside, kaj la poloj, kiuj ne tiel estas kuraĝaj, kiel ili sin laŭdas, kaj la krucmilitistoj, kiuj estas pli malbonaj, ol ili mem tion opinias . . . Sed degelis ilia potenco ĉi tie, kiel degelas la malvarma neĝo sub printempa suno.

III.

Fama en la tuta mondo estis la kastelo de Merkine; same fama estis ankaŭ la nobela gento de Kirklis, kiu de plej antikva tempo, kiun nur praavoj rememoras, sidis en la alta Merkine-fortikajo. Virojn de tiu gento honoris ne nur la homoj, kiuj loĝante en proksimo vidis la bonfarojn de bravuloj, vidis, kiel multaj el ili kuŝigis siajn kapojn defendante la tombojn de la patroj kaj la sanktan fajron de plej altaj dioj.

Multaj el ili fariĝis tiel famaj, ke pri ilia nomo sonis kordmuzikiloj de bardoj tiel vaste, kiel vaste estis parolata nia litova lingvo.

Honoris ilin ankaŭ la potencaj princoj de malnovaj Trakai kaj de granda Vilnius kaj de malnova tempo, de kiam staris Merkine, konfidis ili al plej maljuna el ili administri la kastelon kaj defendi la patrujon kontraŭ ruso, polo kaj kontraŭ malbona krucmilitisto.

Kaj neniam pentis la gloraj regantoj de Litovujo pro tiu konfido al viroj de gento de Kirklis, ĉar neniam eĉ unu el ili trompis la konfidon.

Tiamaniere longajn jarojn filo sekvis patron en la alta kastelo Merkine . . .

IV.

Sed el ĉiuj famaj viroj de tiu ĉi gento, el ĉiuj, kiuj sidis en la alta kastelo Merkine, la plej fama estis la maljuna nobelo Mykis.

Li fariĝis fama ne tiom pro faroj propraj, kiom pro faroj de siaj infanoj.

Li havis kvar filojn, kvazaŭ larĝbrancajn kverkojn, unu pli forta ol alia, pli kuraĝa, ol alia . . .

Kaj kreskis en la kastelo ĉe la patro la filoj, kvazaŭ agloj-grizuletoj en la nesto, kaj vidante

tion la patro ĝojis, ke ili kreskas je utilo al patrujo, je la gloro de la gento . . .

Kaj kiam ili plenkreskis-maturigis, ekparolis al ili la maljuna patro:

— Estas jam sufiĉe, filetoj, migradi en arbaraj densaĵoj. Ne por ĉasado vi naskigis, ne por ĉasado vi kreskis, sed por utili al patra lando, kiun defendante viaj praavoj sian sangon verŝis, ke ĝi pli bele floru, ke pli verde ĝi verdigu . . .

— Kaj ni jam longe revadas kaj songadas, — respondis la filoj, ke nur ni povu elprovi niajn fortojn en milito, ke ni povu nin glori pri nia braveco.

— Mia mano fortiĝis por utile servi al patrujo, — diris la plej maljuna filo Zubrys: — ke ĝi povu nur defendi la gepatran landon kontraŭ malbona krucmilitisto, kiel ĝin defendis niaj avoj.

Kaj Mykis forsendis sian plej aĝan filon okcidenten, tien, kie Balta maro ondigas, kie la brava princo Kejstutis malfacile luktadis-batalis . . .

Du aliajn filojn li sendis tien, kie pura Neris¹⁾ per siaj bluaj ondoj ludas, kie la fama Vilnius per siaj montoj la nubojn apogas, kie la maljuna Algirdas, la ĉefprinco de ĉiuj princoj, preparis militiron, sed kien — neniu scias . . . Nur ĉiuj pensis, ke en malproksiman blankrutenan landon.

Kaj la plej junan fileton li lasis dome, ke li estu al patro helpanto, al patrino ĝojdonanto . . .

La fratoj akriĝis siajn brilajn glavojn, elprovdadis kirasojn, kiujn el malproksimaj landoj alportis komercistoj, preparis siajn grizajn ĉevalojn por malproksima vojaĝo kaj subforĝadis per stalaj hufoj.

¹⁾ Neris-Vilia estas dekstra alfluo de Nemunas. Sur ĝi staras litova ĉefurbo Vilnius.

Kaj selinte kaj bridinte siajn vir-ĉevalojn ili forrajdis tra kupra pordego el la alta patra kastelo.

Neniu ilin akompanis, nek la junaj fratinetoj, nek la virgaj junulinoj, kiuj la kantetojn kantas; nur la maljuna patrino akompanis ilin ĝis la alta sojlo, kaj la maljuna patro ĝis la kupra pordego, ĉar tiel ordonas la malnova moro.

Nur unu junulon sopire rigardpostsekvis du lumaj okuletoj, kaŝiĝintaj malantaŭ la blanka kastelfenestro. Nur la pli aĝan filon de nobelo Mykis, la junulon Zubrys, akompanis la bluaj okuloj de bela Mejluje, filino de nobelo Kindys . . .

Neniu vidis, neniu rimarkis, ke preterrajdante kaj ame sin alrigardante la junulo multon, multon promesis al la knabino: ne nur oran ringon, ne nur silkan veston . . .

Kaj poste vidis patro kaj la maljuna patrino, ke ofte ploradis la filino, sed kial ŝi ploris, oni ne sciis . . . Nur la maljuna patrino eble ekkomprenis, sed eble ankaŭ ne . . .

Ne longe rajdis la filoj kune, nur ĝis la vojkruciĝo. Tie haltiĝis la junuloj, donante al si reciproke la manon ili adiaŭis kaj disiĝis: du forrajdis orienten, kaj Zubrys en okcidentan landon.

Forrajdis filetoj kaj kvazaŭ la malseka tero ilin forglutis. Dum du jaroj nek ili sendis falkon, nek multkoloran leteron. Kaj multe, multe ploris tiam la maljuna patrino, dum du longaj jaroj atendante siajn filetojn . . .

Priploradis junulon ankaŭ la juna knabino . . .

V.

Forpasis longa jaro, kvazaŭ serena printempa tago, forpasis ankaŭ la alia, kiel nebula, malserena aŭtuna nokto, kaj komenciĝis jam la tria, tamen ne revenas la nobelaj filoj el malproksima

vojaĝo. Nek ili mem revenas, nek ili sendas sciigon, nek grizan ĉevalon, nek multkoloran falkon. Kaj funebre ploradis la maljuna patrino sidante ĉe fenestro, malfacile ĝemadis la griza patro en la kastelo promenante.

Kaj alvenis printempo, ekpepis la malgranda hirundo alportinte ĝojan novajon: revenas du, kvazaŭ falkoj, filoj el malproksima orienta lando, kie ili peladis siajn ĉevalojn servante al la glora Algirdas . . .

Kaj revenis du junuloj kaj alportis tiom da akiro, kiom verŝajne neniu antaŭe alportadis: estis inter akirajo hakiloj kaj glavoj el malmola ŝtalo, estis oro kaj arĝento, kaj flava sukceso, kaj silka ŝtofo . . .

Ekĝojis la maljuna nobelo, kvazaŭ suno li heliĝis, kaj invitis li ĉiujn siajn najbarojn, riĉajn kaj malriĉajn, tiujn, kiuj sin okupis per glavo, kaj tiujn, kiuj per plugilo teron kulturis . . . Ĉiujn invitis la maljuna nobelo kaj aranĝis grandan festenon.

Tri tagojn kaj tri noktojn kvazaŭ rivero fluis tie vino, kvazaŭ lagoj staris tie dolĉa mieltrinkajo. Tri tagojn kaj tri noktojn ĉiuj trinkis kaj manĝis, kion nur ili volis . . . Ĉiuj partoprenis en ĝojo de maljuna nobelo kaj tiu ĝojo ne povis finiĝi . . .

Kaj kelkiu tiam enviis lin, ke dioj donis al li tiajn filojn, kvazaŭ larĝkornajn bovojn, vivantajn je utilo al patrujo, je gloro al la gento de Kirklys . . .

VI.

Ne ĉiuj ĝojis pri feliĉo de nobelo Kirklys. Ne ĝojis la maljuna patrino, atendanta la plej aĝan filon, ne ĝojis ankaŭ la belulino Mejluje, la juna filino de Kindys.

Malgajaj por ŝi estis la printempaj tagoj, malgaje lumis la varma suno, malgaje pepadis por ŝi la birdetoj en ĉeriza ĝardeno . . .

La sopiro premis la koreton de junulino, larmoj la okulojn malheligis kaj ĉiam ŝi atendis ies revenon el fremda lando, ĉiam ŝajnis al ŝi, ke iu vokas ŝin de malantaŭ la densaj arbaroj kaj altaj montoj . . .

Hontis nia junulino, ke ĉiuj ŝiaj pensoj estis tie, kie la junulo rajdis; ke ĉiu ŝia sonĝo estis pri la sama junulo jen vundita kaj ŝian helpon alvokanta, jen transformiĝinta en falkon kaj flugante la virginojn de fremda lando alloganta . . .

Kaj tiel revadis kaj sonĝadis la juna knabino la tutan printempon; jam venis la varma somero kaj la sopiro ĉiam mordadis la koron.

Ne unufoje la knabino, apogiĝinte sur kupran pordegon kaj rigardante la malproksiman vojon, vidis malproksime rajdanton . . . Ekvidinte ŝi pensis, ke revenas filo de Kirklys, la juna Zubrys — kaj la koro en la brusto pli ofte batis kaj larmoj la okulojn malheligis . . . Sed rajdis junuloj kaj preterrajdadis, sed tiu atendata, tiu deziregata ne venadis . . .

VII.

Kaj tra la tuta lando disvastigis la famo, ke malproksime, malproksime, tie ĉe Balta maro estis granda batalo. Trifoje suno levigis kaj subiris kaj la bravuloj en batalo luktis. Multe da sango tie fluis, ne unu kuŝigis tie sian junan kapon ĝis la malbona malamiko estis venkita . . .

Granda ĝojo estis en la patrolando, ke la malamiko estis venkita, ke riveroj de lia sango estis elverŝitaj . . . Ne timis jam griza maljunulo,

nek juna knabineto, nek malgrandaj infanoj nokte trankvile dormi kaj gaje matene levigi.

Kaj estimis homoj la nomon de kuraĝa princo Kejstutis . . .

Sed kiu honoris Kejstutis, tiu ankaŭ honoris la junan filon de nobelo Mykis . . . Vaste estis rakontata, ke li sola centojn morthakis, dufoje tiom da grizaj ĉevaloj piedpremis; kien li rajdis, montoj da kadavroj sterniĝis . . .

Kaj ekĝojis la koro de la maljuna patrino, kiam ŝi atendis la revenantan el milito filon Zubrys . . . Atendis ankaŭ la maljuna Kirklys, atendis tordante lipharojn kaj ĝojis, ke neniu, kiom la maljunuloj memoras, tiel brave militis, kiel lia juna filo Zubrys.

Ĉiuj atendis Zubrys'on: la patro, la patrino kaj la junaj fratoj.

Nur sola Mejluge neniu atendis: la sopiro ne premis ŝian koron. Hele lumis la varma suno en serena ĉielo, gaje pepadis birdetoj en ĝardeno de nobelo Kindis, en kiu laboradis lia filino Mejluge . . .

Pro tio ŝi ankaŭ gaje kantadis kiel birdeto najtingalo . . .

VIII.

Kaj rerajdis en patrolandon la multe famiginta Kejstutis, kaj kun li ankaŭ la juna Zubrys . . .

La brava filo de nobelo alportis nek silkon, nek oron, nek la flavan sukcenon, nur alportis li la plej grandan gloron, kian havis nek lia patro, nek liaj fratoj. Pro liaj kuraĝaj agoj ekamis lin Kejstutis, la glora princo de Trakai kaj donis al li multe da lando kaj ordonis al li estri armeopartojn. Tiel lin ekamis kaj tiel fidis al li, ke ĉie anstataŭigis sin de li.

Kvankam tre bone vivis Zubrys en kastelo, kvankam bela estis lago de Trakai, tamen lia koro ne trankviligis: liaj pensoj kaj revoj forflugadis hejmen, en la landon de Nemunas, kie sur la alta monto staras la malnova muskokovrita kastelo . . . Ofte, ofte songadis li pri la patrolando . . .

Nia rajdisto ne tiel sopiris al patrolando, al patro, patrino kaj junaj fratoj, kiel al bluaj okuloj de juna Mejluje, al bela filino de nobelo Kindis.

Li pacienciĝis unu tagon, silentis duan kaj trian, sed plu li ne povis toleri: li iris al princo kaj jene parolis al li:

— Plej alta princo! Kvankam estas tre agrable kaj gaje esti en la kastelo de gloraj viaj patroj, tamen ne trankviligas mia koro ĉi tie: ĝi sopiras al la lando, kie miaj maljunaj gepatroj vivas, kie mallaŭte Nemunas ondas. Forpermesu min hejmen, plej glora princo! Lasu min viziti miajn maljunajn gepatrojn, kiujn mi ne vidis jam dum tri jaroj.

Sed ke li volis ekvidi la junan Mejluje, pri tio li nenion diris.

— Kiu amas siajn gepatrojn, tiu amas ankaŭ nian patrolandon, nian karan Litovujon, — respondis Kejstutis. — Kvankam vi estas kara al mi, tamen mi ne malhelpos vin: rajdu en vian naskolandon por ke ekĝoju viaj maljunaj gepatroj, por ke trankviligu via koro.

Zubrys dece adiaŭis sian reganton kaj promesis baldaŭ reveni kaj servi al la glora princo per ĉiuj siaj fortoj, eĉ sian sangon ne ŝparante . . .

Adiaŭinte li sursaltis sian rapidkuran ĉevalon kaj forrajdis en sian naskolandon, ti-kie la malnova Merkine staras, kie mallaŭte Nemunas ondas kaj rapide fluas Merkys.

Kaj tutajn tagojn kaj noktojn li rajdis, kvazaŭ lin portis ne ĉevalo, sed iu neterulo . . .

IX.

Frumatene, kiam suno ankoraŭ ne levigis, enrajdis Zubrys en Merkinen. Kaj la unua, kiun li ekvidis, estis la belulino Mejluje, kiu frumatene levigis kaj preninte orajn sitelportilojn iris al puto, revante pri la amata junulo . . . Jam ne de hodiaŭ ŝi ofte rigardadas tiudirekten, kie estas la vojo al malnova Trakai . . .

Kaj ekvidinte junulon ŝi ruĝigis kvazaŭ rozofloro, kvazaŭ tiuj koraloj, kiuj ĉirkaŭ ŝia kolo pendis . . .

Kaj elversis knabineto la portatan akvon, kaj forjetis la sitelojn sur la granda vojo, kaj kurinte en la ĉambrom ŝi kortuŝe ploris . . . Kaj kial ŝi ploris, eĉ ŝi mem ne sciis.

Kaj ĝojekbrilis la juna belulo, la fileto de la glora patro, pro ekvido de la amata knabino, pri kiu li longe sopiris.

X.

Ĝojis Mykis, ke revenis filo, ĝojis tuta lia familio.

Jam ekvolis la maljuna nobelo kunvoki siajn najbarojn kaj aranĝi festenon kaj eĉ komencis jam ĝin prepari . . .

— Atendu, patreto, — diris Zubrys: — tiam vi aranĝu festenon, kiam mi estos vizitinta la maljunan nobelon Kindys, estos ekvidinta lian filinon Mejluje, estos parolinta kun ŝia patrineto . . .

Kaj komprenis Mykis, kion volas lia filo kaj aŭskultante li nur lipharojn tordis . . . Al li ankaŭ plaĉis la belaj vangoj de Mejluje.

Frumatene leviginte Zubrys elektis en patra ĉevalejo rapidkuran virĉevalon por maljuna patro de Mejluge, du multkolorajn bovinojn por sia maljuna patrino, kaj por sia juna fianĉino — la oran ringeton.

Kaj ne sola li forrajdis, sed kun maljuna svato, kiu multon vidis, multon sciis.

Kion ili tie faris kaj kion parolis — neniu tion scias, nur reveninte hejmen Zubrys petis sian patron la festenon aranĝi.

Kaj la maljuna Mykis lasis prepari montojn da bakita kaj kuirita viando, tutajn putojn da biero kaj mieltrinkaĵo. Kaj forsendis li invitan-tojn en ĉiujn kvar monddirektojn, ke ili kunvoku al edziĝfesto de glora militheroo kavalirojn, nobelojn, terkulturistojn kaj laboristojn... Neniu devis esti forgesita, ĉar da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis granda abundeco.

Kaj de ĉiuj flankoj kvazaŭ riveroj fluis homamasoj ne tiom por trinki kaj bonguste manĝi, kiom por ekvidi la gloran junulon kaj lian belan fianĉinon...

Tri longajn tagojn, tri noktojn ĉiuj trinkis kaj manĝis, kion ili volis kaj ĝojfestante ĉiuj laŭdadis la kuragan junulon, lian maljunan patron kaj lian belan fianĉinon.

Longe poste homoj rememoradis tiujn tempojn, kiam Zubrys festenis sian edziĝon.

XI.

Tri tagojn, tri noktojn trinkis kaj manĝis la gastoj en la kastelo de Merkine. Tri tagojn ĝojis Zubrys pri sia juna knabino.

Kaj ne vane li ĝojis, ĉar bela kaj puranima estis tiu juna bofilino de Kirklys. Kiel la suno en serena ĉielo inter la blankaj nubetoj, tiel estis

ŝi en la salonego de la malnova Merkine inter aliaj junulinoj aŭ junaj edzinoj. Kien ŝi paŝadis, tie ĉies vizaĝoj serenigis, kie ŝi vorton diris, tie gaje eksonadis rido... Kaj ĉiuj ekamis Mejlujе pro ŝia gaja karaktero, pro ŝia bona koro, kaj precipe la maljuna bopatro Kirklys, al kiu la dioj ne donis propran filinon...

Tri tagojn, tri noktojn ĉiuj trinkis, manĝis kaj la kvaran tagon ĉiuj interkonsentis rajdi trans Nemunas en malluman arbaron ĉasadi arbarbestojn, iom plivigli la ĉevalojn, ekzerci la jetadon de laĉo kaj la arkapafadon.

Interkonsentis la viroj rajdi en la verdan arbaron, kun ili rajdas ankaŭ la juna Zubrys.

Rajdas Zubrys, ne postrestas ankaŭ lia juna edzino, la belulino Mejlujе.

Kaj forrajdis ĉiuj frumatene, dum la suno ankoraŭ ne leviĝis, forrajdis de la alta monto, de l' kastelo de Merkine... Kaj kiom da ĝojo, kiom da rido estis, ĝis ili ĝisrajdis la profundan larĝan Nemunas...

Kaj kiam ili ĝisrajdis Nemunas, kelkaj iris tien, kie la maljunulo Kulvys, griza kiel floranta pomarbo, en boato transveturigadis la dezirantojn, kaj la aliaj rajdis rekte en la malvarman akvon de rivero kaj rajde tranaĝis larĝan Nemunas.

Kulvys ne estis atinginta ankoraŭ mezon de la rivero, kiam li ekvidis tranaĝantan Nemunas en direkto al Merkine larĝkornan cervon.

Mejlujе ekkaptis pafarkon kaj streĉinte ĝin forflugigis sagon al cervo. Bone trafis Mejlujе, trafis en la kolon, kaj la ondoj de Nemunas *ruĝiĝis*. Sed malforta estis mano de Mejlujе, malforte ŝi streĉis la arkon, kaj la cervo plue naĝis al la bordo. Ĝi preskaŭ jam estis atinginta la bordon, kiam alrapidis Zubrys kaj enprofundigis

en ĝian kolon fortan lancon. Kolere eklekis cervo, eĉ arbaroj eĉe resonis, kaj renversigis sur bordaj ŝtonoj.

— Bona signo! — ekkriis la viroj.

— La dioj favoras nian ĉasadon, ke la cervoj eĉ mem al ni kuras, — diris la kuraĝa Zubrys.

— Ova! ni mortigos tutajn veturilojn da bestoj. Tutan jaron ni manĝos kaj ne povos formanĝi.

— Ne rajdu ĉasadi, nobeloj, — diris la maljuna Kulvys, kiu multon vidis dum sia vivo: — turnu viajn ĉevalojn reen: en arbaroj estas maltrankvilaj tempoj, se la bestoj kuras en kamparojn.

Ne atentis ĉi tiujn vortojn la nobeloj kaj gaje forrajdis en arbaron. Tuj ekeĥis la arbaroj de trumpetsonoj.

Kaj ektimis la bestoj kaj kaŝigis en densaĵoj. Ektimis, ke la filoj de Kantolando forrajdis ĉasadi.

Kaj disigis la ĉasistoj traserĉante la krutajn deklivojn, la arbaron kaj arbardensaĵojn . . .

XIII.

Disigis la homoj en arbaro, multe da kapreoloj ili mortpafis, multe da ursoj ili mortpikis.

Sed neniu tiom mortpafis, kiom la juna Zubrys. Nur unu kapreolon, kiun vundis Mejluge, li ne povis atingi kaj ĝin persekutante li forvagis profunde en arbaron.

La suno jam estis malalte, la arbaro jam envolvigadis en noktan kovraĵon, kaj li ĉiam ankoraŭ postsekvis.

Jam la suno subiris kaj malluma nokto kuŝigis sur arbaron, kaj li ĉiam ankoraŭ persekutis. Kaj persekutante li ekaŭdis fortan korntrumpetadon . . .

Kaj oni trumpetis ne tiel, kiel oni trumpetas dum ĉasado alvokante la malproksimen forvagin-

tojn, sed tiel, kiel oni trumpetas alvokante la junulojn al milito, anoncante la grandan danĝeron.

Ploris la arbaro kaj ploris la arboj, same kiel la koro de juna ĉasisto aŭskultante ĉi tiun trumpetadon.

Ektimis Zubrys kaj pelis sian ĉevalon tien, kie la kornoj trumpetis, kaj lian koron kvazaŭ katoj disŝiradis. Kion nur ne pensis, ne imagis Zubrys kaj pro siaj timopensoj ĉiam pli rapide pelis la ĉevalon. Gemis la ĉevalo kvazaŭ plendante, ĝi saltis tra fosajoj, tra trunkrestoj kaj de vento faligitaj arboj. La branĉoj disŝiradis ĝian haŭton, pikadis ĝiajn flankojn, deŝiradis vestopartojn de la rajdanto, sed ĉi tiu nenion sentis, nur ĉiam plirapidigadis la ĉevalon. Kvazaŭ iu demono aŭ ventego kurflugis la ĉevalo de Zubrys. La sola penso okupis nun lian menson: kie estas nun lia belulino Mejluje? Eble urso ŝin atakis, eble ursino ŝin sufokis aŭ larĝakorna cervo ŝin mortpikis... Ĉu ŝi nun ne estas en danĝero kaj helpon alvokas?...

Kaj jen denove eksonis la trumpeto, tie malproksime, kie la alta Merkine staras; kaj en la ĉielo li ekvidis la bruloruĝon: de sur la altaj turoj de Merkine estis donataj fajrosignaloj. Kaj ekkomprenis la junulo, ke ne en ĉasado okazis malfeliĉo, sed ke la patrujo alvokas helpon de ĉiuj, kiuj scipovas uzadi la armilon. Ekmiris la junulo, de kie povis malamiko subite aperi, ĉu de oriento — la blankrutenoj, ĉu de sudo — poloj, aŭ eble de okcidento — la sangavidaj germanoj krucmilitistoj?

Sed ne longe miris, ne longe dubis Zubrys: la vojo estis barita de malbonaj krucmilitistoj.

Ili multaj estis, kaj li sola. Kaj komprenis tiam la junulo, ke malfrue estas serĉadi la junulinon kaj ke li sola devos formeti sian kapon.

Kaj ekmalĝojis koro de junulo, ke ĉiuj lin sola forlasis je venĝo de malamiko. Profunde ekspiris la junulo alvokante helpon de plej altaj dioj: „Prefere mi juna pereos, mian liberan kapon formetos, ol fariĝos sklavo de krucmilitistoj . . . Dioj plej altaj, Perkuno¹⁾ plej potenca, portu min nur en Nemunas, ke la malamikoj ne moku, ke neatendite min atakis, facile min venkis . . . Kuru, kuru ĉevaleto, portu min junulon almenaŭ ĝis Nemunas-rivereto.“

Multe da krucmilitistoj baris la vojon al junulo. Ili estis multaj kaj li sola. Sed ne haltigis la bravulo sian ĉevalon, nur kiel rajdis, tiel preterrajdis . . . Kaj kie kuris lia griza virĉevalo, tie per krucmilitistoj estis sternita la tero: en malbona, malfeliĉa tempo la barbuoj baris la vojon al revenanta militheroo!

Ekblekis la krucmilitistoj kvazaŭ serpento ilin mordis, ekvidinte ke la junulo forkuris kaj postsendis al li centojn da sagoj; flugis la rapidaj sagoj, unuj preterflugis, aliaj vundis la ĉevalon, triaj disŝiradis la blankan korpon de junulo. Bone estis nun al malamiko postsekvi: kie la junulo rajdis, tie sangosignoj restis. Tiu sango estis ne de malnoblaj krucmilitistoj, nur de brava junulo aŭ de lia ĉevalo.

— Portu, ĉevaleto, portu min junan nur en Nemunas, en profundan akvon!

La krucmilitistoj sekvas, kun hundoj ili persekutas ĉiam pli kaj pli proksimen: laciĝas lia griza ĉevalo, per sango ĝi ŝvitas.

— Portu, nur portu, ĉevaleto, min junan en rivereton, en profundan akveton!

¹⁾ Perkuno estis la ĉefa dio de idolanaj litovoj, estro de fulmotondro.

— Ho, volonte mi portus, se mi forton havus, mian junan rajdiston ne nur en larĝan Nemunas, sed ankaŭ en altan Merkine.

Faletis la ĉevalo tra fosajo saltante.

— Saltu, ĉevaleto, portu min junulon en Nemunas larĝan: la sangavidaj krucmilitistoj estas proksime!

— Volonte mi portus, se nur mi povus, ne nur en Nemunas larĝan, sed ankaŭ en altan Merkine . . .

Faletis jam duan fojon la ĉevalo tra ŝtono saltante, la marĉeton evitante . . . Faletis la ĉevalo kaj defalis la helmo de junulo.

— Saltu, ĉevaleto, saltu rapide, portu min junulon nur en rivereton profundan. Proksime estas jam Nemunas, proksime ankaŭ la malbonaj krucmilitistoj!

— Volonte mi kurus kaj mian rajdanton portus, se nur mi forton havus, se ne en malnovan Merkine, tiam almenaŭ en profundan Nemunas . . .

La trian fojon faletis la ĉevalo jam sur verda ebenajo. Faletis la ĉevalo kaj defalis la junulo. La junulo rapide leviĝis, sed la ĉevalo restis kuŝanta, nur malgaje rigardis, kvazaŭ adiaŭante sian rajdiston . . .

— Restu sana, rajdisto, mi vin plu ne portados kaj vi ne plu fieros je mi! Memoru min. Sed kuru nun, ĉar proksime estas la krucmilitistoj kaj ili rapide atingos vin piedkurantan.

La junulo ĉirkaŭprenis kolon de brunulo, kvazaŭ la patrino sian filon, kaj ame ĝin kisis. Dolore ekblekis lastafoje la ĉevalo . . .

Per ĉiuj fortoj kuris la junulo ĝis li atingis Nemunas-riveron, kiu faras al si la vojon tra la densaj arbaroj kaj la altaj montoj.

La krucmilitistoj ne sukcesis atingi la junulon. Li vadis en riveron kaj naĝis al ĝia alia bordo. Estis laca la junulo, rapide fluis la riveraj ondoj kaj malproksimen forportis Zubrys ĝis li atingis la alian bordon. Terure laciĝinte li atingis Merkinen nur je sunsuriro la sekvantan tagon.

Kaj li trovis tie ĉiujn sanajn revenintajn de ĉasado, nur ne trovis li sian plej junan fraton kaj sian plej amatan belulinon Mejluje.

Nur ili du ne revenis hejmen.

XIV.

Ne malvarma norda vento la arbaron muĝigas, ne la verda kverko bruas-krakas, nur la juna edzo sian sorton malbenas kaj alvokas venĝon de plej altaj dioj pro sia juna edzino, pro ŝiaj oraj harligoj.

La sorton li malbenas kaj al si la harojn ŝiras. La doloro, kvazaŭ per pinĉpreniloj al li la koron premas.

Ne la arbaro ekmuĝis, ne la tondro eksonis — nur ekparolis la junaj bravuloj, de la Kantolando kuraĝaj militistoj:

— Vidu la dioj, aŭdu plej potenca Perkuno la dolorajn niajn vortojn: kiom da flavaj haretoj estas en la harplektoj de junulino, tiom da kapoj ni dehakos al malbonaj krucmilitistoj. Kvankam eĉ ni mem pereus, la junajn niajn kapojn ni perdis, tamen la junulinon ni venĝos.

— Ne ploru, frateto, ne ploru, kavaliro, per ploro kaj malbeno vian sorton vi ne plibonigos.

— Facile estas al vi, fratetoj, paroli kaj la venĝon juri! Sed per kio mi venĝos, fratetoj, kiamaniere mi venĝos, kavaliroj? . . . Perdis mi knabinecon pro mia malsageco! . . . Perdis mi knabinecon, mortpelis mian fidelan ĉevalon, seniĝis de blanka glavo! . . .

— Ni venĝos, frateto, ni venĝos, kavaliro, pro via juna knabino, pro ŝiaj belaj vangoj, pro ŝia gracia irado. Ni venĝos pro via knabino, pro via glavo kaj la fidela ĉevalo.

— Ne plendu, fileto, ne ploru kavaliro, — ekparolis la maljuna Mykis: — ĉe via patro en ĉevalejo estas multe da ĉevaloj kaj en armilejo estas multe da glavoj. Tie trovos vi konvenan al la mano glavon, nur ne plu trovos vi tian knabineton.

Ne la ventegoj kolere bruadis, ne la arbaro obtuze muĝis — nur parolis la junaj bravuloj — de Kantolando kavaliroj, konsolante sian fraton Zubrys.

XV.

Kiel mallumaj nuboj malheligās la serenan tagon, tiel ĉirkaŭis per densaj amasoj la krucmilitistoj la kastelon Merkinen. En ĉielo ne estis tiom da lumaj steletoj, kiom estis tie de sanga-vidaj barbuloj.

Sed se granda estis la nombro de malamikoj, des pli granda estis kolera ekscitiĝo de kuraĝaj Kantolandaj militistoj. Ĉiuj silente prepariĝis atendante la batalon.

Tutan nokton neniu fermis la okulon: la viroj portadis ŝtonojn kaj laborojn por dece renkonti la karan gaston; la virinoj por la festeno ne birdajon kaj bestajon bakis — ili boligis akvon kaj peĉon. La gastoj havos kion trinki.

Kaj la gastoj ankaŭ longe prepariĝadis por iri al festeno al la maljuna nobelo Mykis: la tutan tagon kaj la nokton. Nur la sekvantan tagon je sunleviĝo ili komencis surgrimpadi la altan monton, kie staris la malgajaspekta Merkine.

Ili iris ne solaj, sed kun la plej juna filo de Kirklys kaj kun la plej bela lia bofilino.

Ĉu ili la vojon montradis kaj la gastojn hejmen kondukis? Nek ili la vojon montradis, nek ili la gastojn kondukis en la altan bienon de sia patro, en la kastelon de princo. Ambaŭ ili estis ligitaj per ŝnuroj, kaj surmetinte kondukilojn sur ilian kolon la malnoblaj krucmilitistoj ilin kondukis . . .

Ekmiris la viroj tion ekvidinte kaj la kuraĝajn manojn mallevis.

Mokis la krucmilitistoj dirante:

— Malfermu la pordegojn! Ĉu vi ne vidas, ke la regantoj la gastojn kondukas?

— Ĵetu trabojn, verŝu peĉon kaj bolantan akvon. Kial vi okulumas kvazaŭ kornikoj? . . . Aha, vi timas malbone nin trinkigi, ke la regantoj ne ekkoleru . . .

— He, vi, portu al ni bongustan vinon kaj blankan bestaĵon, ke ni fortiĝu por grimpi sur la altan monton.

Kaj tiamaniere ili mokadis, per lancoj puŝadis lacigitan Kriokys, filon de nobelo Kirklys, kaj lian junan bofilinon, Mejluję . . .

— Ha, kion vi atendas, malvigluloj! Se vi ne volas, ke ni ligu ankaŭ vin, kiel hundojn, larĝe malfermu la pordegon kaj akceptu nin kiel gastojn. Tiam ni lasos vin vivaj.

Aŭskultadis viroj, kolermalĝojaj, kiel mallumaj nuboj. Silentis ankaŭ la maljuna Mykis kaj siajn lipharojn mordadis.

Nur sola Zubrys ne silentis, rompante siajn blankajn manojn kaj ŝirante siajn flavajn harojn li alvokadis Perkunon, ke li sendu en lian kapon la fulmotondron.

Silentis Perkuno . . . Kaj la krucmilitistoj de ĉiuj flankoj grimpis ĉiam pli kaj pli proksimen . . .

Kaj ekparolis Kriokys, la plej juna filo de Mykis, kaj ekparolis Mejluje, la kuraĝa litova knabino:

— Viroj, vi timu almenaŭ Perkunon, se vi ne hontas homojn! Kial vi silentas, kial vi ne batas tiujn ĉi malbenitajn hundojn, kiuj bojadas al vi? Ĉu nia vivo estas por vi pli kara ol la patruja libereco? . . .

— Fratetoj, junaj kavaliretoj, se vi ne batos la malamikon, se vi elliveros al ili la kastelon, vi tamen ne savos min knabinon. Nur miserigos vi la patrujon, nur sklavigos vi viajn junajn fratinojn, nur perdos vi vian liberecon.

Kaj ili petis, petegis, ke ilin ne kompatu, ke defendu la patrolandon.

Kaj la malsaĝaj malamikoj ne komprenante, kion parolis la junuloj, pensis, ke ili petegas elliveri al malamiko la kastelon por savi ilian vivon . . .

Kaj ĝojante pro tio ili ankoraŭ pli multe mokridis.

Silentis viroj kaj iliaj vizaĝoj estis pli malmumaj ol aŭtuna nokto, kiam la fulmotondro ekokupas la tutan ĉiellarĝon. Kiel Perkuno en malproksimo kolere fulmotondras, tiel kolere ili malbenadis la malbonan krucmilitiston . . . Malbenadis kaj multon al li promesis . . .

Silentis la maljuna Mykis, nur mallevinte sian grizan kapon siajn lipharojn li mordis.

— Ha, viroj, se vi timas la malamikon, mi lin ne timas! — ekkriis Kriokys. Kaj ekskuigis la junulo kaj streĉigis: defalis de li la ligiloj kiel defalas de arbo la folioj aŭtune. Kaptis li el manoj de plej proksima krucmilitisto lancon, sed ĉi tiu ne ellasis la armilon, nur profunden enigis ĝin en bruston de junulo.

Ekkriis viroj, kvazaŭ unu, sed la maljuna Mykis donis signon per la mano kaj denove ĉiuj eksilentis. Kolora fajreto montriĝis en liaj okuloj — kvazaŭ lupaj okuloj dum aŭtuna nokto — tiel lumis liaj okuloj.

— Tiel vi ĉiuj kiel hundoj pereos, se vi ne malfermos la pordegon! — kriis la krucmilitistoj.

— Viroj! — parolis la knabino: — ĉu pro tio, ke mi estas malforta kaj ne povas disŝiri miajn ligilojn, mi ne povos morti kiel mia frato mortis, ĉu vi pensas, ke mi ne amas patrujon? Plej karaj viroj, ĉu pro mia sola vivo vi perfidos la patrajn tombejojn, la sanktan fajron de dioj, brulantan en familiaj hejmoj!

Kaj tiamaniere plorante parolis la knabino, dume Mykis ĉiam ankoraŭ staris senvorta.

— Mia kara edzo, vi estis kiel falko kuraĝa, vi ne estus lasinta hontigi min, nek vin, nek nian patran landon. Vi mem verŝus mian sangon kaj poste pro sia knabino venĝus. Sed pereis mia kara edzo transe de Nemunas-rivero, nur ne pereis mi malfeliĉulino! . . .

Eksaltis la juna Zubrys, prenis en lertan manon sian fortan pafarkon kaj pafis tien, kie la knabino kortuŝe ploris.

Li celadis ne al malamiko, nur en koron de sia amatino. Kaj falis knabineto kvazaŭ subhakita verda tilio, eĉ vorton plu ne dirinte.

Haltiĝis la konsternitaj malamikoj . . . Ekkriis litovoj . . .

Neniu tion atendis.

Kaj eksiblis, ekfajfis la sagoj, brue falis sur kapojn de krucmilitistoj la pezaj ŝtonoj kaj grandaj traboj. Kvazaŭ riveroj fluis la bolanta peĉo.

Kaj grandan amason de krucmilitistoj sternis sur la teron niaj bravaj junuloj. Grandan festenon

arangis la nobelo Mykis por la nevokitaj gastoj. Multaj el ili mortdrinkis kaj por eterne restis kuŝite, kie la rapidkuranta Merkys plaŭdas, kie la larĝa Nemunas ondiĝas, kie la malgaja kastelo de Merkine staras . . . Kiu ne estis mortigita per hakiloj kaj glavoj, tiun dispremis la ĉevalaj piedoj aŭ englutis la ondoj de rivero.

Eĉ unu malamiko ne postvivis, neniu revenis hejmen, nur tiuj, kiuj estis portataj de la Nemunas larĝa. Sed pro ilia reveno ekĝojis nek patro, nek patrino, nek la juna fratino . . .

Altpreze pagis, forte venĝis kavaliroj de Kantolando por la bela vizaĝo de Mejluje. Kaj en ŝia harplekto ne estis tiom da flavetaj haroj, kiom da kapoj propraj kaj malamikaj kuŝigis la junaj militantoj.

Multe da militistoj ekdormis tie por eterne. Inter ili ankaŭ la tri filoj de Kirklys, kaj eĉ la heroo Zubrys ne postrestis.

Multaj patroj kaj patrinoj ne plu ĝojis pri la varmaj, serenaj somertagoj. Ne ĝojon portis ili ankaŭ al gemaljunuloj Kirklys, perdintaj ĉiujn siajn infanojn.

La postvivintaj viroj kunmetis sur la dekstra bordo de Nemunas grandegan ŝtiparon, metis sur ĝin tri filojn de Mykis, tri filojn de la glora gento Kirklys, kaj ankaŭ la kvaran Zubrys kun lia brava belulino Mejluje. Forbruliginte la heroojn oni surŝutis el flava sablo altan monteton kaj sur ĝia supro konstruis altan tureton, ke de malproksime oni ĝin vidu, ke la malproksimaj nepoj memoru, ke la heroo oferis por sia patrujo sian junan vivon kaj eĉ sian plej karan junedzinon.

La turo longe jam malaperis: la tempo ĝin mordetis, la pluvo ĝin vipadis kaj la manoj de homoj ĝin detruadis.

Restis nur sole la tombejo, alta, longeta, per abiarbareto kovrita. Kaj eĉ ĉi tiun tombejon la kolera vento detruadas, la flavan sablon forblovante. Kaj eĉ la arbaroj malaperas . . .

Kaj la homoj forgesis, kiu kuŝas en ĉi tiu tombejo, nur oni scias, ke tie kuŝas ne ordinaraj mortemuloj.

Kaj la maljunuloj rakontas, ke tie grandeguloj, herooj kuŝas, sed kiuj, tion neniu scias.

La malfortaj idoj forgesis, kiel la maljuna nobelo Mykis aranĝis la edziĝfeston por sia bofilo Zubrys.

Forgesis ĉi tion la proksima gento, forgesis ĝin ankaŭ la pli malproksimaj homoj.

Aŭ eble ili tute rezignis je siaj prapatroj kaj sia gepatra lingvo . . .

Silentas la ĉirkaŭo . . . Jam ne tintas plu glavoj, ne blekas plu de Kantolanda militistaro ĉevaloj, nur malĝoje ploras la nudiĝinta monto de Merkine. Ploras ĝi, ploregas, ke la filoj de Kantolando ĝin forgesis.

29. 12. 1911.

Trad. J. Maĉernis.



El Krève-Mickevičius.

Sorto de l' pego.

Somero . . . Tagmezo . . .

Arbaro bruas, kvankam mi tute ne sentas venton: ĝi kuradas sur altaj vojetoj, sur pintoj de l'arboj.

Arbaro estas plena je mistero, profunda trankvileco kaj potenco kiel ekzistaĵo, kiu multe scias kaj komprenas.

Mi sidas sur ŝtupo kaj aŭskultas, metinte pafilon sur genuojn.

Kaj ŝajnas al mi, ke l'arboj scias iun misteran sciaĵon, ke ili intermurmuretas, parolas unu al alia pri ĝi, balancante la pintojn, sed mi scias nenion, mi ne komprenas . . .

Kaj mi tiel malĝojas, ke mi ne komprenas, kion murmuras la arboj.

Kial ili estas tiel mallautaj, trankvilaj?

Eble ili jam scias, kie loĝas feliĉo, eble ili jam komprenis, por kio vivas tiu-ĉi mondo, kia estas la senco de tiu-ĉi vivo — senco, kiun mia koro sentas, ke ĝi estas, sed la vojon al ĝi eltrovi ne povas, ne scias, kvankam tion deziras tiel dolore . . .

Kial estas la arboj tiel trankvilaj, tiel mallautaj? Kian misteron kaŝas de mi la arbaro? Pri kio murmuratas ĉi-tiuj belkreskaj arboj?

Mi ne scias, ne scias . . .

Kaj neniun diras al mi . . .

Taŭkst-taŭkst, taŭkst-taŭkst! . . . sonas tra l'arbaro. Tio-ĉi estas la pego, kiu enkroĉiĝis en seklignon kaj ĉizas ĝin. Ĉizas tuta sindonita al unu deziro — plej rapide elĉizi la larvon, kiun per sia korpo elkreskigis, elnutrigis la arbo, belkreska pino . . .

Ĝi ankaŭ iam estis trankvila, ĝi ankaŭ intermurmuretis kun aliaj, balancante la altan pinton; nun ĝi mortis por ke vermo nutriĝu . . .

Ĉizas la pego kaj ĉizas, kaj ĝi ne pensas pri mi, kiu ĝin povas mortpafi, nek pri arbaro bruanta, nek pri tiuj altkreskaj balancantaj arboj, kiuj unu al alia diras sekreton.

Eble ĝi jam longe aŭdis ĉiujn misterojn, kiujn arbaro bruas, kiujn l'arboj rakontas . . . Eble ĝi jam scias, ke l'arbaro por tio ekzistas, ke

ĝi en tiu arbaro flugadu, ke l'arboj por tio kreskas, ke ĝi havu sufiĉe da larvoj kaj insektoj . . .

Mi sidas sur stipo metinte la pafilon sur genuojn kaj aŭskultas kiel bruas l'arbaro, kiel l'arboj bruetas, kaj la pego ĉizas kaj ĉizas . . . Hundeto alkuris, kuŝiĝis ĉe miaj piedoj kaj, elŝovinte la langon, spiradas . . .

Hundeto, hundeto! por kio ni vivas? Ĉu mi, por ke ci kuradu en arbaro kaj ne estu malsata, ĉu ci, por ke al mi ne estu tiel enue en l'arbaro vegeti . . .

Jen la pego ĉizas kaj ĉizas kaj entute nin ne evitas. Al ĝi estas tute sufiĉe, ke ekzistas l'arbo, plena je larvoj. L'arbo mortis, pereis, sed per tio gajnis la pego: tiu-ĉi arbo pereis, por nutri per sia korpo la larvojn; tiuj-ĉi larvoj kreskas, por ke la pego ne estu malsata . . .

Ej, pego, atentu, ke mi cin ne demandu, por kio ci vivas, kial ci estas feliĉa? Ej, cin gardu, ke mi ne deziru ekkoni, kion mi tiel dolore volas scii, ne intencu eltrovi tion, kion mi tiel labore serĉas. — Ej, pego, cin gardu! . . .

Ne evitas min la pego. Nur ĉizas kaj ĉizas . . . Eble ĝi jam sentas malproksime la larvon, jam ĝin persekutas . . .

Kik-kik — krias la pego. Ĝi tiel ĝojas, ke lia deziro efektiviĝis, ke larvo jam estas en lia beko. Kik-kik . . . Ej, pego, ĉu ci estos feliĉa kaptinte la larvon, cian deziron plenuminte, kaj mi, estro de ĉiuj kreaĵoj . . . Efi, pego! . . .

Mi sublevis pafilon kaj celis . . . Ekbruas l'arbaro kaj l'arboj ekstremis . . . Defalis la pego, eble ankoraŭ ne englutinte la larvon . . . Defalis kaj kvazaŭ mem ne sciis, kio ĉi-tie okazis al ĝi.

Turniĝis sur unu loko, kriis, saltis kaj ankoraŭ ne povis kompreni, ke ĝi jam estas mortpafita,

ke jam ne por ĝi verdiĝas l'arbaro, ne al ĝi jam pereas la arboj belkreskaj, subhakitaj per larvoj, ne, ne por ĝi . . .

Malĝoje, ho, kiel malĝoje . . .

Premante, domaĝe . . .

Jen la tago estas varma kaj la suno brile lumas kaj l'arbaro estas trankvila kaj paca, kiel antaŭe, kaj l'arboj intermurmuretas, kiel antaŭe, kaj neniu observas, neniu rigardas ke tie-ĉi mortas vivajo . . .

Pereas la mondo, kiu vivis en ĝi . . .

Kaj tiel ĉiam kaj ĉie . . .

La pego ankoraŭ rerigardadis, saltadis, rampis sub arbetajojn. Alkuris la hundo, ekkaptis ĝin je la kapo — kaj nur flugilojn ekskuis la pego . . .

Manĝu, hundeto, manĝu la pegon, se bongusta, ĝi estas por ci.

Nun mi scias por kio l'arbaro bruadas, por kio en ĝi sensukiĝas la arboj altkreskaj, subtrancitaj per larvoj . . .

Nun mi scias, por kio vivis kaj por kio pereis la pego . . .

Nun mi komprenas, por kio mi vivas, por kio suferas, por kio mi faras la bonon kaj krimon . . .

Por kio mi pereigis unu vivajon, kiu vivi deziris kaj rajton por tio-ĉi havis . . .

Mi scias, por ke mi mem vivu, kian fabelon rakontas la arboj, pri kia mistero murmuras altkreskaj kaj unu murmuretas al alia.

Ili murmuras, ke mi, la homo, sinjoro de l'mondo, inter agloj la aglo, vivas por tio, ke la hundo ne malsatu . . .

Ili murmuretas, ke mi sterkigos per mia korpo la teron, sur kiu elkreskos bela tremolo, kaj en tiu tremolo troviĝos malgranda larveto . . .

Esperantigis J. Koch.

Napoleono Ŝeŝjavilkis.

I.

Napoleono lernas.

Kiam Napoleono finis komencan lernejon, lia patro forveturigis lin en lernejon de diversaj metioj en Vilno. Li jam estis 14 jara. Li estis forta, bone nutrita. Tial dum unuaj jaroj li ĉion volonte laboradis: ĉarpentis, tornis el ligno kaj ŝtalo. Kaj ĉar en tiu ĉi lernejo oni same bone instruis el la libroj, do dum du jaroj Napolĉjo, forgesinte ĉion en la mondo, enprofundiĝis sole en la librojn; li revadis nur pri scienco, kaj ĉe fino de l'jaro la lernejo lin eksigis, kiel tute ne taŭgan por metioj.

Al patro, alveturinta por repreni la filon hejmen, la instruistoj konsilis sendi lin en realan lernejon. „Nu, por li ne konvenas fariĝi metiisto, kiam li estas viro de l' scienco.“ Kaj la patro konsentis.

Napolĉjo estis jam tiom kleriginta, ke akceptita en la malsuprajn klasojn nur pro iaj mankoj de programo, certe havis nenion por fari. Kaj li komencis gravuri. La okuloj de tuta klaso sin turnis al la benko de Napolĉjo, kie li, artamanto, kun firme kunpremitaj lipoj, kurbiginta sur la benko knedis sian vakson aŭ panmolajon; oni supozis ian surprizon: estos iu kolego portretita aŭ instruisto karikaturita. Tiu ĉi lasta afero tiom plaĉadis al la klaso, tiom liveradis da ĝojo, ke je ĝi estis infektitaj eĉ instruistoj mem. Longe ili ŝajnigadis nevidantaj, kion faras Napolĉjo, kaj nur tiam sin jetadis por „konfiski“

lian laborajon, kiam kolegoj ekstreĉadis la kapojn por ekvidi ĝin kaj nepovis reteni ridon. Konfiskante, ili mem ridetis pri ĝi kun siaj kolegoj en la ĉambro de instruistoj kaj prenis karikaturojn hejmen, kiel maloftan rememoraĵon.

Dum du jaroj bataladis la instruistoj kontraŭ tiu flanka sinokupo de Napolĉjo, kaj fine konsilis al la patro repreni lin kaj prefere redoni al la artmetia lernejo. „Ĉar se oni lin dece instruos en artoj, eble li fariĝos dua Antokolski.“

Ankaŭ ĉi tie Napolĉjo laboris tutan jaron eĉ dum noktoj. Tiom li ĉi tie estis pentrinta kaj skulptinta, kiom alia eĉ dum tri jaroj ne sukcesus fari. Sed post unu jaro li ree ĉion forjetis kaj komencis blovi fluton kaj muziki violonon. Napolĉjo duone faris nenion; por ĉiu afero li dediĉis tutan sian animon aŭ tute nenion. Li muzikadis kaj tubon blovis dum tutaj horoj, ree pohore vizitadis muziklecionojn, ĝis kiam la lernejo ordonis al li prefere elekti por si muziklernejon, kaj ne vanuzi la tempon kaj lokon de aliaj. „Vi translokigu lin en muziklernejon“ — konsiladis la instruistoj kaj konatuloj al lia patro.

La patro nenion plu respondis. Mordante la dentojn la patro reveturigis Napolĉjon en Paŝvenĉjus, promesante al si tiom lin enjungi en laboron, ke li rekompencu la elspezojn por sia instruado. Tiel Napolĉjo finis sesjaran studadon.

II.

Napoleono laboras.

Estante en la beleco mem de la aĝo kaj de bonfarto, Napoleono Ŝeŝjavilkis reigita en la vilaĝan vivon sentis sin, kvazaŭ fiŝo en la pura akvo, kaj same entuziasme ekprenis la terkulturajn laborojn, kiel li ordinare amis ĉiun novan okupon.

Mirinda estis lia kapableco, ĉar kun la vilaĝaj laboroj li konatiĝis nur ŝtelmaniere — dum la someraj libertempoj.

Fajfante, kantante aŭ simple diversajn sagaĉojn murmurante, Napoleono plugis kampon, falĉis fojnon, draŝis grenon aŭ sterkis sterkon neniom malplitaŭge ol al kutimiĝintaj dungitaj laboristoj, sed pli bone, ĉar pli pacience. Tial laboristoj de Ŝeŝjavilkis jam nenien volis iri solaj, sen Napoleono. Ĉe komuna laboro, rigardante tiun belan el sango kaj lakto junulon, kaj aŭskultante liajn arbitrajn murmuradojn, oni mem laboradis pli volonte kaj senenue.

Matene Napoleono salte ellitiĝadis, ankoraŭ dormema li ŝanceliĝadis mizeruleto; ŝajnis ke jen, li renversiĝos reen en la varman liton. Sed ne, li venkas sin, kaj kun tuta sia blonda kapo sin ŝovas en la lavujon plenan da ĵus ĉerpita malvarma akvo.

— Brrr... laŭtigas li, tamen lavas sin, kaj la juna sango batas vizaĝen; fajre brulas la vizaĝo, flame flagras la oreloj, en la lavujo frotitaj. Malvarmeto de l' mateno ekstremiĝetas la tutan korpon. Li sinskuegis.

Li prenis el la stalo satan ĉevaleton. Matene ĝi ankaŭ estas mallerta. Ĝi iras retenigante, sinstrecigante, postan piedon rektigante.

— Nu, nu! Ne ŝtelisto ja cin kondukas, kial ci iras forŝovinte piedon? Ĉu ci avertas min, ke oni cin forŝtelos. Tio estas ebla afero, ci ja estas diligenta laboristo. Sed mi cin ne forlasos, ci ne timu! Sur la limo de l' mondo mi atingos la ŝteliston kaj lin sufokos... Ci iru, do iru!

La ĉevaleto iras, bonguste ĝi trinkas puran malvarman akvon; ĝi skuigās, komence, per sola kolhararo, poste ankaŭ per tuta korpo; eksentinte

sur sia dorso junan fortulon, plenan da viveco, ĝi definitive rekonsciigas kaj jam per pli rapida paŝo iras tien, kie ĝi hieraŭ lasis plugilon kaj ne finplugitan kampon.

Ĉio vekigas ĉirkaŭe kaj ekĝojigas Napoleonon laŭvoje.

Jen, pasero elflugetis el sia subtegmento kaj same ekskuigis, kiel Napoleono kaj lia ĉevaleto. Napoleono lin alparolis.

— Nu? ĉu bone ci dormis kun cia ino en la lanuga kuŝejo?

La pasero ne respondis, nur volupteme rigardinte je Napoleono, ĝi forflugetis sur la barilon por reglatigi sian hirtan plumaron.

Jen, knabino elŝiriĝas el la lito, kvazaŭ ŝi estis amindumita de l' junulo. Teruriginta, timema ŝi estas, sed gaja. Nur ĉiuj ŝiaj haroj pinarsimile disigiĝis, kaj tro malmulte da vestoj ŝi surhavas. Versajne, ŝi estis intencinta por unu momento elsalti flanken kaj reveni por ordigi.

Tion ankaŭ rimarkis Napoleono: li ĉion vidis aŭ divenis, kaj krietis, timigante sin per la mano:

— *Stüss*, dormkovantino!

Kaj la knabino, kvazaŭ pafvundita, remalaperis en la grenejo.

Kaj rido kaptas Napoleonon, ke li, la ĉevaleto, la pasero kaj la knabino, ĉiuj estas similaj dormemuloj, kvazaŭ ili difirenciĝus nur laŭnome, sed ne laŭrase; kvazaŭ se oni ilin ekparoligus ilialingve, ili ĉiuj samvorte respondus, ke same ili sentas, pri la samo zorgas kaj ĝojas.

Ho, kiom la naturo ĉion scipovas plekti je unu unueco!

En la kampo Napoleono enjungis la ĉevaleton en la plugilon. Nu! La ĉevaleto forte ĝin ek-tiris; li potence ĝin trenas per la ŝultroj; la

plugiltrancilo traŭĉas tian rektan, egale dik-kaj larĝan sulkon. Ĝi simetrie, simetrie kuŝiĝas sur antaŭe renversita sulko. Ĝi ne kuŝiĝas, nur apogetiĝas. Al Napoleono ŝajnas, ke ĝi ankaŭ sentas matenon, elvaporiginte noktan dormon, ĝi jam gaje ektrinkas sunan varmon.

Kaj post li sturneto „gakt, gakt“, kolektante raŭpojn malantaŭ pluganto. La hundo Pilkis (grizulo) arbitre saltegis al blue brilanta birdeto. La birdeto „plast-plast-plast“ for, for, sed laŭ sama sulko.

— Pilki, ĉu ci frenezigiĝis? Nu, kio cin malutilas la fajfanto de nia ĝardeneto? Ĉu ci ne hontas? Ĉar ci mem ja la raŭpojn ne mangos, nek ci ilin trovos. Ĉu ci komprenas, Pilki?

Napoleono murmuris, Pilkis lin komprenas. Li komencas ĉirkaŭsaltadi, celante per antaŭaj piedoj kapti plugiltenilon. Sed li gajnis nur orefracpon per la returnita mano.

— Iru ci for, dorlotitulo! Mi ne havas tempon okupiĝi pri ci. Jen, ci atendu, mi eljungos la ĉevalon por paŝtigi, tiam ni ekludos...

Ankaŭ tion komprenas Pilkis, li ekskuas la kapon kaj sage forkuras kamplimen, tie rimarkinte leporon.

Laŭte kaj nevolonte fendigis la plugata grundo de piedpremita kampo. Ŝajnas, ke tio estas enuiga laboro. Ho ne! Oni rigardu, kia estas diverseco de l' naturo.

Kaj ne bedaŭras Napoleono parton de forlasita dormo.

III.

Napoleono legas la librojn.

Pro sia diligenteco kaj legolerteco Napoleono aperis en la hejmo de Ŝeŝjavilkis, kiel hela suno.

Jes, Manjo ankaŭ volonte kaj lerte legis. Ambaŭ gefratoj havis belsonan voĉon. Tamen, dum la legado de Manjo, la aŭskultantoj ne tiom atentis sencon de la legajo, kiom ili rigardis la knabinon.

Tute alia estis Napoleono. Tiu ĉi sana, kvazaŭ bovovireto, gaja, vivoplena, kvankam li estis tiom bela, kiom lia fratino, tamen oni tion malofte rimarkis pro tio, ke li scipovis nek iri, nek paroli laŭhome. Turnigante, murmurante, li „enrajdadis“ en la ĉambiron: alie nomi lian irmanieron ne estis eble; bobene li sinturnis en la mezo de la ĉambro, sake li surbenkiĝadis en la interfenestra angulo, metante la dekstran piedon sur la apudan seĝon kaj maldekstran lasinte sur la posttabla benko. Nur tiam li eklegadis la librojn.

Nu, kiu do rigardos tian barbaron? Aliafoje la hejmanoj eĉ koleris je li pro tia dismetado de piedoj.

— He, donis al vi Dio tiom longajn piedaĉojn: unu piedo estas en Rámajaj, dua - en Svédasaj!

Ŝajne kolere diris la patrino, forjetante de la seĝo la piedon, forkurinta de la dua 17 kilometrojn.

Napoleono ŝajnegadis timiĝon pro la surprizo; kaj surkliniĝinte ĝis la nazo al la tablo kaj laŭ ĝia supraĵo li tiel bele, apartmaniere ekrigardadis la patrinon, ke ĉi tiu tuj dolĉiĝadis kaj komencis karesi iom krispiĝintajn, flavajn harojn de la filo.

— Nu, nu, legu vi, legu. Sed vi ne ŝercu!

Kaj Napoleono eklegas, kamertone fiksinte la voĉon, laŭ la libreto: se li prenas „Pasakos ir pritikimai“ ¹⁾ de Olechnavičius, alie li ĝin legos; se eltiros „Broma vedančia i Dangu“ ²⁾ de Olšauskas, li ankaŭ ĝin alivoĉe legos. Kaj tiun voĉon, koncernan al enhavo, li sukcesis konservi dum la tuta legado.

¹⁾ „Fabeloj kaj aventuroj.“

²⁾ „Ĉielen kondukanta pordego.“

Napoleono legis, efektive, laŭ juda temperamento, ke eĉ liaj salivoj fluis, nenion atentante, ĉu iu lin aŭdas, ĉu ne, ĉu la aŭskultanto aŭdas la komencon, ĉu finon, — simile al Londona oratoro de Hayde Parke. Kaj la familio de Ŝeŝjaviĥkis kontentiĝis je tio, kion ĝi akiris, ĝi preferis aŭdi, ol legi mem. Unu el familio tute ne sciopovis legi, alia legis malfacile, tria, kvankam bone leganta, nevolis, ĉar al li ne plaĉis la ankoraŭ ne prilaborita litova lingvo, — do Napoleono — leganto estis al ili necesa.

Reveninte el Vilnius, Napoleono ĉiam pli malofte uzis la plej popularajn religiajn librojn, ĉar tro bone li sciis kateĥismon. En lia surtuta poŝo ĉiam pli ofte troviĝadis aliaj libretoj aŭ folietoj¹⁾. Ilin li nur tiam eligadis el kaŝejoj, kiam en la ĉambro estis nur hejmanoj aŭ bone fidindaj najbaroj. Li rigardetis tra unu fenestro, tra alia, signifplene mistere li observadis la ĉeestantojn, — tiam li singarde eltiradis pakajon da presajoj.

La religiajn librojn Napoleono legis laŭte; ĉi tiujn — duonvoĉe. La unuajn li legis malvarme, kvazaŭ por si, ĉi tiujn — nepridireble arde, ke eĉ liaj vangoj komencadis flori kaj okuloj brili. Legante ilin Napoleono per tuta sia animo protestis kontraŭ arbitrojn de rusaj oficistoj en Litovujo, kontraŭ persekutado de Litovaj rajtoj en preĝejo, en lernejo, en komunumo, en juĝejo kaj ĉie en la patrujo. Li ne komentadis la legajojn, li nur trinkis per sentoj kaj per la sentoj redonis al aŭskultantoj la spiriton de l' protesto, kiu alvenis per iuj sekretaj vojoj, el ia nur reveblalando de libereco.

¹⁾ Presajoj en Germana Litovujo post malpermeso de Litova preso de Rusoj. (P. Ŝ.)

Ĉe la aŭskultantoj, trinkigitaj de tiu spirito, same akre ekbriladis okuloj, kaj ekstremadis kolere la lipoj . . .

Tiamaniere Napoleono murmuremulo senkonscie fariĝis vekilo de la rekonsciiĝo de Litova nacio.

IV.

Napoleono amas.

Sur la lipoj ridetantaj
De l' junulo belstatura
Ekaperis krispiĝantaj
Haroj el la oro pura.
Vangoj blankaj alabastre
Rozoruĝe sin oruinis,
Kaj okul', brilanta astre,
Multkolore radilumas.
Ĉar en pura kor' infana
Ekbruliĝis fajra amo,
Tra l' vizaĝo diafana
Tra penetris ĝia flamo.

P. Ŝ.

Bela li estis junulo ne nur pro sia juneco, saneco kaj vizaĝo, sed ankaŭ pro siaj spiritplenaj okuloj. La okuloj de Napoleono-revanto ĉiam estis plenaj de iaj strangaj, kvazaŭ noktaj vidaĵoj. Li sciis, kial ne! ke li estis bela. Ne unu knabino al li tion estis senintence dirinta. Diversvolvas, ĉarmulino, sian parolon, plej eble komplikante ĝin, por ke li ne komprenu, kion ŝi volas diri; tamen verdiro, finfine, kontraŭvole elsaltos: „Kiom vi estas bela“ . . . Li nur ne sciis gradon de tiu sia beleco, kaj kian potencon ĝi kaŭzas.

Sane kaj sate kreskigita, per la laboroj gimnastikiĝinta, Napoleono estis forta, kiel ŝtalo. Ŝajnis al li, ke ekzistas neniu homo en la mondo, kiun li ne luktvenkus; ke ekzistas nenia objekto,

kiun li ne povus levi kaj forporti. Li fojon en muelejo vete surportis 200 kg da greno sur kruta ŝtuparo. Eĉ la homoj timiĝis. Firmaj estis liaj junaj tendenoj. Per efektivaj ventegoj bolis lia juna sango en liaj vejnoj.

Kiu do povus ami, se ne li? Nur li, sporte edukita, ne nerviĝinta, sen malbonaj moroj, neniajn ŝlosilojn perdinta, estis ĉasta. Ju pli kapabla ami li estis, des pli hontema li sin sentis. Li hontiĝis eĉ de si mem. Eĉ la manon de l' knabino volupte tuŝeti por li estis egalterure, kiel fajrumiĝi.

La unuan amon de Napoleono ekbruligis Darato. Ŝi, eĉ mem tion nerimarkante, ne povis deŝiri la okulojn de l' junulo, ŝi rigardis je la vizaĝo mem, avide kaptante per siaj okuloj lian rigardon. Senkonscie ŝi serĉis lian manon, kaj longe ĝin tenis en la sia, ne nur salutante kaj adiaŭante, sed ankaŭ montrante al li siajn laborejojn.

Ĉio ĉi ne malpli elektrigis Napoleonon, ol galvanana fluo. Post kelkaj tiuspecaj eksperimentoj febro jam skuis Napoleonon; li ekmaltrankviliĝis kaj rapidis hejmen, sed ne forgesis eksperimentojn de Darato. Per siaj internaj okuloj li vidis ŝin enlitiĝante kaj ellitiĝante, kaj nerveme li vibris, kvazaŭ ektuŝita violonĉela kordo.

Nu, kiam Napoleono nun komencis kanti, por ĉiuj estis evidente, ke kantas ne li mem, sed iu el lia interno. La voĉo de Napoleono, ĝis nun karesinta orelojn, nun la korojn ekkaresis.

V.

Napoleono kantas.

Oni parolas, ke belsona voĉo, kanto, estas ŝlosiloj de unua pordo al iu ajn koro.

Nekantantan Napoleonon same malfacile estis imagi, kiel dum advento nekriegantan lupon. Laborante li nazkantetis, sed veturante, rajdante aŭ irante li laŭdece lupkriis.

Fojon li kun siaj kolegoj estis jus fininta ian helplaboron por sia najbaro Sviestaviĉjus. Jen, amasigas Napoleono ĉiujn de li konatajn kantkapablajn junulojn. Do, kuniĝis dekelko da junuloj sur la bordo mem de Venta. Vaporplena printempa aero, per eksterordinara heleco radilumanta suno, printempe ekscitita juna sango, — ordonis al ili ion deziri, ion sopiri, ion pro ia kaŭzo ami. En tia situacio oni ne staras senkante. Per tuta sia sopiro ĉi tiuj idoj de l' naturo salutis ĝin renaskiĝantan kaj ĝian renaskiĝanton — Sunon.

La vira ĥoro akorde kantis kanton per tri voĉoj. Muzikon lerninta Napoleono lerte plektiĝis inter ili kun la baso, diverse modulante sian voĉon kaj ŝmirante la pli simplajn lokojn. El sanaj laringoj kaj brustoj per potencaj voĉoj elŝiriĝis la kanto por atingi malproksiman Sunon.

Alvenis jam gaja printempo bela!

La suko acera jam gutas hela.

Odoras viol' kaj freŝa betul',

Jen sonas en val' gaja najtingal', —

Estas do raviga monato majo.

Ekresonis per potencaj voĉoj ekvibrigitaj bordoj de Venta, ekĝemis la junaj arbaroj, forsendante malproksimen, kaj pli malproksimen kaptitan kaj kaptatan ehon, — eĉ ĉiuj anguloj sonis. La rivero kaptis la nekomplikitan, tamen tiom pravan, kompreneblan, tiom impresigan per sia simpleco kanton de l' printempo kaj kune forportis, fortondris en ambaŭ direktoj de l' valo. Maldekstre la rivero ĝin dronigis en la mal-

proksimo, dekstre -- ekvibris per ĝi ĉiuj fenestroj de Gondinga. Kvazaŭ metala sonis la kverkareto. La aero mem vibris laŭ la kanta ritmo, ebene, malrapide, sed potence kaj persiste forsendante siajn ondojn tien, kien ili estis celitaj -- al Suno.

Sonis la kanto. Strofoj sekvis strofojn. Estis tre multe da egalsonaj strofoj, tamen la kantistoj nevolis ĉesigi la kanton, nek aŭskultantoj deturni la orelojn. La longa kanto kontentigis longan sopiron al printempo. Oni volis ĝui ĝin, ĝui senfine; aŭskulti ĝin, aŭskulti -- ankaŭ senfine. De malproksime vidiĝis, kiel gondinganoj eks-citigis, eksvarmis, mirigitaj ili komencis kolektigi ĉe l' bordo de l' rivero, ĉar tian horon ili estis ne nur neniam havintaj, sed eĉ ne aŭdintaj. Vidiĝis doktoro kun siaj kolegoj en la perono. Vidiĝis la tuta oficejo de l' asesoro.

La eksbienposedinto Sviestaviĉjus senkonscie ekstarigis kaj senĉapigis. Li estis aŭdinta precize ĉiujn plej bonajn operojn de l' mondo, plenumatajn de plej eminentaj operkantistoj kaj ĥoroj. Li aŭdis popolajn ĥorojn en Italujo, Tirolo. Li aŭdis la kantojn de l' junaj angloj, kiuj senĝene kantas dum noktomezoj en stacidomoj aŭ ie ajn. Ĉie estis belo; nur ne tiom, kiom ĉi tie nun. En Italujo li konis aŭditan belan kanton, verkitan de iu drinkeja ĉifonulo; la kanteto vivos ĝis kiam aperos alia bulvara aŭ strata verketo. Nenio travivos sian aŭtoron. La angloj kantis, kion ili lernis en la lernejo. Tirolanoj kantis por siaj montoj, per mallongaj strofoj, por ke plimulte estu da eĥoj en la intermontoj.

Nun, ĉi tie, litovoj kantas al siaj ebenajoj, al siaj senlimaj iam arbaroj, potence igante ĝin forporti la eĥon malproksimen ĝis la mondlimo, de malproksime nedivenebla . . .

* * *

Oni devas scii, ke Napoleono estas ne ia fantazia produkto, sed efektive ekzistanta persono. Li arde amas sian patrujon kaj heroe ĝin defendis en la danĝera momento, sed mi pri tio eksilentos, por ne malhelpi la karajn gelegantojn eterne aŭdi lian ravigan kanton.

6. 5. 1923
Švėkšna.

El diversaj fragmentoj de „Pragiedru liaj“,
de Vaižgantas-Tumas
traduke verkis P. Šaulys.



DŽIUGAS.

De Lazdynų Pelėda.

En bela loko de Samogitujo¹⁾, zonigita per verda arbara krono, staras kastelo de potenca Džiugas. Liaj riĉaĵoj estas senfinaj, ĉar ĉiuj dioj, kaj la plej multe Marso, al li donis sukceson.

Tamen ne sentis sin feliĉa la potenca Džiugas. Ne kontentigis lin amasoj da sklavoĵ, nek oro, nek zibelaj kaj ursaj feloj, nek rusaj rubloj arĝentaj. Ĉion li rigardis malgaje, kaj en si mem sentis neprirakonteblan maltrankvilecon. Kaj sopiris li. Sed kaŭzon de tiu maltrankvileco li ne povis trovi, kaj aspiron de siaj deziroj ne sciis nomi.

Kunvokis Džiugas spertulojn, kiuj unuvoĉe decidis: „Tiel enuas la aglo, ĝis kiam ĝi ekhavos la flugilojn kaj ĝis kiam ĝi povos alten ekleviĝi. Kaj vi enuas, ĉar vi sentas vian estontecon. Enskribite estas ĉe Eternulo, ke vi estos potenca super la potenculoj.“

Nur tiom estis permesite diri al la spertuloj. Kiam ili foriris, al Džiugas fariĝis ankoraŭ pli mal-facile. Dum vesperoj kuŝadis li sur urso felo apud

¹⁾ Samogitujo nomiĝas okcidenta parto de Litovujo.

fajrejo kaj revis aŭskultante bruon de arbarego. Ŝajnis al li dum momento, ke aŭdiĝas eĥo de batalo kaj lia animo troviĝas tie, koro sentis maltrankvilan batadon; li vidis amasojn da sklavoj, ĉaroŝarĝojn da akiroj kaj amasojn da potenculoj, kiuj klinis la kapojn antaŭ li, kiel malfortaj spikoj...

Unu vesperon, kiam Džiugas revis, ekaperis infera dio Inferulo kaj diris al li: "Ĉion al vi mi donos, kion nur deziras via koro, kaj aĝon trioble pli longan, ol de simpla homo, nur post la morto vi devas veni al mi por servi."

Džiugas silentis.

Inferulo daŭrigis: "En ĉiu okazo sin turnu al mi, — ĉion vi ricevos, apenaŭ vi povos ekpensi. Ĉefkastelon mi konstruos al vi, neprikalkuleble sklavojn vi havos; montojn da oro mi kunŝutos, kaj tian forton mi al vi donos, ke centjarajn kverkojn vi plej facile forŝirados, kaj montojn per unu piedekbato renversados."

-- Mi estos via! -- respondis Džiugas potenculo.

Dio malaperis kaj Džiugas pensis kuŝante, ĉu tio estis la sonĝo, aŭ ĉu tio estis malsana revo.

Kaj li eksentis en si la forton, foriris de kastelo en verdan arbaregon, kaj al si mem ne kredante, ekprovis deŝiri unu abion. Apenaŭ li tuŝis per manoj, la abio forŝirinta, kvazaŭ keno, en liaj manoj balanciĝis.

Komencis forŝiradi Džiugas la sekajn abiojn kaj sur ebenajo kunmetadi en amaso. Kunmetis li la amason — apenaŭ videbla estas la pinto. Poste li elhakis fajreron el siliko kaj ekbruligis..

Tio estis simpla milita signalo: litovoj, ekvidinte brulantan lignofajron, kolektiĝis en amasoj, sin armis kaj iris, kien ordonis la potenculo.

Dum mallonga tempo neĉirkaŭvidebla amaso da militistoj, armitaj per pafarkoj, stariĝis apud

lignofajro, kie ilin senpacience atendis reganto Džiugas.

Foriris ĉiuj trans Nemunas¹⁾, kontraŭ poloj. Gloriĝis en tiu milito Džiugas. Lia mirakla glavo ĉie faris la vojon. Iris Džiugas kiel tondro tra pola lando. Li akiris multegon da havaĵo kaj sklavojn; inter ili estis juna polino. Ekvidis ŝin Džiugas, kaj io stranga okazis al li: la glavo, forgesita, forglitis el liaj manoj, kaj Džiugas staris enpenetrante sian rigardon je polino, kvazaŭ je ne tera estaĵo. Li rigardis, rigardis je ŝiaj kunligitaj manoj, je vundita en kelkaj lokoj korpo, je malvestitaj kaj kovritaj per polvo piedoj, — kaj Džiugas'a koro vekigis, ekamis ŝin, kiel pli ami ne estas eble. Lia koro ne konis la amon, plenan je sindediĉo por la amata homo. Tial do nenion helpis ploroj de polino: Džiugas kaptis ŝin en brakoj, surmetis al si sur ĉevalo kaj, forgesinte militistojn, revenis reen al la patrujo.

Rajdas Džiugas kaj ĉiam rigardas sian sklavinon: polino paliĝas kaj paliĝas, li premas ŝin, la amon promesas, parolas pri siaj riĉaĵoj, kiuj al ŝi li metos al la piedoj . . . La sklavinon nenio povas kontentigi. Ploras ŝi ĉiam kaj ĉiumomente malfortiĝas.

Kiel moligi ŝian koron? — pensas Džiugas.

— Polino, ĉu vi aŭdas! jam hejmo estas proksime, — parolas Džiugas, morgaŭ dukoj antaŭ vi la kapojn klinos! Morgaŭ festedziĝon mi aranĝos! . . . Polino, ne dormetu!

La polino dormetas, jam balanciĝas sur la brakoj.

— Polino, polino, ne dormetu!

¹⁾ Nemunas estas ĉefa rivero de Litovujo.

Vidas Džiugas, ke tio ja eterna sonĝo ekkaptas la sklavinon, kaj neniu, eĉ tondro povas ŝin veki . . .

„Inferulo!“ — pensas Džiugas: — „li promesis plenumi ĉiujn miajn dezirojn“ . . .

Džiugas per tuta sia voĉo komencis voki la dion de infero. Sepfoje arbaregoj ripetis tiun vokon, ĝis kiam aperis dio.

— Kion vi deziras, Džiugas potenculo? — li ekdemandis.

— Veku ŝin! — diris la potenculo, montrante je kuŝanta sen spiro polino.

— Mi ne havas tian potencon! — respondis infera dio, — ĉar sur kolo de tiu ĉi knabino estas signo de ŝia dio.

— Oni povas forjeti, — respondis Džiugas kaj tuisis la krucon, sed ĝi kvazaŭ kreskligiĝis al la brusto de mortintino.

Tri tagojn kaj tri noktojn ploris Džiugas je ekamita sklavino kaj ne povis revivigi ŝin. Li enterigis ŝin en verda arbarego en proksimeco de granda vojo, kunŝutis grandan monton, kiun ankoraŭ ĝis nun oni povas vidi.

Li mem foriris en la arbaregon por malĝoji.

Reveninte hejmlanden, li ne iris en sian kastelon — nur sola ĉevalo revenis.

Kien perdiĝis ĝia mastro?!

Džiugas sopiris je la amatino. Por ŝia rememoro li ordonis al infera dio kunŝuti la monton kaj elfosi la lagon, por ke larmoj havu kien faladi.

Oni kunŝutis la monton kaj elfosis la lagon. Nur Džiugason oni nenie trovis.

Proksime de monto, en arbarego, vagas ĉiunokte kaŝa estajo kaj ploras, ĝemas, kaj vento akompanas la ĝemon.

Centjaroj trapasis. Apud la monto oni forhakis la arbaregon. Loko ekplaĉis al la homoj, kaj ili komencis konstrui la domojn.

Pasis ankoraŭ centjaroj. En la loko de la monto staras urbo — tio estas nia Telšiai¹⁾.

Malgranda parteto de la arbarego ĝis hodiaŭa tago restis.

Maljunuloj diras, ke Džiugas dum noktoj ankoraŭ malĝojas, bedaŭras sian amatinon. Por tio tiun ĉi parton de arbarego oni nomis „Džiugailiai“.

Esperantigis Mare Lukoŝevičaite-Alseikene.

¹⁾ Telšiai estas distrikta urbo en Samogitujo.

Rim. de tradukinto.



La rajtoj de virinoj.

Kristnaska rakonto de Mario Pečkauskaitė.

Petre Rimutaite, lernantino de kvara klaso, alveturis nunan jaron al kristnasko iom zorgoplena. La kaŭzo estis, ke tuj post kristnaska libertempo ŝi devis legi en grupo de „estontuloj“¹⁾ referaton „Pri rajtoj de virinoj“, kiun ŝi devis prepari dum festoj. Tiu ĉi referato premis ĝin, kiel ŝtono. Kiom ajn ŝi pripensadis, kiom ajn ŝi streĉis sian menson, tamen ĝis nun ŝi ankoraŭ sciis nek kiel komenci, nek kion pluen skribi, nek per kio fini. Kaj tamen ŝi devis nepre skribi, ĉar alie ŝi poste ne povus eĉ

¹⁾ Ateitininkai-estontuloj estas organizacio de konsciaj katolikaj gimnazianoj kaj studentoj, kiuj metas en fundamenton de sia agado katolikan religion kaj litovan naciecon.

okulojn montri. Skribis ja en nuna jaro ŝiaj geamikoj almenaŭ kvin referatojn: „Evoluo de la mondo“, „Estonto de kulturo“, „Moralo kaj scienco“ kaj aliajn, kaj neniu rifuzis pro nepovo ĝin fari. Des malpli decas al ŝi rifuzi, al ŝi, kiu estas plej bona lernantino de supera klaso²⁾ de Viŝtakiu gimnazio. Des pli, ke dum lasta kunveno Kaze Dimajte legis referaton „Moralo kaj socio“ kaj eksciinte, kia temo estas elektita por Petre, diris:

— Ho, kia facila temo! Estos ne mirinde, se ci, Petre, skribos bele. Mi skribus tian referaton dum unu horo.

Nu, ĉiuj scias, ke Kaze emas fanfaroni. Nek ŝi skribus tiel rapide, nek ĝi estus bela. Sed ja ankaŭ aliaj diris, ke la temo estas facila . . . Do, eĉ eligu el haŭto, sed nepre devas skribi.

Sidiĝinte en sia ĉambreto ĉe sia skribotableto kaj metinte antaŭ si grandan folion da papero, Petre ekmeditis. De tempo al tempo preninte kraĵonon ŝi skribas kelkajn vortojn, kiujn tuj forte trastrekas laŭlonge kaj laŭlarĝe — kaj denove ŝi pripensas. Kaj dume ŝiaj pensoj estas jam cent kilometrojn malproksime de virinorajtoj, ili forflugas ien, distriĝas, interplektiĝas, kvazaŭ tiu fumo, kiun ŝi vidas tra fenestro eligantan el najbara domo, kaj ŝia mano anstataŭ skribi seriozajn kaj gravajn vortojn de referato, pentras iujn kurbajn ornamentojn, iajn fantaziajn birdetojn, havantajn eble nur tion komuna kun ŝia referato, ke estante simboloj de libereco, ili estas antitezo de sklavigitaj virinoj.

En la apuda ĉambro ŝpinas ŝia patrino. Tra la malfermita pordo ŝi ĉiam rigardas sian filineton kaj ŝia ruĝvanga vizago komencas esprimi mal-

²⁾ Ĉar gimnazio estis ankoraŭ ne tuta, anstataŭ ok kutimajn klasojn havanta nur kvar malsuperajn.

trankvilon. Fine ŝi ne eltenas kaj iras en filinĉambreton.

— Petrele, pupeto, ĉu ci ne malsanas? — demandas ŝi zorge. — Nek ci lernas, nek ci legas, nur sidas kaj sidas, kvazaŭ bienon vendinte.

— Mi tute ja ne malsanas, patrineto. Nur, vidas vi, mi havas malfacilan laboron. Mi devas skribi referaton. Tial mi ĝin nun pripensas.

Petre, kiom nur ŝi povis, penis paroli ne en loka dialekto. Ŝia instruisto de litova lingvo tre ne amis dialektismojn kaj dike substrekadis ilin en ŝiaj kajareroj per ruĝa inko dirante, ke absolvinta gimnazio homo devas paroli puran litovan lingvon.

— Kion ci diras, Petrele — reparacio? Kio estas tiu reparacio?

— Referato, patrineto. Kiel mi povus ĝin pli bone klarigi? Ĝi estas kvazaŭ iu prediko. Mi ĝin skribos kaj poste legos en kunveno.

— Sufiĉas, sufiĉas. Na, kiel ci, infaneto, predikos ne estante pastro? Kvankam ci estas instruita, kvankam lernas en gimnazio, sed tamen ci ne estas pastreto. Al pastro dank' al pastra sakramento helpas la Sankta Spirito. Al li estas ja facile, sed kion ci povos diri estante knabineto?

— Sed virinoj ofte paroladas pli bele ol viroj. Pasintan aŭtunon estis ĉe ni el Kaunas unu anino — estontulino kun referato pri virinoj. Ŝi parolis tiel bele, kiel eĉ unu pastro el nia ĉirkaŭajo ne parolas. Se vi, patrineto, estus aŭdinta, certe vi estus esplorinta.

— Ĉu vi vidas? Na, eble iu sola troviĝis. Sed rigardu, kiel antaŭ elektoj en sejmon (parlamenton) envadis niajn urbetojn, foirojn bojante kvazaŭ ĉas-hundoj tiuj agitatoj, ĉiuj estis ili viroj. Virino eĉ unu ne estis.

-- Pro tio, ke virinoj ne estas ankoraŭ klas-konsciaj kaj ne postulas siajn rajtojn.

— Kompreneble, infaneto, mi ne estas klera. Sed al mi ŝajnas, ke al virinoj ne decas tiel bojadi — senkuraĝe diris patrino.

— Ĉi tio estas nur malnovaj antaŭjuĝoj, patri-neto, — decide respondis filino.

El politika regiono patrino subite transiris al personaj aferoj.

— Prenu ĝin lupoj, tiun reparacion, Petrele. Prefere iru iom promeni. Sufiĉe en tiu gimnazio ci laciĝas, almenaŭ dome ci ripozu. Aliaj diras, ke lernado estas nur senfrukta tempperedado, senlaboremo. Sed mi komprenas, ke ĝi estas malfacila kapturnigo. Estas ja ne ludo ellerni tian amason da libroj. Certe ili formangas infanan sanon.

Petre jam mem tediĝis pro longa sidado, tial vestiĝinte ŝi foriris en urbeton, en poŝtejon.

Dum nokto falis profunda neĝo kaj nun tero estis tiel blanka, pura kaj senkulpa, kiel prepari-ĝinta al unua Komunio knabineto. En malproksima blua ĉielo lumis ora suno kaj ĉie estis tiel ĝojige kaj altige. Petre fariĝis ĝoja, la pezo de referato malpliĝis, en koron eniĝis kuraĝo kaj ŝi diris al si:

— Nenio! Mi ĝin skribos! Hodiaŭ vespere mi elpremos unu paĝon, kaj morgaŭ, postmorgaŭ mi ĝin finos.

Ŝi sciis, kiel komenci, ĉar ŝi rememoras, kion diris tiu fraŭlino el Kaunas, sed ŝi ne volas, ke estu ĝuste same. Tuj oni komencus diri, ke ŝi kopiis. Precipe tiuj knaboj; ili kritikis, kvazaŭ rabiaj, se nur ili povas al io alkroĉiĝi. Bone diris tiu fraŭlino, ke nur teorie ili donis al ni kelkajn rajtetojn, sed praktike ili tamen penas subigi vi-rinon, montri, ke ili estas pli stultaj ol viroj; tamen

ili volas sin antaŭenpuŝi sur unuan lokon kaj kiel ĝis nun ĉion teni en sia ĉirkaŭprenado. Kie nur ili povas, ili malestimas virinojn kaj mokas ilin, nomante ilin virinaĉoj... Kun kia energio ŝi parolis!... Poste, finante, ŝi diris, ke plej bona rimedo por akiri siajn rajtojn estus aranĝi ĝeneralan strikon de ne edziniĝintaj virinoj, ke ĉiuj ni kune decidu ne edziniĝi, ĝis en ĉiuj vivofakoj estos donitaj al ni rajtoj egalaj al la viroj. Nur domage, niaj virinoj estas ankoraŭ tiom ne klaskonsciaj, ke aranĝitaj strikon estus tre malfacile...

Subite antaŭ okuloj de Petre aperis flavaj tonditaj lipharetoj, blujaj okuloj, bukaj haroj kaj gracia staturo en griza kostumo — unuvorte, la instruisto mem de litova lingvo kaj de aliaj objektoj, s-ro Linksnuioté (deklinacio) kvazaŭ viva. En koro de Petre fariĝis tiel varme, varme... Se eĉ tiu striko okazus, por s-ro Linksnuioté oni certe povus fari escepton... Li estas tute ne tia, kiel aliaj viroj, Li eĉ ofte diradas en klaso, ke knabinoj pli bone scipovas litovan lingvon ol knaboj. En nuna jaro ŝi eĉ ne ricevis de li noton pli malaltan ol kvin...¹⁾ Na, kompreneble, ke ŝi skribas senerare kaj penas paroli sen dialektismoj... La tuta klaso nomas ŝin simpatio de s-ro Linksnuioté... Ŝi pro tio ne koleras. Esti simpatio de iu filernanto — fi! — sed de instruisto, ĉu tio ne estas honoro? Kial ŝi ne povus esti lia simpatio, ĉu ŝi ne estas plej bela lernantino en la kvara klaso? Ho, ŝi tion bone scias. Pri tio ŝi havas tutan amason da pruvoj en formo de pli aŭ malpli longaj leteretoj. Kaj plej belaj inter ili estas tri de s-ro Linksnuioté poŝtkarto, ricevitaj dum la lasta gimnazia vespereto. Kompreneble, sen subskribo, sed ŝi ja tuj ekkonis,

¹⁾ En litovaj lernejoj plej alta noto.

de kiu ili estas . . . Ĉar kiu alia povus tiel bele skribi:

Ho, bela ci estas, kvazaŭ ora stelo!

Ho, kial ci tiel batas, mia mizera koro!

Kelkan tempon Petre iris deklamante versojn el ĉiuj ĉi tri poŝtkartoj kaj ĝuante ilin . . . Pasintan jaron en Ŝiauliai unu lernantino fariĝis do edzino de instruisto . . . Kial do ankaŭ ŝin ne povus trafi tia feliĉo? . . .

Ĉar ne estis foirtago, tial en poŝtejo estis nur kelkaj hebreej, kiuj preninte leterojn foriris. Kaj Petre restis sola kun poŝtej-gvidistino, ŝia estinta kamaradino el popola lernejo. Fraŭlino oficistino donis al ŝi kelkajn poŝtkartojn kun salutoj je Novjaro de amikoj kaj amikinoj, kaj ankoraŭ unu, post enigardo en kiun la bela vizaĝo de Petre ruĝiĝis kaj koro ekbatis pli rapide. Sur poŝtkarto estis skribita verso kaj anstataŭ subskribo estis du literoj: M. L.

„Matas Linksniuote! Matas Linksniuote!“ kantis koreto de Petre. Poŝtkarto mem estis simbola: bela fraŭlino, kronita per rozoj, kaj flanke flamanta koro. Fraŭlino similis Petren, kaj flamanta koro verŝajne signifis mem la s-ron Matas Linksniuote.

— Kiel ci estas feliĉa, Petre, tiom da leteroj ci ricevas! — diris poŝtistino.

— He, tiuj — ĉu ili estas, aŭ ne estas — ŝvingis per mano Petre. — Sed divenu, de kiu estas ĉi tiu?

— Kiel mi povas scii. De iu-ajn fianĉo.

— Sed de kiu? — demandis ĝojradianta Petre.

— Ne de iu simplulo, oo!

— Eble de tiu via bela instruisto?

— Vi divenis.

— Ho, kiel ci sukcesas ĉie, Petre! — diris poŝtistino, videble, jam envianta. Kiel bone al ci, ke

ci estas en gimnazio. Kiam ci absolvos en Viŝtakiai, eble gepatroj lasos cin pluen.

— Komprenoble, lasos. Mi volas absolvi ĉiujn klasojn. Nur Dio scias, kiel ankoraŭ sorto destino — aldonis mistere ridetanta per siaj ruĝaj kiel framboj lipetoj kaj adiaŭinte foriris el poŝtejo en vendejon aĉeti poŝtkarton por respondo al s-ro Linksniuote. Longe ŝi elektadis kaj fine elektis unu, sur kiu estis bildo de ame interparolantaj du gejunuloj. Al Petre komence venis la penso skribi apud la knabino siajn literojn, kaj apud la junulo M. L. Sed iom pripensinte decidis ne meti literojn — s-ro Linksniuote devos mem diveni, kion ĝi signifas.

Poste Petre devis viziti ankoraŭ kuracistedzinon, ĉar patrino estis komisiinta ŝin diri al tiu sinjorino, ke menditan buteron patrino alveturigos dimanĉe. Kuracistedzino estis tre afabla sinjorino kaj tial Petre ĉiam tre volonte iradis al ŝi. Ŝi tre interesiĝis pri lernado de Petre, demandadis pri gimnazio. Kaj nun gastigante ŝin demandadis, kiel ŝi pasigas tempon. Petre sinlaŭde diris, ke ŝi havas laboron, ĉar ŝi skribas referaton.

— Ĉu mi povas demandi, je kiu temo? — diris kuracistedzino.

— Pri virinaj rajtoj — respondis Petre.

Tra lipoj de kuracistinedzino traflugis klara rideto, kaj siaj belaj grizaj okuloj lumiĝis per gajaj fajreroj.

— Kaj kiel vi sukcesas? Ĉu jam finskribis?

— Ankoraŭ ne. Ankoraŭ mi ne pripensis kiel komenci. Sed mi havas ankoraŭ sufiĉe da tempo.

— Estas tre bone, ke vi al kutimigadas esprimadi viajn pensojn — diris kuracistedzino. — Sed ĉu ne venis al ci la penso, Petrele, ke paroli pri ies rajtoj povas nur homo matura, pli sperta

kaj saĝa ol vi, tiel ne grandaĝa junularo, gimnaziaj lernantoj? Ĉu vi neniam aŭdis la diron: „Nur tiu scipovas ordonadi, kiu al kutimiĝis obeadi?“ Same oni povas diri: nur tiu povas paroli pri siaj rajtoj kaj postuli ilin, kiu bone scias kaj plenumas siajn devojn. Do, mi konsilus al ci, anstataŭ skribi pri virinaj rajtoj, skribi pri virinaj devoj.

Petre iom sin ĝenis ĉe kuracistedzino kaj neniam ŝi ekkuraĝus disputi kun ŝi. Tial ŝi mal-kuraĝe respondis:

— Kion fari, ke tian temon oni al mi donis . . .

Mi ĝin ne povas ŝanĝi . . .

— Kial ne povas? Ci klarigu al ili, kial ci ŝanĝis ĝin, kaj ili devos kun ci konsenti. Tamen pripensu tion, Petrele. Pripensu, ĉu oni nun ne tro multe parolas pri siaj rajtoj, kaj neniu eĉ vorton pri siaj devoj, aldonis kuracistedzino adiaŭante.

Kaj eble kuracistedzino veron diras, pensis Petre irante hejmen. Ŝi estas ja tiel klera, bona, afabla. Tamen tiu koleĝino-estontulino parolis tute alion. „Dum tiom da jarcentoj — kriis ŝi per sia energia voĉo — ni virinoj havis nur devojn, devojn kaj senline devojn, kiel veraj sklavoĵ. Ne, jam sufiĉas tio! Donu al ni antaŭe rajtojn, tiam poste ni parolos jam pri devoj . . .“

Dio scias, kiu parolas la veron? pensis Petre. Sed nelonge. Subite el profundaĵoj de ŝia konscio aperis la simbola poŝtkarto de s-ro Linksnuote kun ĝiaj belaj versoj kaj enprofundigis sur la fundon de nekonscio ĉiujn virinajn rajtojn kaj devojn, kaj referaton. Petre komencis ripetadi tiujn versojn komence silente, poste laŭte, poste ekkantis ilin diversmelodie.

Ĉu estas en la mondo iu tiom potenca,

Ke li povu ekregi la koron,

Kiam ĝi ŝvelas pro ĝojosento . . .

Lackantinte ŝi komencis pripensadi, kion respondi. Nepre ŝi devus respondi same per versoj. Sed kiamaniere skribi belajn? Ĉar sendi iajn-ajn al s-ro Linksniuote ne estas eble. Pripensante tiel ŝiaj okuloj haltiĝis sur kreskanta apud vojo betulo — kaj momente ŝi eksentis inspiron kaj komencis deklami:

Vi estas bela, kiel tiu juna betuleto,
Viaj haroj estas bukraj, kiel de tiu betulo folieto . . .

Pli ŝi ne povis komponi, ĉar ŝi alvenis hejmen. Gaja ŝi enkuris internen, sed tuj ŝia ĝojo iom nubigis, ĉar hejme ŝi trovis onklon kaj onklinon, kiun ŝi ne amis, ĉar ŝi havis tre malnovan virkomprenon kaj tute ne estimis klerecon.

Tebolilo jam zumis, sur tablo jam kuŝis diversaj manĝaĵoj kaj tuj ĉiuj sidiĝis trinki teon. Rimutiene rigardinte filinon diris:

— Nun ci tute alie aspektas, Petrele. Tutajn tagojn ŝi sidas ĉiam sur libroj. Eĉ paligis mizerulino! Apenaŭ mi sukcesis ŝin forpeli iom aeron spiri. Nur kiamaniere tiu kapeto povas elteni tiun lernadon!

— Nu jen, kia ĉi tie laboro! — diris onklino. Se oni devus tutajn tagojn stari sur piedoj, tiam certe estus vera laboro. Al mi ŝajnas, ke tiu ĉi lernado estas nur trompado de popolo, pli nenio.

— Ne babilaĉu sensencaĵon, patrino — respondis onklo. — Mem ne lernis, do nenion ci komprenas. Kia estas ĉi tie trompo? Ĉu malklera homo povas fari tion, kion faras instruita?

— Rigardu, nia Petrele ankaŭ jam predikojn skribas — sinlaŭde diris Rimutiene.

— Ne, eble jam la mondfino estas ne malproksima, se jam virinoj komencis fari laboron de pastroj! — ekkriis indigne onklino. Ĉu ne en preĝejo de Viŝakiai ci diros cian predikon?

— Kial en preĝejo? — rugiginte diris Petre. — Tio estas tute ne prediko, kiel vi diras, sed referato pri virinaj rajtoj.

— Kiujn rajtojn ankoraŭ deziras tiuj virinoj? — ekparolis Rimutis. Ili havas do jam rajton baloti kaj okupi diversajn oficojn. Rigardu, antaŭe en postejo ĉiam sidis viro, kaj nun sidas knabino.

— Iom da rajtoj ili jam akiris — respondis Petre — sed ankoraŭ ne estas egaleco. Unu alveturinta el Kaunas fraŭlino, tre instruita — absoluta tutan gimnazion, diris, ke estas tre maljuste, ke oni ne lasas virinojn esti pastroj kaj ke oni devas nepre batalakiri ĉi tiun rajton.

Viroj komencis ridi, kaj onklino de indigno eĉ ne povis ekparoli. Nur post kelka tempo diris al Rimutiene:

— Bofratino, ĉu mi ne diris: ne lasu knabinon en ĉi tiun gimnazion, ne lasu! Ĉi ne sekvis tiun konsilon kaj jen la filino jam deziras esti pastro. Ĉu ci ne vidas, ke ĉi tie estas laboro de malbona spirito?

Rimutis ridante diris:

— Se virinoj eĉ estos pastroj, mi jam ne iros al ili konfesi, kiel ajn al ci plaĉas, Petrele. Mamente ili elbabilados ĉiujn pekojn.

Kaj onklo serioze aldonis:

— Kvankam mi ne estas instruita, kvankam mi ne vizitis gimnazion, sed sanktan skribon mi legis kaj bone scias, ke Sinjoro Jesuo kiel siaj apostoloj pastroj elektis virojn, kaj eĉ ne unu virinon. Tial kiamaniere Eklezio povus ion fari, kion Sinjoro Jesuo ne ordonis?

— Kiamaniere mi povas kun vi disputi, se vi ne estis en gimnazio — diris Petre, ne sciante kion

respondi, kaj leviginte de tablo foriris en sian ĉambreton.

Satludinte kartojn kaj vespermanĝinte ĉiuj foriris dormi. Rimutiene longe ne povis ekdormi. Ĉiam en ŝia kapo turniĝadis pastroj-virinoj. Ŝi konsentis kun onklino, ke ĉi tie estas ne io alia ol tento de malbona spirito, ĉar S-ro Jesuo tiel ne ordonis. Tamen neniel ŝi povis elpeli el ŝia kapo la penson, kiel estus bone, se papo permesus al virginoj fariĝi pastroj. Nun, ne havante filon, ŝi nenian ĝisatendos sian pastron, kaj se permesus, tiam eble Petrele . . . Tio estus ja feliĉo! Ne parolante jam pri tio, kiom da Diaj gracoj iras sur tutan parencaron de pastro, kia honoro estas esti patrino de pastro . . . Krom tio, kiam Petrele fariĝus paroĥestro, ŝi havus kie gastigi, kaj iam Petrele ŝin ankaŭ prizorgus dum ŝia maljuneco . . . Nur oni devas pripensi, kion signifas morti en paroĥdomo . . . Ĉi same estas pastro, ĉi same Dio . . .

Kaj tiamaniere ŝpiniĝis revoj de Rimutiene. Fine konsciĝinte ŝi krucsignis sin, ke la malbona spirito foriĝu, kaj ekdormis.

Dume Petre ĉiam ankoraŭ sidis en ŝia ĉambro ankoraŭ ne prepariĝante iri dormi. Neniu ĉi tie ŝin malhelpis. Tiu ĉambreto estis sole de ŝi proprajo; eĉ kiam ŝi ne estis hejme, neniu dormis en ĝi kaj tuŝis neniun de ŝi metitan objekton. Ĝi estis plej bela en la domo ĉambreto kaj en ĝi estis metitaj plej belaj aĵoj. Sur fenestroj estis blankaj kurtenoj, sur tapetaj muroj vidiĝis multego da poŝtkartoj, ĉe muro staris komodo kaj sofo, kaj sur tablo gramofono. Antaŭe dormadis ĉi tie patrino, sed kiam Petre komencis vizitadi gimnazion kaj la unuan fojon reveturis je Kristnasko, patrino foriris en alian ĉambron, cedante ĉi tiun ĉambreton al ŝia instruita filineto.

Kiam Petre ofendiĝinta kaj kolera saltinte de la tablo venis en sian ĉambron, referato komencis kvazaŭ akvo flui el sia kapo kaj plumo kuradis apenaŭ povante kapti la vortojn. Tiel per unu ekspiro dum unu horo ŝi plenskribis tutan paĝon. Nun, kiam ĉiuj foriris dormi, ŝi legis la skribitaĵojn kaj vidis, ke ĉio estas tre bona.

La komenco estis tia:

„Ĉe ni en Litovujo virinoj nur teorie havas egalajn rajtojn kun la viroj, sed en praktiko estas tiel, kiel antaŭ cent jaroj. La popolo, estanta ne priskribeble malklera, malŝatas virinon, ĉie ŝin primokas... La virinoj mem konsideras sin kreaĵoj pli malsuperaj ol viroj...“

Pluen ŝi skribis jene: „Kie estas ĉe ni egaleco kaj justeco? Kie estas iu virino en alta ofico? Kiu estas prezidanto de Litovujo? Viro. Kiu estas ministroj? Viroj. Kiu estas vicministroj kaj diversaj direktoroj? Viroj. Kiu estas episkopo kaj pastroj? Ĉiam viroj kaj viroj! Ĉion ili tenas ĉirkaŭpreninte, nenien allasante virinojn...“ Nur mi devas peni ĝin legi per tia energia kaj malĝoja voĉo, kiel tiu Kauna parolantino — kaj la impresoj ne mankos.

Uzante la inspiron, Petre volis ankoraŭ skribi, sed la pensofluo komencis malrapidiĝi. Sub plumon subŝoviĝis ĉiam pli da dialektismoj, fine kvazaŭ mallumiĝis en la kapo kaj Petre eksentis, ke ŝi dormetas. Tial pluen ne lacigante sin ŝi kuŝiĝis en liton kaj momente egaligis je rajtoj kun patro kaj onklo, kiuj malantaŭ muro jam longe ronkadis.

Ekdormis Petre kaj sonĝas.

Jen ŝi estas jam tre instruita, absolvinta tutan gimnazion kaj eĉ universitaton. Jen oni elektis ŝin prezidanto de litova respubliko. Kaj ŝi estas

ne tia mizerulo, senpova prezidanto, kiel estis antaŭe en Litovujo, sed tre potenca. Si tuj eksigis ĉiujn ministrojn virojn kaj anstataŭis ilin per virinoj. Nur solan portfelon de ministro-prezidanto ŝi donis al viro, sed nur tial, ke tiu viro nomigis Matas Linksniuote, konata per sia poeta talento kaj sia inklinoj je virinoj. La elokventa Kauna estontulino fariĝis prezidanto de parlamento. Petre estis intencinta la superajn oficojn dividi po duone por viroj kaj virinoj, por ke almenaŭ unufoje estu efektivigita tiu de virinoj tiom soife atendata justeco. Sed delegacio de virinoj, gvidata de nomita Kauna estontulino, veninte al ŝi komencis klarigi, ke ĉar viroj dum tiom da jarcentoj solaj tenis ĉion en sia povo, tion saman nun devas fari virinoj, ĉar nur tiel estos malnova maljusteco egaligita kaj ĝustigita. Tial ili petas tute forigi virojn de regado.

Petre tiel faris kaj viroj estis degradigitaj je plej malsuperaj oficlokoj, kiel antaŭe la virinoj. Kaj ĉio prosperas plej bone. En Litovujo regas ordo; la drinkemo malaperis pro persekuto de virinoj; pri subaĉetoj ne estas eĉ parolo, ĉar viroj severe estrataj de virinoj, ilin ne kuragis preni, kaj virinoj, kompreneble, tion ne faras. Sinjoro Linksniuote skribas je honoro de prezidanto ĉiam pli longajn kaj pli sentoplenajn versojn; la ambasadoroj de fremdaj landoj, ravitaj per beleco de prezidanto, estas kvazaŭ vakso molaj.

Kaj jen unu tagon venas al Petre sinjoro ministro-prezidanto kaj leginte sentoplenajn versojn, en kiuj li komparas homan vivon kun fadeneno, demandas ŝin, ĉu ŝi konsentos kuntordi fadeneton de sia vivo kun tiu de lia. Si rugiginte

respondas, ke konsentas — kaj sentas, ke nun nenio pli mankas por ŝia feliĉo.

Nur subite malfermiĝas la pordo kaj en salono perforte enpremiĝas granda amaso da virinoj: ĉiuj ministroj kaj viceministroj gvidataj de la parlamenta prezidantino. Ruĝa de kolero ŝi krias per ŝia potenca voĉo:

— Ha, jen kiel, sinjorino prezidanto de Litova Respubliko! Ne kaŝiĝu, ni ĉion scias! (Petre neniel povas kompreni, kiamaniere ili povas scii, kio ĵus okazis inter kvar muroj.) Atendu, atendu, ĉi tie estas demokrata respubliko, sed ne reĝlando! Laŭ nia decido, prezidanto ne rajtas fariĝi edzino de ministro-prezidanto, ĉar tiuj oficoj devas esti ĉiam apartigitaj unu de alia. Krom tio ni decidis, ke prezidanto entute ne rajtas edziniĝi. Tiu viro estos nek tio, nek alia, nur miksiĝos senbezone kaj tuj volos puŝi ŝian nazon en administradon. Do, ĉar vi ekintencis edziniĝi kaj eĉ kun ministro-prezidanto, ni forigas vin de prezidanta trono. Enpakadu viajn aĵojn kaj plej rapide foriĝu el prezidanta palaco. Kaj vi, civitano Linksnjuote, de nuna horo ne plu okupas vian altan oficon, kiun vi sen tio ja malrajte ricevis kaj en kiu estis kvazaŭ urtiko, kreskinta en rozĝardeno. Vi estas degradita kaj denove sendata en gimnazion de Viŝakiai instrui tie litovan lingvon kaj aliajn fakojn. Kaj civitanino Rimutaite seniĝas je ĉiuj de ni batalakiritaj rajtoj, ricevos neniun oficon kaj devos kontentigi je tio, ke ŝi estos edzino de s-ro Linksnjuote kaj pli nenio.

Ho, kia honto al Petre! Kiel domage estas perdi prezidantoficon, belan palacon, ĉion! Sed malgraŭ ĉiuj ĉi malfeliĉoj ŝia koro kantas.

— S-ro Linksnjuote min amas kaj estos mia.

Sed jen sinjoro Linksniuote proksimiĝas al parlamenta prezidantino kaj profunde kapklininte li diras:

— Pardonon estimataj civitaninoj. Ni ankoraŭ nenion definitivan decidis. Se edziĝinte mi estus degradita, mi, mi rezignos je ĉi tiu mia intenco.

Petre eksentis, ke kvazaŭ akra tranĉilo enpikis en sian koron kaj . . . vekigis.

Kie mi troviĝas? Nek estas bela salono, nek koleriĝintaj civitanoj, nek s-ro Linksniuote. Ŝi kuŝas en sia ĉambreto . . . Kiel bone, ke ĝi estis nur songo!

Ŝi turniĝis sur alian flankon kaj ŝajne ne dormas. Kaj vidas, ke kvazaŭ tra la kontraŭa fenestro eniras iu bela homo en longaj blankaj vestoj kaj grandaj flugiloj. Ho, ĝi estas anĝelo! Liaj okuloj estas tre similaj je okuloj de kuracist-edzino kaj li estas tiel radianta, tiel lumigis tutan ĉambreton. Irante rekte al ŝia tableto, la anĝelo per ora kraĵono kruksimile trastrekis sian referaton kaj supre surskribis: Pri virinaj devoj.

Sidiĝinte en lito, Petre bone vidas tiun skribajon, ĉar anĝelo lumas kvazaŭ plej luma lampo, kaj literoj brilas kvazaŭ oro. Farinte tion anĝelo malaperis. En ĉambreto denove fariĝis mallume, nur kruco sur referato kaj surskribo brilas en tiu mallumo, kvazaŭ per fosforo desegnitaj.

Vekiĝinte matene Petre tre klare memoris sian songon kaj tuj saltinte el la lito ŝi kuris al la tablo rigardi la referaton. Sed la referato kuŝis sur la tablo netuŝita tia, kian ŝi lasis hieraŭ vespere. Sed en memoro de Petre la de anĝelo skribitaj vortoj tiel radiis, ke ilia lumo atingis eĉ sian koron. Kaj Petre komencis meditadi pri virinaj devoj.

El litova lingvo tradukis J. Maĉernis.

Lumigilo de feliĉo.

De J. Biliūnas.

Sur alta kruta monto aperis mirinda lumigilo. Ĝi brilis, kiel stelo, ĉirkaŭlumigita per hela rondo, el oraj literoj. Ĝin ekvidinte homoj iris al la monto, miris je lumigilo, sed nepovante surgrimpi la monton, ne povis ankaŭ tralegi la orajn literojn.

Fine troviĝis junulo, kiu tralegis al la kolektiĝinta homamaso: "Feliĉo de la homoj."

Famo pri tio disvastiĝis en la tuta ĉirkaŭaĵo: ĉie sole nur pri tio oni parolis. Sed neniu povis bone kompreni, kaj al aliaj klarigi, kion signifas tiuj vortoj. Dum tutaj tagoj kaj noktoj homamasoj deĵoris apud la monto, unuj forirante, aliaj alvenante, kaj atendis novan, ankoraŭ pli grandan miraklon, aŭ klarigon de la malnova . . .

Kaj la lumigilo ne nur ne estingiĝis, sed ĉiam pli lumis kaj la oraj literoj ĉiam pli brilis . . .

Kaj unu nokton venis al tiuj homoj griza maljunulo, kaj demandis ilin:

— Por kio vi tien ĉi kolektiĝis kaj kion vi atendas?

La amaso respondis:

— Jen, sur la monto aperis lumigilo kun mirinda surskribo, kiun ni ne komprenas.

— Mi al vi klarigos, — respondis la maljunulo: — tiu ĉi lumigilo estas ja via feliĉo; tiu, kiu surgrimpos la monton kaj ektuŝos lumigilon, li ĉiujn homojn faros feliĉaj . . .

Ekĝojis la amaso kaj ekmoviĝis kiel maro. Kvankam la monto estis alta kaj kruta, tamen plenegaj je ĝojo homaj okuloj rigardis ĝian pinton, kiel sunon, kaj multaj jam sin preparis por grimpi.

— Haltu, mi ankoraŭ ne finis! Ne tiel estas facile, kiel vi opinias, atingi la pinton de la monto; tiujn, kiuj grimpos, de ĉiuflanke timigos abomene-gaj fantomoj, krios kaj ĝemboj per diversaj voĉoj, vokos ilin returnen. Kaj tiuj, kiuj ektimos, sin returninte ekrigardos malsupren, aŭ pro nesingardemo deglitos iliaj piedoj, momente aliĝos je ŝtonoj. Kaj eĉ tiuj, kiuj surgrimpos poste la monton kaj ektuŝos la mirindan lumigilon, tuj aliĝos je ŝtonoj kaj nur per sia morto faros aliajn feliĉaj . . .

Tiel dirinte, la maljunulo malaperis.

Ekmalĝojis la amaso, aŭdinte tiujn liajn vortojn; ekspiris la tuta amaso kiel unu homo, kaj malalten ekklinis siajn kapojn. En iliaj okuloj estis jam ne ĝojo, sed disreviĝo; nun ili ne proksimiĝis al la monto, sed komencis de ĝi malproksimiĝi . . . Neniu volis oferi sian vivon. Kaj ne nur sian vivon ne volis oferi, ankaŭ aliajn de tio admonadis. Gepatroj bedaŭris siajn infanojn, junulinoj siajn junulojn, junuloj siajn amatojn, fratinoj fratojn: unuj gardis la aliajn, tremis unu pri la alia.

Tamen troviĝis kuraĝuloj. Ne multe da tiaj estis, sed ilia nombro ĉiam kreskis.

Gefiloj kaŝe de ĉiuj forkuradis el gepatraj domoj, tre malofte benataj de ili; enamiĝintaj gefunuloj disiĝadis, unuj riproĉante la aliajn, kaj nur malofte iuj iris kun forte kunplektitaj manoj . . . Kaj iris tiuj ĉi ĉiuj kuraĝuloj al la monto por foeri sian vivon por feliĉo de la homoj, forgesante sin mem, siajn amatojn . . .

Malfacila estis ilia vojo. La monto estis tiel kruta kaj glita, ke sufiĉis la plej malgranda nesingardemo, kaj la malfeliĉuloj glitis malsupren kaj aliĝis je ŝtonoj. Kaj diversaj fantomoj,

kvazaŭ spiritoj de infero flugadis ĉirkaŭe, kiel teruraj neekzistantaj bestoj timigadis de ĉiuflanke, ĝembojis kiel lupoj, siblis kiel serpentoj, bojis kiel hundoj. Pro diversaj voĉoj kaj terurajoj al la kuraĝuloj fariĝadis kapturigo, suferis la korpo, kaj malfortiginte ili faladis malsupren, aliĝante je ŝtonoj.

Sed anstataŭante la pereintojn iris novaj amasoj da kuraĝuloj kaj grimpis sur la monto. La tutan montbazon ĉirkaŭis alta ŝtona muro: tio ja estis kadavroj de la pereintoj.

La loĝantaro nun malproksimiĝis de tiu monto, kiel de la plej terura malsano kaj pesto. Kaj tiuj, al kiuj tie pereis karaj homoj, — al gepatroj infanoj, al junulinoj junuloj, al junuloj iliaj amatinoj, forŝirante la harojn de siaj kapoj kaj verŝante la larmojn, malbenis tiun lumigilon, dro-nante en malfeliĉegoj . . . La monto fariĝis la plej terura loko de malfeliĉoj kaj malbenoj.

Tamen tio ne detenis la novajn amasojn da kuraĝuloj de la oferoj kaj sindediĉoj. La spiritoj de la pereintaj kolegoj naskis en iliaj koroj neprirakonteban mirindan eblecon: ili necedante iris al la monto unu post la alia.

El la homaj kadavroj, aliĝintaj je ŝtonoj, ĉirkaŭ la malnova monto fariĝis alia monto, kies pinto ĉiufoje pli kaj pli proksimiĝis al la lumigilo. Al la pli lastaj amasoj da kuraĝuloj ĉiam estis pli facile supreniri . . .

Kvankam jam pli ol unu jaro da oferoj kaj sindediĉoj pasis, kaj tamen ankoraŭ nek unu el la suprenirantoj alproksimiĝis al la monta pinto, ektuŝis la mirindan lumigilon. La loĝantaro de la ĉirkaŭaĵo nomis ilin jen revuloj kaj frenezuloj, jen ploris ilin bedaŭrante; multe ankoraŭ estis da

tiaj, kiuj je ili nur ridis, mokis kaj ĝojis, ke ili pereas.

Sed, jen, unu belan printempan tagon sen-nombra amaso da kuraĝuloj — gejunuloj, infanoj kaj maturaj viroj, palaj kaj lacaj — denove alproksimigis al la monto. En la okuloj de ili ĉiuj lumis espero kaj kuraĝo, amo kaj sindediĉo. Ekkriegis ĉiuj per potenca voĉo kaj, kiel ondoj de ekmoviginta maro, sin jetis al la monto, deĉiuflanke timigataj kaj persekutataj de fantomoj, ili grimpis kaj grimpis trans la ŝtonaro supren, surkovrante la tutan vojon per novaj kadavroj de siaj pereintaj kolegoj. Ju pli supren ili grimpis, des pli mal-densa fariĝis ilia nombro. Jen jam nur iomete da ili restis. Sed ili jam tre, tre proksime estis de la pinto. Aŭdis ili jam nek kriegon de fantomoj, nek vidis iliajn terurajn vizaĝojn; iliaj brilantaj okuloj estis streĉitaj al la lumigilo, kaj de ĝi ili ne povis jam sin detiri, tio ja estis fino de ilia malfacila vojo, tie ja feliĉo de la homoj staris antaŭ iliaj okuloj . . .

Ankoraŭ du, tri kolegoj falis kaj la restintaj atingis la pinton . . . Ekkriis ili per la ĝojega potenca voĉo de la venko, kaj ĉiuj, kiel unu ekkaptis per siaj manoj la lumigilon. Ĉiuj unu-momente aliĝis je ŝtonoj . . .

Kaj fariĝis miraklo! Ĉiuj fantomoj malaperis, kaj la ektuŝita lumigilo dispeciĝis je sennombra multego da lumigiletoj, kaj, kiel falantaj steloj de la ĉielo, deĝis de la monto malsupren eklumigante la tutan ĉirkaŭaĵon. La homoj de tiu ĉirkaŭaĵo subite eksentis en siaj kampoj, domoj kaj loĝejoj agrablan lumon, en siaj koroj kaj kapoj neprirakonteblan kvietecon. Momente dispeciĝis katenoj de la mallibereco, malaperis inter la homoj malamo kaj diversaj ofendoj kaj malju-

steco; ĉiuj sin eksentis estantaj egalaj kaj feliĉaj, ĉiuj estimis la proksimulon kaj liajn rajtojn.

Aperis feliĉo inter la homoj . . .

Ekvidinte sin kaj aliajn tiel aliĝintajn, la homoj divenis ankaŭ la kaŭzon de la ŝanĝo. Rememoris ili la mirindan lumigilon, kaj ĉiuj, kiel unu, kuris al la malbenita monto por ekrigardi. Sed kolektiĝintaj homamasoj jam ne trovis la lumigilon. Eĉ la malnova monto jam ne estis videbla: ĝi tuta estis, de la malsupro ĝis la pinto mem ĉirkaŭita per ŝtonaro.

Ĉion komprenis nun la homoj kaj kun respekto humile ekklinis siajn kapojn teren; tio ja estis la kadavroj de iliaj savintoj, kiuj, mem mortante, alportis al ili la feliĉon . . .

Kaj de tiu tago la antaŭe malbenita monto estis nomita loko de gloro kaj feliĉo; de tiu tago ĝi fariĝis historia monumento de la vivo de la homoj. Nun la loĝantaro ne nur de ĝi ne kuris, kiel de malsano kaj pesto, sed kun respekto kaj amo humile klinis teren siajn kapojn, rememorante la pereintajn savintojn de la lando.

Esperantigis Vaclavas Bartoŝeviĉius.



Bildeto.

De Julius Janonis.

Aŭtuno ploretas. Per koto de Litovuja vojo vadas longa, longega militistara vico. Apenaŭ vivaj unu post la alia kun malfacileco iras kuntiriĝintaj en kotigite grizaj, kiel ĉirkaŭantaj kampoj, manteloj, malgajaj soldatoj.

De kie kaj kien?

De kie, oni ne scias. Sed profunden enfalintaj, nenion esprimantaj okuloj, paligintaj vizaĝoj kaj la sama paŝado de tute laciĝintaj homoj atestas, ke de malproksime. Eble el mezo de Rusujo kaj eble eĉ el la malproksima Siberio . . . Ĉu tamen ne ĉio la sama? Tute egale ili estas forlasintaj siajn familianojn, eble sen pano restigitajn edzinojn, infanojn . . .

Kaj kien?

Kompreneble estas. Tien, de kie, kvazaŭ sonoj de malproksima tondro, alflugas jen pli fortaj, jen malpli fortaj sufokigitaj tondrobatoj . . . Kaj jam tie ĉi aŭdiĝas eĥo de milito, kaj jen ĉi tie estas viktimoj de ĝi . . .

Kaj kontraŭvole rigardo turniĝas al la malrapide ŝanceliĝanta longa vico kaj akompanas ĝin tiel same, kiel jam multajn ilin akompanis, ĝis kiam malaperas for de okuloj la lasta homo . . .

Jam multaj ili foriris okcidentodirekten — sed kiu scias, kiom da ili revenos . . .

Kaj doloras la koro, doloregas, ekvidinte, sur kiel ankoraŭ malalta nivelo staras la homo . . .

Esperantigis Liudas Alseika.

La problemo de nacia civilizacio en Litovujo.

De Prof. D-ro St. Šalkauskis.

Rilate al disvolviĝo de litova civilizacio oni povas diferencigi tri periodojn. La unua periodo distingiĝas per supereco de orientaj vivprincipoj kaj finiĝas en la jaro 1569, kiam okazis la unio de Lublin. La dua periodo distingiĝas per supereco de okcidentaj vivprincipoj kaj finiĝas en la jaro 1883, kiam plentagiĝis la nacia revekigo de Litovujo. De tiu tempo komenciĝas la tria periodo, kiu daŭras ĝis hodiaŭ. Volante solvi la problemon pri litova civilizacio, ni devas laŭvice esplori ĉiujn ĉi tri periodojn, ĉar la nuna stato de litova civilizacio estas rezulto el la tuta historia fariĝo de Litovujo. Ĉi tion ni faras en formo de resumo el la libro de aŭtoro „Sur les confins de deux mondes.“

I. LA TEZO.

La supereco de Oriento en Litovujo.

A. *La fundamentaj elementoj de litova nacieco.*

Kiam la popoloj venante el prehistoria mal-lumo aperas en la historia helo, por ilia sorto precipe gravan rolon ludas tri grupoj de faktoroj: unu grupo estas ligita kun la etnologia karaktero de nacio, la dua — kun la geografia situacio, la tria — kun historiaj cirkonstancoj de interna kaj ekstera vivo. Estos interese esplori, kiamaniere

en la unua periodo de litova kultura vivo esprimiĝis ĉiu el supre nomitaj faktoroj. Antaŭ ĉio, kian rolon ludis ĉi tie la etnologia karaktero de litova nacio? — La respondo al ĉi tiu demando estas grava ne nur por la unua periodo, sed ankaŭ por la du sekvantaj; tial ĉi tiun demandon ni devos pritrakti iom pli detale.

Litovoj, simile kiel ankaŭ la aliaj hindo-eŭropanoj, venante el Oriento Okcidenten, alportis kun si elementojn aŭ ecojn de la orienta spirito. En la novaj loĝlokoj kaj ĉe novaj vivcirkonstancoj la originaj ecoj iom post iom ŝanĝiĝadis kaj konformiĝis al aliaj de ĉiuj flankoj ricevataj karakterecoj. Tamen, pri la litova nacio oni devas diri, ke ĝi pro sia tradicia konservativismo plej longe kaj plej pure konservis en sia karaktero kaj en sia vivo la originajn orientajn ecojn. Eĉ en la hodiaŭa litova lingvo, en la restaĵoj de ĝia mitologio, en la popola poezio klare ankoraŭ sentiĝas la rezonoj de orienta mondo, kiel la fundamenta eco de nacia karaktero, kiu ankoraŭ hodiaŭ donas la eblon ekkoni la komunan de eŭropaj nacioj heredajon, elportitan el la komuna hindo-eŭropa prapatrujo. Ĉi tio estas tro konataj aferoj por ilin ankoraŭ foje pruvadi.

El la supre dirito estas facile fari la konkludon, ke el ĉiuj eŭropaj nacioj en litovoj postvivas plej multe da komunaj ecoj de hindo-eŭropa gento. Alie dirante, la komuna hindo-eŭropa gento eble plej pure esprimiĝas en litova nacio, ĉar ĉi tie ĝi restis ne tuŝita ne nur fiziologie, sed eĉ psikologie. Ĉi tiu fakto havis tre gravan signifon por la litova historio, ĉar ju pli puraj restas la gentaj ecoj en iu nacio, des pli aktive ili esprimiĝas en la popola vivo. Ĉi tion oni devas konstati precipe pri la litova nacia historio.

La hindo-eŭropa gento, kiel ĝi aperas en sia prapatrujo en Oriento, reprezentas la plej perfektan tipon de primitiva homaro, kunigante la riĉecon de intelektaj kapablecoj kun pasiva sinfordono al ritma natura vivo. Laŭ sia ideala tipo la hindo-eŭropano antaŭ ĉio estas nedifektita naturhomo. En li havas la superecon la faktoroj ne de la kulturo, sed de la naturo, ĉar li kaŝas en si la riĉan naturan disponon, kiu estas la elirpunkto por la kultura agado. La interna riĉeco de spirito ĉi tie ankoraŭ ne esprimiĝas en la formoj de ekstera civilizacio.

Simile ankaŭ kiam la litovoj eniradis la helon de historio, la komunaj ecoj de hindo-eŭropa gento estis la elirpunkto por kultura ĝia disvolvigo. La pasiveco, ennaska al ĉiuj veraj filoj de naturo, metis sian stampon sur la tutan ilian vivon. Por akiri la kulturen aktivecon, ili devis travivi ankoraŭ longan historian tempospacon, dum kiu al ili estis destinita sperti multe da diversaj influoj, sugestintaj ilian nacian spiriton.

La problemon pri la aktivigo de litova nacia spirito siatempe ekprenis la fama franca geografo E. Reclus, tamen tute ĝin ne solvis. Estos ne seniterese postsekvi lian penson, por poste dece respondi al la demando. Jen kiamaniere li pri-skribas la litovan karakteron:

„Estante popolo de arbaristoj aŭ terkulturistoj, tre sindonaj al siaj prapatraj moroj, — la litovoj, diras E. Reclus, facile fordonas sin al la sorto kaj eĉ ne provas ĝin direkti laŭ sia voldecido. La litova indiferenteco fariĝis eĉ proverba: neniu alia nacio tiel facile kaj trankvile akordiĝas kun la ŝanĝiĝintaj vivcirkonstancoj.“¹⁾

¹⁾ E. Reclus, *Nouvelle Géographie Universelle*, vol. V, 432 p.

Ni povus ĉi tie aldoni, ke perdinte la paciencon, la litovo scipovas ekscitiĝi kaj uzi siajn fortojn laŭ cirkonstancbezonoj. Li, kiu kutime malforte reagis al kutimaj sortobatoj, subite superŝvelas je mirinda ekscitiĝo, kiam lia pacienco kaj sinrego atingas la limon: tiam la longe ŝparita energio erupcias kun terura forto.

La koncentriginta en si mem, pli multe inklinata al pensemo ol al agado, la litovo esprimas ĉi tiun sian karakteron ankaŭ per sia ekstera aspekto: „La litovaj vilaĝanoj, diras E. Reclus, per simpleco de sia vestaĵo rimarkinde kontrastas je poloj; ili evitas la akrajn kolorojn, la malsimplmanierajn modojn, la brilajn ornamojn; la griza ilia vesto, brodita per neniamaj ornamoj, atestas pri ilia modesta karaktero: ili tute ne penas fieri pri sia aspekto. Komparante litovojn kun poloj — „la filoj de la suno“, Michelet nomas ilin „filoj de la ombro“ (Légendes du Nord).“¹⁾)

La litova nacia poezio inspiris al E. Reclus jenan priŝkribon de moralaj ecoj de litovoj: „Iliaj kantoj bele esprimas ilian animon: ili estas atentaj observantoj, iaforte iom ironiaj, sentoplenaj, melankoliaj, plenaj je naturkompreno. Kvankam ili estis devigataj ofte militadi kaj havis grandajn militheroojn, ili — ĉi tiu pacama popolo — rememoras nenian militheroon, prikantas neniun militiron, fieriĝas pri neniuj gajnita bataloj; ĉi tiu popolo kontentiĝas per priplorado de siaj mortintoj: laŭ ĉi tiu vidpunkto la litova nacio estas eble la unika en la familio de eŭropaj nacioj. Ĝi diferenciiĝas de aliaj kontinentaj nacioj per subtila singardo, hontema diskreteco, kun kiu ĉiuj ĝiaj popolaj kantoj parolas pri la amo.“¹⁾)

¹⁾ E. Reclus, Nouvelle Géographie Universelle vol. V, 431 p.

Jen la litovo tia, kiel lin produktis la naturo kaj kia li restas de kulturo ankoraŭ ne ĉirkaŭhakita. La tre pasiva lia karaktero altiris al si la atenton de E. Reclus kaj igis lin eĉ tro rapide fari la ĝeneraligan konkludon pri la signifo de ĉi tiu faktoro por la nacia vivo. „La longe de Nemunaj arbaroj premita nacio, diras li, ne estas el tiuj, kiuj povas kompari sian influon kun la rolo, kiun ludis la aliaj kulturaj popoloj de Eŭropo. Kelkiu mirante demandas sin, kiel povis okazi, ke la nacio, konsistanta preskaŭ senescepte el homoj sentemaj, intelektaj, poeziemaj, dotitaj de naturo per riĉa fantazio, „homoj honestaj, forte konsciaj pri sia persona indeco“¹⁾ ne kapablis produkti eĉ unu grandan poeton, eĉ unu grandan geniulon sur la spirita kampo (J. E. Kohl, Die Völker Europas).“²⁾

E. Reclus al ĉi tiu demando respondas jenmaniere: „Tiel okazis, ĉar ĉi tiu popolo ĉirkaŭita de malamikoj kaj poste venkita de ili, ekmankis la konfidon al siaj fortoj.“³⁾

La franca geografo solvas la demandon sole en la lumo de etnologia litova karaktero, ĉar en tiu tempo, kiam li tion skribis (ankoraŭ antaŭ 1880 jaro) li ne povis uzi tiun novan lumon, per kiu la litova revekigo lumigis kiom la litovan

1) Rim. de trad.: Tiel diras la fama filozofo Kant en sia antaŭparolo en „Lietuviškoji gramatika“ (litova gramatiko) de Milkės. Estas bone fundamentita opinio, ke la mondfama Kant estas litovdevena, kion jam pravas lia ne germana nomo. En Litovujo similaj nomoj renkontiĝas sufiĉe ofte, kaj ankaŭ en la germanigita, origine litova gento prusaj ĝis hodiaŭ troviĝas lokonomoj, kiel Kanten, Kantin, Kantenjaj, Kantenis (Die altpreußischen Ortsnamen, de Königsberga prof. D-ro Georg Gerullis, Berlin 1922 paĝo 56.)

2) E. Reclus, Nouvelle Géogr. Univ. V, 431—432 p.

3) En sama verko 432 p.

nacian karakteron, tiom ankaŭ la tutan ĝian historian sorton. Nun li povus certigi, ke nur de post sia revekiĝo la litova nacio komencis la periodon de normala nacia kulturkreado, kaj ke nur en ĉi tiu periodo ĝi komencas aktive esprimi sian nacian individuecon, ricevintan aktivan karakteron dank' al travivaĵoj dum sia antaŭa historio.

Konsiderante la nacian revekiĝon de litovoj kaj tiujn tute apartajn cirkonstancojn, kiuj antaŭe malhelpadis la nacian ilian evoluon, oni ne povas konsideri la vivon de litova nacio tiom ne produktata, kiel ĝi ekŝajnis al E. Reclus. Kontraŭe, ni kuraĝas aserti du opiniojn, kiuj klariĝos el la sube dirota: unue, dum la tuta litova historio la spirito de nacio, kie kaj kiamaniere ĝi povis, penadis servi al la altaj bezonoj de civilizacio; due, la civilizacio de Eŭropo ŝaldas al litova nacio multe pli multe, ol oni kutime ĝin opinias, — eĉ pli multe, ol oni povus esperi de nacio, al kiu la cirkonstancoj estis tiom malfavoraj.

Aliaflanke, la nacia litova aktiveco aperinta tute subite kun la komenciĝo de la nacia revekiĝo, estas rezulto de interpuŝiĝo inter Oriento kaj Okcidento, kiu okazis sur litova teritorio. Ĉi tio kolorigas ĝin tute apartmaniere.

Oriento, kvankam laŭ sia karaktero pasiva, posedas pli ol Okcidento da produktaj fontoj kaj memstara energio en la potenciala stato. La aktiva Okcidento estas pli inklina al organiza laboro, ol al pacienca agemo. Kaj ĉar la perfekteco de la produktata vivo dependas de la interharmoniigo de ĉi tiuj du principoj, tial Oriento kaj Okcidento senkonscie gravitadas unu al alia. Sur ĉi tiuj laŭinstinktaj penadoj baziĝas la historiaj iliaj rilatoj. La antikvaj tempoj vidis la grandegan ondon, naskiĝintan en Oriento kaj superakvigintan

Okcidenton; iom poste komenciĝis kun ankoraŭ pli granda forto la refluo: al „premiĝo Okcidenten“ respondis „premiĝo Orienten“. Komence la kreaĵ fortoj de Oriento serĉas tion, kio povus ilin fruktigi; poste Okcidento serĉas por si kampon por sia aktiveco. Se ni konsiderus la homaran vivon kiel esprimiĝon de iu unuo, tiam la reciproka efiko de du mondoj ŝajnas konsistanta el du fariĝoj, per kiuj manifestiĝas la homa spirito: komence ĝi malfermiĝas por la ekstera mondo por poste reveni en sin mem. Al homaro, kiel ankaŭ al individuo, ĉiu ĝia eco havas sian relativan valoron por akiri feliĉon, sed nur la suma interharmoniĝo de ĉi tiuj ecoj povas garantiĝi al ĝi la tutecan evoluon.

Litovujo ankaŭ travivis ĉi-tiujn du evoluetapojn: ekscitita per la atakoj de siaj najbaroj, ĝi estis, tiel dire, elirinta el si mem, el sia pasiveco, por interrilati kun aliaj nacioj; per ĉi tio ĝi akiris la aktivajn ecojn, kiuj mankis al ĝi antaŭe. Poste, sekvante la refluan ondon, ĝia nacia spirito, nun jam kapabla fari la krelaboron, revenas en sin mem kaj preparas la sintezon de orientaj principoj, kiujn ĝi jam de komenco posedis en siaj profundajoj, kaj de okcidentaj principoj, kiujn ĝi akiris dum sia historia sperto. Noĉe, en ĉi tiu evoluetapo troviĝas nun la litova nacio deĝista nacia revekigo.

Dirante mallonge, la nacia litova karaktero evoluadis laŭ kontrasta regulo: nur en reakcio ĝi akiradis tion, kion ĝi ne posedis en la senpera agado. La povon reagi kun precipe granda potenco ĝi montris en du plej gravaj momentoj de sia historio: la unuan fojon en la XI jarcento, kiam la premego flanke de najbaraj nacioj elvokis en litovoj la energian kontraŭstaron, kiu el rajta

sindefendo baldaŭ fariĝis almilita ekspansio; la duan fojon en la XIX jarcento, kiam la fremda subpremo kontraŭ sia deziro pligrandigis intencesecon de nacia revekigo, donante al ĝi nevenkeblan vivecon. Reagante la unuan fojon la genio de litova nacio preparis la fondon de forta kaj potenca ŝtato; la duan fojon ĝi komencis tutenergie puŝi la nacion laŭ vojo de kultura kaj politika sendependeco, nehaltigante ĝis estos atingita la celo. Kvankam ĉi tiujn du momentojn departigas tutaj jarcentoj kaj diferenco de direktoj, tamen la internaj ligiloj, eĉ mem la historia logiko, kunligas ilin ambaŭ. Ĉar la penadoj de litovoj kun ŝtataj rimedoj krei nacian civilizacion siatempe ne nur ne sukcesis, sed kontraŭe komence disponigis ilin al fremda influo kaj poste eĉ submetis ilin al fremda regado, — tial nun, akirinte politikan sendependecon, la litova nacio decidigis apogi sian sendependecon sur pli altan nacian civilizacion.

El reakcioj, regataj de kontrastregulo, la litova nacio laŭsperte ekkomprenis, ke la sintezo de nacia vivo ne povas okazi sen deca kunlaboro de intelektularo kaj de simpla popolo, kaj, de alia flanko, sen deca ekvilibra akordigo de kontraŭaj influoj. Litova historio laŭesence estas historio de nacia genio, kiu malgraŭ la interna apartigo kaj malgraŭ la interbatalo de du mondoj en ĝiaj profundajoj, dank' al nacia konservativismo konservis sian individuecon kaj penadas korekti siajn historiajn erarojn, produktante novan intelektularon kaj farante sintezon de elementoj de du diferencaj mondoj.

B. La direkto de la unuaperioda litova historio.

Supre estas montrita, kiamaniere ŝanĝiĝis kaj fortiĝis la nacia litova karaktero. Kiel dirite, en la unua periodo, la atakoj de najbaroj devigis la litovan nacion eliri el si mem kaj serĉi kulturen fruktigon. Kien devis direktiĝi ĉi tiu procedo en la proksima estonto, ĉi tion decidis la geografiaj kaj historiaj cirkonstancoj dum la kreiĝo de litova ŝtato.

Vivante flanke de la vojo, laŭ kiu iris la granda popolmigrado, la litova nacio longe dormetadis sur la sino de la naturo kaj en si mem ne trovis sufiĉe da stimuloj, kiuj estus povintaj ĝin vekigi kaj instigi al iu pli energia historia faro. Vere, jam en la plej antikva mezepoko sur la du falangoj de litova teritorio, de oriento kaj de okcidento, estis sentebla la kultura movado, kiu kompreneble, ne povis lasi litovojn netuŝitaj. Ĝi estis de unu flanko, la granda akvovojo, kondukinta el Bizancio en Skandinavion, al kiu apartenis ankaŭ la baseno de Daŭguva (Dvina); kaj de alia flanko — la komercvojo, liganta Italujon kun Skandinavio kaj kondukanta preter Vieno tra „Caruntum“ kaj Prusa lando.

Tamen ĉi tiu kultura movado ne puŝis ankoraŭ la litovan nacion al historia scenejo. Ĉi tio okazis sur la sojlo de X kaj XI jarcento, kiam la atakoj de polaj kaj rusaj princoj igis la defendantajn sin litovojn transiri al kontratakoj. En la XI kaj XII jarcento ili jam plezure provadas siajn fortojn en aktivaj militentreprenoj. Ili ofte venkas, sed ne havante firman ŝtatan organizon, ili ne kapablas fortikiĝi en la militakiritaj landoj. Por litovoj, kiel ankaŭ en multaj aliaj lokoj, la milito estis forta stimulo por fondi ŝtaton. Tamen la problemoj pri fido de la ŝtato fariĝis por ili

demando pri vivo aŭ morto nur tiam, kiam la premo de teŭtonaj ordenoj de krucmilitistoj kaj de glavofratoj komencis minaci al iliaj plej gravaj vivinteresoj.

Litovoj kvazaŭ senkonscie sentis, ke iliaj propraj fortoj ne sufiĉos por kontraŭstari al du ordenoj, sub kies standardoj kolektiĝadis la plej kuraĝaj militemuloj el preskaŭ la tuta okcidenta Eŭropo. Tial la instinkto de sindefendo igis ilin pligrandigi siajn materiajn fortojn per almita politiko, por povi kontraŭstarigi al teŭtonaj ordenoj egalan potencon.

Ĉi tiu almita politiko de litovoj devis turniĝi tiudirekten, kie estis renkontebla plej malgranda kontraŭstaro, nome — orienten, kontraŭ rusoj. En tiuj tempoj, tio estas en la XIII jarcento, la plinulto da rusaj princoj ne povis kontraŭstari al tataroj kaj estis de ili almilititaj. La okcidentaj rusaj, blankrutenaj kaj ukrainaj princoj preferis subiĝi al litova grandprinco ol esti sklavigitaj de tataroj. Ĉi tiu cirkonstanco kune kun la ceteraj ĉi tie ne pritraktotaj, rimarkeinde plifaciligis al litovoj atingi sian politikan celon. En bataloj kontraŭ tataroj almilitinte iun rusan landon, litovoj organizis ĝiajn materiajn fortojn por uzi ilin poste ne nur kontraŭ tataroj, sed ankaŭ kontraŭ teŭtonoj.

Estas memkompreneble, ke en ĉi tiu unua historia periodo litova nacio devis disvolvi grandan energion; mem restante idolana kaj de ĉiuj flankoj ĉirkaŭita de kristanaj malamikoj ĝi tamen sukcesis krei fortan ŝtaton, kapablan defendi sian ekziston. Laŭesence prudenta instinkto igis ĝin senti, ke, dezirante sukcesi en la proviva batalo kaj doni al tiu batalo pli altan sencon, necesas akordigi siajn naturajn inklinojn kun ia pli alta ĝenerala ideo.

La litova ŝtato, formiĝinta pro la plej gravaj vivintereso, jam de la komenco de sia ekzisto havis gravan signifon; al ĝi, nome, estis destinita haltigi la penetradon de militemaj teŭtonaj ordenoj orienten, kaj de alia flanko en la sama tempo haltigi la tataran ondegon, ruliĝantan okcidenten. Plenumante ĉi tiun gloran rolon litovoj sukcesigis ankaŭ sian nacian taskon, kiu estis same bela, kiel ankaŭ signifplena.

Kaj vere, oni ne povas ne miri pri tiu eksterordinara vidajo, kia estis la lastaj en Eŭropo idolanoj, fondantaj kun mirinda energio potenca ŝtaton de Balta ĝis Nigra maro kaj samtempe en XIII kaj XIV jarcentoj subtenantaj ekvilibron inter Oriento kaj Okcidento. En ĉi tiu historia procedo idolana Litovujo defendis kristanan Okcidenton de tataraj bandoj kaj la kristanan Orienton de teŭtonaj ordenoj.

Por defendi de orientaj barbaroj tion, kion bonan posedis la okcidenta civilizacio, kaj por defendi kontraŭ okcidentaj barbaroj tion, kion valoran havis la orienta civilizacio, la sorto vokis sur la historian scenejon litovojn-idolanojn kaj pro ilia utila helpo destinis al ilia nacio la honoran taskon kunligi en sintezo du civilizaciojn, kiujn ili tiel sukcese defendis. Tiam internan sencon havis la en XIII jarcento fondita litova ŝtato.

La prolema, kiun solvi estis destinita al litova nacio jam de la komenco de ĝia historia vivo, ne estis solvebla de la komenco de ĝia kultura kreado. Komence la litovoj havis la okazon konatigi kun greko-rusa civilizacio, kiun ili renkontis etendante la limojn de sia ŝtato orienten. Laŭ pligrandiĝo de litova ŝtato pligrandiĝis ankaŭ la kulturaj bezonoj de litovoj, ĉar en okcidento

ili devis militi kun pli kulturaj siaj malamikoj, kaj en oriento regi pli kulturajn landojn. Do, ne estas mirinde, ke trovinte en limoj de sia ŝtato pli altan civilizacion, havantan fortan tradicion, litovoj komencis alpropriigadi ĝin por siaj bezonoj. Oni povas nur bedaŭri, ke la formoj, en kiuj ili prunteprenis la civilizacion en Rusujo, en tiu tempo respondis nek al ilia nacieco, nek al civilizacia utilo entute. Ili prunteprenis meĥanike, same kiel meĥanike ili estis puŝitaj al almilita ekspansio, al interrilato kun siaj subuloj kristanoj. Defendante sian ŝtaton kaj almilitante fremdajn popolojn litovoj foruzis multe da fortoj kaj poste ne kapablis aktive montri sian nacian individuecon en almilititaj teritorioj.

Oni devas konsenti, ke la rusa civilizacio, prunteprenita el Brizantio, sufiĉe bone konvenis al la unua periodo de litova historio. Laŭ kultura vidpunkto ĝi estis meza ĉeno inter la natura orienta pasiveco kaj la kultura okcidenta aktiveco. Ĉi tiu cirkonstanco helpis al pli rapida disvastiĝo de tiu civilizacio inter litovoj.

Tamen estas grave memori, ke la influo de nova kulturo disvastiĝis nur en certa regiono, ke ĝi ne en sama grado influis diversajn regionojn de litova ŝtato kaj diversajn sociajn klasojn. Tiu kulturo disvastiĝis en Litovujo tiom, kiom ĝi respondis al bezonoj de ŝtatorganizo kaj al interesoj de reganta klaso. Litovoj komencis uzi en siaj oficialaj dokumentoj slavan, rusan lingvon, kaj la grandprinco kun siaj nobeloj en sia ĉiutaga vivo komencis uzadi blankrutenan lingvon. Tiamaniere, la intelekta kulturo de litova inteligentularo komencis esprimiĝi en formoj de greko-rusa civilizacio; dume la simpla popolo restis fidela al sia nacia individueco.

Tiamaniere la inteligentularo rifuzis plenumi sian rektan devon, nome — levi la simplan popolon sur pli altan kulturŝtupon. De tiu tempo komencigis la malfeliĉa apartiĝo inter inteligentularo kaj popolo. Kaj ju pli apartiĝis nacie la supera klaso de la cetera popolo, des pli sentebla fariĝis la politika kaj sociala antagonismo. Kun la tempo eĉ la ŝtato mem, grandmezure perdinte la naciajn ecojn, komencis servi nur al la reganta klaso. Unuvorte, la socio kaj la ŝtato komencis aristokratiĝi.

La litova ŝtato jam de la komenco konsistis el du partoj: el litova kerno kaj el rusaj provincoj. Por ke la ŝtato povu vivi intensan kaj fortan vivon, estis necese kunfandigi tiujn partojn en unu unuon kaj apogiĝi pro manko de nacia patriotismo sur ŝtatan, socian patriotismon.

Kaj ĉi tiu kunfandigo okazis tiamaniere, ke la tuta reganta klaso estis inklina al greko-rusa civilizacio, haviganta al heterogena litova reganta klaso la kulturalan komunecon; krome, komence de XV jarcento Vytautas la Granda, dezirante plifortigi politikan unuecon de Litovujo neneigis la aŭtonomion de rusaj princolandoj. De ambaŭ flankoj estis farita kompromiso: perdon de sia aŭtonomio la provincoj kompensis per denaciigo de litova aristokrataro. Poste, de unu ŝtatofino ĝis la alia disvastiĝis la ideo pri litova nacieco, kiel esprimo de ŝtata unueco.

Dum interne de litova ŝtato iris la priskribita procedo, en najbareco okazis nova grupiĝo de la fortoj. En Oriento dum tiu tempo Rusujo liberigis de tataraj jugo (1480) kaj forigis ilin de historia scenejo. Fortiĝinta tiamaniere la Moskva ŝtato trapenetriĝas per aŭtokrata spirito kaj la ideo „unuigi ĉiujn rusajn landojn“. En Okcidento proksimume

en la sama tempo pereas la potenco de teŭtonaj ordenoj. Post kiam Litovujo akceptis bapton, ili ne havis pli motivon por sia ekzisto kaj tial nun ne trovadis pli tiom da morala kaj materiala subteno en Okcidenta Eŭropo, kiel antaŭe. La frakasitaj ĉe Grunvaldo en la jaro 1410 krucinilitistoj jam ne kapablas plu reakiri sian estintan potencon kaj en la XVI jarcento alvokas Polujan protektoraton. En la sama jarcento la glavofrata ordeno petas de Litovujo helpon kontraŭ Moskvo kaj rekonas sur si la superregon de Litovujo kaj Polujo.

La potenco de poloj en tiu tempo kreskas. La unuiĝo kun Litovujo en la jaro 1385 por ili signifis komencon de la nova epoko. La litova ŝtato ne nur defendis ilin de orienta flanko, sed liveris al ili ankaŭ novajn teritoriojn por ilia kultura ekspansio tiudirekten. La poloj komprenis eluzi la novajn cirkonstancojn por pligrandigi sian materialan potencon kaj stimulataj per la akiritaj sukcesoj ili ekdeziris almiliti por si la hegemonion en la slava mondo. Iliaj bataloj kontraŭ turkoj, kiuj tiutempe estis okupintaj Balkanan duoninsulon kaj jam komencis minaci al Centra Eŭropo, akiris por ili gloron de defendantoj de Okcidenta civilizacio kaj fortigis ilian prestiĝon dum ilia penado akiri hegemonion inter slavoĵ.

Tiamaniere, Moskvo kaj poloj anstataŭis tatarojn kaj teŭtonojn, kiel reprezentantojn de Oriento kaj Okcidento, penantajn penetri Litovujon. Pli aŭ malpli frue Moskvo kaj Polujo devis fariĝi malamikoj pro diverseco de sia civilizacio, ĉar ambaŭ ŝtatoj egale penadis disvastigi siajn limojn kaj influon. Rivaleco estis des pli neevitebla, ke la du ŝtatoj laŭ sia tipo forte kontrastis: Moskvo disvolvigadis en direkto al absoluta monarkio en orienta despota stilo; Polujo, sekvanta la okcidentan individuismon, evoluis al aristokrata respubliko.

La despota absolutismo en Moskva ŝtato estis bazita sur orienta pasiveco de regatoj. La volo de reganto estis ĉi tie leĝo kaj la tuta socia vivo senredire devis obei al li. La ordo ĉi tie estis sinonima kun sklaveco.

Tute alia estis Polujo. La elira punkto por ĝi estis individuismo: liberum veto, kvankam pli malfrue formulita, fariĝis ĉi tie plej supera vivonormo. Arbitreco anstataŭis ĉi tie liberecon.

Litovujo estis devigita konduki armilan militon kontraŭ Moskvo kaj diplomatian militon kontraŭ Polujo. Rezisti kontraŭ siaj malamikoj el Oriento kaj Okcidento signifis por Litovujo starigi ekvilibron inter materialaj kaj politikaj fortoj de Moskvo kaj Polujo. Dum litovoj sukcesadis subtenadi ĉi tiun ekvilibron, ili ĝuis sian sendependan ŝtatovivon. Sed ĉi tio dependis kiom de sukcesoj sur militkampoj, tiom ankaŭ de scipovo akordigi interne de la ŝtato tiujn kontraŭajn principojn, kiujn reprezentis la eksteraj rivaloj — Moskvo kaj Polujo. Aŭ, dirante pli ĝuste, la sukceso en milito kontraŭ malamikoj dependis de la deca plenumo de la lastnomita tasko.

Kiel jam supre estas menciita, Moskvo kaj Polujo, irante laŭ kontraŭaj direktoj, ne kapablis en sia interna vivo akordigi la ordon kaj liberon. Dume la litova ŝtato, sekvante la instinkton de sinkonservo, scipovis — ĉi tion ni devas konsenti — ne malbone akordigi ĉi tiujn apogojn de socia vivo kaj doni al ĝi senkomparan por tiuj tempoj altan esprimon en la fama „Litova Statuto“.

„Litova Statuto“ povas servi kiel mezurilo de tiu kultura nacia kreado de litova spirito, kiu montrigis en la unua ĝia historia periodo malgraŭ ke ĝi estis vestiita per fremda vesto, sub kiuj estis kaŝita la mortiga armilo.

Ke „Litova Statuto“ estis kreprodukto de litova spirito, kvankam ĝi akceptis fremdajn, nome polajn kaj rusajn principojn, plej bone pruvas tiu fakto, ke la nacioj, de kiuj estis prunteprenitaj ĉi tiuj principoj, havigis al si leĝkodeksojn multe pli malfrue ol Litovujo. Rusujo havigis al si skribitan leĝkodekson nur post pli ol cent jaroj kaj eĉ tiam multon prenante el „Litova Statuto“. De alia flanko, Polujo devis eĉ atendi la Napoleonan kodekson.

„Litova Statuto“ estas la plej granda monumento de nacia litova civilizacio el la unua ĝia historia periodo. Ĝi estas simbolo de tiu politika ekvilibro, kiu montriĝis en akordigo de ordo kaj libero interne de la ŝtato, kaj de ekstere — en haltigo de orientaj kaj okcidentaj elementoj en ilia tendenco neneigi unu la alian.

II. ANTITEZO.

La supero de okcidenta influo en Litovujo.

A. La tendenco de litova historio en la dua periodo.

La regado de Jogaila en Litovujo estis komenco de gravaj ŝanĝoj en nacia litova vivo. La bapto de Litovujo, akceptita el manoj de katolika pastro, la politika unio kun Polujo kaj ĉiam kreskanta interamikigo inter la aristokrataro de ambaŭ landoj — ĉio ĉi havis decidigan signifon por la litova vivo, kiu de nun ĉiam pli deturniĝas de Oriento kaj direktiĝas al Okcidento.

Post faro de unio kun Polujo Litovujo large malfermiĝis por la influo de latine-pola civilizacio. Ĉi tiu influo iris paralele kun la agado de pola pastraro en Litovujo. Ne malpli gravan rolon havis la komuneco de la reĝo: loĝante ofte en Polujo li iom post iom alproprigis al si la principojn de

tia vivo kaj reveninte poste hejmen li komencis ankaŭ en Litovujo enkondukadi tiujn principojn en la vivon. Fine, la amikiĝo inter litova kaj pola aristokrataro havis similan signifon por la litova vivo. Kune kun rajtoj kaj privilegioj, akiritaj laŭ pola ekzemplo, la litova aristokrataro iom post iom alproprigis al si ankaŭ polajn morojn kaj kulturajn formojn. Tiamaniere litova inteligentularo eniris en kontakton kun pola inteligentularo, kies kulturo, kreskinta en atmosfero de Okcidento, ricevis la eblon sur la kampo de litova vivo interrilati kun orienta mondo.

Tamen estus malĝuste pensi, ke la nova influo ne trovis kontraŭstarajn malhelpojn. Tiam malhelpon ili trovis en orientaj vivprincipoj, jam enradikiĝintaj en litova vivo. La interbatalo inter ĉi tiuj du mondoj daŭris interne de litova vivo dum la tuta daŭro de persona unio (1385—1569). Tiu luktado estis des pli akra, ke litova ŝtato en unua sia periodo kunligis sian sorton kun la interesoj de orienta civilizacio, kiu nun estis endanĝerigata per la pola influo. Tial estas facile komprenebla, kial la konkurado de ĉi tiuj du civilizacioj en la nomita periodo ĉefe esprimiĝis en la bataloj, kiujn litovoj devis fari por defendi sian sendependecon kontraŭ poloj. Kaj ĉefe ĉi tiuj bataloj, kiuj, escepte la militojn de Svidrigaila, neniam estis sangaj, havis kompare al malfacilaj militiroj kontraŭ Moskvo la decidan influon al la plua sorto de Litovujo.

Antaŭ la Lublina Unio (1569) la kultura influo de poloj en Litovujo ne estis ankoraŭ granda. Post Lublina Unio Litovujo kvankam restis aparta aŭtonoma ŝtato, tamen multon el sia sendependeco perdis je utilo de Polujo: fakte ĝi devis rekoni la polan ĉefecon en interpopolaj rilatoj; la elektita por Polujo reĝo samtempe fariĝadis grandprinco

de Litovujo; la eldono de komunaj por ambaŭ ŝtatoj leĝoj apartenis al komuna parlamento; fine Litovujo devis rezigni sian superregnon de ukrainaj princlandoj, kiujn dum Lublina Unio poloj arbitre enkorporigis en sian ŝtaton. Jenaj estis la fundamentaj ŝanĝoj, kiujn Lublina Unio enportis en litovan konstitucion. La du lastaj ŝanĝoj plej multe helpis al pola kulturo disvastiĝi en Litovujo. Perdinte la ukrainajn provincojn, Litovujo kune kun ili perdis la plej grandan apogon, kiun ĝi havis tie en orientaj tradicioj. Kaj de alia flanko, kiam litovoj iris en la komunan parlamenton kun poloj, al pola kulturo malfermiĝis novaj vojoj por penetri en litovan vivon. Kaj sukcese plenumi ĉi tion al poloj helpis ne nur politikaj cirkonstancoj, sed ankaŭ ilia geografia situacio, nome tio, ke ili estis per Litova Ŝtato ŝirmitaj de orienta flanko, dume Litovujo mem devis preskaŭ senĉese militadi kontraŭ ĉiam plifortiĝanta Moskvo. Sed samtempe oni devas rekoni, ke Polujo en sia politika kaj kultura batalo kontraŭ Litovujo posedis tiun supercon, kiun entute posedas Okcidento kompare kun Oriento. Simile kiel antaŭe, la idolana litova kulturo ne povis kontraŭstari la influon de greko-rusa civilizacio, tiel nun la kontemplativa karaktero de la lasta devis cedi la superecon al sia kontraŭulo — okcidenta civilizacio, posedanta aktivajn kaj praktikajn ecojn. Dum iris la luktado inter ĉi tiuj du mondoj, la nacia litova spirito, ne akirinta ankoraŭ sufiĉe de aktiveco kaj ne trovinta sian propran esprimiĝformon, devis ankoraŭ foje sin klini antaŭ la antaŭenmarŝanta vivpotenco.

Elliverita tiamaniere al efikprincipoj de pola civilizacio, Litovujo per tio sama estis devigita trapenetriĝi per tiuj neaj fluoj, kiuj direktis la politikan kaj socian vivon de Polujo.

Jam antaŭ Lublina Unio Polujo estis aristokrata respubliko, kvankam ĝi nomiĝis monarkio. Tial, ambaŭ ŝtatoj povis pli intime interrilati nur tiam, kiam ankaŭ Litovujo komencis ordigi sian vivon laŭ aristokratismaj principoj. Tiun sencon havis ankaŭ la reorganizo de nobela klaso, kiun elpensis Zigmunto Aŭgusto por firmigi la union inter Litovujo kaj Polujo.

La reformo de Zigmunto Aŭgusto komenciĝis ĉe la supro mem: li anstataŭis la heredan sinsekvon de la reĝoj sur litova trono per elekta, por tia maniere ebligi, ke la elekta pola reĝo povu fariĝi samtempe reganto de Litovujo. Kiam poste komencis kolektiĝadi la komuna pola-litova parlamento, tiam montriĝis, ke la reĝo kaj grandprinco estas nur ludilo en manoj de aristokrataro. Ĉi tiu reformo subfosante la potencon de litova grandprinco per la samo subfosis ankaŭ la potencon de pola reĝo, kiu jam ne estis plu sendependa hereda litova potenculo.

La povo de monarko estis ankoraŭ per tio malgrandigita, ke la aristokrataro sukcesis fari la ŝtaton finance de si dependa. Havante en siaj manoj la plenpotencôn en leĝdonado, ĝi ne sin ĝenis pli grandigi siajn rajtojn kaj privilegiojn. Estante antaŭ ĉio grandbienistaro, ĝi ne kontentiĝis per tio, ke ĝi sklavigis la vilaĝanojn, estintajn antaŭe liberaj, sed eĉ ekspluatcele malgrandigis la politikajn kaj ekonomiajn rajtojn de urbanoj, kiuj apenaŭ sukcesis defendi sian personan liberecon.

Ĉe tia aferstato la supera potenco fakte transiris de monarko al aristokrataro. La aristokrata parlamentarismo en jenaj tempoj estus signifinta progreson, se ĝi ne estus degenerinta en la konatan polon senprincipan arbitrecon, bone esprimatan per liberum veto. La nobeloj de jenaj tempoj

ne nur nelimigite regis en sia komunumo, ne nur laŭ sia bontrovo decidadis pri la vivo kaj morto de siaj sklavoĵ, sed eĉ la ŝtatan potencon mem ili konsideris valorajo, devanta servi al iliaj privataj bezonoj. Ĉi tia anarĥiista rilato al ŝtata potenco iom post iom alkondukis ĝis tio, ke oni komencis serioze defendi la rajton organizi tiajn „konfederaciojn“, kiuj preparadis verajn ŝtatribelojn.

Kune kun la politikaj polaj moroj en Litovujon venis ankaŭ iliaj esprimiĝformoj. Post Lublina Unio la pola lingvo ĉiam pli sukcese konkuras kun la blankrutena lingvo, uzata en Litovujo por oficialaj celoj, kaj en la jaro 1698 estis eldonita ordono, laŭ kiu en ĉiuj ŝtatoficejoj estis uzota pola lingvo.

Estas memkomprenebla afero, ke tia aferstato devis fosi profundan abismon inter la reganta klaso kaj la larĝaj popolamasoj de litova nacio. Humiliĝita en persona sklaveco, premata per ekonomia ŝarĝo, malzorgata kulture la litova simpla popolo tamen restis fidela al siaj naciaj tradicioj kiom laŭ formo, tiom ankaŭ laŭ enhavo; kaj ĉi tiu fideleco kapabligis ĝin pli bone kompreni tiun abismon, kiu apartigas ĝin de la reganta klaso ne nur nacie, sed ankaŭ sociale. Tiamaniere, la nacia litova dramo estis atinginta la plej grandan streĉiĝon, post kiu nepre devis veni historia ĝia solvo.

Fortikigante la uniajn ligilojn kun Litovujo kaj enkorporigante la ukrainajn provincojn de Litovujo, Polujo akiradis novajn fortojn por batali kontraŭ Moskvo. Entirita tiamaniere en la konkuran batalon sur Poluja flanko, Litovujo estis en danĝero suferi ankaŭ la sorton de Polujo, se la lasta estos venkita de Rusujo.

Vole — ne vole servante al polaj interesoj en oriento, Litovujo ekvidis sin ankaŭ pro pola kulpo

en neĝusta rilato al germana mondo. Kiam per unuigitaj de ambaŭ ŝtatoj fortoj la potenco de teŭtonaj ordenoj estis detruita kaj ili devis rezigni je siaj imperialistaj celoj, la poloj komencis tiam per nenio pravigeblan favoron al germanoj en Baltaj landoj. Ĉi tiun konduton imitis ankaŭ la regantaj sferoj de Litovujo kaj tiamaniere preterlasis la bonan okazon fortikiĝi sur la de litova nacio loĝata marbordo. Logita partopreni en pola ekspansio orienten, Litovujo ne povis prizorgi siajn aferojn ĉe Balta mara, ĉar siatempe ne estis faritaj penuzoj ricevi tion, kion elŝiris el Litovujo la teŭtonaj ordenoj, kaj je kiuj landoj ĝi havis nepridisputeblan rajton. La ĉefa tasko por la tiutempaj litovaj regantoj devis esti liberigi latvojn de la glavofrata ordeno kaj defendi prusojn de germanoj, kion intense faris la krucmilitistoj.

La rezulto estis, ke Polujo penetrante orienten efektive nur malfermis la pordon por germana mondo kaj tiamaniere faciligis al ĝi la antaŭeniron orienten. Sed ĉi tiu mondo neeviteble sur voje devis kunpuŝiĝi kun la unuigita pola-litova respubliko, kaj simile, kiel antaŭ kelka tempo la litova ŝtato ekvidis sin inter Moskva martelo kaj Poluja amboso, tiel nun la unuiginta pola-litova respubliko ekvidis sin ambaŭflanke premata de du potencoj — Prusujo kaj Rusujo, al kiuj estis destinita en nova formo daŭrigi la malnovan luktadon inter Oriento kaj Okcidento.

Dum tiu tempo, kiam la nomitaj du malamikaj potencoj ĉiam plifortigadis, la fortoj de la unuiginta respubliko ĉiam malpliigadis pro la interna malordo, deveninta de anarhista sintenado de reganta aristokrataro. La supera estreco kvazaŭ ludilo transiradis el manoj en manojn kaj la ŝtato farigis ilo por kontentigi la ekdezirojn de la regan-

toj, dume en la najbaraj ŝtatoj la kreskanta absolutismo fortikigis kaj koncentrigis en solaj manoj la ŝtatan potencon, antaŭ kiu ĉiuj sociaj klasoj devis kliniĝi, pli aŭ malpli servante al ĝiaj bezonoj.

La malapero de politika kaj sociala ekvilibro baldaŭ ekhavis ankaŭ ekonomiajn sekvojn: la terposedantoj kune kun politika potenco eluzis por sia utilo ankaŭ la plej grandajn enspezfontojn de la lando kaj konscie kun helpo de leĝdonado forigante ĉian konkuron, detruis la komercon kaj industrion de la urboj. En la najbaraj landoj en tiu tempo la aferoj disvolviĝadis en tute alia direkto: malgraŭ la manko de kapitaloj la ŝtata potenco tia aŭ aliamaniere sukcesis protekti la urbanojn kontraŭ egoistaj ekdeziroj de terposedantoj, kvankam ĝi ĉefe sur ilin sin apogis, ĝi igis tiamaniere formiĝi la tiel nomatan „trian klason“, kiu en la lastaj tempoj ludis tiom gravan rolon por formiĝo de la rajta ŝtato.

Ĉe tia aferstato ne estas mirinde, ke la unuiĝinta pola-litova respubliko fin-fine ne povis kontraŭstari siajn malamikojn, kiuj konscie eluzadis por siaj celoj ĝiajn malfortecojn — kaj fine de la XVIII jarcento ĝi ĉesis sendepende ekzistadi.

Estas tre signifoplena la fakto, ke la pereco de la unuiĝinta pola-litova respubliko preskaŭ koincidis kun la degelo de litova ŝtato en komuna respubliko: la konstitucio de 3 majo, kiu jam malfrue provis korekti kelkajn katastrofigajn historiajn erarojn, rilate al Litovujo faris tamen la definitivajn konkludon el Lublina Unio, metante Litovujon en staton de simpla provinco de pola ŝtato. Kaj en vereco tio estis provo apliki al la tuta litova ŝtato la sekvojn de tiu evolucio, kiun travivis la poliginta litova reganta klaso; kaj ĉi tio sajnjis tute natura kaj rajta al klaso, kiu siajn interesojn identigis kun la interesoj de la tuta ŝtato.

Tiamaniere la pola influo komence subfosis la nacian konscion de la reganta klaso, kaj poste eluzante ĉi tion puŝis la tutan litovan ŝtaton en pereon, kiun preparis la unuflanka pola politiko. Dum litova nacio en la unuiginta respubliko elmontradis sian spiritforton, la danĝero de fina katastrofo ne povis havigi la decidajn rezultojn, sed ĵus kiam la nacia litova spirito estis venkita per pola tendenco, la fina katastrofo fariĝis neevitebla. El tio ni vidas, ke la sendependeco de litova ŝtato estis ne nur kondiĉo por deca disvolvigo de litova nacio, sed ankaŭ grava faktoro por konservi ekvilibron en unuiginta respubliko. Tial pereco de litova sendependeco estis katastrofa ankaŭ por la pola regno.

B. La intelekta litova kulturo en la dua periodo.

La procedo, kiu iris en la reganta litovo klaso, alkondukis la malnovan litovan ŝtaton al fina ruinigo. Tamen ĉi tio ne signifas, ke en la dua periodo de litova historio ĝia nacia spirito ne ricevis eblon elmontriĝi en tia aŭ alia formo. Nome, en ĉi tiu periodo Litovujo ĝisatendis pli altan intelektan kulturon, kiu kvankam estis laŭforme fremda, tamen sufiĉe bone respondis al fundamenta inklino de nacia spirito. En ĉi tiu rilato interalie estas signifoplena la fakto, ke ĝuste en tiu periodo (1595) sur la teritorio de litova ŝtato (en Brest Litovsk) efektiviĝis la unio inter okcidenta kaj orienta konfesoj. Kvankam en ĉi tiu fakto ne facile estas pruvi la rektan efikon de nacia litova spirito, tamen en sia esenco ĝi bone akordiĝas kun la fundamenta karaktertrajto de litova nacio kaj minimume havas por la lasta la simbolan signifon.

La dolorigaj okazintaĵoj de la dua periodo, devenintaj el ŝanceliĝinta ekvilibro en socia vivo inter aktiva okcidenta individuismo kaj pasiva orienta

cedemo, igis la pli klerajn spiritojn serĉi novan akordigon de ĉi ambaŭ principoj se ne en viv-praktiko, tiam almenaŭ en intelekta kulturo. Tiamaniere la problemo pri sintezo de du civilizacioj suriris novan ebenon kaj vestiĝis per novaj formoj.

Simile, kiel la kondukfadenoj de la unua litova historia tendenco kuniĝis en „Litova Statuto“, kvazaŭ en simbola bildo, tiel nun unu homo respegulas en si la novan direkton de nacia spirito kaj plej brile ĝin respegulas en tiu tempo, kiam la okcidentaj principoj triumfas en Litovujo. Ĉi tiu de la sorto elektita geniulo, esprimanta samtempe sian epokon kaj la universalan homan spiriton, estas Adamo Mickevičius.

Ankoraŭ unu analogio. Simile kiel „Litova Statuto“ estas signifoplena simbolo por la tempo, kiu dum ĝia kreado estis jam finiĝanta, tiel ankaŭ nun la esprimanto de la dua periodo liveris al la lasta la monumentan esprimon ĝuste en tiu tempo, kiam ĝi jam kliniĝis al sia eterna fino: nome, la rezultoj de intelekta litova evolucio ricevis palp-eblan kaj precizan formon nur tiam, kiam al regado de okcidentaj principoj en Litovujo komencis minaci mortiga danĝero. Ĉi tio okazis jam post ruiniĝo de pola-litova respubliko, en la unua duono de XIX jarcento, kiam la litova ĉefurbo Vilnius estis akirinta la nomon „Atenoj de Nordo“. La historia kunlaborado de litovoj kaj poloj devis nur eldoni sian frukton, sed dume estis jam la tempo, kiam Litovujo denove ekinterrilatis kun rusa kulturo.

En ĉiu sintezlaboro ekzistas centro de intensa kreado. Vilnius, estinta en jenaj tempoj simila centro rilate al intenseco kaj larĝeco de sia spirita kreado, superis la plej grandajn polajn urbojn kaj liveris al poloj tiajn intelektajn kaj moralajn valorojn, kiuj poste fariĝis plej valoraj fundamentoj

de ilia kulturo. Mickevičius, kies genio estas vera floro de litova spirito, estas ĝis hodiaŭa tago la plej brila stelo en ilia civilizacio. Kiel iam en la tempoj de Jogaila la materiala evoluo de Litovujo estis fundamento por pola potenco, tiel poste la spirita litova evoluo, kies fina ĉenero estis Mickevičius, helpis al poloj levi ilian spiritan kulturon sur tian nivelon, kiun ili solaj, ne helpataj de flanko, ne estus povintaj atingi. Krome estas notinde, ke inter la faroj de Jogaila kaj Mickevičius, kreskigintaj la polan nacion, estis ankoraŭ unu litovo — la granda Kostiuška, dank' al kies spiritaj faroj la pola nacio estis konvertita de fortokulto al spirita kulto.

Inter la kaŭzoj, direktintaj la intelektan litovan evoluon al pola kulturo, estis krom la asimilo de aristokrataro, eĉ la kleriga laboro, evitinta la uzadon de litova lingvo. Vere, post Lublina Unio depende de religia movado, kiun elvokis la protestantismo, estis farataj provoj juste kaj konsekvence solvi la problemon pri litova lingvo; tamen la spirito de la tempo kaj historia inerteco de fluanta periodo montriĝis pli fortoj ol voĉo de prudento. Pretersonis ankaŭ kiel voĉo en dezerto la admono de kanoniko Daŭkša, laŭ kiu la perdo de lingvo signifas perdon de nacia vivo kaj honoro. Kaj efektive Daŭkša estis profeto. Kiam post tri jarcentoj la konsciaj litovoj decidiĝis rehavigi al litova nacio rajton „al vivo kaj honoro“, ili devis alparoli ĉi tiun popolon en komuna lingvo, kiun antaŭe inteligentularo estis malfeliĉe malestiminta. Sed, ĝis kiam tio efektiviĝis, historio daŭrigis sian komencitan vojon.

Jezuitoj, kiuj komence tre sukcese konkuris kun predikantoj de protestantismo sur nacia litova kampo, eksilentis, kiam la lastaj estis venkitaj, kaj

la litova vivo fluis en kutima fluejo. De tiu tempo la kleriga laboro, restinta preskaŭ senescepte en iliaj manoj ankoraŭ cirka du jarcentojn, ne atingis precipe gravajn sukcesojn kaj ne liveris decajn fruktojn; ankaŭ de ili gvidata Akademio en Vilnius per nenio distingiĝis. La forigo de jezuita ordeno en la jaro 1773, koincidis kun vekiĝinta reform-spirito, elvokita per la unua divido de pola litova respubliko. La Edukada Komisiono, kiu prenis en siajn manojn la riĉaĵojn, de jezuitoj amasigitajn, efektivigas en Polujo kaj Litovujo la larĝe kaj kuraĝe ellaboritan reformplanon de popola klerigado. Densa reto de lernejoj kovras nun Polujon kaj Litovujon kaj ampleksas pli larĝajn sociajn tavolojn. La kleriga sistemo nun estis atinginta tiel altan nivelon, kian alialoke en Europo ĝi nenie estis atinginta.

Tamen, kiom la afero rilatas Litovujon, ĉi tiuj reformoj devas esti diverse prijuĝataj laŭ tio, ĉu oni ilin taksas laŭ pure intelekta vidpunkto aŭ laŭ nacia. Estas nedubeble, ke Edukada Komisiono sukcesis konsiderinde levi la intelektan kulturon en Litovujo; sed bazigante sian agadon sur evoluo, kiun trairis la reganta klaso, ĝi kune kun klerigado pligrandigis en vastaj popolamasoj de Litovujo la denaciigon, kiu antaŭe estis tuŝinta nur la aristokrataron. Tiamaniere la malsupraj nobeloj kaj urbanoj estis disponigitaj al denaciiga inerteco, servinta al pola kultura utilo. La afero ne sangigis eĉ tiam, kiam post perdo de sendependeco la laboro de Edukada Komisiono transiris en manojn de kompetenta princo Ĉartoryski, kiu dank' al favoro de Aleksandro I estis nomita kuratoro de regiono de Vilna Universitato: la klerigado de litovoj senhalte prosperadis kaj la litovoj mem ĉiam pli multe partoprenis en kultura kreado, esprimiganta en naciaj polaj formoj.

En la jaro 1803 la Akademio de Vilnius fariĝis universitato, kiu, ĝuante larĝan aŭtonomion, baldaŭ ekfloris kaj vere fariĝis centro de pole-litova klereco en la dua periodo de litova historio. Kiom ĉi tie montriĝis la intelektaj litovaj fortoj, ĉi tion atestas la konata pola kritikisto P. Chmielowski. „Baldaŭ montriĝis, diras li, ke al litovoj mankis nur bona gvido por ke ilia spirito bele ekfloru kaj montru sian potencon. Ĉiuj fortoj, kiuj antaŭe kuŝis kaŝitaj en profundajoj de spirito, aktive elmontriĝis eksteren, kiam nur ilin atingis la radioj de prudenta klerigado, — kaj eĉ tiagrade, ke dum tempospaco de 1815 ĝis 1822 la intelekta vivo en Vilnius fariĝis pli intensa ol en Varsovio. Kaj ne nur la scienco profitis el ĉi tiu deĉe gvidata klerigado: la poezia kreado estis ankaŭ forte vekita per la ĝenerala ekinteresiĝo pri la spiritaj bezonoj. Litovujo produktis dum ĉi tiu tempo pli da poetoj, ol iu ajn alia ¹⁾ parto de Polujo“.

Kvankam vilna klereco esprimiĝis en formoj, kiujn al ĝi donis la periodo de aristokratia evoluo, tamen en ĝi iom respeguliĝis la universala jen-tempa klereco, enhavinta pli klarajn demokratajn ideojn. Kiom la profesoroj de vilna universitato, tiom ankaŭ la studentoj ĉiam pli komencis interesiĝi pri la bezonoj de simpla popolo, kio ja ankaŭ estis favorata per la tiutempa romantismo. Ekzemple, S. Stanevičius kolektas litovajn kantojn; Danilevičius esploras litovan juron; I. Jaroŝevičius la unua provas pentri bildon de kultura litova vivo. En la sama tempo inter la studentoj

¹⁾ Substrekita de tradukinto. — Komparu Piotr Chmielowski. Adam Mickiewicz, I vol. 8 p. Warszawa 898. Ĉar ĉi tie estas citata laŭ franca traduko, tial ĉi tiu tradukajo povis malproksimiĝi de originalo ne tiom per enhavo, kiom eble per frazoj. Aŭtoro.

de vilna universitato maturiĝas la estontaj pioniroj de litova revekigo: S. Daŭkantas kaj M. Valančius.

Tiamaniere, laŭ la tempa spirito la vilna universitato fariĝadis nacieca kaj demokrata; sed ĝuste en tiu tempo la agado de universitato estis de rusa registaro paralizita kaj en la jaro 1840 tute ĉesigita. Do, se al vilna universitato ne estis destinita plene disvolvi ĉi tiun novan direkton, ĝi almenaŭ sukcesis ĝeneraligi kaj komuniki al la publiko la rezultojn, kiujn la litovoj atingis dum la periodo de pola kultura kaj politika supereco. Laŭ ĉi tiu vidpunkto la plej signifoplena persono estis, kiel jam estas menciita, Mickevičius, edukito de vilna universitato; pri li do decas diri kelkajn vortojn pli.

Estas ne malfacile rimarki, ke inter la sorto de Mickevičius kaj de tuta Litovujo ekzistas simbola analogio. Kiel Litovujo estas lando de neefektivigitaj eblecoj, tiel li estas geniulo de neefektivigitaj personaj eblecoj. Arturo Górski bele priskribas ĉi tiun dramon flankon de lia sorto. „Pasis jam duono de centjaro, skribas li, post morto de Mickevičius. Li mortis malproksime de Litovujo en fremda lando, preskaŭ ĉe la limoj de Respubliko. La vivo rifuzadis al li ĉion, kion li plej multe deziris, kaj tiel estis de la komenco ĝis la fino. La veninto forpelis lin el lia naskolando. Li amis virinon, kiun ricevis alia. La liberspirita homo, naskiĝinta en libero, li mortis havante antaŭ la okuloj la sklavecon, kaj liaj penadoj ĝin forigi dum tuta lia vivo restis vanaj. Filo de Eklezio, militanto por la kruco, li fariĝis viktimo de eklezia cenzuro kaj ekvidis nomojn de siaj verkoj sur la listo de malpermesitaj libroj. Poeto el Dia graco, homo, kiu en fundamenton de sia vivo metis inspiron, li oferis la poezion al la vorto, la vorton — al agado kaj dediĉis sin fine al apostolado, neniam skribinte

„sian libron“. Li havis instinkton de agemulo, kiu puŝis lin al batalo kun la realaĵo de la vivo, kaj li devis fine de sia vivo per siaj laĉiĝintaj okuloj vidi la malĝojigan realaĵon de liatempa mondo, kiu kontraŭis al liaj plej belaj revoj. Destinata por Olimpo, li tamen deturniĝis de dikonvena trankvilo kaj fariĝis tera batalanto¹⁾.

La drama sorto de Mickevičius efektive estas bona ilustraĵo de Litovujo dum ĝia dua periodo: la sukcesoj de pola influo alkondukis Litovujon al drama fino; ĝi ankaŭ ruinigis la vivon de Mickevičius, ĉar li provis fari konsekventajn metafizikajn konkludojn el liberum veto, fariĝinta devizo de lia tempo.

Ĉi tiu historia devizo, postulinta por si „la potencon je animoj“ en „Improvizadoj“ de Mickevičius, esprimiĝis fine ĉe la lasta per mesia prometeismo, kiu povis konduki litovan Prometeon ner sur monton de Golgota, sed sur rokojn de Kaŭkazo, kie la viktimo de sinofero ne estis kronita per la glora Reviviĝo . . .

Kvankam en la sorto de Mickevičius aperas la tragika superrego de pola kulturo, tamen, estante filo de sia nacio kaj produkto de tuta ĝia historio, li kunigis en sia spirito kaj en sia kreado la elementojn de du kontraŭaj civilizacioj. La jam nomita A. Górski en sia verko „Monsalwat“ parolante pri la spirito de Mickevičius akcentas la batalon, kiun faris en la animo de geniulo la bela okcidenta Promiteo kun la orienta cedema Jobo. Ĉi tiu batalo de du homoj en la sama animo efektive estas karaktero por Mickevičius, kiel reprezentanto de la epoko. En profundo de lia animo ĉiam estis maldorma la instinkto, kiu igis lin konsideri kiel

¹⁾ A. Górski, Monsalwat, 4 p. Kraków 1908.

idealo la ekvilibron inter Oriento kaj Okcidento kaj la sintezon de ĉi ambaŭ civilizacioj; kaj samtempe interna voĉo diris al li, ke litova nacio estas alvokita servi al ĉi tiu idealo.

Kvankam ne rekte parolante foje pri sia genio, Mickevičius kelkfoje rimarkas, ke li samtempe atentis Orienton kaj Okcidenton. Ekzemple en „Improvizajo“ per lipoj de Konrado li diras:

 Mi havas, havas ĉi tiujn du flugilojn;
 Sufiĉas ili al mi: mi ilin disetendos de
 oriento ĝis okcidento.

 Per maldekstra mi ekbatos la pasinton,
 per la dekstra — la estonton.

Kaj ĉi tiun universalismon li konsideras ne nur sia persona propreco, sed ankaŭ de la tuta litova popolo. Ekzemple, en sia kurso, legita en Parizo, li proklamadis, ke „litova nacio en siaj manoj havas la ŝlosilon al ĉiuj slavaj problemoj,“¹⁾ malgraŭ tio, ke ĝi ne havas naciecan konscion kaj ne esprimas ĝin en sia lingvo.

En ĉi tiu senco ankaŭ Mickevičius mem devas esti konsiderata kiel litovo, kvankam li estis alpropriginta al si la formojn de tiu spirita kulturo, kiu estis produkto de nacia kaj intelekta evoluo, fariĝinta en litova aristokrataro. En unu letero al Towiański Mickevičius, parolante pri naciaj litovaj kantoj, diferencas inter melodio kaj vortoj, kaj rimarkas, ke la vortoj estas produkto de la tempo. Por la verko de sia vivo Mickevičius prenas la fundamentan melodion de nacia litova spirito, sed la vortojn aplikis tiujn, kiujn estis liverintaj la lastaj jarcentoj de litova historio.

¹⁾ Adam Mickiewicz, *Mythologie lithuanienne*, en la libro „Les Slave“ 129 p. Paris 1914.

Entute, oni devas konsenti, ke en persono de Mickevičius plej klare kaj en plej bona senco esprimigis la spirito de la tuta dua epoko kun siaj ecoj kaj eraroj. Mickevičius estas viva monumento, starigita sur la limo de du epokoj: li kvazaŭ trankvila sunsubiro per siaj melankoliaj radioj adiaŭas la forirantan tagon kaj vekas konfidon al venanta morgaŭo.

En sia lasta granda verko, titolita „PanTadeusz“,¹⁾ en kiu estas prikantata Litovujo de la jaro 1812, Mickevičius ofte uzas rilate al homoj kaj aĵoj la epiteton „la lasta“, kaj per ĉi tio kvazaŭ adiaŭas tion, kio malaperas en pasinton.

La grandeco de Mickevičius estas eĉ en tio, ke li, estante esprimanto de unu epoko, samtempe koncentrigis en si ĉiujn elementojn, necesajn por la venonta epoko, por la nacia litova revekiĝo. En li fakte jam okazas la logika transiro de litova historia antitezo al ĝia sintezo. Lia klare vidanta spirito trapenetris eĉ la nebulon de estonteco kaj igis lin deklari pri litova nacio, ke „ĝi estas unu el nacioj, troviĝantaj en atenda stato“.²⁾ Kaj la estonto efektive pravigis ĉi tiun lian diron: en la tempo de Mickevičius Litovujo atendis sian revekiĝon.

III. SINTEZO.

La nacia litova revekiĝo kaj ĝia idealo.

Akordigo de elementoj de du mondoj en la formoj de nacia litova civilizacio.

La bloveto de demokrata spirito, naskiĝinta en Francujo fine de XVIII jarcento kaj fortikiĝinta

¹⁾ Rim. de trad. En Esperanto ekzistas bonega traduko de A. Grabovski, titolita „Sinjoro Tadeo“.

²⁾ A. Mickiewicz, *Mythologie lithuanienne*, en la libro „Les Slaves“ 131 p. Paris 1914.

en Eŭropo la tutan XIX jarcenton, ne preteriris ankaŭ Litovujon: verdire ĝi vekis litovan nacian konscion kaj helpis al litova popolo venki tiun danĝeran dormemon, de kiu ĝi estis jam pereanta. Kiel jam supre estas dirita, la procedo de aristokratiĝo estigis profundan abismon interne de litova nacio kaj fine detruis Litovan Ŝtaton; tial nur demokratigante ĝi povis denove unuigi kaj reakiri sian sendependecon. Kompreneble, rapide ĝi ne povis reakiri tion, kio estis perdita dum longaj jarcentoj. Eĉ ne per unu fojo ĝi sukcesis haltigi la destruktivan efikon de tradicia inerteco; sed tamen, la nova vivdirekto estis starigita de demokratismo kaj devis pli aŭ malpli frue venki.

En demokratiĝo de Litovujo oni povas diferenci tri procedojn, laŭ kiuj litova nacio liberigadis de malnovaj tradicioj kaj konscie decidigis en nacia rilato. Post la divido de pola-litova ŝtato inter Rusujo, Germanujo kaj Aŭstrio ĝis la unua ribelo en la jaro 1830 en litova socio ankoraŭ regas la malnovaj aristokrataj ideoj. La superaj sociaj klasoj, ne havante plu apogon en sia ŝtato, komencis nun konscie alproprigi al si polan naciecon, esperante kune kun la pola popolo batalakiri por si la liberon. Laŭ ĉi tiuj ideoj estis farata la pola-litova ribelo en la jaro 1830. Malsukceso de tiu ribelo laŭ sia senco estis kondamno al ĝiaj gvidantoj, ne scipovintaj organizi la nacian movadon sur pli larĝa bazo kaj altiri al ĝi pli multenombrajn batalantojn el simpla popolo.

La disreviĝo pro la nesukcesinta ribelo siavice elvokis reakcion kontraŭ tiuj tradiciaj faktoroj, kiuj estis kulpaj je malsukcesoj. Meze de iam regintaj klasoj nun komencas jam montri la

inklino alproksimiĝi al la simpla popolo kaj vivi kun ĝi en pli proksimaj rilatoj. Tio estis la prepara periodo por litova revekigo, kiam inter la inteligentularo fortiĝadis interesiĝo pri litova lingvo kaj popola kulturo.

Ĉefaj agantoj de ĉi tiu prepara periodo estis historiisto S. Daukantas, episkopo M. Valančius kaj popolarizatoro V. Ivinskis. Je utilo de litovacia revekigo laboris ankaŭ tiuj verkistoj, kiuj kvankam skribis pole, tamen vekadis amon al litovacia nacio kaj ŝtato, kiel, ekz., neparolante jam pri Mickevičius, la historiisto T. Norbutas, la verkisto I. J. Kraszewski kaj poeto V. Kondratavičius.

Kaj tamen ĝis la ribelo de la jaro 1863 kaj liberigo de vilaĝanoj el servuteco la demokratigo de Litovujo estis akcelata nur per devizoj de romantika idealismo, kiuj ankoraŭ ne trovadis firman apogon en faktoroj de reala socia vivo. Tia reala faktoro fariĝis nun la liberigita klaso de vilaĝanoj, kiuj ricevinte sian personan liberecon devis iel esprimi sian nacian vizaĝon. Ĉi tio fariĝis klara precipe post dudek jaroj, kiam estis kreskinta la unua generacio de liberaj litovoj, kun kiu kune aperis ankaŭ la unuaj radioj de „Aušra“¹⁾ — tagiĝo de la nova periodo en litova vivo. La logiko de nacia revekigo montriĝis pli forta ol persekutadoj de rusoj, per kiuj ili penis sufoki la konsciigon de litovacia nacio.

La revolucio de 1905 jaro alportis al Litovujo novan venkon de demokrataj principoj, kaj kune kun ĝi ankaŭ profundigon de nacia movado. De ĉi tiu tempo la demokrataj ideoj akiras en la juna Litovujo la decidigan influon kaj per tio forpuŝas

¹⁾ Aušra-tagiĝo, ĵurnalo eldonata de la jaro 1883 en Prusa Litovujo, ĉar en la de rusoj regata parto de Litovujo estis malpermesita litova preso.

de historia antaŭscenejo la aristokrate decidigintajn tradiciajn elementojn, kiuj verdire jam en la revolucio 1905 ne trovis por si lokon.

La nacia litova revekigo jam de la komenco havis trioblan protestsencon: ĝi laŭ sia esenco protestis unue, kontraŭ rusiga politiko de la estraro, due, — kontraŭ polaj pretendoj kaj, trie, kontraŭ la tradicia determiniĝo de aristokratoj. La revekiganta Litovujo donis respondon al konkurado inter rusoj kaj poloj, kies objekto ĝi estis fariĝinta: ĝi respondis, ke ĝi volas fariĝi nek rusa, nek pola, sed resti memstara kaj ke pro tio ĝi ne rekonas kiel siaj gvidantoj tiujn, kiuj kondukis ĝin al la rando de abismo.

Kaj fine la litova popolo instinkte komprenis, ke dezirante vivi ĝi devas laŭ eblo korekti la malnovajn erarojn kaj reakiri tion, kio ankoraŭ ne tute estis perdita, kaj ke ĉi tiun revekigan kaj rekonstruan taskon ĝi devas efektivigadi per kultura laboro tiom interne de la lando, kiom ankaŭ en la ekstera politiko.

Antaŭ ĉio la demokratiga procedo en Litovujo starigis la demandon pri la normala kunlaborado inter inteligentularo kaj popolo, kiu en la nacia litova revekigo ricevis precipe gravan signifon pro la malfeliĉa historia dispartiĝo, kiu fariĝis fundamento por ĉiuj malfeliĉoj de Litovujo. La nacia revekigo devis dece solvi ĉi tiun demandon, starigante harmonion inter la komunaj penadoj de la simpla popolo kaj individuaj penadoj de inteligentoj.

Malgraŭ la eksterordinare malfacilaj vivcirkonstancoj la litova simpla popolo ĉiam efektivigadis sian nacian taskon, kreante kaj konservante la fundamentajn formojn de litova kulturo. Dum multaj jarcentoj ne trovante helpon de la inteli-

gentularo en ĉi tiu sia krelaboro, ĝi kutimiĝis elmontradi pli da iniciativo, ol ĝenerale oni povas renkonti ĉe la popolo. De ĉi tio dependas larĝa kaj libera de subpremantaj tradicioj ĝia entreprenemo en kultura kreado kaj forta penado akiri klerecon.

Kaj siavice, la inteligentoj de revekiĝa periodo, kreskintaj en ĉi tiu atmosfero, bone komprenis sian taskon krei novan intelektan kulturon, kiu povus kroni la kulturon de simpla popolo kaj respondus al postuloj de nacia litova individueco. Ĉi antaŭ ĉio konsideras sia devo resti en plej proksima kontakto kun la simpla popolo kaj eviti la erarojn, en kiuj dronis la malnova inteligentularo. La historia sperto de pasinto konvinkis ĝin, ke nur tiam povas esti normala kunlaborado inter la simpla popolo kaj inteligentularo, kiam la lasta en siaj rilatoj al popolo gvidas sin laŭ demokrataj principoj kaj kiam, dirante ĝenerale, la problemoj pri la rilato inter individuo kaj socio trovas en la praktiko ĝustan solvon.

Nome, en sia pasinto la litova nacio estis viktimo de du eraraj direktoj: en la komenco de sia historio laŭ la grado, kiom en la socia vivo superregis la originaj orientaj principoj, la socio absorbadis la personon; kontraŭe, en la periodo de okcidenta supereco la persono subigis socion al siaj interesoj. La nacia litova revekiĝo jam pro tio, ke ĝi disvolviĝis paralele kun demokratiĝo, devis starigi normalan ekvilibron inter persono kaj socio.

Kutime, kiam la superregon ricevas la socio kaj ne persono, tiam montriĝas inklino al socialismo; kaj kontraŭe, kie superregon ricevas persono, sed ne socio, tie ni havas la elmontron de individuismo. Ekzemplo por la unua okazo povas

esti Rusujo, por la dua — Polujo. La demokrata litova decidiĝo, fariĝinta nepraĵo de ĝia historia evoluo, gardis ĝin de ekstremaj socialismaj tendencoj, kiel tio okazis en Rusujo, kaj de ekstrema individuismo, kion ni vidas en Polujo. Tiamaniere la akordiĝo de simplpopola kulturo kaj de intelekta de inteligentularo kreata kulturo transirante en la regionon de la socia vivo, signifas sintezon de socialaj kaj individuaj principoj.

La pli granda, ol ĉe la najbaroj, ekvilibro en la rilatoj inter persono kaj socio estas nur unu punkto de tiu sintezo de orientaj kaj okcidentaj elementoj, al kiu puŝas Litovujon la historia fluo. Kiel ni jam scias, en diversaj periodoj Litovujo vivis sub influo de rusa kaj poste de pola kulturo. Kvankam la politikaj sekvoj de ĉi tiu fremda influo al litova nacio estis tre doloraj, tamen tio ne signifas, ke defendante sin kontraŭ ili ni devus decide nin senigi de tiuj kulturaj akiroj, kiujn atingis nia lando sub iliaj standardoj. Estas nacia devo de ĉiuj konsciaj litovaj kleruloj, kiuj ĝis nun kreskis kaj kleriĝis sub influo de pola kaj rusa kulturo, liberiĝi de fremdaj kulturformoj, ne rifuzante samtempe tion, kio estas pozitiva kaj universala en la enhavo de fremda kulturo. Aliaĵe, ni devas kunfandigi en unu organan tutecon la diferencajn elementojn de pola kaj rusa kulturo, aŭ en novan nacian sintezon.

Konsilante al Litovujo tiamaniere fini ĝian historian kaj kulturen evoluon, ni konscias, ke ni gvidas nin je ĉi tio ne nur per ideala bonplaĉo, sed ankaŭ per reala bezono, ĉar litova nacio, laŭ nia kompreno, ne havas alian eliron por defendi sin kontraŭ la destruktivaj fremdaj influoj, kiuj minacas al ĝia nacia tuteco. Unue, la tiamaniera likvido de historia heredaĵo unu foje por ĉiam de-

prenas al Rusujo kaj Polujo la fundamenton okupi Litovujon pro la motivoj de kulturaj sukcesoj. Krome, la sinteza venko de pola kaj rusa influo ĝi tiujn influojn nekapablaj aparte akiri danĝeran superregon en litova vivo. Fine, la dirita nacia sintezo faciligos la revenon al nacia vivo por ĉiuj, kiuj nuntempe ankoraŭ troviĝas sub escepta influo de unu el ĉi tiuj fremdaj kulturoj.

Pri la lasta afero decas diri ankoraŭ kelkajn vortojn. Ni bone komprenas, ke neniu rajtas fari iun eksteran perforton al persono, kiam tiu elektas por si tian aŭ alian naciecon, ĉar ĉiu persono devas ĝui liberecon en efektivigado de siaj moralaj kaj naturleĝaj devoj. Tial litova nacio ne povas uzi perfortajn rimedojn, volante plirapidigi la revenon al gepatra nacieco de poligintaj elementoj de Litovujo. Anstataŭ tio ĝi devas tiamaniere konduki sian kulturan agadon kaj efektivigi tiajn kondiĉojn de kultura vivo, ke ĉi tiuj elementoj eksentu de interne la neceson eliri el sia izoleco kaj kunlaboradi en kreado de nacia sintezo, je kiu ili povus partopreni per sia sperto, akirita dum la migrado. Ili devas konvinkigi, ke en la tuteca nacia kulturo ili povas trovi pli da kultura valorajo, ol ili povas esperi de la fremdo. Tiam ankaŭ la litova nacio ne povus konsideri kiel vana la historiajn erarojn de siaj infanoj kaj donus al li honoran lokon inter siaj filoj.

Konsiderante la politikan eksteran konjunkturon oni povas rimarki, ke normala vivo kaj disvolvigo de Litovujo estas ebla nur tiam, kiam estas konservata ekvilibro inter Germanujo kaj Rusujo, kiom la politikaj kaj ekonomiaj interesoj de ĉi-ambaŭ ŝtatoj interpuŝiĝas sur litova teritorio. Nek ilia senindulga konkurado, nek la supereco de unu el ili en la vivo de alia, nek la intima ilia akordiĝo,

direktita kontraŭ la aliaj ŝtatoj de Eŭropo povas esti profita por interesoj de Litovujo. Tial la sendependa ekzisto de litova ŝtato ne povas esti favora por ĉi tiuj tri okazoj. Nur la ekvilibro de politikaj kaj ekonomiaj fortoj de Germanujo kaj Rusujo konvenas al interesoj de litova ŝtato, kaj tial la sendependa litova ŝtato devas penadi helpi efektivigi ĉi tiun ekvilibron. Jam ĉi tiu sola sufiĉas por pravigi la sendependan ekziston de Litovujo, ne parolante jam pri la rajto de ĉiu popolo sendepende kaj memstare ordigi siajn aferojn.

El tio, kio estas dirita pri la historia procedo en Litovujo, estos jena ĝenerala konkludo. Dezirante vivi kaj flori, la litova nacio devas efektivigi en sia politiko kaj kulturo la ekvilibron de Oriento kaj Okcidento; kaj efektive, kiel la historio pruvas, ĝi sukcesadis venki la malfacilaĵojn de sia situacio laŭ tio, kiom ĝi sukcesadis efektivigi ĉi tiun kondiĉon. Kaj kontraŭe, la decidiga superrego komence de orienta, poste de okcidenta influo estigis ĉiam pli multe da detruantaj faktoroj, kiuj fine tute neneigis ĝian ŝtatan vivon. La revekiĝo de litova nacio estis antaŭ ĉio reakcio kontraŭ la malutila superrego kiom de orienta, tiom ankaŭ de okcidenta influo. Ĵus ni vidis, ke litova popolo povos plensignife vivi nur tiam, kiam ĝi sukcesos kunfandi en unu nacian sintezon la elementojn de rusa kaj pola kulturoj, enigitan en litovan formon, kaj estigi almenaŭ parte kaj en limigita amplekso de sia vivloko la ekvilibron inter germana kaj slava mondo.

Do, la kultura tasko de litova nacio, kiu klarigis jam en la komenco de ĝia historio, restas ĉiam la sama; sed la bilanco de la fortoj nuntempe forte ŝanĝiĝis. Hodiaŭ Litovujo povas esti nur antaŭgarda ĉeno, aŭ kiel oni ĝin kutime noma — bufro-

ŝtato inter du grandaj potencoj, kiuj penadas aŭ unu alian neneigi, aŭ alianciĝas por aliajn neneigi.

Ĉi tia situacio postulas de litova nacio ne tiom materialan potencon, kiom internan tutecan disvolviĝon kaj klaran komprenon pri sia kultura destino. Kaj ĉi tio estas atingebla nur kondiĉe, se litova nacio kunigos en sia civilizacio la individu-econ de sia nacia esprimiĝo kun la universaleco de enhavo.

La realigo en sia civilizacio de sintezo de du mondoj aŭ pli ĝustadire, de du duonoj de ĉi tiu mondo, jen estas alta nacia tasko, jen idealo inda de plej grandaj penadoj, plej grandaj oferoj. La konscia efektivigado de ĉi tiu idealo igos la litovan nacion eksenti la veran sian indecon kaj samtempe montros al kultura mondo la veran ĝian fizionomion kaj per tio konvinkos la vastan mondon pri netuŝebleco de ĝiaj naciaj rajtoj.

Ke la preparolita nacia sintezo principe estas ebla kaj dezirinda, ni kuraĝas decide afirmi apogante nin sur la valora opinio de prof. M. de Munnynck, laŭ kies kompreno la nacia tasko de Belgujo estas akordigi en sintezo la romanan kaj germanan civilizacion. Nur devas ni rimarki, ke je ĉi tiu rilato inter Belgujo kaj Litovujo ekzistas fundamenta diferenco en tio, ke, laŭ prof. M. de Munnynck, al Belgujo konvenas ĉi tiu tasko de sintezo pro la miksitaj ĝia etnologia konsisto, dume al Litovujo, etnologie homogena, ĉi tiu tasko estas destinita pro la diferencaj civilizaciaj elementoj, kiujn ĝi kolektis dum sia historio. Kaj tamen, laŭ nia konvinko, la opinio de prof. M. de Munnynck pri tio, kion li nomas „la miksitaj patrujoj“, tre bone rilatas ankaŭ al Litovujo, kiom ĝi konsideras la sintezon de diversaj civilizacioj.

„La patriotismo, diras li en sia „Psikologio de patriotismo“, ne kontentiĝas sole per la intelekta fundamento. Estas necese, ke la tuta persono, kiel ĝi ekzistas, estu ravita je la patrujo; tial, por ke povu naskiĝi la vera patriotismo, devas kuniĝi en unu motivo de nacia ekzisto la vivo de la sentoj, la amo, la konscio pri sia indeco kaj la entuziasmo. Kaj estas ne multe esperige, ke la rolo de bufroŝtato inter du militemaj landoj per si mem povus inspiri al ni la konfidon al nia valoro kaj la patriotan amon. Estas necesa io plia kaj en vereco tiu plia ankaŭ ekzistas: la miksitaj landoj laŭ sia naturo estas alvokitaj krei sintezon de du civilizacioj, efektivigadi la kunfandigon de du idealoj.

Kaj efektive, kio estas idealo, se ne *gvidanta principo, la tuteca perfekte, kiun ni devas ĉiam alceladi, sed kiu restas neniam atingebla? Ĉiu efektivigita idealo estas malgajnita idealo. Se oni nur kontentiĝas per tio, kio jam estas, aŭ kio estas efektivigebla, oni tuj komencas adoradi neestimindaĵojn, fariĝas malvigla, morta. Sole la plej alta idealo, mem per si ne atingebla, povas esti nia gvidanto en nelaciĝanta progreso, nur ĝi sola povas garantii la senĉesan disvolviĝon, neelĉerpeble ekflamigadi entuziasmon kaj tiamaniere estigi nevenkeblan patriotismon.

La idealo de miksitaj landoj efektive estas belega. Al ĝi decas per la sola larĝa homa ekrigardo ĉirkaŭpreni la elementojn de du kulturoj, vivi per tiu ĉi riĉa sintezo kaj komuniki al du najbaraj landoj la plej valoran kernon de du konkurantaj civilizacioj, ilian floron. ilian frukton . . .

Jen estas nobla idealo. La miksitaj patrujoj devas starigi al si la taskon kreskigi en la nacio vere homan animon, servi kiel radikala simbolo por la tuta larĝeco de homaro kaj ĝia spirita trezoraro,

kaj kunigi la limigitajn kulturojn en frata sintezo. Kaj vere oni ne bezonas pluon serĉi por vekti en la nacio konscion pri sia indeco kaj inspiri al miksitaj landoj firman kaj produktan patriotismon ¹⁾).

Laŭ sia historia sorto kaj geografia situacio Litovujo estas ankoraŭ pli feliĉa ol tiaj miksitaj patrujoj, kiaj estas Svisujo kaj Belgujo: de unu flanko Litovujo havas unu fundamentan nacian individuecon, kaj de alia flanko la areo de nacia sintezo ĉi tie atingis limojn de universalismo, ĉar ĉi tie estas kunigataj la mondoj de Oriento kaj Okcidento.

Tia estas idealo de litova nacio. La analizo de kultura kreado devus pruvi, ke efektivigado de ĉi tiu idealo ne restas nur en regiono de dezirindaĵoj, sed pli aŭ malpli elmontriĝas ankaŭ en realeco. Tamen, ĉi tia speciala esplorado eliras el limoj de ĉi tiu artikolo, kiu momente kontentiĝas per ĝenerala heligo de nacia litova civilizacio.

Trad. J. Maĉernis.

Kelkaj vortoj de tradukinto.

„Vere belega kaj nobla estas idealo de la miksitaj patrujoj“ ripetas aŭtoro la vortojn de svisa-belga prof. M. de Munnynck. Jam la tasko en unu sintezo ĉirkaŭpreni du kulturojn entuziasmigas ĉi tiujn du noblajn virojn, kaj kiel arde ekflamus ilia homama koro, se ili pli proksime ekkonus la plej grandan „miksitan patrujon“ — Esperantujon! Kiom pli alta estas la tasko de ĉi tiu grandioza patrujo, disetendiĝinta sur la tuta terglobo, ampleksanta ĉiujn popolojn, ĉiujn kulturojn kaj, ni esperu,

¹⁾ Prof. M. de Munnynck. O.P. Psychologie du Patriotisme. 37—39 p., Fribourg 1914.

ankaŭ ĉiujn venontajn jarmilojn! Prenante el kulturoj de ĉiuj popoloj la plej valoran kernon, la civitanoj de Esperantujo devas krei vere homaran kulturon, vere homan civilizacion, kaj nur ili havas la eblon ne nur teorie, sed ankaŭ praktike efektiviĝi ĉi tiun vere homan civilizacion, ĉar nur ili havas en siaj manoj la ŝlosilon al koro de ĉiuj popoloj, nur ili povas forigi la ĵaluzon kaj malamikan konkuradon inter la popoloj, nur sur ilia neŭtrala fundamento povas kolektiĝi la homaj gentoj en unu harmonian familion, nur tiu plej granda miksitata patrujo, la unika kaj la sola sur nia planedo, povos fine forigi la lastan kaj plej teruran restaĵon de barbareco — la hombuĉadojn, ĉar jam ne estos kun kiu plu militi. La venko de esperantismo signifas komencon de vere homa vivo. Pli altan kaj noblan idealon en homa vivo apenaŭ oni povas trovi. Kaj tial ne estas mirinde, ke sub la verda standardo kolektiĝas ĉiam pli multe da pacaj batalantoj, da homoj, dezirantaj unuigi homaron, sintezigi ĝian spiritan posedaĵon. Kaj rekte en tiu lando, kiu per sia historio estis preparita por plej granda sintezo — Litovujo — naskiĝas nia Majstro, en tiu lando eksonas la arda „Nova Kanto“ de A. Dombrowski, proksime de tiu lando A. Grabovski, influita de litova historio kaj spirito, kantas sian entuziasmigan „Tagiĝo“. Kaj kiu scias, kiajn „pacajn batalantojn“ naskos tiu lando en estonto...

2570

Enkonduko kaj disvastigo de katolikismo en Litovujo.

El litova lingvo tradukis Heleno Mačernis.

Kutime oni konsideras kiel jaron de Litova bapto 1387, dum kiu jaro veturadis tra Litovujo kun polaj pastroj Jogela, la grandprinco de Litovujo, kiun poloj invitis esti ilia reĝo kaj kiu kun sia familio kaj plej proksimaj nobeloj akceptis bapton en pola ĉeurbro Krakovo kaj tie edziĝis je pola reĝidino Jadviga. Laŭ diro de polaj historiistoj, nur de tiu jaro Litovujo fariĝis kristana; ĝis tiu tempo ĝi estis idolana. Pro tiu vojaĝo de Jogela tra Litovujo kun polaj pastroj kaj Jadviga (ŝi ankaŭ estis alveturinta al Vilnius kaj poste vojaĝadis tra Litovujo) kaj entute pro tiu amikiĝo de Jogela kun poloj — polaj historiistoj kaj naciistoj disvastigas opinion, kvazaŭ litova popolo ekkonis doktrinon de Kristo pere de poloj, kvazaŭ ni devas esti dankaj al poloj pro tio, ke ni estas kristanoj-katolikoj k. t. p. Sed konatiginte pli detale kun tiutempa historio, ni ekvidos, ke estis tute alie, ol poloj nun diradas. Montriĝas, ke nek ili nin baptis, nek ili la unuaj predikis ĉe ni Kristan doktrinon, unuvorte ili havas nenium rajton laŭdi sin, kvazaŭ ili estas niaj apostoloj estintaj.

Estas vere, ke poloj, kiel ankaŭ niaj orientaj najbaroj rusoj kaj blankrutenoj, fariĝis kristanoj pli frue ol litovoj, ĉar litovoj loĝis malproksime de kristanaj landoj, malpli da rilatoj havis kun ili, loĝis en preskaŭ ne alireblaj lokoj inter densegaj arbaroj kaj marĉoj, kaj fine estis devigitaj dum

kelkaj jarcentoj preskaŭ seninterrompe militadi por defendi sian liberecon, havaĵoj kaj vivon. Sed malgraŭ ĉiuj ĉi malhelpoj, ne permesantaj al kristanismo penetri Litovujon — la unuaj semoj de Krista doktrino jam longe antaŭ Jogela estis jetitaj en litovan kampon kaj trovis ĉi tie tre konvenan por si teron. Antaŭ ĉio jam mem la malnova litova religio, kiu el ĉiuj konataj al ni idolanaj religioj eble estis plej nobla, kiu, kvankam siamaniere, instruis pri amo al proksimulo kaj pri neceso de bonaj agoj, pri senmorteco de homa animo kaj pri ĉielo, kie bonaj agoj estos rekompencitaj, — per siaj fundamentaj ideoj ne estis kontraŭa al Krista religio. Ankaŭ la karaktero de litova nacio — pacema, trankvila kaj serioza, inklina al pripensado pri Dia esenco kaj ĉiaj misteroj — estis tre konvena por kompreni kaj disvolvadi kristanajn idealojn. Tial kvankam antikvaj litovoj estis tre sindonaj al siaj malnovaj dioj, ĝis ili nenion estis aŭdintaj pri la vera Dio, — kiam ili ekaŭdis pri Li, tuj en Litovujo troviĝis homoj, kiuj ekkomprenis verecon de nova religio, ĝin ekamis kaj ju pluen, des pli kaj pli da kristanoj ni trovas en Litovujo. Kristanismo komencis penetri Litovujon ĉefe de du flankoj: el okcidento pere de germanoj (kaj nur parte iom pere de poloj), el Oriento — pere de blankrutenoj. Ĉi lastaj konfesis kristanismon laŭ orienta skismo kaj havis orientan riton, kiu kvankam pli impona, tamen ne konvenis al serioza, meditema karaktero de litovo. Kristanismo de okcidento — katolikismo — de unua fojo al litovoj pli ekplaĉis kaj de unuaj siaj paŝoj firme stariĝis sur litova tero.

Kiel favore estis renkontita ĉe ni Kristana doktrino oni povas kompreni jam el tio, ke litovaj princoj, kvankam mem estante ankoraŭ idolanoj, ne nur ne malpermesis al katolikaj pastroj prediki

Dian vorton en siaj landoj, sed eĉ mem helpadis je tio protektante ilin kaj konstruante por ili preĝejojn. Tiel jam princo Vitenas konstruis katolikan preĝejon kaj invitis du pastrojn de Franciska ordeno, kiun fakton mencias letero de litova grandprinco Gedimino, adresita al papo Johano XXII. Mindaugas la Granda, kiam li fariĝis reganto de Litovujo, tuj turnis sin al papo Inocento IV esprimante sian deziron akcepti katolikan religion. Kaj vere, baldaŭ post tio, en la jaro 1251 en kastelo Kernava li mem kun sia edzino Morta, siaj du filoj Repikis kaj Ruklius kaj multaj korteganoj solene estis baptata. Post sia bapto Mindaugis tuj forsendis siajn delegitojn al la nomita papo Inocento IV por komuniki al li pri tio kaj peti de li por si kronon de Litovujo. Tre afable akceptis sankta Patro la delegitojn de litova princo, volonte plenumis liajn dezirojn kaj destinis episkopon Enrikon de Chelmo, ke li surmetu reĝan kronon sur Mindaugis kaj proklamu, ke Litovujo de nun estas reĝlando. Krom tio li skribis persone al Mindaugis dirante, ke li akceptas „tiun novan reĝlandon . . . kaj tutan nacion“ kiel proprajon de sankta Petro. Kune kun ĉi tiu letero sankta Patro sendis al Mindaugis ankaŭ reĝan kronon. Solena kronado okazis en Naujapilis en la jaro 1252. Nun reĝo Mindaugis ekintencis ordigi katolikan Eklezion tiel, kiel en aliaj Eŭropaj landoj, kaj tiucele antaŭ ĉio intencis fondi episkopecon. Tial li denove skribis al sankta Patro, montrante, kiun li volus vidi unua episkopo. Pro tio papo Inocento IV la 21 de aŭgusto 1253 skribis al ĉefepiskopo de Livlando inter alio jenan: „La glora litova reĝo, antaŭ ne longe akceptinta la sanktan bapton, sciigis nin, ke li deziras, ke en lia lando estu fondita episkopejo. Tiucele li promesas konstrui kate-

dralon, dece ĝin pridonaci kaj ĉirkaŭi per estimo. Konsentante plenumi lian deziron ni skribas al ci leteron, ke ci sanktigu je episkopo tiun pastron, kiun montros la reĝo, kaj ĉar la reĝo per letero petis nin pri sanktigo de frato Kristiano el Livolanda germana ordeno, viro instruita, serioza kaj virta, kiun reĝo havis ĉe si dum sia bapto kaj volus lin pluen lasi ĉe si, do kontentigante tiun peton de la reĝo per ĉi tiu apostola skribo ni komisias cin, Frato, sanktigi je episkopo la nomitan fraton Kristianon. Por sanktigracemonio invitu ankoraŭ du episkopojn; de la sanktigo prenu promeson, ke li obeos al ci, kaj juron, ke li estos fidela al ni. Laŭ ĉi tiu ordono de papo Kristiano vere estis sanktigita episkopo de Litovujo. Mindaugis riĉe liu pridonacis per grandaj terposedaĵoj en Raseiniai, Betigala kaj Laukuva. Mindaugis konstruis ankaŭ katedralon, sed kie — ne estas konate, ĉar dum postaj ribeltempoj ĝi videble estis detruiĝinta. Eble en Naujapilis, Kernava aŭ en iu el nomitaj urboj. Krom tio, en de blankrutenoj loĝata parto de sia regno, en urbo Liubĉ en la jaro 1250 Mindaugis fondis monaĥejon por dominikanoj pastroj kaj ricevis de papo permeson fondi en Blankrutenujo duan episkopejon, por kiu en la jaro 1253 estis sanktigita je episkopo dominikana monaĥo Vitas, poste de Eklezio agnoskita kiel benita. Sidejon de tiu dua episkopejo Mindaugis faris en Liubĉ.

Tiamaniere jam 136 jarojn antaŭ bapto de Jogela Litovujo estis alkalkulita al familio de kristanaj popoloj kaj katolika religio fariĝis kvaŭzaŭ litova ŝtata religio. Katolikismo, kiu jam en la tempoj de Vitenis aŭ eble ankoraŭ pli frue trovadis en Litovujo anojn, de nun ĉiam pli multe da anoj altiras de malnova litova religio, kiun Min-

daugis ne volis perforte subpremi. Eĉ se Mindaugis estus volinta perforte enkonduki kristanismanon, li tion ne povis fari, ĉar tia perforto povis estigi ribelojn, danĝerajn por ŝtatekzisto. Tiam estis malfacilaj tempoj por Litovujo, kiu nur per seninterrompaj militoj povis defendi siajn limojn. Kaj la tempoj fariĝadis ĉiam pli maltrankvilaj kaj danĝeraj por Mindaugis. Kontraŭ li ribelis partianoj de malnova religio kaj malgrandaj princoj, ne kontentaj je lia centraliga politiko. Oni eĉ akuzis lin, ke li perfidas Litovujon al majstro de Livlanda ordeno. Komenciĝis kontraŭ li konspiroj, kaj en pli malproksimaj partoj de Litovujo, kie estis pli fortaj liaj kontraŭuloj, komenciĝis eĉ persekutadoj de kristanoj. Tiamaniere Mindaugis estis devigita provizore ne plu disvastigadi kristanismanon. Tion eluzis aliaj liaj kontraŭuloj kaj komencis disvastigadi famon, ke litova reĝo kvazaŭ rezignis je kristanismo kaj denove fariĝis idolano. (Ĉi tiun fabelon kelkaj polaj historiistoj kaj nekonsciencaj verkistoj eĉ ĝis hodiaŭ ripetadas.) Volante funde klarigi la tutan situacion de Litovujo al sankta Patro mem, la reĝo Mindaugis mem forvojaĝis en Romon en la jaro 1262 kaj renkontiĝis tie kun papo Urbano IV. Papo, afable lin aŭskultinte, enmanigis al li skribajon al Krakova episkopo Prandoto, al kiu li ordonis helpi al Mindaugis en liaj proreligiaj penadoj kaj krome helpi al litova reĝo unuigi kun Roma Katolika Eklezio la regatajn de Mindaugis blankrutenojn, kiuj estis kristanoj laŭ orienta rito. El ĉi tio ni vidas, ke Mindaugis estante ĉe papo mem iniciatis unuigon de Eklezioj. Same ni vidas, kiel multe zorgis tiu vere apostola litova reĝo pri ekleziaj aferoj kaj pri katolikeco de Litovujo. Tamen ne longe jam estis destinita al reveninta el Romo Mindaugis regi Litovujon. Du

plej potencaj liaj kontraŭuloj kaj gvidantoj de idolana partio, la princoj de Žemaičiai ¹⁾ Trainaitis kaj Daumantas, sendis dungitajn mortigistojn por inside lin mortigi. Mindaugis, kune kun siaj du filoj: Ruklis-Henriko kaj Repikis-Andreo estis mortigita dum sia ĉasado en regiono de Dauguva (Dvina) la 12 de Septembro 1263. Ke reĝo Mindaugis kaj liaj du filoj pereis kiel veraj martiroj de Kristo, ĉi tion hodiaŭ agnoskas ankaŭ tiaj seriozaj polaj kaj katolikaj verkistoj, kia estis antaŭ nelonge mortinta historiisto de Eklezio en Litovujo pastro prelato I. Kurčevski, kiu, skribante pri morto de Mindaugis, klare diras, ke li „pereis kiel martiro pro sia popolo, pro ĝia savo“ ²⁾. Post mortigo de Mindaugis en Litovujo ekregis kontraŭa al kristanismo partio, en multaj lokoj de Litovujo komencigis malkaŝa persekutado de kristanoj kaj nefortekredaj homoj pro timo komencis denove revenadi al idolismo. Fidelaj kristanoj forlasinte siajn hejmojn kaj havaĵojn kaŝadis sin en arbaroj. Kaj da tiaj forkurintaj en arbarojn kristanoj estis sufiĉe multe, kio pruvas, ke jam en tiu tempo kristanismo estis trovinta en Litovujo konsciajn anojn, ne ŝanceligante oferantaj pro ĝi sian havaĵojn kaj eĉ vivon. Tamen tiu persekutado de kristanismo en Litovujo daŭris ne longe. Jam de 1300 jaro, post kiam iom silentigis militoj, la kristanoj ricevis liberecon konfesadi kaj predikadi sian kredon, T. Norbutas en sia „Historio de Litovujo“ pri tio skribas jenon: trankvilo kaj paco benis nian landon. La krucoj, sanktaj signoj de eterna savo, multfoje neniigataj, centfoje detruataj, nun denove stariĝis laŭ bordoj de rivero Neris (Vilio), ornamitaj per kronoj el

¹⁾ Žemaičiai estas okcidenta parto de Litovujo kun siaj urboj: Šiauliai, Telšiai, Raseiniai, Klaipėda (Memel).

²⁾ „Swięci biskupi i apostołowie Litwy.“ Wilno 1912, p. 58.

folioj kaj havantaj siajn adorantojn . . . kaj kiam dimanĉe sonorila voĉo kunvokadis al preĝo kredulojn, la pastroj kun miro vidis antaŭe ne viditajn homojn nun serĉantajn trankvilon kaj konsolon ĉe sanktaj altaroj. Ili estis antaŭ multaj jaroj el riĉaj vilaĝoj pro persekutoj forkurintaj civitanoj . . .“

La granda princo ¹⁾ de Litovujo, Gediminas, kvankam mem ne estis katoliko, ne nur ne malpermesadis en sia regno kristanismon, sed, kontraŭe, diversmaniere ĝin subtenis kaj deziris, ke tuta Litovujo fariĝu katolika, kiacele li skribis leteron kaj sendis siajn senditojn al papo Johano XXII, en kiu li interalie konfirmas, ke „Mindaugis kun tuta sia regno estis akceptinta Kristan doktrinon“, tio estas, ke dum regado de Mindaugis katolikismo estis proklamita ŝtata religio en Litovujo. Gedimino en sia nomo kaj en nomo de tuta sia popolo en ĉi tiu letero esprimas deziron akcepti katolikan kredon. Bedaŭrinde, la politikaj cirkonstancoj denove malhelpis la definitivan venkon de katolikismo en Litovujo. En Eŭropo oni ĉiam ankoraŭ konsideris Litovujon idolana lando. Tamen dum regado de Gediminas (1316 – 1339) la katolikismo en Litovujo ne nur havis plenajn rajtojn, sed ĉiam pli disvastigadis kaj fortiĝis. Jam en la nomita letero Gediminas mencias, ke franciskanoj havas siajn preĝejojn en Litovujo en Vilnius (Vilno) kaj Pleskava kaj dominikanoj en Naujapilis.

Post la morto de Gediminas en la jaro 1339 grandprinco de Litovujo fariĝis lia filo Algirdas, kiu ankaŭ estis tre favora al katolikismo. Eĉ li

¹⁾ Kvankam jam de Mindaugis la regantoj de Litovujo havis rajtan nomon de reĝoj, tamen liaj posteuloj ne uzis ĉi tiun titolon, eble parte pro tio, ke ili refariĝis idolanoj, parte pro tio, ke ili regis grandajn rusajn teritoriojn, kie regantoj estis nomataj princoj kaj ĉefa reganto — granda princo.

mem konfesis kristanismon kaj antaŭ sia morto akceptis bapton laŭ orienta rito, ĉar liaj du edzinoj estis blankrutenaj princinoj. Dum la regado de Algirdas en Litovujon alvenis pli multe da franciskanaj kaj dominikanaj monaĥoj, kiuj predikis kristanismon en litova ĉefurbo Vilnius kaj en aliaj lokoj. Precipe fervora kristano kaj protektanto de kristanismo fariĝis litova magnato Petras Goštautas. Goštautas estis plej amata de Algirdas nobelo kaj kelkan tempon li estis administranto de Podola provinco, kiun litovoj antaŭ ne longe estis almilitintaj. Poste li estis anstataŭanto de Algirdas en Vilnius kaj tie havis sian palacon kaj grandajn ĝardenojn en tiu loko, kie nun estas preĝejo de sankta Bonifaco kaj estinta palaco de episkopo. Dum sia estado provincestro en Podolo, Goštautas fariĝis katoliko kaj ju pli konatiĝis li kun veroj de tiu religio, des pli fervora kristano li fariĝis. Fariĝinte anstataŭanto de Algirdas en Vilnius, Goštautas, dum bapto ricevinta nomon Petro, ĉiamaniere penadis disvastigadi kristanismon inter litovoj. Interalie en la jaro 1364 li invitis el Mozurio 14 franciskanajn monaĥojn, kiujn loĝigis en sia palaco kaj al kiuj disponigis siajn ĝardenojn en urbo mezote. Kvankam ne multe scipovantaj litovan lingvon tiuj monaĥoj ne multe povis kunhelpi al disvastigo de kristanismo en Litovujo, tamen sub alta protekto de Goštautas kaj de Algirdas mem, ili almenaŭ trankvile povis preĝadi ĝis la jaro 1366. En tiu jaro, kiam Goštautas kaj Algirdas estis forveturintaj el Vilnius, pro ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne klarigitaj kaŭzoj partianoj de malnova religio ribelis kaj mortigis ĉi tiujn 14 monaĥojn, sep en ilia ĝardeno, kaj sep aliajn oni dejetis de sur la hodiaŭ nomata Kruco-monto, kien ili estis forkurintaj, en rivereton Vilnele. Reveturinte en Vilnius, Goštautas kun

granda bedaŭro kaj soleno enterigis tiujn monaĥojn en ilia ĝardeno kaj kun kunsento de Algirdas dece punis la mortigistojn. Akuzitaj pro ĉi tiu krimo estis proksimume 500 homoj. El ili plej kulpaj estis mortpunitaj, kio pruvas, ke sub regado de Algirdas kristanoj estis defendataj per samaj ŝtatoleĝoj kiel ĉiuj civitanoj; krome ankaŭ tion, ke tiu atenco estis farita nur de fanatikuloj de pereanta idolismo kaj ne havis aprobon de grandaj popolamasoj, ĉar alie Goštautas kaj Algirdas ne estus povintaj fari tian publikan proceson kaj tiel severe puni kulpulojn. Anstataŭ la mortigitaj pastroj Goštautas jam la sekvantan jaron, tio estas 1367, invitis en Vilnon novajn pli ol tridek franciskanojn, konstruis por ili monaĥejon kaj preĝejon de plej sankta Virgino Mario en tiu urboparto, kie staras de rusoj forprenita preĝejo de sankta Francisko, kaj sur loko, kie estis entombigitaj la mortigitaj monaĥoj estis starigita krucforma monumento kun signitaj iliaj nomoj. Zorgante tiel fervore pri katolikaj aferoj Goštautas, post morto de sia edzino (polino) mem farigis monaĥo en de li konstruita monaĥejo. La 24 de majo 1374 ĉi tiun monaĥejon atakis de kelka tempo loĝigitaj en Vilnius tataroj, kiuj mortigis ĉiujn 36 monaĥojn, inter ilin ankaŭ Goštautas mem.

Estas rimarkinde, ke laŭ monaĥeja kroniko inter mortigitaj de tataroj monaĥoj estis 6 litovoj, kio lasas supozi, ke da laikaj katolikoj inter litovoj devis esti jam sufiĉe multe. Do ni vidas, ke longe antaŭ regado de Jogela apude de adorodo de Perkunas estis adorata ankaŭ Kristo. Oni povas kuraĝe aserti, ke kiam Jogela alveturis kun polaj pastroj bapti litovojn, tie jam estis pli multe da katolikoj, ol da idolanoj. Ĉi tion pruvas ankaŭ la fakto, ke dum tiu „bapto de Litovujo“ estis bapti-

taj nur tridek mil homoj, kvankam la nombro da litovoj tiam atingis kelkajn milionojn. Ĉar multaj jam de longe estis kristanoj, Jogela kun siaj pastroj nur tridek mil da homoj povis trovi ankoraŭ ne baptitaj. Kaj eĉ ĉi tiuj ne baptitoj videble antaŭ tio jam ne unufoje aŭdis pri Kristo, se ili tiel volonte iris al bapto, kiel tion rakontas kronikoj, ĉar certe ne blankaj dum bapto donataj ĉemizoj allogis niajn praavojn al nova kredo, kiel tien naive asertas polaj historiistoj. Ĉar ne sen vestoj ja en tiu tempo iradis litovoj kaj blanka tolajo ne estis tiam en Litovujo nevidita maloftajo, ke por ĝin akiri la de jarcentoj al sia religio alkutিনিগinta popolo ŝanĝus sian kredon. Ne multon ĉi tie povis helpi ankaŭ la timo de Jogela malkontento, ĉar en aferoj de religio en ĉiuj tempoj ne popolamaso devis obei al siaj regantoj, sed pli la regantoj la popolamason. Jam tia estas psikologio de ĉiuj tempoj kaj de ĉiuj popoloj. En tempoj de Jogela Litovujo jam tiom estis kompreninta la neceson definitive formeti sian malnovan religion, ke sufiĉis simpla anonco de Jogela, kie kaj kiam okazos la baptado, por ke la restintoj tridek mil da idolanoj senreziste akceptu bapton. Aliamaniere oni neniel povus klarigi tiel subitan kaj senribelan konvertiĝon al Kristo de tia idolanamaso.

Kiu do tiel katolikigis Litovujon? Kiu ĝis tiu tempo tiel maturigis kristanismon kaj kiu la unua metis en la Litovujan kampon la unuajn semojn de kristanismo?

Kristanigis, katolikigis Litovujon ne iu alia, ol litovoj mem, la regantoj de Litovujo kaj iliaj plej proksimaj helpantoj, kiuj jam preskaŭ ducent jaroj antaŭ Jogela ekkonis kaj bone komprenis la supercon de kristanismo kompare kun sia malnova religio. Ĉi tion faris tiaj fervoraj konfesantoj de

katolikekleziaj veroj kaj disvastigantoj de ili, kiel la granda litova reĝo, glora krista martiro Mindaugis; tiaj protektantoj kaj favorantoj de Katolika Eklezio, kiel glora Petro Goštautas, akirinta pro sia kredo martirkronon kaj ĝis nun ankoraŭ atendanta la publikan agnoskon de siaj meritoj pere de Katolika Eklezio kaj kanonan rajtigon esti ĉe Dio nia protektanto; fine tiaj saĝaj kaj kleraj ŝtatregantoj, kiel Gediminas kaj Algirdas, estimegintaj kristanisman kaj deziregintaj, ke kristanismo finvenku en Litovujo. Kaj la unuajn semojn de kristanismo semis en litovaj animoj jenaj sanktuloj kaj benituloj de Katolika Eklezio, nomataj apostoloj de Litovujo:

1. S-ta Ansgarius, ĉefepiskopo de Bremeno, franco laŭ deveno, apostolo de Svedujo kaj konsiderata kiel la unua apostolo en Litovujo; ĉirkaŭ la jaro 850 li predikis Kriston en Baltaj landoj kaj eĉ fondis episkopejon en urbo Pretino.

2. S-ta Adalberto, ĉefepiskopo de Magdeburg, germano; revenante el rusa lando li ĉirkaŭ 960 jaro predikis en Litovujo.

3. S-ta Vaitiekus-Adalberto, episkopo de Praga, ĉeĥo, predikis en litova gento prusoj kaj tie en la jaro 1097 ricevis martiran kronon.

4. S-ta Brunono, germana episkopo en la jaro 1009 predikis en Ŝirvintai kaj sur bordoj de rivero Ŝeŝupe estis mortigita de idolanoj.

5. S-ta Olavo, reĝo de Norvegujo, kiu longan tempon apostoladis en Litovujo kaj Blankrutenujo kaj post reveno en sian landon estis mortigita de siaj samlandanoj. Tiu sanktulo, vivante en Litovujo, akiris tian amon kaj estimon de litovoj, ke eksciinte pri lia morto litovoj „senfine funebradis pri li“ kaj „kvankam ili estis ankoraŭ idolanoj, ili decidis ĉiujare rememoradi lin 29 de julio, nome

tiun tagon, kiam li estis mortmartirita“.) Tia estimo al predikisto de Kristo flanke le litovoj klare montras, ke nur unuopaj okazoj estis tiuj mortigoj de sanktuloj Vaitiekus kaj Brunono; ĝenerale jam en tiuj malnovaj tempoj, kiel ankaŭ nun, litovoj distingigis per sia religia toleremo kaj profunda kompreno de nobla Krista doktrino.

6. Meinhard, germana episkopo, kiu la unua konstruis katolikan preĝejon en Kurlando, loĝata de litova gento latvoj.

7. Berthold, cistersa monaĥo kaj episkopo, germano el Saksujo, Livolanda episkopo de litovoj kaj latvoj, alveninta ĉi tien ĉirkaŭ la jaro 1196.

8. Albertus, germana episkopo, fondinto de Riga (1199), invitinta en Kurlandon aŭgustianajn kaj cistersajn monaĥojn, el kie ili iradis tra vasta latva kaj litova lando fervore kaj sukcesplene predikante kristanismo.

9. Gotfrido, germana cistersa monaĥo, kiu predikis al prusoj en la jaro 1207.

10. Kristiano, ankaŭ cistersa germana monaĥo, en la jaro 1214 nomita unua episkopo de Prusoj.

11. Kristiano, germano, kiu baptis reĝon Mindaugis kun lia familio kaj korteganoj, plej amata helpanto de Mindaugis en lia predikado de Kristanismo en Litovujo; laŭ peto de Mindaugis li estis sanktigita la unua episkopo de Litovujo en Naujapilis.

Jen ĉiuj unuaj predikistoj de kristanismo en Litovujo. La plimulto el ili estis germanoj; unu estis franco, unu ĉeĥo, unu norvego.

La nomita pola verkisto pastro prelato J. Kurĉevski en sia jam citita verko al supre nomitaj apostoloj de Litovujo aldonas ankoraŭ du polojn:

1) Ks. Jan Kurczewski. Świąci biskupi i apostołowie Litwy.

sanktan Jackon, apostolon de blankrutenoj kaj la benitan Viton, kiu laŭ peto de Mindaugis estis nomita dua episkopo de Litovujo (en blankrutena parto). Sed ke s-ta Jacko, longe predikinta en Polujo kaj en Blankrutenujo, ankaŭ predikis en Litovujo, pri tio ekzistas neniam certaj komunikoj. La dua polo — la benita Vito — vere estis episkopo en regno de Mindaugis, sed li laboris ekskluzive en de blankrutenoj loĝita parto de Litovujo. Tiamaniere ni vidas, ke poloj, kvankam estante al ni pli proksime ol okcidenta Eŭropo kaj pli frue ol ni fariĝinte kristanoj, tamen ĝis tempoj de Jogela nenion faris por disvastigi kristanisman en Litovujo.

Dum pli postaj tempoj, kiam pri ekleziaj aferoj en Litovujo komencis zorgi ĉefe poloj, plej parte ne sciantaj nian lingvon kaj ne penantaj ĝin lerni, la katolikeco komence tiel bele ekflorinta, komencis malprogresadi, kion sukcesis haltigi veraj litovaj pastroj kaj episkopoj.

Plej longe konserviĝis idolanismo en Žemaičiai. Tie eĉ post Jogela bapto la plimulto restis idolanoj. Nur dank' al penadoj de litova grandprinco Vytautas ili estis kristanigitaj en la jaroj 1413-1416. Ĉefa lia helpanto en tiu afero estis litova pastro Motiejus, kiu laŭ deziro de Vytautas, estis nomita unua episkopo de Žemaičiai. L. G.



Evoluado de litova lernejo.

La 22an de Oktobro ni festis en Kaunas la 60jaran naskiĝdatrevenon de Maironis, la poeto de revekiĝo de nia litova nacio. En la 1893 jaro li verkis nacian poemon: „Tarp skausmų į garbę“ („Tra l' doloroj al la gloro“). Kio estis en tiu tempo Litovujo? La poeto jene komencis sian poemon (laŭvorta traduko):

Kie estas ĝi hodiaŭ?

Nur la tombojn vi vidas; kaj estas malgaje, kaj doloras la brusto!

Kvazaŭ post ventegoj grandaj,
Kiam sur la maro vasta
Ekdormas la ondo lasta.
Kie estas tiu fama lando?
Aŭskultas, serĉas la orelo
Kaj la voĉon trovi volus!
Sed jam kvin jarcentoj,
Kaj ankoraŭ ĝi ne sin levas
Post tiom da doloroj suferitaj! . . .
Kaj tamen Litovujo
Ja vekigos iam,
Ĉar kruco la vivon promesis:
La voĉon de kankloj¹⁾ oni ekaŭdos,
La dormanta sango ekbolos,
Ja atendas la trankvilo nur venton . . .

Tiel komencis Maironis sian poemon en la jaro 1893. Tuta Litovujo, kiun tiam regis rusoj

¹⁾ Nacia korda muzikilo.

aspektis kiel tombejo: ne aŭdiĝis eĉ ia voĉo. Ie ajn laboradis ia areto de litovaj kleruloj en Prusujo. Unu aŭ alia litova junulo studis en Peterburgo, Moskvo aŭ Varsovio. Kaj plie — dezerto, timige, malagrabla. Oni timas diri: preskaŭ kvin jarcentojn la dorma trankvilo regis en la lando!

Tiu trankvilo, mortiginta Litovujon, komenciĝis depost 1569 jaro, kiam en urbo Lublin Poloj devigis litovan ŝtaton fari union kun Polujo. Litova nobelaro ekkomencis akceptadi polan lingvon kaj kulturon, en Litovujo aperis (el Polujo) servuto, kiu preskaŭ sklavigis litovan vilaĝanaron. En Polujo komencis regi malordo, kies rezulto estis tio, ke en 1795 jaro ambaŭ unuigitaj ŝtatoj — Polujo kaj Litovujo — ĉesis ekzisti sendependaj, ĉar ili estis dividitaj inter la najbaroj: Germanujo, Aŭstrujo kaj Rusujo. Litovujo subfalis sub la rusan jugon. La vivo por litovoj fariĝis tre malfacila, ĉar rusoj ekintencis rusigi nian landon: ilia registaro sendis en Litovujon amason da rusaj oficistoj, instruistoj, ortodoksaj pastroj, kaj militistaro. En 1831 jaro poloj, altirinte al si parton da litovaj bienposedantoj, ribelis kontraŭ rusoj. Sed la ribelo malsukcesis. La rusoj komencis pli subpremi la polojn kaj litovojn. En tiu jaro la rusa registaro faris grandan kulturan vundon al nia lando: ĝi fermis la universitaton de Vilnius, kiu tie funkciis kaj lumis por la tuta lando de post la jaro 1576. En 1863 jaro poloj de nove ribelis, sed ankaŭ malsukcese. Kvankam litovoj en tiu ĉi ribelo ne partoprenis, tamen rusa registaro punis Litovujon per doregaj punoj: forprenis de katolikoj multon da preĝejoj, kiujn ricevis la venintaj ortodoksuloj, fermis ĉiujn lernejojn, multajn loĝantojn forekzilis en Siberion kaj ilian havaĵon konfiskis. Fine generalo Muravjov, de litovoj nomata Ko-

rikas (pendiganto, ĉar li pendigis multajn homojn) rusa gubernatoro por tuta Litovujo, en 1864 jaro malpermesis libropresadon en litova lingvo, opiniante tiamaniere rusigi pli rapide Litovujon. Por tiu celo rusoj volis enkonduki rusan alfabeton por litovaj libroj kaj komencis tiajn librojn presigi. Sed litovoj ne akceptis tiun „gracon“ kaj restis fidelaj al sia preso latinalfabeta. Kia strangajo! Dum estis malpermesita litova preso latinalfabeta, la polaj libroj kaj gazetoj estis permesitaj en Litovujo kaj helpis pligrandigi poligadon de litovoj. (En tiu ĉi malfeliĉo de litova nacio ankaŭ poloj ne estas senkulpaĵ.)

Komenciĝis derura tempo por litova nacio. Estis konsiderata kiel grandega kulpo, se litovoj katolikoj kuraĝis preĝi el litovlingvaj preĝlibroj! Sed rusoj forte eraris. Kvankam Litovujo estis perdinta sian sendependecon, tamen la nacio restis viva. Troviĝis patriotoj, kiel Jonas Basanavičius, la patro de renaskiĝo de litova popolo, Vincas Kudirka (jam mortinta), Jonas Šliupas, Jonas Jablonskis (filologo), episkopo Antanas Baranauškas (mort. 1902), pastro Al. Daubrauskas, pastro Juozas Tumas-Vaižgantas kaj multaj aliaj, kiuj levigis por savi la nacion.

Ne povante hejme presigi litovajn librojn ili komencis en Prusujo eldonadi litovajn presajojn kaj kaŝe transportigadi en Litovujon. En la jaro 1883 aperis la unua litova ĵurnalo „Aušra“ (Tagiĝo), poste „Ukininkas“ (Terkulturisto), „Varpas“ (Sonorilo), „Tėvynės Sargas“ (Gardanto de Patrujo) k. a. En la jaro 1895 en eksterlando jam estis eldonataj 22 litovaj gazetoj kaj ĵurnaloj. La lando estis sursemita per litovaj libroj kaj gazetoj. La rusa registaro jam ne sciis, kion fari: ĝi kruele persekutis litovajn inteligentulojn (kuracistojn, pas-

trojn, studentojn) — ilin ekziladis en Siberion, enmetadis en malliberejojn. Sed la forprenitojn kaj ekzilitojn anstataŭigadis aliaj fortoj.

Malesperis la registaro, ĉar ĝi ekvidis, ke per persekutoj ĝi nenion faros kaj nur plimultigos la nombron de malamikoj, do finfine la 7an de Majo de la jaro 1904 caro eldonis edikton, permesantan al litovoj presi litovajn presajojn en litova lingvo. Tiamaniere malgrandeta litova popolo parte finis la teruran 40jardaŭran krucvojon en kulturbatalo kun grandega rusa ŝtato, venkinte la lastan.

Kaj en kia stato estis la lernejo en tiu ĉi epoko?

Litovan nacian lernejon en la jaroj 1864—1904 bonege ilustras nia skulptisto Petras Rimša jenmaniere: la virino sidas ĉe ŝpinilo kaj instruas knabon legi el litova katolika preĝaro, kaŝe akirita el fremdlando per helpo de kontrabandistoj. Jen kiamaniere litovoj instruadis siajn infanojn dum 40jaroj de rusa persekutado! La ĉefa instruistino de litova gejunularo en tiu plendinda epoko estis litova pia virino, simpla vilaĝana patrino. Mi, la skribanto de tiuj ĉi linioj, ankaŭ havis la feliĉon ricevi la unuan klerigadon en la sama „lernejo“. Kaj litovaj infanoj, ricevintaj komencan edukon en „Rimša lernejo“, grandparte restis fidelaj al litova nacieco kaj la katolika religio, dum malproksima edukado (se ili ĝin ricevis) en rusaj lernejoj, en kiuj oni instruis ĉion ruslingve — de A. B. C. kaj plue, eĉ katolikaj pastroj estis devigitaj religion instruadi ruslingve, malmoraligadis junularon. Al la „ĉefinstruistino“ helpadis litovaj kleruloj, la filoj de vilaĝanoj (litova nobelaro estis jam poliginta kaj perdita por la nacio): pastroj kaj laikoj — unuj preparante la necesan literaturajon, la aliaj — ĝin liverante kaj disvastigante. Ĉar

estis granda manko de literaturaĵo por la popolo, oni devis ĝin prepari. Ekzemple, la episkopo de Kauna episkopdistrikto Motiejus Valančius (1801 ĝis 1875) verkas librojn (li verkis 20 diversajn librojn), mein presigas eksterlande, igas tion fari la pastrojn kaj laikojn (kiel la historiiston Daukantas). La katolika litova pastraro ludis gravan rolon en tiu tragedia malfeliĉa por litova popolo tempo. Ekzemple, Jonas Katela (mort. 1908), la paroĥestro de Panemunelis (ĉe la limo de Litovujo), tiel fervore laboris en sia paroĥo, ke en ĝi ne restis eĉ unu persono analfabeta. Tamen la rusa polico ne povis kapti tiun „kulpulon“. Kiel granda estis la obstino de litovaj katolikoj en tiu ĉi rilato, ĝin karakterizas la jena versaĵo — unu el la multo de tiuspecaj — de fama litova poeto kaj lingvisto Antanas Baranauskas (mort. 1902), la episkopo de eparkio Seinai. Li, veturante el patrujo en Peterburgon, kantis kaj poste miloj da buŝoj tiun kanton en la lando ripetadis kaj ripetados dum longaj jaroj.

Litovujo kaj Daŭguvo, ho vi sanaj restu!
 Al litovaj samlandanoj Di' favora estu!
 Litovuj' vi plej aminda mia patrineto,
 Vi, Daŭguvo, la plej vasta nia rivereto!
 Vasta, milda lando nia en la antikveco!
 En vastaĵoj tiuj regis rusojn kun saĝeco.
 Nun la rusoj kun moskvidoj moskve mastrumadas,
 Kaj de Litovuj' infanojn la mizer' premadas.
 Nek la preson, nek la librojn ili al ni donas:
 „Estu nigra kaj malluma Litovuj“ — ordonas.
 Ho vi rus', ne estos tiel, kiel vi parolas,
 Ne laŭ via vol', sed kiel bona Dio volas.
 Vi ja sanktajn Diajn rajtojn malfortul' perfortas,
 Kaj al land' kaj loĝantaro jugon nur alportas.

Volas vi ja niajn korojn per potenc' tranĉigi
 Kaj al ni per via frosto brustojn katenigi,
 Vi ne venkos, fil' de l' Nordo, estos ni fortkoraj,
 Ofte oni nin elpruvis per fajr' de doloroj.
 Jam teŭtonoj per la glavo longe nin batalis
 Kaj de Prusoj nin detranĉis, Litovuj' ne falis.
 Niajn fratojn ili buĉis sur la tombo sanga,
 Rabis landon kaj . . . fariĝis luteranfalango.
 Vi ne venkos, viajn glavojn rompos niaj koroj,
 Fluidiĝos la glacioj — fluos viaj ploroj . . .
 Niaj koroj reviviĝis per la sango Dia,
 Niaj vundoj resaniĝis per la preĝ' Maria.
 Sur la ondoj ni atingis Eklezian fundon.
 Di' spirit' en ni ekbrulis fajran amprofundon.
 Kredas, amas ni, kaj ridas je via potenco
 Estas ni ja kun sanktuloj de la kredkomenco.
 Nin ŝarĝigu vi per ŝarĝoj, ni vin ne lakeos,
 Eĉ forpeli Siberion — kaj ni ne pereos.
 Kaj neniel vi fortiras nin de l' kredoj Romaj,
 Ĉie estos ni kun Dio, patro de la homoj.
 Sen libero, sen la preso, gracon donas Dio
 Lumas per scienc' malluma, nigra lando nia.
 Venos iam temp' de l' gentoj kaj la ter' rompiĝos,
 Mallumiĝos lum' de l' mondo, nia eklumiĝos.
 Falos montoj, malaltaĵoj supren sin eklevos,
 Malfortul' potenca estos, potenculoj krevos.
 Tremu do vi fil' de l' Nordo honte kurbiĝinta,
 Mem falinta en pereon, nin ne entirinta!
 Estas ni ja ŝtono Dia, vi nur la rompaĵo.
 Ni en Petra naĝas ŝipo, vie en grekflosaĵo . . .

19. 5. 1923.

Trad. Pr. A. Dambrasukas.

La 1-an de decembro de 1904 jaro en Peter-
 burgo aperis la unua litova semajna ilustrita gazeto
 „Lietuvių Balsas“ (voĉo de litovoj), fondita de
 Smilga (mort. 1921). En tiu sama monato komencis
 eliri en Vilnius unua ĉiutaga ĵurnalo „Vilniaus

Žinios“ (Sciigoj de Vilnius), fondita de inĝeniero Petras Vileišis. P-ro Ambroževičius en Vilnius komencis eldonon de „Lietuvos Bitininkas“ (Abelkulturisto de Litovujo). En 1905 jaro en Vilnius aperis „Lietuvos Ūkininkas“ (Terkulturisto), socialista semajna gazeto. En komenco de 1906 jaro en Kaunas aperis „Nedėldienio Skaitymas“ (Dimanĉa legajo), fondita de prelato Antanas Karosas (nuna episkopo de eparkio Seinai) kaj redaktita de p-ro A. Dambrauskas (nia famkonata samideano), kaj en Kaunas fondiĝis granda presaj-eldona societo de s-ta Kazimiro. En tiu sama jaro litovaj pastroj de eparkio Seinai fondis belan semajnan ilustritan gazeton „Šaltinis“ (Fonto). Poste aperis pli multe da diversaj gazetoj, ĵurnaloj kaj revuoj. La litovaj gazetoj, kiuj estis eldonataj en Prusujo, kompreneble, devis malaperi, esceptinte Amerikon.

La 14-an de Majo de 1905 jaro la caro ordonis „permesi instruadon de litova lingvo en lernejoj, kiuj havas la programon de elementaraj kaj urbaj duklasaj lernejoj“, en kiuj lernas pli da litovaj infanoj ol alinaciaj.

Ne havante la eblon ĉi tie montri la ĝeneralan bildon per detalaj sciigoj pri eduka stato en tuta Litovujo en dirita 1905 jaro, mi prenas tiurilate la estintan gubernion de Kaunas. Laŭ la oficiala jarlibro de tiu gubernio por 1905 jaro en gubernio Kaunas estis entute 302 lernejoj elementaraj, duklasaj kaj urbaj (kelkaklasaj). En tiu nombro estis 21 duklasa kaj 5 urbaj tri aŭ kvarklasaj lernejoj. El dirita nombro de 302 klerigadaj institucioj, la kumumoj subtenadis per siaj kostoj 228 elementarajn kaj 2 duklasajn lernejojn. En tiuj 228 elementaraj lernejoj lernis 12992 infanoj, au 62% de tuta ĝenernalaro katolika, do en ĉiuj elementaraj lernejoj de tuta gubernio estis 81% de tuta nombro de

lernantoj katolikoj. En tiu tempo en tuta Litovujo ekzistis nek unu privata lernejo. (En jaroj 1912—1913 en Litovujo ekzistis 844 elementaraj lernejoj kun 42384 gelernantoj kaj 28 gimnazioj, komercaj kaj similaj lernejoj kun 5956 gelernantoj.)

La caro permesis instrui kaj lerni litovan lingvon en ĉi supre diritaj lernejoj. Ankaŭ estis permesita instrui la religion en gepatra lingvo en ĉiuj lernejoj de la lando. Sed ho ve, ekstaris granda barilo kontraŭ tiu graco! Ja, en Litovujo, esceptinte gubernion de Suvalkai (kiu apartenis al tiel nomata „Pola regno“, kie estis iom alia ordo), estis ĉiuj instruistoj rusoj, ortodoksoj (pravoslavo), tute nekonantaj litovan lingvon; se estis iu instruisto litovo, katoliko, tiu povis siaprofesie labori nur ie en Kalmukujo, en Kirgizujo aŭ Polujo, nur ne en sia patra lando (en gubernio de Suvalkai estis kelke da litovaj instruistoj). Ekzistis du instruistaj seminarioj (en Veiveriai kaj Panevėžys), kiuj ne povis prepari instruistojn taŭgajn por instruado de litova lingvo. Kion do oni devis fari? En tiu jaro, kaŭze de Rusa-Japana milito, en Rusujo ekbruliĝis revolucio, kies ondoj atingis ankaŭ Litovujon. Ĉi tie la loĝantaro, agitita de agitatoroj, komencis forpeladon de rusaj pli malsupraj oficistoj kaj instruistoj. Kvankam tiu „revolucio“ malsukcesis kaj ĝi sekvigis kozakan nagajkon (skurĝon) por la „ribelantoj“, tamen estis akirita la ebleco al litovaj instruistoj reveni en patrujon por labori en ĝiaj lernejoj.

Litovoj katolikoj, volante iom pli perfektigi la publikan klerigadon, komencis klopodon pri fondado de privataj lernejoj. Por tiu celo unu post la alia fondiĝis tri grandaj klerigadaj societoj: en gubernio de Suvalkaj — „Žiburys“ (Lumilo), en gubernio de Kaunas — „Saulė“ (Suno) kaj poste en gubernio de Vilnius — „Rytas“ (Mateno). Tiu

societoj komencis en la lando fondadi laŭ la eblo lernejojn, kursojn, bibliotekojn. Jen iomete da sciigoj pri la agado de la societoj. „Žiburys“ havis en la 1910 jaro 9 elementarajn lernejojn kun 464 gelernantoj, 16 bibliotekojn — legejojn, kun 20693 libroj, unu progimnazion por knabinoj. „Saulė“ havis en tia sama 1910 jaro 45 elementarajn lernejojn kun 2564 gelernantoj (en tiu jaro la registaro fermis 24 lernejojn), do en 1912 jaro — 18 elementarajn lernejojn, 5 lernejojn pli grandajn por knabinoj, pedagogiajn kaj librotenistajn kursojn, en kiuj ĉiuj lernis 630 knaboj kaj 863 knabinoj kaj instruis 52 instruistoj; la societo ankaŭ havis 21 bibliotekon — legejon kun 7791 volumoj. En la 1913 jaro „Saulė“ konstruis grandan brikan domon por 150000 rubloj, oferitaj de katolikoj. Ekzistado de tiuj societaj lernejoj estis tre malfacila: ili ricevadis de registaro nek unu centimon, tamen devis plenumadi ĉion, kion postulis la registaro, devis instrui nur ruslingve, esceptinte gepatran lingvon kaj religion.

En 1914 jaro ekbruliĝis la mondmilito, kaj Litovujo fariĝis kampo de sangaj bataloj, de gigantaj rusaj kaj germanaj armeoj. Ĉio estis eksanceligita en la lando. La pli multo da intelingentoj pro timo forlasis lo patrujon kaj formigris en la malproksiman Rusujon. En aŭtuno de 1915 jaro la tuta Litovujo estis okupita de germanoj, la frontlinio forpuŝiĝis ĝis post la limoj de la lando. La okupantoj komencis sin ordigi. La restintaj litovoj kleruloj povis nur je unu sin okupi: komencis lernejan laboron. Kaj tuj en la sama aŭtuno la societo „Rytas“ fondis en Vilnius litovan gimnazion, vesperajn kursojn por plenaĝuloj kaj pedagogiajn kursojn por preparo de instruistoj por elementaraj lernejoj k. t. p. La germanoj ne faris

malfacilaĵojn en tiu rilato. Sed en unuaj paŝoj de pure litova lerneja vivo oni renkontis grandan barilon: ne estis la necesaj lernolibroj, precipe por neelementaraj lernejoj-gimnazioj k. a. Tiam Litova scienca societo en Vilnius komencis preparadon de necesaj litovaj lernolibroj: personoj, posedantaj konforman lertecon, tradukis kaj societo presigis preparitajn lernolibrojn. El ĉefurbo la lernejsfondada laboro estis disetendita en la provincon. Al laboro estis altiritaj ĉiuj eblaj fortoj, ĉar komence nur en tiu ĉi kampo oni povis labori sen pli grandaj malhelpoj. La Klerigadaj Societoj „Žiburys“ kaj „Saulė“ ankaŭ fondadis la lernejojn. En la komenco la germanoj, dum ili organiziĝis, estis sufiĉe toleremaj je la dirita afero. Ekzemple, la skribanto de tiuj linioj en la fino de Novembro de 1915 jaro fondis elementaran lernejon de „Žiburys“ en la distrikto Seinai de gubernio Suvalkaj (en Seinai, nune okupita de poloj, mi, kun mallonga interrompo loĝis de 1908 jaro), kaj germana distrikta lernejestro vizitis min nur en Aprilo de 1916 jaro. Sed kiam germanoj komencis sian zorgadon pri litovaj lernejoj, ili en tio tiel trois, ke aperigis eĉ vandalajn ekzemplojn. La germanoj ekvolis ekuzi la lernejojn por germanigaj celoj: ili ordonis instrui germanan lingvon eĉ en elementaraj lernejoj, plinombriĝis la lecionojn de germana lingvo en aliaj lernejoj k. t. p. Litovoj kontraŭstaris. Sur tiu fundamento, ekzemple, en urbo Mariampole okazis eĉ sanga eksceso: germana oficisto en la klaso antaŭ ĝelernantoj per manbato en vizaĝon sangigis instruistinojn. Kiam germanoj forprenis ĉiujn elementarajn lernejojn en siajn manojn kaj ili mem komencis fondi tiujn instituciojn, la loĝantaro ekbojkotis: estigis, ekzemple, lernejoj, vizitataj nur de 2—3 lernantoj.

Germana okupacio estis tre kruela. Ĝiaj sekvoj estis la neelporteblaj rekvizicioj, teruraj „laboraj batalionoj“, germanigado kun malpermeso eĉ en korespondado uzi litovan lingvon, plen-plenaj mallibero da loĝantoj en bagatelajoj k. t. p. Ĉi tio estigis grandan profundegajon inter loĝantaro kaj okupantoj-germanoj. La lando eksentis esti treege pli malfacile ol tio estis sub la rusa regado en antaŭmilitaj lastaj jaroj. Sen politikaj okazintaj-fluoj (proklamo de l' sendependeco de Polujo, la penadoj de poloj enigi ankaŭ Litovujon en ilian sferon, kaj kontraŭstaro de litovoj), komenciĝis vengemaj ribelaj ekscesoj en la provincoj. La germanoj ekproponis fari malgrandan konsilantaron de „konfidaj“ personoj. Do, la komuna opinio litova estis tiu, ke oni devas krei reprezentantaron de nacio por defendo de aferoj de la lando. Post longaj pritraktadoj germanoj, ekvidinte ke ili nenion alian povas fari, permesis kunvoki konferencon, kiu kunvenis en Vilnius la 18an de Septembro de 1917 jaro kaj laboris ĝis 22a de tiu monato. Kunvenis 214 reprezentantoj el ĉiuj lokoj de la lando. La konferenco decidis post longaj debatoj, ke Litovujo devas esti sendependa ŝtato, kaj elektis konsilantaron el 20 personoj. Laborado de la konsilantaro estis malfacilega kaj ĝi nenion povis fari ĉe la okupantoj, kontraŭe — la lando eksentis sin en ankoraŭ pli malbona situacio. Sed tiu konsilantaro donis komencon al la organizo de la ŝtata vivo. La 16an de Februaro de 1918 jaro la konsilantaro, kiel sola reprezentantaro de la lando, proklamis sendependecon de Litovujo, la 5an de Novembro de tiu ĉi jaro ĝi invitis profesoron A. Voldemaras organizi la unuan kabineton de ministroj, kiu komencis funkcii la 11an de la sama monato. Kiam en germanujo okazis revolucio, la

germanoj estis devigitaj forlasi la okupitajn landojn, kaj tiusekve rusaj bolŝevikoj eniris en Litovujon. La litova registaro estis devigita trairi en Kaunas kaj tie komencis ŝtatan organizadon kaj defendan agadon.

Unua ministro de la publika klerigado estis Jonas Yčas, protestanto. Kiel la tuta registaro, tiel ankaŭ ministro de la klerigado devis ĉion organizi el nenio. La 14an de Aprilo de 1919 jaro ministro de la publika klerigado fariĝis J. Tubelis, katoliko. La 10an de Majo de 1920 jaro en la ministerio laboris jam 37 personoj.

La plej supera lernejo.

Unu el la unuaj zorgoj de ministerio de publika klerigado estis fondo de la universitato en Vilnius. La konsilantaro de Litovujo la 2an de Decembro de 1918 jaro konfirmis la statuton por la universitato. La universitato devis esti malfermita la 1an de Januaro de 1919 jaro kaj komenci la funkciadon la 15an de tiu ĉi monato. Sed en la unuaj tagoj de Januaro Vilnius estis okupita de bolŝevikoj, poste de poloj.

La 27an de Januaro de 1920 jaro en Kaunas estis fonditaj tiel nomataj altaj kursoj kun ses fakultatoj: humanitara, jura, matematika kaj fizika, naturscienca, medicina kaj teknika. En majo de tiu ĉi jaro la kursoj havis jam 500 studentojn. La 16de Februaro 1922 tiuj ĉi kursoj estis transformitaj en la ŝtatan universitaton, en kiu nuntempe lernas ĉirkaŭ 1000 da studentoj, instruataj de ĉirkaŭ 100 da profesoroj.

La superaj lernejoj.

La litova ministerio de publika klerigado trovis 8 gimnaziojn kaj 11 progimnaziojn, kiuj estis fon-

ditaj dum la milito. El tiuj (8 + 11) estis fonditaj: de „Saule“: 10, de „Žiburys“: 3, aliaj — de diversaj lokaj komitatoj.

a) La 1an de Januaro de 1920 jaro jam ekzistis 38 tiuspecaj lernejoj, el kiuj estis: ŝtataj: 4 gimnazioj (10,52%), de lokaj komunumoj kun helpo de la ministerio: 1 gimnazio kaj 3 progimnazioj, de „Saule“: 1 gimnazio kaj 4 progimnazioj, de „Žiburys“: 6 progimnazioj, aliaj — de aliaj organizacioj. Ŝtataj gimnazioj havis 1521 gelernantojn, privataj kun ŝtata helpo 7 gimnazioj kun 2297 gelernantoj kaj 18 progimnazioj kun 2440 gelernantoj, entute 25 lernejoj (65,79%) kun 4737 gelernantoj (57,46%).

Privataj lernejoj,

kiuj mem kovris ĉiujn elspezojn, estis: 5 gimnazioj kun 1424 gelernantoj kaj 4 progimnazioj kun 561 gelernantoj, entute 9 lernejoj (23,68%) kun 1985 gelernantoj (24,08%). Ĉi tiuj lernejoj estis fonditaj: en 1915 jaro: 3, en 1917: 3, en 1918: 16, en 1919: 16 lernejoj. Plenklasaj gimnazioj en 1920 jaro estis nur 8, progimnazioj plenklasaj: 14. El ĉiuj 38 tiuspecaj lernejoj estis: 30 litovaj, 2 polaj, 4 hebrea, 1 germana kaj 1 rusa. En la lernejoj estis 257 klasoj: en gimnazioj 162 klasoj, en progimnazioj 95 klasoj, normalaj 190 klasoj.

En tiuj gimnazioj kaj progimnazioj (esceptinte tri gimnaziojn en la de poloj okupita teritorio — en Vilnius kaj Švencionys) instruadis 374 geinstruistoj: 253 viroj kaj 121 virinoj. El tiu nombro estis 193 kun universitata klerigo, 235 kun gimnazia aŭ egalvalora klerigo.

En ĉiuj 38 lernejoj estis 8243 gelernantoj: 4947 knaboj kaj 3246 knabinoj — in 250 klasoj, t. e. po 33 gelernantoj en la klaso.

En gimnazioj la 1an de Januaro de 1920 estis 5242 gelernantoj: 3038 knaboj kaj 2204 knabinoj.

En privataj gimnazioj kaj progimnazioj estis 3985 gelernantoj: 2626 knaboj kaj 3985 knabinoj, t. e. 96,23% de tuta nombro de gelernantaro en tiuj lernejoj.

La 1an de Januaro de 1921 jaro estis jam 48 pli altaj lernejoj (gimnazioj kaj progimnazioj): 32 litovaj (66,67%), 4 polaj (8,35%), 9 hebreaĵ (18,75%), 1 germana (2,08%) kaj 2 rusaj (4,17%).

En tiuj lernejoj instruadis 539 geinstruistoj: 373 viroj kaj 164 virinoj. El ili estis: 161 kun universitata klerigo, 316 kun gimnazia kaj 62 sen pli alta klerigo.

Mezaj lernejoj.

Da tiaspecaj lernejoj (kun 3—4 klasoj) estis la 1an de Januaro 1920: 16, kiuj havis 833 gelernantojn (564 knabojn kaj 269 knabinojn) en 32 klasoj (meze po 26 gelernantoj en la klaso) kaj 63 instruistojn.

El tiuj 16 mezaj lernejoj nur 1 estis ŝtata (kun 24 gelernantoj), aliaj 15 estis subsidiataj de la ŝtato kaj por tiu helpo ĝi elspzis po 518 germ. mark. por lernanto.

La 1an de Januaro en 1921 jaro estis 29 mezaj lernejoj kun 158 geinstruistoj (111 viroj kaj 47 virinoj), el kiuj 11 kun alta klerigo, 113 kun meza klerigo, aliaj 34 sen meza klerigo. Tiuj lernejoj havis 2130 gelernantojn: 1396 knabojn kaj 734 knabinojn en 77 klasoj (po 27 gelernantoj en la klaso).

Elementaj lernejoj.

Kiom da elementaj lernejoj ekzistis en la lando dum la foriro de germanaj okupantoj, mankas la

sciigoj: laŭ la oficiala komuniko de tiu administra-
cio, saĝnas, ke estis en la lando 923 lernejoj.

En fino de 1918/19 instrua jaro en nur ne-
okupita Litovujo (en 26 distriktoj) estis 1036 ler-
nejoj kun 45 540 gelernantoj, el kiuj estis: 903 li-
tovaj, 49 hebreaj, 33 polaj, 37 germanaj, 11 latvaj
kaj 3 rusaj lernejoj. En tiuj lernejoj laboris 1232 ge-
instruistoj (627 viroj kaj 605 virinoj), el kiuj estis
621 kun cenzo kaj 611 sencenzaj personoj.

La 15an de Januaro de 1920 jaro estis 1173 ler-
nejoj, el kiuj 1059 litovaj, 55 hebreaj, 21 polaj,
25 germanaj, 10 latvaj, 1 blankrutena kaj 2 rusaj.
En la lernejoj lernis 71 648 gelernantoj. Laŭ la
religio estis: 63 630 katolikoj, 3214 protestantoj,
4435 pravoslavoj, 318 hebreoj kaj 51 de aliaj religioj.

Ĉe la elementaj lernejoj funkciis la 15an de Ja-
nuaro de 1920 jaro 345 vesperaj kursoj por plena-
ĝuloj. Tiujn kursojn vizitadis 8480 gelernantoj:
3867 junuloj kaj 4613 junulinoj.

Por ke ni povu tuj enkonduki la devigan ele-
mentan klerigadon, ni bezonas ankoraŭ 2298 ler-
nejojn kaj 4596 geinstruistojn (nur por la neoku-
pita parto de la lando). En elementaj lernejoj oni
instruas en gepatra lingvo sen diferenco de naci-
eco. La lernejojn subtenas la komunumoj kaj
privataj personoj kun helpo de la ŝtato, kiu pagas
la salajron al geinstruistoj.

Elementaj lernejoj estas kontrolataj kaj pri-
zorgataj de ministerio de publika klerigado per
ĝiaj inspektoroj, da kiuj nuntempe estas 25.

Geinstruistaj seminarioj.

La 1an de Januaro de 1920 jaro ekzistis 4 se-
minarioj por preparo de geinstruistoj por elementaj
kaj mezaj lernejoj. El tiu unu seminario (en Kaunas)
estas fondita de „Saule“ en 1907 jaro. En tiuj

lernejoj lernis 149 gelernantoj, ĉiuj litovoj kaj ilin instruis 39 geinstruistoj. La 1an de Januaro de 1921 jaro en ĉiuj 4 seminarioj estis 325 gelernantoj: 119 junuloj kaj 206 junulinoj, ĉiuj litovoj; ilin instruis 45 geinstruistoj: 15 kun universitata klerigo, 22 kun gimnazia aŭ malpli alta klerigo.

Estis granda manko de geinstruistoj. Kaj la estintaj instruistoj ne havis decan prepariĝon. Por forigi tiun mankon la ministerio aranĝas somerajn dugaradajn pedagogiajn kursojn: 1. por instruistoj, kiuj ankoraŭ ne havas instruistcenzon, kaj 2. por cenzaj instruistoj, kiuj deziras pliprofundigi siajn sciojn. En 1919 jaro estis por necenzuloj 8 kursoj, kiujn vizitis 763 personoj, por cenzuloj estis 1 kurso kun 243 aŭskultantoj. En 1920, 1921 kaj 1922 jaroj ankaŭ estis tiuspecaj kursoj. En 1922 jaro estis ankaŭ en Kaunas tiel nomataj pedagogiaj kursoj laŭ laborprincipo.

En 1919 jaro la ŝtato elpezis por klerigado 11 284 989 germ. markojn, en 1920 jaro 22 971 996 germ. mark., en 1921 jaro 38 895 745 germ. mark., en 1922 jaro pli ol 239 740 669 germ. mark. (Oni devas elspezi 75—80% de tuta ŝtata budĝeto por militistaro, kiu devas esti sufiĉe granda, ĉar la poloj senĉese nin minacas kaj okupis grandan parton de nia teritorio.

La 16an de Februaro en Kaunas oni malfermis litovan ŝtatan universiteton. La altlernejo havas 6 fakultatojn: teologian, filozofian, humanitaran, juran, matematikan — natursciencan, medicinan kaj teknikan.

La 1an de Aŭgusto la konstituanto akceptis konstitucion, kiu garantias la religian edukadon de junularo de tiuj gepatroj, kiuj mem estas religiemaj.

Jen la mallonga enhavo de tiu leĝo: la elementaraj lernejoj estas fondataj de ministerio de

publika klerigado, de komunumoj, de sociaj aŭ religiaj organizaĵoj kaj de apartaj civitanoj de Litovujo. Ĉiuj lernejoj troviĝas sub kontrolo de la ŝtato. La tuta lando dividiĝas en klerigadajn regionojn laŭ la limoj de la distriktoj.

Normala elementa lernejo estas de 4jara kurso kun 4 partoj kaj 2 klasoj. En lernejo estas instruataj: religio, gepatra lingvo, legado, skribado, aritmetiko, naturscienco, terkulturo, geografio, historio de Litovujo, grafiko, manlaboraĵoj, gimnastiko, ludoj, kantoj (ekleziaj kaj popolaj), higieno. La religion instrui povas tiu persono, kiu havas permeson de eklezia estraro.

Elementajn lernejojn la infanoj vizitas inter 9—14 jaroj. La instruistoj de elementaj lernejoj devas esti absolvintaj la ĝeinstruistan seminarion. La infanoj de instruistoj estas liberaj de pago por instruado en pli altaj lernejoj. Ĉe ĉiu lernejo oni organizas gepatran komitaton. La gepatroj havas rajton per $\frac{2}{3}$ da voĉoj postuli forigon de la instruisto, se li malbone plenumas siajn devojn.

La instruistoj estas leĝliberigitaj de milita devo.

Krom la preparolitaj lernejoj, ekzistas kelkaj specialaj: 4 — terkulturaj malsuperaj kaj 1 tiuspeca meza lernejo (ĉiuj ŝtataj), 1 mastruma lernejo por knabinoj (de societo de katolikaj virinoj), 1 teknika lernejo, 1 muzika lernejo.

En la jaro 1922 la nombro de ĝeinstruistaj seminarioj pligrandigis je 2, el kiuj unu estas virina, tenata de kultura societo de katolikaj virinoj.

Por kompari la klerigadstaton, kiu estis lastjare antaŭ la mondmilito, kun nuna ŝtato, ni havas jenajn datojn:

Antaŭ la milito en normala trankvila tempo en la tuta Litovujo estis 844 elementaj lernejoj kun 42, 384 ĝelernantoj kaj 28 pli altaj diversspecaj lernejoj

kun 5956 gelernantoj, kaj la 16an de Februaro de la jaro 1922 en nur neokupita Litovujo funkciis 1465 elementaj lernejoj kun 104032 gelernantoj kaj 53 pli altaj diversspecaj lernejoj kun 8448 gelernantoj. Ĉio ĉi tio estigis el nenio ĉe malbonegaj cirkonstancoj de nuna tempo.

Ne la tutan Litovujon mi ektuŝis parolante pri niaj klerigadaj aferoj. Ĉirkau triono de tuta etnografia Litovujo kun la ĉefurbo Vilnius estas katenigita de imperialista Polujo. En okupita parto de la respubliko la vivo de litovaj (kaj ankaŭ de blankrutenaj) lernejoj kaj entute la klerigadaj aferoj troviĝas en la stato, kiun iam estis doninta al ni la pendigisto Muravjov. Mi permesas al mi ĉi tie enmeti nur paron da karakterizaj ekzemploj. En la distrikta urbeto Seinai ekzistis du litovaj gimnazioj — por knaboj kaj knabinoj — kaj duklasa elementa lernejo (ankoraŭ tie estis 8 litovaj diversaj kulturaj societoj), en ĉirkaŭaĵo bele floris 8 elementaj litovaj lernejoj, kaj nun — sub la pola okupacio ne restis eĉ unu litova lernejo (la escepto estas unu rifuĝejo por infanoj). Jam kioma jaro pasas kaj la infanoj kreskas neklerigataj: la gepatra senĉesa petego ĉe la poloj helpas nenion. Kiam poloj la 23an de Aŭgusto de 1919 jaro per „Siberia“ maniero ekokupis Seinai, ili la duan tagon post la okupo forpelis la instruistojn kaj forbruligis la librojn. La skribanto de tiuj ĉi linioj, kiel litovo, estis malliberigita kaj savis sian vivon nur dank' al alveno de litova militistaro. Estas ridindega kaj ĉagrena fakto, kiun mi forgesos neniam: foje, kiam mi iris en komunan loĝejon de lernantoj, poloj arestis min sur la strato — nur pro tio, ke mi ne posedas polan lingvon! Post nelonge la poloj (katolika popolo!) forpelis el Seinai la tutan pastran seminarion (ĉar ĝi estas litova) kun

profesoroj trans demarkacian linion kaj poste devigis la episkopon Antanas Karosas forlasi sian sidejon en Seinai. La lando ĉirkaŭ Seinai estas pure litova; la komunumo kaj paroĥo Punkskas same. Ĝis nun la poloj ne permesas renovigi ĉe unu estintan lernejon. En Vilnius, ekzemple, la 1an de Oktobro de pasinta jaro per sangverŝo de litovaj infanoj la poloj eljetis la litovan gimnazion de „Rytas“ el ĝia domo, forprenis de litovoj la rifuĝdomon kaj orfejon. La plorantajn infanojn ili forpelis sur la straton. Kaj tiel plu. Kian krucvojon iras la litovaj lernejoj en teritorio de Vilnius, atestu la suba interesa dokumento (en traduko):

„Lerneja Inspektoro de Lida, la 16an de Oktobro de 1922 jaro, 3385. Al litova Klerigada societo Rytas.

Responde al Via skribo de 13. Oktobro de 1922 jaro, N 171, mi komunikas, ke por ricevi permeson malfermi privatan lernejon en Komaruncy, oni devas sendi petskribon al Kuratorio de Lerneja Distrikto en Bialystok pere de Lerneja Inspektoro kun jenaj aldonoj:

1. Statuto de institucio, aŭ de la organizajo, fondanta lernejon;
2. la atesto de lerneja aŭ distrikta kuracisto ke ejo, kie estos aranĝita lernejo, estas konforma al la postuloj de lerneja higieno;
3. statuto de lernejo;
4. programo de instruobjektoj;
5. Semajna plano de lecionoj kun montrado de tagoj kaj horoj, en kiuj apartaj objektoj kaj kiaj estos instruataj;
6. skriba deklaro, ke estos instruataj nur tiuj objektoj kaj en tiuj horoj, kiuj estos montritaj en programo kaj semajna plano de lecionoj;

7. promeso, ke pola lingvo, historio kaj geografio de Pulujo, ankaŭ aritmetiko kaj naturscienco estos instruataj pollingve en tia amplekso kaj dum tia nombro da horoj semajne, kiun antaŭvidas ministeria programo por publikaj lernejoj;

8. nomaro de instruistoj kun almeto de iliaj kvalifikoj;

9. atestoj pri ŝtata aparteno de instruantoj;

10. atesto, ke instruantoj de pola lingvo, historio kaj geografio de Polujo, ankaŭ de aritmetiko kaj naturscienco estas absolvintaj polan mezan lernejon.

11. provizora budĝeto;

12. promeso, ke ĉiumonate en montrita tago estos prezentataj al lerneja inspektoro raportoj pri la lernejaferoj.

Samtempe mi rimarkas, ke se lernejo estos malfermita sen permeso, mi estos devigita turni min al konformaj instancoj por ĝia fermo.

(Subskribo) J. Wojtowicz, Inspektoro de lernejoj.

Tre malmulte da litovaj instruistoj estis en Litovujo en la jaro 1904. Tamen, kiam nur iomete ekblovis la venteto de la nacia liberigo, tuj ili fondis en Vilnius geinstruistan unuiĝon. Sed baldaŭ, kiam komenciĝis la reakcio en Rusujo, tiu organizo povis nur kaŝe iomete vegetadi ĝis la mondmilito. Sed jam de la komenco mem montriĝis du direktoj: la junaj instruistoj estis revoluciemaj, dume la pli aĝaj preferis la vojon de evolucio. La unuaj kiel sian presorganon elektis la socialistan gazeton „Lietuvos Žinios“, kaj la duaj — la sciencjurnalon „Draugija“, redaktatan ĝis nun de nia bonekonata samideano prof. A. Dambrauskas.

En 1911 jaro estis fondita unuiĝo de litovaj katolikaj geinstruistoj en Kaunas. La unuiĝo agadis kaŝe. La mondmilito ĉesigis la agadon de

unuigo. Nur la 25 de majo 1918 ĉi tiu Unuigo estis legigita de okupacia estraro en Vilnius.

Ĉesis la milito, kaj komencis la forkurintaj instruistoj revenadi el Rusujo. Parto el la revenintoj aliĝis al Katolika Instruista Asocio, kaj la ceteraj, indiferentaj aŭ eĉ malamikaj al Kristanismo, fondis „Profesian Instruistan Asocion“, kiu penadas forigi la religiinstruon en lernejoj kaj la edukadon de junularo gvidi laŭ socialisma recepto.

Ilia presorgano estas „Mokykla ir gyvenimas“ (Lernejo kaj la vivo). La vera nombro da anoj de tiu ĉi Asocio ne estas konata. Verŝajne, ĝi estas cirka 800. Katolika Instruista Asocio la 25 de Junio 1922 havis 27 filiojn kun 750 geanoj: 352 viroj kaj 397 virinoj. Katolika I. Asocio jam de 1918 jaro havas sian de universitata profesoro Pr. Dovydaitis redaktatan ĵurnalon „Lietuvos Mokykla“ (La lernejo de Litovujo). Ĉiujare tiu asocio aranĝas konferencojn por instruistoj, pasintan jaron de ĝi estis aranĝitaj eĉ pedagogiaj kursoj en tri urboj. Nunan someron ankaŭ estas projektataj pedagogiaj kursoj. La estraro de Kat. Instruista Asocio konsistas el universitataj profesoroj Pr. Dovydaitis, J. Tamošaitis kaj la parlamentano-instruisto S. Tijunaitis.

Krome, ekzistas ankaŭ unuigo de hebreaj instruistoj.

Kaunas, 8. de Dezembro 1922.

Instruisto S. Tijunaitis.

La vera patriotismo kaj la formoj de ĝia esprimiĝo.

De Prof. D-ro St. Šalkauskas.

En la lasta tempo ĉiam pli ofte ni havas la okazon konstati, ke la refleksa ondo de agresiva naciismo ĉiam plifortiĝas. Nesatigeblaj apetitoj de militgajnintoj, la eraroj de bolŝevika internaciismo kaj la malfavoraj cirkonstancoj, kiuj kompromitis en okuloj de ne orientanta sin popolamaso la agadon de pacemaj homoj, — ĉio ĉi plifortigis la naciisman reakcion, kiu komencis eĉ revii pri diktaturo post kiam la faŝista entrepreno en Italujo estis sukceskronita. Al ago de plifortiganta agresiva naciismo estas simptome, ke ĝi facilanime malatentas la konstituciajn kaj parlamentajn garantiojn kaj penas subigi la malamikon per armiloj, kiuj ebligis al bolŝevikoj venkon en Rusujo. Sed ĝuste pro tio, ke la naciisma faŝismo, kiel ankaŭ la bolŝevika kosmopolitismo pekas kontraŭ principoj de demokrata ordo, al homo klarvide pensanta ne povas esti dubo, ke en niaj tempoj la sukceso de unoj aŭ de aliaj povas esti nek reala, nek longedaŭra, kaj ke unu kaj alia estos de historio kondamnita.

Kiel ĉie, tiel ankaŭ ĉe ni en Litovujo la faŝismo trovis iun eĉan respondon. Tiu ĉi fakto povas servi al ni kiel bona okazo por serioze ekmediti, ĉu ĉio estas en ordo en nia nacia vivo, kaj ĉu ekinterrilatinte kun tentoj de reala vivo ni scios, kiel agi kaj kiel kontraŭstari blindajn inklinojn de nacia temperamento. En tia tempo estas prudente

serioze ekinteresiĝi pri la principoj de vera patriotismo, por ke, konatiginte kun ili, ni povu konscie juĝi la elmontrojn de nia interna nacia vivo kaj fiksi decan direkton al nia nacia agado. Tial hodiaŭan nian interparolon mi dediĉos al klarigo de principoj de patriotismo, esperante, ke per tio mi helpos al nia socio eviti la agojn, kiuj makulus nacian nian konsciencon, ne parolante jam pri tio, ke ili farus nin partoprenantoj de malhonoraj entreprenoj de agresiva naciismo.

I.

La koncepto de naciismo estas firme ligita kun koncepto de nacio. Tial estas necese antaŭe diri kelkajn vortojn pri la lasta. La nacio, juĝante formale, estas homamaso, ligita per la formo de komuna kolektiva individueco. Certe, ĉiu socio tiel aŭ alie formas iaspecan kolektivon individuecon. Tamen, kiam oni parolas pri popolo, kies individuecon oni kutime nomas nacieco, tiam oni pensas pri plej alta kaj plej riĉa speco de kolektiva individueco, kiu memstare kaj naturnecese formiĝas ĉirkaŭ homa individuo, ĉar ĝi servas al li kiel neanstataŭebla rimedo, por ke li povu publike agadi. Nacia individueco estas kvazaŭ projekcio, kiun persona individueco desegnas en socia medio. La etnologia temperamento, lingvo, kutimoj, socia ordo, la okupata teritorio, ŝtato — ĉio ĉi povas formi signojn de nacia individueco; tamen la nacia individueco ne ĉesas esti tia, se al ĝi mankas unu aŭ alia el la nomitaj signoj. Ju malpli da naciaj signoj estas en nacia individueco, des malpli ĝi estas klare distingebla, simile kiel la homa individueco povas esti pli aŭ malpli klara kaj riĉa.

Kaj la patriotismo estas amo al sia nacia individueco. Tio, kio ĉe homa individuo estas ego-

ismo, tio ĉe nacio estas patriotismo, aŭ, alie dirite, patriotismo estas projekcio de persona egoismo, desegnita en socia ĉirkaŭo, aŭ ankoraŭ pli mal-longe — patriotismo estas nacia egoismo. Ĉiu egoismo per si mem pravigas la fakton de sia ekzisto. Tial de psikologoj estas ĝuste rimarkite, ke inter patriotismo kaj ĝia objekto ne ekzistas kaŭza rilato kaj rekta proporcio — la nacio estas amata ne tial, ke ĝi estas granda, bela kaj potenca, sed antaŭ ĉio tial, ke ĝi estas propra, aliafoje eĉ pro tio, ke ĝi estas malfeliĉa, ke ĝi estas suferigata, kaj eĉ iafaje pro tio, ke ĝi estas . . . ekspluatanta la aliajn. En la historio de nacioj ne multe estis da similaj popolstatoj, en kiu troviĝis nia popolo antaŭ sia nacia revekigo: ĝi apenaŭ portis sur siaj malfortigitaj ŝultroj la malfacilan historian sorton, ĝi estis jam ĉiurilate mortagonianta: ĝia nacia individueco, difektita kaj malfortigita de fremda influo kaj perforto povis sin laŭdi nek per nacia konscio, nek je sendependeco, nek je kulturo, nek je potenco. Kaj tamen malgraŭ ĉio ĉi troviĝis homoj, kiuj instigataj de patriotismo, komencis la gloran batalon pro la ekzisto de nacio, pro ĝia savo el agonistato, kaj por tiu ĉi ilia entrepreno sufiĉis du fundamentaj principoj de patriotismo: 1. ke ĉiu nacia individueco havas egalajn kun la aliaj rajtojn por ekzistado kaj 2. ke la unua natura leĝo de ĉiu individueco, do ankaŭ de nacia individueco, estas egoismo.

De patriotismo aŭ de amo al sia nacia individueco estas necese diferencii unuflanke la amon al patrujo en pli mallarĝa senco kaj de alia flanko ŝtatecan aŭ civitanan konscion. La amo al patrujo aŭ al sia naskolando povas esti ankaŭ ĉe homoj, kiuj apartmaniere ne amas la nacion, loĝantan en ilia naskolando. La amo al naskolando povas eĉ

kuniĝi kun loka konscia ŝtatemeco, sed per tio ĝi ne fariĝas ankoraŭ patriotismo. Ekzemple, poliĝinta litovo povas ami Litovujon kiel sian naskolandon kaj pro malkompreno nomi sin litova patrioto, dum liaj preferaj simpatioj kliniĝas al pola ŝtato kaj nacio. Aklimatiĝinta hebreo en Litovujo povas ami sian naskolandon Litovujon kaj esti bona civitano de litova ŝtato, kaj samtempe lia nacia patriotismo ligas lin kun hebrea nacia individueco. Litovo, loĝanta en Litovujo, en unu sola sento de plena patriotismo kunigas la amon al naskolando, civitanecon kaj amon al sia nacia individueco. En la unua okazo la fundamento de komuneco estas amo al naskolando, en la dua okazo — amo al sia lando kaj ŝtato, kaj en la tria okazo — amo al sia lando, ŝtato kaj nacio. Nur tre vaste komprenante la signifon de patriotismo oni povas paroli pri ĝi en la unuaj du okazoj; laŭ vera ĝia senco, patriotismo elmontriĝas nur en la tria okazo.

Do, laŭesence, patriotismo estas amo al sia nacia individueco. La amo estas gentkoncepto, al kiu patriotismo rilatas kiel speco, kaj kies proprecojn ĝi entenas en sia naturo. Kaj dume kiom da miskomprenoj estas ligata kun ĉi tiu vorto! Kiom da plej diversaj ofte radikale kontraŭdiraj elmontroj de homa animo estas pravigataj per plivastigita tiu kompreno! eĉ kiom da kriinoj estas senkulpigataj je ĝia nomo! Kaj ĉio ĉi okazas tial, ke kutime homoj konsideras amon kiel laŭdinda virto eĉ tiam, kiam ĝi fariĝas karikaturo. Por ekzemplo prenu ni amon de patrino al ŝiaj infanoj. Ĉu malofte oni havas la okazon vidi, kiel ĉi tiu sento de sinofero fariĝas blinda instinkto, nea flanko de patrino, havanta por infanoj tre nedezirindajn sekvojn? Kaj tio, kio iafaĝe estas nomata amo de patrino,

pli similas ĝian egoismon, ekiganta en infanoj similan egoismon kaj blindajn instinktojn. Tial tute ĝuste diris unu svisa pedagogo (E. Dévaud), ke ekzistas amo, kiu pereigas, kaj ekzistas amo suferanta kaj potenca, kiu savas. Ĉi tiu diro estas aplikebla ankaŭ al tiu amo de nacia individueco, kiun ni nomas patriotismo. Sufiĉas iom enigardi en historion de popoloj per kritika okulo por konvinkigi, ke flanke de patriotismo, kiu savas, ekzistas patriotismo, kiu pereigas. Se la unua estas vera patriotismo, la dua estas ĝia malbona karikaturo. En kio do konsistas la diferenco inter vera kaj ne vera patriotismo?

Montriĝas, ke en nacieca amo, kiel ankaŭ en ĉiu alia speco de amo, troviĝas elemento, kiun oni povas nomi deziro de grandeco. Kiam oni amas ion-ajn, oni tute certe deziras, ke la objekto de amo estu bona, bela, nobla, unuvorte, ke ĝi estu granda. La deziro tutplene pravigebla, ĉar se ĝi malaperus, la amo fariĝus instinkto. Kiam amo estas bazita sur la deziro de grandeco je la montrita senco, en la amata objekto oni amas antaŭ ĉio tion, kio faras ĝian idealan tipon, aliadire, la objekto estas amata ne tia, kia ĝi vere estas, sed tia, kia ĝi devas esti. Nur tian amon oni povas prudente defendi des pli, ke ĝi laŭesence jam estas faktoro de perfektigado.

Se patriotismo estas ligita kun bone komprenita deziro de grandeco al sia nacio, ĝi altigas kaj vivigas ĝin. Se ĝi estas ligata kun malbone komprenita deziro de grandeco al sia nacio, tiam ĝi malaltigas kaj pereigas ĝin. La grandeco estas malbone komprenata tiam, kiam ĝi estas konceptata kiel deziro de materia kaj fizika potenco, plivastigata senlime kaj senrajte. La materia potenco de nacio havas siajn rajtajn limojn kiel internajn,

tiel ankaŭ eksterajn: de unu flanko la materia nacia potenco ne devas senproporcie pliigi kompare kun la pli alta kulturo de nacio kaj malhelpi la normalan evoluon de la lasta; de alia flanko ĝi ne rajtas plivastigante malutili la materiajn, politikajn kaj kulturajn rajtojn de aliaj popoloj. Dume la historio de popoloj atestas, ke tiuj, kiuj sin nomis patriotoj, plej ofte kaj antaŭ ĉio deziris por sia nacio materialan potencon kaj tiun potencon ili disvastigadis per ĉiuj rajtaj kaj malrajtaj rimedoj. Ĉi tie ni trovas la fonton de imperialismo, ĉi tie estas ankaŭ la fonto de tiuj homaraj malfeliĉoj, kiuj kreskas laŭ tio, kiel kreskas la potenco de nacioj. Kaj ĉi ĉiuj naciistoj, ŝovinistoj, imperialistoj, kiuj volus monopoligi al si la nomon de patriotismo, en vereco estas ekzekutistoj ne nur de homaro, sed ankaŭ de sia nacio kaj ĝin pereigas pli frue, ol venas malamikoj de ekstere kaj enpikas en la koron de popolo la materialan glavon.

Tial la vera deziro de grandeco al sia nacio devas rilati ne ĝian eksteran potencon, kiu havas rajtajn limojn, sed ĝian internan valoron, kiu povas esti senlime pligrandigata, perfektigata. Tial, se patriotismo, kiel dirite, ne estas en rekta proporcio kun materia aŭ ia alia aktuala nacia grandeco, ĝi devas esti en tia proporcio kun deziro por sia nacio de virta kaj kultura grandeco. Aristotelo diris, ke beleco ekzistas nur en granda objekto. Kun sama rajto oni povas diri, — kaj mi pensas, ke nur tiel komprenis sian aserton Aristotelo mem, — ke nur bela objekto povas esti vere granda. La samo estas aplikebla al la virta grandeco. La materia grandeco, kiu laŭesence jam estas limigita, povas kaŝi en si putradon kaj ruinojn; la morala grandeco, eĉ kiam ĝi estas subpremata de perfortrimedoj, ne havas limojn por vera evoluo

kaj libere regas la homajn korojn senkonsidere je limoj de tempo kaj spaco. Deziri tian grandecon al sia nacio estas la unua devo de vera patriotismo; kaj la patriotismo, kiu ĉesis esti instiganto je perfektigado kaj progreso de sia nacio, estas kvazaŭ malviva branĉo, ne donanta pli fruktojn.

El la supre dirita oni povis jam rimarki, ke patriotismo havas rilaton tiom al formo de nacieco, kiom al ĝia enhavo. Kiam oni diras, ke patriotismo estas amo al sia nacia individueco, oni per tio substrekas la formalan flankon de patriotismo; kaj kiam oni diras, ke vera patriotismo estas bazita sur bone komprenita deziro de grandeco al sia nacio, tiam oni atentigas la esencan enhavon de patriotismo. Se ni prenos iun-ajn vivan nacion, tiam ni vidos, ke plenan ĝian naciecon formas kiom individua kolektiva vivoformo, tiom ankaŭ la enhavo, kiu plenigas tiun formon. Formo sen enhavo efektive estas nur malpleno; la enhavo sen formo — abstrakcio, havanta nenion komunan kun vera vivo. Nur kunligo de ili ambaŭ en formo de viva nacio formas tion, kion ni nomas plena nacieco.

Ne malfacile estas rimarki en kultura historio, ke dum progresado de nacia kulturo la enhavo de nacieco fariĝas ĉiam pli universala laŭgrade kiom ĝiaj formoj fariĝas ĉiam pli individuaj. La kultura nacia progreso per sia direkto montras, ke plena nacieco devas akordigi plenan individuecon de formo kiu plena universaleco de enhavo. Tial la plej grandaj geniuloj de homaro, kiuj ĉiam estas antaŭen puŝantoj la kulturon de nacioj, kunigas en sia kreado la individuan nacian formon kun la universala enhavo de homa spirito. Homero, Plato, Ŝekspiro, Goete, Dostojevski kaj ĉiuj aliaj geniuloj de homaro montriĝas al la mondo per iu lingvo,

iu nacia temperamento, iuj moroj, en difinitaj cir-
konstancoj, unuvorte — en certa nacia formo, kiu
ricevas en ili konkretan vivoformon. Sed tio, kio
estas en ili komunehoma kaj eterna, ĝi estas tiu
plej profunda enhavo de ilia kreaĵo, kiu, estante
vere homa samtempe estas ankaŭ vere universala.
Sen nacia individueco al geniulo ekmankus pul-
sobato de vivo; sen universala enhavo geniulo
perdus la veran vastecon de homa spirito. Jen
kial kosmopolito, kiu ŝatas nur enhavon de nacia
spirito kaj ne agnoskas decajn rajtojn al nacia
individueco, estas senkolora homo, neformanta
tipon de viva persono; dume naciisto, konsideranta
la nacian formon pli alta ol enhavo, kutime estas
supraja kaj malvastvida individuo, ne kapabla vidi
preter la nacia formo la neceson de universala
enhavo.

Tial, la trian fundamentan econ de vera patrio-
tismo formas la kunigo de individua nacia formo
kun la universala enhavo. Ne malfacile estas ri-
marki, ke ĉi tiu tria eco de patriotismo memkom-
preneble sekvas el deziro al sia nacio de vera
grandeco. La vera grandeco kiel de homo, tiel
ankaŭ de nacio iĝas ne el materia formo, kiu ĉiam
estas limita, sed el spirita enhavo, kiu ĉiam estas
nelimita. Kvankam la limita formo servas al en-
havo kiel elmontriĝilo, tamen ĝi ne limigas la
enhavon, ĉar inter la enhavo kaj formo, kiel inter
ideo kaj signo, ne ekzistas kvanta proporcio.
Prenu ni, ekzemple, la ideon de amo. Tiu ĉi ideo
perskribe montriĝas per tri literoj, parole — per
tri sonoj. Dume, la enhavo de tiu ideo neniam-
niere estas limigata per tiuj tri literoj aŭ sonoj.
La enhavo de amo kaj ĝia ekfloro en homa spirito
povas esti same vasta, kiel la homa spirito mem.
Inter enhavo de amo kaj la vorto amo kiel ni

vidas ekzistas nenia kvanta proporcio tial, ke inter ili estas nur simbola rilato, pere de kiu ni laŭkonsente kunligas ideon kaj vorton. En litova lingvo simbola signo de amo estas vorto „meilė“, en germana lingvo tia simbola signo estas vorto „Liebe“, en franca lingvo — vorto „l'amour“ k. t. p. Ĉie kun individueco de formo estas kunigata la sama enhavo de amideo, kiu abstrahita de konkretaj cirkonstancoj havas universalan sencon.

Kio ĉi supre estas dirita sole pri la vorto amo, tio havas komunan signifon por ĉiuj formoj de individua nacia ekzisto. La nacieca formo estas nur signo, per kiu devas elmontriĝi la universaleco de homa spirito, kaj kiel tia la individua nacieca formo ne estas memcelo, sed nur ilo por esprimiĝo de universala enhavo en popolvivo. Tial, se oni faras al si la programon de nacia agado starigante al si naciecon kiel celon kaj ne kunigas ĝin kun pozitiva vivenhavo, tiam sciu ni, ke antaŭ ni ni havas suprajajn kaj malvastvidajn kreitaĵojn, nomatajn naciistoj. Sufiĉas rememori rusan „ligon de rusa popolo“, polan „nacion demokration“, germanajn „Deutschnationale“, aŭ niajn ankoraŭ ne informiĝintajn kelkajn grupojn, por vidi, ke nacieco estas komprenata kiel celo, kaj ne kiel ilo. Tiel komprenata nacieco kondukas homojn al tiu senhomiĝo, tiu senenhavo, kiu estas propreca al naciistoj. Dume vasta programo de nacia agado, bazita sur vera patriotismo, ĉiam devas kunigi individuajn naciajn formojn kun universala enhavo de homa spirito, kiel signon kun ideo, ilon kun celo. Nur tia kompreno de nacieco povas gardi patriotismon de degeneriĝo en naciismon.

Do, al mi ŝajnas, ke mi trovis tri fundamentajn ecojn de patriotismo: 1. prudenta amo al sia nacia individueco, 2. deziro de morala grandeco al sia

nacio, 3. kunligo de individua nacia formo kun universala enhavo. Kunigante ĉiujn ĉi supre nomitajn fundamentajn ecojn oni povas diri, ke vera patriotismo estas amo al sia nacia individueco, bazita sur deziro al sia nacio de morala grandeco, estiĝanta en universala enhavo de homa spirito kaj esprimiĝanta en individua nacieca formo.

II.

Post klarigo, kio estas vera patriotismo, mi devas nun montri, kiamaniere ĝi devas esprimiĝi. Aperas tuta serio da demandoj, kiujn mi devos laŭvice pritrakti: unue, kiamaniere elmontriĝas vera patriotismo en aparta nacio rilate al li mem? due, kiel ĝi elmontriĝas en agado de patrioto rilate al nacio? trie, kiun rilaton starigas vera patriotismo inter apartaj popoloj, kaj, kvare, kiel ĝi ordigas la rilatojn de aparta homo al tuta homaro?

Konsiderante koncepton de vera patriotismo facile estas diveni, ke ĝi devas esti kiel al aparta patrioto, tiel ankaŭ al patriote amata nacio faktoro de perfektigado kaj de kultura progreso. Kiel jam supre estas dirita, vera patriotismo ne estas disigebla de bone komprenita deziro de grandeco al sia nacio; kaj ĉi tiu grandeco, kiel ni scias, eliĝas el universala enhavo de nacieco, kiu elmontras la homan indecon de nacio. Ĉi tie povas aperi la demando, kiu efektive estas portanto kaj efektiviĝanto de ĉi tiu homa indeco. La nacio, kvankam nomata kolektiva individuo, efektive havas nur ŝajnon de reala individuo. Efektive la nacion formas sumo de rilatoj inter apartaj homoj, kaj tiu sumo estas nomata socia medio, en kiu aparta homo trovas por sia individueco alplenigon kaj elmontriĝregionon. Vere, en sociologio oni provis defendi teorion, laŭ kiu nacio estas viva organismo.

Tamen ĝis nun neniu sukcesis pruvi ĉi tiun teorion per nerefuteblaj argumentoj. Ĉiam ankoraŭ restas la fakto, ke reala kaj viva bazo de nacia kiel ankaŭ de ĉiu alia kolektiva vivoformo estas viva homa persono, kaj nur la interrilatoj de apartaj personoj estigas tion, kion ni kutimas nomi kolektivaj organismoj.

Do, se oni diras, ke vera patriotismo devas esti bazita sur deziro al sia nacio de morala grandeco, elfluanta el universala indeco de homa spirito, ĉu per tio ne estas memkompreneble, ke tiu alcelado al vera grandeco antaŭ ĉio devas esprimiĝi en patrioto mem kiel nefleksebla decidemo perfektigi kaj per sia persono servi kiel reala materialo por konstrui la palacon de nacia indeco? — Amor bene ordinatus incipit a se ipso, diras la moralistoj: „Bone ordigita amo komencas de si mem.“ Sed, se amo komencas de si mem, tiam homo devas apliki antaŭ ĉio el amo elfluantajn devojn al si mem. Vere ami sin mem signifas antaŭ ĉio ami idealan sian tipon kaj peni ĝin realigi en sia vivo. Se ni amas nin tiaj, kiaj ni fakte estas, tiam vere nia amo estas plej simpla egoismo. Simile estas ankaŭ kun patriotismo: se vera patriotismo postulas deziro al sia nacio moralan grandecon, tiam tiu deziro devigas la patrioton mem peni afektivigi en sia persono kaj sia agado la deziratan moralan grandecon. Homo, stariganta tiun postulon al sia nacio kaj siaj nacioj, kaj ne aplikanta ĝin antaŭ ĉio al si mem, ne estas vera patrioto. Se multaj homoj, kiu nun tiom fanfaronas pri sia patriotismo, sciis ĉi tiun regulon de patriotism-elmontro, ili devus multe pli humile paroli pri ĉi tiu socia virto! Laŭ montrita ĉi supre senco, la devoj de patriotismo koincidas kun virtodevoj de persono, kaj tial paroli pri sia patriotismo decas same singarde, kiel pri

siaj virtoj, ĉar vera patriotismo montriĝas per faroj, sed ne per sekaj vortoj aŭ vantaj fanfaronadoj.

Vera patriotismo, kiel dirite, estas faktoro de perfektigado kaj de kultura progresado kiel por aparta homo, tiel ankaŭ por tuta popolo. Kompreneble, ankaŭ nunfoje la faktoro de perfektigado kaj de kultura progreso povas elmontriĝi nur per apartaj membroj de nacio. Sed, se antaŭe ni konsideris la personan flankon de agado de nacioj, nun ni konsideros ĝin de publika aŭ socia vidpunkto. La signifo de patriotismo al nacio en vereco dependas de tio, kiel ĝi elmontriĝas en nacia civiliza kreado. Celkonscia patrioto povas havi gvidantan signifon por pli alta intelekta kulturo, kiu nur kune kun simplpopola kulturo formas nacian civilizacion. Simlpopola kulturo kiel kolektiva kreaĵo, kreas originmaniere plej individuan naciecan formon. Tiamaniere formiĝas ekzemple nacia lingvo. Pli alta intelekta kulturo, kiel kreaĵo de inteligentularo, kreas per konsciaj penadoj de apartaj personoj ĉefe la universalan enhavon de nacieco. Tiamaniere estas kreitaj la grandaj verkoj de naciaj geniuloj, kiuj ĉiam restos monumentoj de universala homa spirito. Kaj jen, vera patriotismo, akordiganta individuan nacian formon kun universala enhavo, montriĝas enhavanta en si principojn de demokratismo kaj progreso. El ĵus dirita estas facile vidi, ke kreiĝo de nacia civilizacio laŭesence estas demokrata fariĝo, ĉar ĝi postulas kunagadon de simpla popolo kaj de inteligentularo: la kolektiva popla kreado kaj individua kreado de kleruloj kuniĝas per solidara celo estigi plene nacian civilizacion, ampleksantan simplpopolan kaj klerulan kulturon. Tiamaniere, nacia civilizacio estas tiu ebena, kie devas montriĝi demokratemo de popolo kaj solidareco de kolektivaj kaj individuaj penadoj.

Eble nenie tiel klare elmontriĝis la demokrateco de vera patriotismo, kiel ĝi okazis ĉe nacia vekigo de litovoj. Se en historio de Litovujo la malaperado de litova nacieco estis sekvo de aristokratiigo, la kontraŭa procedo — demokratiigo alportis al Litovujo nacian revekigon. Tio signifas, ke demokratismo, kiel sintezo de kolektivismo kaj individuismo, kaj la vera patriotismo estas laŭesence ligitaj unu kun alia.

Facile estas konvinkiĝi, ke simila interligo estas ankaŭ inter patriotismo kaj progreso. La amo al nacieco, kiel dirite, kunigas individuan nacian formon kun universala enhavo, kiu montras indecon de nacio. Difinita nacieca formo, t. e. lingvo, nacia temperamento, socia ordo, moroj k. t. p. palpeble montras, kio estis kaj ankoraŭ estas en nacia vivo. La enhavo de nacieco, kiel ne limita kaj tial neniam precize difinebla, estas objekto, pri kiu oni devas juĝi laŭ tio, kia ĝi devas esti. Ami sole la naciecan formon signifas kune kun naciistoj fari el ĝi idolon. Ami sole naciecan enhavon signifas kune kun kosmopolitoj platone estimi abstrahitan de reala vivo ideon. Dume efektive en patriotismo ni devas kunigi amon al individua nacieca formo kun amo al universala enhavo de nacieco. Amante la individuan naciecan formon ni antaŭ ĉio amas tion, kio jam estis, kiel nia pasinto, kaj eble ne malplia tion, kio ankoraŭ estas — nian estanton. Amante la enhavon de nacia spirito, ni amas antaŭ ĉio tion, kio devas esti, tio estas nian estonton, kiu devas esti direktata al idealo. Naciisto, kiu antaŭ ĉio amas nacian formon, plej multe amas tion, kio estis kaj kio ankoraŭ estas, kaj tial esence estas konservativulo. Kosmopolito, kiu amas nur abstrahitan de nacia vivo enhavon, amas plej multe tion, kio devas esti, sed neligante estonton kun pasinto

li emas iri revolucian vojon de progreso. Vera patriotismo akordigas ĉi tiujn ekstremajn inklinojn, kunligante la pozitivajn tradiciojn de pasinto kun firma decido nedeflankigante iri la vojon de konsekvenca kaj reala progreso al pleneca idealo.

Verdire, la progreso memkompreneble elfluas el deziro de morala grandeco al sia popolo, kaj sur tiu deziro, kiel ni vidis, estas bazita vera patriotismo. Tial vera amo al sia nacio ne lasas trankviliĝi vidante en sia popolo malperfektojn kaj moralajn mankojn, kaj kontentigi per tio, kio jam estas en ĝia vivo; tiu amo igas batali kontraŭ malfortecoj kaj malbonaj inklinoj de sia popolo ĝin eduki kaj eĉ akre riproĉi, se ĝiaj deflankiĝoj forkondukas ĝin de vera progresvojo.

Ankoraŭ unu taskon havas vera patrioto rilate al sia nacio: li devas zorgi pri efektivigo de alvoko de sia popolo. Ĉiun nacion oni povas senlime perfektigadi, ĉar la spiritaĵoj de nacio ne estas limitaj. Tamen nacia inklino, geografia situacio, procedo de nacia historio estigas specialajn emojn, kiuj faciligas realigon de konvenaj eblecoj. Speciala inklino aŭ direktiĝo de nacia kulturo estas alvoko aŭ destino de iu nacio, kaj tiun destinion oni devas antaŭ ĉio efektivigadi per patriotaj penadoj, alceladi ĝin kiel idealan tipon de iu nacio. La efektivigado de nacia alvoko formas fundamentan taskon de nacia kultura progreso. Ekzemple, litova nacio havas sian nacian destinion aŭ taskon, kiu dependas de ĝia nacia orienta temperamento, geografia situacio inter Oriento kaj Okcidento de Eŭropo, kaj ĝia specifa historio, kie intermiksiĝis civilizacio de du mondoj. Hodiaŭ mi ne povas pli vaste pritrakti tiun demandon, ĉar ĝi eliras el limoj de mia temo; ĉi tie nur okaze mi devas konstati la fakton, kiun pli vaste mi klarigis en alia loko,

ke laŭ menciitaj cirkonstancoj de nia nacia vivo, la tasko de nia nacio estas akordigi en harmonia sintezo en formoj de nia nacia individueco la civilizacion de du mondoj, de Oriento kaj Okcidento. Belgujo kaj Svisujo simile estas destinitaj fari sintezon de romana kaj germana civilizacio. Nia destino estas per tio eksterordinara, ke ni devas ampleksi en nacia sintezo kulturon ne de du rivalizantaj popoloj, sed tiun de du mondoj, de Oriento kaj Okcidento. Alceladi ĉi tiun sintezon en limoj de nacia pleneca civilizacio estas tasko de nia popolo. La tasko estas granda, ĉar la idealo estas alta, eble neniam tute atingebla. Sed ĝuste pro tio ĝi estas por nia nacio vera idealo, ĉar atingita idealo, kiel oni diras, estas perdita idealo. Jen kiel estas difinata la tasko de nia nacio en socio de aliaj popoloj; samtempe al ĝi estas metata alta celo kaj al ĉiu patrioto — morala devo celkonscie efektivigadi ĉi tiun taskon en sia kultura kreado.

La tria demando, nome, kian rilaton devas starigi vera patriotismo inter apartaj nacioj, estigas kaj ĉiam ankoraŭ estigas multajn miskomprenojn. Paroli ĉi tie pri devoj de vera patriotismo en nuna tempo de ekscititaj naciaj sentoj signifas paroli pri objektoj, nekompreneblaj al plimulto da homoj. Kaj efektive, ĉu malofte renkontas ekmiregon la aserto, ke vera patrioto devas ami ĉiujn aliajn popolojn kiel la sian? Tamen mi decidiĝis ankaŭ pluen defendi tiel definitan devon kaj pruvadi, ke ĝi koincidas kun tio, kio estis pli supre dirita pri vera patriotismo, kaj ke moralo povas pravigi nur tian interrilaton de popoloj. Antaŭ ĉio ni rememoru, ke nacio estas kolektiva individuo, havanta tre signifajn analogiojn kun aparta individuo. Nacieco estas por nacio tio, kio individueco por individuo, aŭ personeco por persono, kaj eĉ kolektiva

individueco de nacio estas nenio alia, ol evoluo de persona individueco aŭ disetendiĝo en socia medio. Plue, ni vidis, ke tio, kio por persono estas egoismo, por nacio ĝi estas patriotismo. Vera amo estas amo al sia ideala tipo, kunigita kun devo realigadi ĝin en sia vivo kaj konduto. Simile vera patriotismo estas amo al ideala tipo de sia nacio, kunigita kun devo ĉi tiun tipon realigi en nacia vivo kaj agado. Farinte ankoraŭ unu paŝon en disvolvado de analogioj, ni ricevos la saman normon por interrilatoj de unu flanko inter apartaj homoj, kaj de alia flanko — inter apartaj nacioj. Estas klare, ke ĉiuj apartaj individuoj de la sama speco havas samajn rajtojn. Tiel, ĉiu persono estas esprimanto de universala enhavo de homa spirito kaj kiel tia havas egalajn kun ĉiu alia persono moralajn rajtojn. El ĉi tio sekvas por ĉiu persono la morala devo ami sian proksimulon kiel sin mem. Simile, ĉiu nacieco estas kolektiva individueco, esprimanta specifmaniere la universalan enhavon de homaro kaj tial ĝi havas egalajn moralajn rajtojn kun ĉiu alia nacia individueco. Do, el tio sekvas por ĉiu patrioto la morala devo ami ĉiujn ceterajn popolojn kiel la sian.

La dirita devo ami ĉiujn aliajn popolojn certe ankoraŭ ne signifas, ke patrioto de unu nacio devas esti samtempe patrioto de ĉiuj aliaj nacioj. Patriotismo, kiel dirite, estas ekskluziva amo al sia nacio, ĝi estas specifika prefero, simile kiel egoismo estas ekskluziva amo al si mem. Kiam estas dirata, ke homo devas ami sian proksimulon, kiel sin mem, aŭ patrioto devas ami aliajn naciojn kiel la sian, oni ĝin diras ne pri fakta aŭ psikologia, sed nur morala egaleco. Jen kion diras pri ĉi tiu objekto Vladimiro Solovjov, unu el la plej grandaj defendantoj de la parolata principa decidiĝo: „La postulo

ami aliajn naciecojn kiel la sian signifas ne psikologian samecon de sento, sed moralan egalecon de vola rilato: mi devas tiel same deziri veran bonon al aliaj nacioj, kiel al sia; ĉi tiu „amo de bondeziro“ estas egala jam tial, ke vera bono estas unika kaj ne dividebla. Komprenoble, ĉi tiu morala amo estas kunigita kun psikologia kompreno kaj ŝato de pozitivaj ecoj de ĉiuj aliaj nacioj: dank' al bona volo venkinte la neprudentan kaj obskuran nacian malamon, ni kapablas ekkoni kaj ĝui fremdajn naciecojn kaj ili komencas al ni plaĉi. Tamen, ĉi tiu „plaĉo-amo“ ne povas esti egala al tiu, kiun ni sentas rilate al nia nacio, simile kiel la plej pura amo al proksimulo, kiu laŭ ordono de Evangelio devas esti laŭ morala vidpunkto egala je amo al si mem, neniam povas esti egala laŭ psikologia vidpunkto. Mi mem, kiel ankaŭ mia nacio jam per tio havas avantaĝon, ke ni estas la elirpunkto. Foriginte ĉi tiun miskomprenon, finas Solovjov, per si mem foriĝas ĉiuj seriozaj kontraŭdiroj, kiujn oni povus kontraŭstarigi al nia principo: „Amu ĉiujn aliajn popolojn, kiel la sian“. (Vl. S. Solovjov, Verkaro St. P. ²VIII, 330—331.)

Estas memkompreneble, ke la devo ami aliajn popolojn kiel la sian estas tute akordigebla kun natura rajto defendi la individuecon de sia nacio kaj ĝiajn rajtajn postulojn per ĉiuj rajtaj rimedoj. La krimo kontraŭ la devo ami aliajn popolojn, kiu en lastaj tempoj estigis grandegajn katastrofojn, estas konata sub la nomo de imperialismo. Devo de ĉiu vera patrioto estas kontraŭbatali imperialismon egale ĉu de sia, aŭ de fremda nacio. Sed, komprenoble, ĉi tiu rajta batalo neniam povas pravigi la malamon al fremdaj, eĉ malamikaj popoloj. Eĉ oni devas ami nacion, kun kiu nia nacio militas

pro sindefendo, ami kiel la sian, tio estas ami ĝian idealan tipon kaj deziri por ĝi tiun moralan grandecon, kiu efektivas ĝian idealan tipon. Sed rekte la imperialismo de tiu nacio estas tiu nea faktoro, kiu malebligas al ĝia ideala tipo realiĝi kaj kiun oni devas kontraŭbatali kiom pro defendo de sia nacio, tiom pro ekkonsciigo de la koncerna agresiva nacio. Por ekzemplo prenu ni Polujon, de kies imperialismo multe ni devas suferi dum la tuta tempo de nia antaŭ ne longe akirita sendependeco. En historia sia pasinto Polujo vivis kaj disvolvigadis parte je konto de tiuj nacioj, kiuj vole aŭ nevole venis en politikan kaj kulturalan ĝian influferon. Tiaj estis litovoj, ukrainoj, blankrutenoj kaj aliaj. Superaj klasoj de ĉi tiuj popoloj forte poliĝis kaj donis al pola nacio multe da kulturaj servoj, ne atentante rajtajn devojn rilate al sia nacio. Ŝajnas, tiu cirkonstanco, ke unu nacio ricevas de alia nacio profiton kun malutilo al nacia individueco de la lasta, povas estigi por la unua neniujn rajtojn nek je la apartaj teritoripartoj, nek je limigo de fremda suvereneco. Tamen, rekirinte sian sendependecon la pola nacio ne volis ĉi tion kompreni, kaj la faktajn historiajn rilatojn konsideris jura fundamento por efektivigadi siajn imperialistajn ekdezirojn. Dume, komencante sian novan ŝtatan vivon Polujo povis suriri alian disvolvigvojon: ĝi povis rekoni plenrajton de sendependa vivo al ĉiuj estintaj subigitaj de Rusujo popoloj kaj ne malhelpi al ili ĉiuj solidare krei kaj firmigi sendependajn ŝtatojn. Ĝi devis nur kompreni kaj praktike apliki tion, ke kultura influo je fremda ŝtato ankoraŭ ne estigas la rajton regi tiun nacion. Polujo ne kapablis ĉi tion kompreni: la hieraŭa sklavino Polujo fariĝis hodiaŭa vipanto de aliaj popoloj kaj per tiu denove por longa tempo

venenis interuaciajn rilatojn en orienta Eŭropo. Laŭ mia profunda konvinkigo la estonta historiisto devos konstati, ke pola imperialismo, kvankam militinta kontraŭ bolŝevikoj, tamen helpis al disvolvigo de bolŝevismo, kiu interalie estas elementa reakcio kontraŭ nacia imperialismo; kaj oni devas opini, ke tuta nuntempa situacio en orienta Eŭropo estus tute alia, se poloj estus suririntaj la supremontritan dezirindan vojon. Aliaflanke, oni ne bezonas esti profeto por jam nun antaŭvidi malĝojan estontan sorton de poloj: nacio, kiu ne nur ne ekhavis ĉirkaŭ si fortajn najbarajn amikojn, sed kiu per sia imperialismo ĝis ostocerbo ofendis kaj dolorigis preskaŭ ĉiujn najbarajn popolojn, ĝi ne povas ne ĝisatendi sian historian Nemezidon. Vidante, kiel super ĝia kapo etendas al si amike, kaj al Polujo minace, la manojn germanoj kaj rusoj, oni ne povas dubi, ke Polujo devos rezigni ne nur je tio, kion ĝi maljuste alproprigis, sed ankaŭ je tio, kio rajte al ĝi apartenas. Unuvorte, Polujo nehaltigeble iras al katastrofo. Mi ĉi tie ne konjektados pri speco kaj amplekso de katastrofo, — mi konstatas nur ĝian neprecon. Ĉu ni, estante veraj patriotoj, povos ĝoji, kiam ĉi tiu katastrofo estos efektiviĝinta fakto? Kompreneble, ne povos. Kiel nun ni devas bedaŭri, ke pola nacio deflankiĝis de sia ideala tipo, tiel tiam ni devos bedaŭri, ke al ĝiaj veraj rajtoj estas farita malutilo, des pli, ke deflankigo de pola nacio de ĝia vera vojo estas danĝera por ni pro tio, ke ili atakas nin; same malutilo al iliaj veraj rajtoj flanke de iu alia nacio minacos ankaŭ nin. Ĉi tiu ekzemplo montras al ni, ke bone komprenitaj interesoj de ĉiuj nacioj estas solidaraj kaj ke amo al ĉiuj aliaj nacioj estas akordiĝebla kun vera patriotismo eĉ tiam, kiam ni estas en militstato kun ili.

En ĉi tiu loko ne estos senbezone pritrakti iom la demandon pri naciaj malplimultoj, kiu en nia tempo estas precipe aktuala. La naciajn malplimultojn konsistigas tiuj personoj, kiuj estante daŭraj leĝantoj de iu ŝtato kaj ĝiaj civitanoj, tamen ne apartenas al nacio, konsistiganta la plimulton de ŝtata leĝantaro. Pri naciaj malplimultoj oni ne povas paroli en ŝtatoj, kiuj laŭnature ne havas nacian karakteron, ĉar en ili ne estas iu ĉefa, fundamenta nacio. Tiaj ŝtatoj iaforte estas nomataj „miksitaj patrujoj“, kies plej pura ekzemplo povas servi Svisujo. En Litovujo, al kiu nacian karakteron donas litova nacio, al malplimultoj apartenas hebreoj kaj poloj aŭ, pli ĝuste, poliĝintaj litovoj. Pliakriĝintaj rilatoj inter litovoj kaj ĉi tiuj grupoj en la lasta tempo aktualigis ĉe ni la demandon pri la malplimultoj. Kiel devas solvi por si tiun problemon vera patrioto?

Nacieco, kiel ni vidis, estas publika elmontrig-formo de individuo, kaj tial, se ni estimas la homan individuon, ni devas ankaŭ estimi lian ennaskan elmontrigformon. Krom tio, la devo ami ĉiujn aliajn naciojn, kiel la sian, ordonas al patrioto estimi ĉian fremdan naciecon. Unuvorte, nacieco de iu persono estas netuŝebla lia individua rajto, kaj tial estus peko kontraŭ ĉi tiu rajto konduki asimilan politikon. Vera patriotismo ne povas akordiĝi kun iu ajn morala krimo. Simile oni ne povas pravigi per patriotaj motivoj la malpliigon de politikaj rajtoj de malplimultoj. La escepta situacio de malplimultoj ne nur ne estas principe pravigebla, sed kontraŭe, kiel tion bone pravas historio, estas malutila kiom al naciaj malplimultoj, tiom ankaŭ al premanta ilin pli granda nacio, ĉar ĉiu perforto demoraligas kiel perfortaton, tiel ankaŭ la perfortanton, kaj la lastan demoraligas eĉ ankoraŭ pli multe.

Certe, oni ne povas nei, ke iafoje la kondutmaniero de malplimulto povas esti malutila al naskolando kaj ŝtato, en kiu ili loĝas, kiel ankaŭ al fundamenta nacio. Sed dum ilia agado ne estiĝas per leĝoj antaŭviditajn kaj per juĝo kondamnatajn krimojn, oni ne rajtas kontraŭ ili uzi iunajn perforton. Ni vivas en la tempo, kiam juroscienco starigis kaj principe defendis la koncepton de rajta ŝtato, kiu al polica administrpotenco de registaro kontraŭstarigis per konstitucio garantiitan rajtecon. Laŭ ĉi tiu kompreno de socia ordo al homo estas ne malhelpata en certaj limoj libere kaj senpune fari moralajn krimojn. Al tiaj nepunataj krimoj apartenas ankaŭ krimoj kontraŭ sia nacieco aŭ patriotismo, kiom ili rekte ne detruas la fundamenton de ŝtato. Des malpli oni povas apliki perfortajn jurajn premojn al naciaj malplimulto, decidiĝintaj malutile al fundamenta nacio. Kompreneble, tio ne signifas, ke ne estas bezone kontraŭbatali tian decidiĝon de malplimultoj; nur tiu batalo devas esti kondukata per kulturaj rimedoj sur la sama egalrajta bazo. Vera patrioto, havanta komprenon pri honora batalmaniero, ne postulos sian registaron, ke ĝi ligu kaj kuŝigu lian kontraŭulon, por ke li povu facile brutalmaniere priedbati lin. Li, kompreneble, batalos per ĉiuj rajtaj rimedoj kun malutila agado de malplimulto, neniam tamen eligante el decaj limoj, tio estas ne postulante, ke iliaj rajtoj estu malpliigitaj, nek faros ion, kio poste malebligus bonan kunvivadon kun ili.

Do, vera patrioto rilate al naciaj malplimulto evitos tenton de asimilado, kaj kontraŭbatalante malutilan ilian agadon rilate al ŝtato kaj fundamenta nacio, postulos por ili egalajn rajtojn, por ke batalo estu justa. Tiel kondukas homo, havanta komprenon pri honora batalmaniero.

La demando pri malplimulto forte komplikigas, kiam nacian malplimulton konsistigas elementoj dum historia procedo defalintaj de fundamenta nacio kaj simpatiantaj al fremda nacio, kiu kondukas agresivan batalon kontraŭ fundamenta nacio. Similan okazon ni havas en Litovujo, kie tiel nomatan polan malplimulton formas ĉefe la poliĝintaj litovoj. El historio de Litovujo facile ni povas vidi, ke ĝiaj poliĝintaj superaj klasoj multe malutilis al la patrujo. Ili ne donis al litova nacio pli altan intelektan kulturon en nacia individua formo; ili kaŭzis ne konstantecon de nia ŝtato; per sia nedemokrata socia politiko ili forte ruinigis nian ekonomian vivon; ĝis hodiaŭ ili estas malhelpo en nia nacia, kultura kaj politika revekigo kaj eĉ per fakto de sia ekzisto ili servas kiel fakta kvazaŭ pravigilo por agresiva deziro de poloj penetri en Litovujon, ne parolante jam pri tio, ke ili simpatias al tiuj faroj de poloj kaj ĉe okazo eĉ aktive helpas al ili. Alkutimiĝo al malnovaj tradicioj kaj kultura komuneco kun pola nacio faris tion, ke ili apartmaniere ekamis polan nacian individuecon kaj al ĝi ili dediĉas sian patriotan preferon. Kiam litova nacieco komencis denove reakiradi perditajn poziciojn, ili, kulpuloj pri multaj malfeliĉoj de Litovujo, eksentis, ke ili estas ofenditaj je iliaj tradiciaj kutimoj kaj proklamis bataldevizon pri konservo de iliaj regorajtoj en Litovujo. Kaj kiam ili ne sukcesis efektiviĝi siajn reakciajn revojn, ĉar revekiga procedo ilin flankenpuŝis, kiel predikantojn de pasintaj tempoj, ili eksentis sin martiroj kaj en fundamenton de sia martirologio ili senkonscie akceptis apologion de renegacio kaj perfido. Jen kompatinda de poliĝintaj elementoj historia esenco.

Estas memkompreneble, ke rilate al tia nacia malplimulto estas multe pli malfacile ol kutime

konservi decan rilaton: estas ne tiel malfacile estimi polan naciecon en veraj poloj, sed multe pli malfacile estas estimi polan naciecon en poliĝintaj litovoj, kiam ĉi tiu nacieco formiĝis dank' al malhonora denaciigo. Litova patrioto, interrilatante kun ĉi tiuj siaj erariĝintaj fratoj, nur malfacile povas subpremi certan moralan naŭzan senton, kiu estiĝas vidante iliajn farojn de senkonscia renegacio kaj perfido. Sed ĉi tie ni devas memori du aferojn: la personan liberecon kaj naturon de patriotismo.

La morala defendo de naciaj rajtoj baziĝas je tio, ke ili estas etendiĝo de personaj rajtoj en medio de sociaj rilatoj. La fundamenton ĉi tie formas la netuŝebla rajto de persono senmalhelpo elmontriĝi publike tiamaniere, kiel tio plaĉas al li, kaj komunikiĝi kun homoj, kiuj havas kun li ion komunan, kompreneble, kiom tio ne estas turnita kontraŭ ŝtato kaj kontraŭ publika ordo kaj tial ne estas per leĝoj punata. Dume morala kulpo kontraŭ naciaj devoj, ekzemple abnegacio de sia nacieco, ne estas punata per juraj premigaj rimedoj, ĉar la persona rajto pri individua libereco estas pli grava ol la morala rajto de nacio postuli de siaj anoj patriotismon. Tial ne estas eble pravigi iujn jurajn premojn rilate al niaj denaciigintaj elementoj, kiom ili ne krimas kontraŭ komunaj punoleĝoj. Krom tio oni devas bone kompreni, ke juraj premoj en similaj okazoj ne nur estas principe nepravigeblaj, sed eĉ fakte estas sencelaj kaj malutilaj. Dume, naciistoj neniam povas kompreni ĉi tiun simplan veron, ĉar ili ne kapablas kompreni veran naturon de patriotismo. Estante amo al sia nacia individueco, patriotismo, kiel tia, ne estas atingebla per iuj perfortaj rimedoj. Per iu perforto homo ne povas devigi alian homon ami

lin. Simile ankaŭ nacio per neniu perfortrimedoj povas devigi siajn denaciigintajn elementojn amin. Ĉi tie oni bezonas multe da tolero, prudento kaj kultura kreado.

Se oni devas zorgi pri defendo de siaj naciaj rajtoj, tiam ekzistas ne malpli grava devo eviti ĉian ofendon de rajtoj de naciaj malplimultoj, kaj vera patrioto tiurilate devas observi la plej grandan justecon, ĉar li ne povas ne kompreni, ke ofendi rajtojn de malplimultoj estas ne nur principe malpermesite, sed ankaŭ malutile al tiu nacio, kiu plenumas malhonoran rolon de subpremanto.

Vera patriotismo estas akordiĝebla nur kun vera demokratismo, kaj kiu forgesas ĉi tion, tiu ne povas esti bona patrioto. Tial batalante kun malamikoj de sia nacio vera patrioto ne kulpigos kontraŭ principoj de demokratismo, sed penados levi sian nacion sur tian ŝtupon de ekonomia, politika kaj kultura stato, ke ĝi estu neatingebla por malamikaj penadoj. Konscia kaj libera kultura decidiĝo kaj ordiĝo, sed ne polica burokrata protekto de registaro povas garantii sukceson al nacia batalo ne parolante jam pri tio, ke sole tiu agadmaniero estas principe allasebla. Estas jam tempo formeti antaŭjuĝon de suprajaj homoj, ke laŭprincipe agadmaniero en la vivo ne estas praktika. Per ĉi tiu diro la spirita blindeco solidarigas kun tiuj, kiuj en la vivo ne povas kontraŭstari tentojn kaj serĉas por sia brutala agadmaniero teoriantpravigon.

Do, la kultura kreado plej bone armas nacion en ĝia batalo kun malamikoj precipe kun malamike sin tenantaj naciaj malplimultoj. Ĉiu el ni en ĉiutaga vivo povas sperti ĝustecon de ĉi tiu aserto. Se ni estas maljuste atakataj de homoj pro faroj de nia bona volo, ni povas elekti du vojojn: aŭ

nean juĝprocedon, aŭ pozitivan elmontrigon per utilaj faroj. Irante la unuan vojon ni elspezos tutan nian energion, neniun konvinkos kaj postlasos neniujn pozitivajn farojn, kiuj parolus por ni antaŭ historia juĝo. Elektinte la duan vojon ni pligrandigos per pozitiva laboro la havajon je bonaj faroj laŭ tio, kiel plimultiĝos neaj agoj de niaj kontraŭuloj, kaj ĉe tia batalmaniero ne povas ne veni tempo, kiam amasigita per nia laboro riĉaĵo mem ekparolos al konscienco de homoj kaj igos ilin juste ŝati nian valoron.

Simile estas ankaŭ en nia nacia batalo pro feliĉa nia estonto. Se, ekzemple, ni volas fari ne malutilaj naciajn malplimultojn kaj eĉ revenigi erariĝintajn niajn fratojn en nacian komunicon, ni devas plifortigi nian kulturkreadan laboron. Irante ĉi tiun vojon ni pli aŭ malpli frue devas sukcesi, kaj nia venko estos ne iluzia kaj ne mallongedaŭra, sed vera kaj daŭra.

Finante, mi devas ankoraŭ tuŝi la demandon pri vera patriotismo kiel akordigo de persono kun homaro per perado de nacio. Kiel antaŭe ni jam vidis, la nacio dank' al enhavo de sia civilizacio povas havi universalan signifon en homara historio. La tuta homaro, kiel tia, ne havas por sia elmontrigo individuan formon, kian havas nacio en nacia individueco. Tial persono, kiel membro de iu-ajn nacio, montriĝas en sia vivo kaj agado per formoj de sia nacieco, atingas la esencon de homaro pere de universala enhavo de sia nacia civilizacio. Amante ne nur individuan formon de sia nacieco, sed ankaŭ universalan enhavon de nacia civilizacio, vera patrioto ne povas ne ŝati la universalaĵojn ecojn de homa spirito kaj kune la tutan homaron, kiel tian. Naciisto, estimanta antaŭ ĉio kaj plej multe la individuan nacian formon, ne

povas alligi ĝis humanaj sentoj, kiuj ampleksas la tutan homaron, ĉar formala reakcia lia ŝovinismo kutime ampleksas nur per sia kvazaŭ-patriotismo nur malgrandan areton de sampensaj homoj. Vera patrioto per universala enhavo de nacia civilizacio atingas la homaran koron, ĉar li komprenas, ke nacieco perfektigas laŭ tio, kiom pli grandigas de unu flanko individueco de ĝia esprimiĝformo, kaj de alia flanko — la universaleco de ĝia komunehoma enhavo. La homara spirito ne esprimiĝas alie, ol per naciaj individuecoj; tial aparta persono ne povas iri al ĝi alie ol per agoj de bone komprenita patriotismo. Ĉi tiu patriotismo ordonas al konscia persono zorgi pri universala enhavo de sia nacio kaj samtempe ami ĉiujn aliajn naciojn kiel la sian, ĉar ĉiuj naciecaj formoj estas destinitaj esti portantoj kaj esprimantoj de homara spirito. El ĉi tio klarigas, kiel vera patriotismo devas akordigi sian personan kreadon kun ideala esenco de tuta homaro.

Samtempe oni devas konstati, ke tia akordigo de aparta persono kaj de tuta homaro fariĝas ĉiam pli reala laŭ tio, kiel ekonomia, politika kaj kultura komuna agado de nacioj eniĝas ĉiam pli en organizitajn formojn. La historio entute kaj precipe historio de niaj tempoj sufiĉe pruvas, ke laŭ progresado de kulturo izola vivo de nacioj fariĝas ĉiam pli neebla. Laŭ kultura progresado la vivo de nacioj plej diversmaniere interplektiĝas inter si kaj igas vole ne vole partopreni komunan homaran vivon. Sed de alia flanko oni devas konstati, ke paralele kun dirita procedo okazas plifortiĝo de naciaj sentoj kaj estiĝas bezono defendi ĉi tiun individuecon kontraŭ malrajtaj minacoj. El tio ni vidas, ke universaligo de nacioj iras sampaŝe kun ilia individuigo. Do, kiel akcelinda idealo ĉi tie

povas esti libera kaj harmonia kunvivo de naciaj individuecoj en tutmonda asocio de nacioj. Niaj tempoj, kiom ili sin gvidis per sana instinkto, starigis al si ĉi tiun idealon, sed la unua tiudirekte farita eksperimento estas same malproksima de matureco, kiel la unua paŝadprovo de infano estas malproksima de firma paŝado de matura viro. Tamen kredu ni: la idealo, kiu havas fundamenton en realeco, ne povas resti senfrukta en homara konscio, kvankam la unua eksperimento ĝin pli kompromitas, ol defendas.

La komunagado de naciaj individuecoj en tut-homaro estas necesa ankaŭ tial, ke neniu nacieco povas plene esprimi la riĉecon de homara spirito. Ĉar nacio vivas en certaj limigitaj cirkonstancoj, ĝi vole aŭ ne vole povas realigi nur iun solan flankon de universala tasko, ĝiaj kulturkreadaj eblecoj estas limigitaj. El tio elfluas la neceso dividi la kulturkreadan laboron, tiel diri specialigi, sed pro tio aperas ankaŭ la bezono poste interŝanĝi la akiritajn rezultatojn. Tiamaniere la naciaj individuecoj alplenigas unu la alian kaj nur harmonia tuteco de ili formas tion, kion ni nomas homaro. Tial vera patrioto, sekvanta la destinon de sia nacio kaj faranta kulturkreadan laboron, samtempe laboras je la utilo de tuta homaro, kaj utiligante al si la fruktojn de komunagado de ĉiuj nacioj, li mem ĝuas la homarajn trezorojn.

El ĉio ĉi dirita sekvas, ke vera valoro de iu nacieco dependas de tio, kiom da universala enhavo aŭ de komune — homa spirito estas realigita en formoj de ĝia nacia civilizacio. Laŭ tio ankaŭ estas mezurata la vera signifo de nacio en vasta homara societo kaj morala ĝia potenco en la mondo. Deziri por sia nacio tian potencon en familio de nacioj signifas fari konsekvencan kon-

kludon el bone komprenita grandeco. Se ĉiu imperialisma emo, bazanta sur iu ajn perforto, estas senkondiĉe kondamninda, tiam la penado esti gvidanto en homaro per agoj de krea spirito ne nur estas pravigebla, sed eĉ faras unu el elmontrig-formoj de vera patriotismo. Nur domaĝe, ke ĉi tiuj penadoj kutime estas karikaturigataj per imperialisma instinkto. La malnova historio donas al ni klarajn ekzemplojn, montrantajn, kiel spirito de nacia hegemonio en homaro iaforte estas en kontraŭa proporcio al ĝia materia potenco. La potenca Romo militvenkis malgrandan Grekujon, sed de ĉi tiu Grekujo eble sola urbo Atenoj pli multe faris por humanitara kulturo de postaj jarcentoj ol la grauda Roma imperio. Ĉi tiu kultura heredaĵo tiel aŭ alie ĝis hodiaŭ postvivas en la kultura mondo. Sed eĉ ankoraŭ pli malgranda ol grekoj — hebrea nacio, montriginta en pasinto per neniam faroj de materia potenco kaj same subigita de Romo, superis eĉ grekojn per sia morala signifo por novaj tempoj. Nekalkuleblaj milionoj da homoj nun, kiel dum tuta vico da pasintaj jarcentoj, kunligas sian vivon kun estintaj en malgranda Palestino rezultokazintaj de alvoko de hebrea nacio. Jen ekzemploj, kiel oni devas kompreni la grandecon de sia nacio kaj realigi ĝin ne nur dum iu limigita tempo en sia naskolando, sed en la tuta mondo kaj por longaj jarcentoj. Ĉi tion precipe devas kompreni malgrandaj popoloj, ĉar laŭ vortoj de prof. M. de Munnynck: „Providenco verŝajne tial deprenis de ili materiajn fortojn, ke ili apogiĝu nur sur spiritaĵoj fortoj“. (Romuva No. 2, p. 17.) Irante laŭ ĉi tiu direkto ni ne nur defendos nin de niaj malamikoj, sed trovos ankaŭ nian veran grandecon, kiu estos limigita nek per limoj de nia teritorio, nek per tempodaŭro de

nia vivo. Se ni devus elekti por nia vera patriotismo sintezan devizon, tiam sekvante la vortojn de Mickevičius en Konrado mi dirus:

„Plektu ni el kara patrujo vivan kanteton“.

„Kaj faru el ĝi ĝojobjekton por jarcentoj“.

Kaunas, la 11 de marto 1923.

Tradukis J. Mačernis.



Grandaj kaj malgrandaj nacioj.

El „Litova Stelo“.

Kiel la naturo prezentas al ni malegalajn estajojn (ekz. giganton - elefanton kaj etulon - skarabeton *Rhynchites betulae*), tiel ankaŭ en la homaro ni trovas sociajn organismojn — naciojn tre malegalaj: unuj el ili estas grandegaj, aliaj — malgrandetaj. Je tio ĉiuj konsentas.

Sed kia nacio povas esti nomita vere granda? Ordinare tiun demandon oni respondas sin fondante sur la nombro da individuoj apartenantaj al nacio. Estu du nacioj havantaj m_1 , kaj m_2 da individuoj. Tiam se tiuj nombroj konvenas al la neegaleco $m_1 > m_2$, oni diros, ke la unua nacio estas pli granda ol la dua. Sed ĉu tio estas ĝuste? Ĉu oni povas kontentigi, komparante la grandecon de du nacioj per la abstrakta nombro da individuoj, tute neatentante iliajn internajn kvalitojn? Ĉu oni povas diri, ke unu nacio, havanta cent milionojn da analfabetoj kaj sifilitikuloj, estas dekoble pli granda ol nacio, konsistanta el 10 milionoj da sanaj, energiaj kaj kleraj homoj. Evidente, ne.

Aliaj fondas la nacian grandecon sur la grandeco de okupata de iu nacio teritorio, de ĝia armeo, de ĝia ŝiparo k. t. p. Tiuj ĉi faktoroj certe havas

sian valoron kaj montras nacian forton. Sed ankaŭ tie ĉi la efektiva grandeco rezultiĝas ne el abstrakta nombro de kvadrataj kilometroj, de soldatoj, de ŝipoj, sed el ilia pozitiva kvalito. Tiu ĉi lasta ofte estas pli ĝusta kriterio pri la vera grandeco de iu nacio, armeo aŭ ŝiparo, ol ilia nombro. Dank' al tio estiĝas eblaj tiaj faktoj, ke la malgranda ekz. Japanujo povis venki la grandan Rusujon k.t.p.

La demando ankoraŭ pli komplikiga, kiam iu nacio estas taksinda ne sole per sia materiala, sed ankaŭ per morala valoro. La antikvaj grekoj ekz. estis sendube laŭnombro malgranda nacio, sed per sia nacia genio ili faris por la kulturo de l' homaro multe pli, ol ia ajn la plej granda nacio, ne esceptante Romanojn mem. Do per siaj naciaj meritoj la antikva greka nacio devas esti teninda pli granda ol la Romana.

Tio sama estas dirinda ankaŭ pri la hebrea nacio el la religia vidpunkto. Ĝies influo daŭras ja en la tuta civilizita mondo ĝis nun.

Tiuj konsideroj, kvankam en si ĝustegaj, tamen en la demando pri nacia grandeco, bedaŭrinde, ne estas ĝis nun sufiĉe atentataj. Anstataŭ nacia virto, genio, oni ŝatas ordinaro nur nacian multhomecon kaj fizikan forton. Malmulthomaj nacioj estas nomataj malgrandaj, multhomaj — grandaj.

Tiu ĉi diferenco, kvankam unuflanka, povas tamen esti rigardata kiel ĝusta, ĉar havas fundamenton almenaŭ en la statistiko. Sed absolute neakceptinda estas la eltirata el tie jena konkludo: pli grandaj nacioj havas ankaŭ pli multe da politikaj rajtoj, kaj la plej grandaj nacioj posedas la ĉefrajton kondukadi la tutan homaron, estrante la malgrandajn naciojn laŭ sia bontrovo kaj eĉ ilin forglutante, se tion postulas iliaj grandnaciaj „interesoj“.

Oni ne bezonas multajn filozofadojn por elmontri, ke la dirita ĉefraĵo estas nenio alia, ol superba pretendo. Ĝi estus iom pravigita, se la grandaj nacioj estus efektive alkondukintaj la malgrandajn naciojn kaj la tutan homaron al „tera paradizo“, al absoluta feliĉo. Sed, ho ve! La lasta mondmilito plejklare elmontris, ke al grandaj nacioj mankas grandaj homoj. Kondukataj de siaj malgrandaj hometoj kun malforta volo kaj mallarĝa saĝo, la grandaj nacioj anstataŭ „tera paradizo“ sukcesis krei veran inferon ne sole por malgrandaj nacioj kaj la tuta homaro, sed ankaŭ por si mem. Do ekzistas nenia fundamento al grandaj nacioj por esti fieraj: granda ilia nacia ŝovinismo, granda politika miopeco, granda kruel-eco, granda spirita blindeco ne faras ja grandan honoron al ili kaj al ilia mondpolitiko. Pro tio oni ne devas miri, ke troviĝas homoj kuraĝantaj profeti la alvenon de la epoko „de malgrandaj nacioj“, anstataŭigonta la nunan epokon „de grandaj nacioj“.

El la paleontologio ni scias, ke la plej grandaj vivaj organismoj povas ekzistadi nur en specialaj teraj kondiĉoj. Se tiuj malestas, ili nepre pereas. Dank' al tio estas jam pereintaj antikvaj mastodontoj, pleziozaŭroj, mamutoj k. a. Ion similan oni povas diri ankaŭ pri grandaj sociaj organismoj, t. e. pri grandaj nacioj. La glora rusa publicisto M. O. Menŝikov estas iam skribinta: „la malgrandaj nacioj povas fariĝi grandaj, al la grandaj minacas danĝero — fariĝi malgrandaj“. La nuntempaj politikaj cirkonstancoj ŝajnas tute pravigi la diron de la mortigita de bolŝevikoj rusa publicisto.

Do la grandeco de nacio ne estas ĝia nepra, esenca eco. Tial la fieriĝo de iu nacio pro sia fizika „grandeco“ estas same neracia, kiel la fieriĝo

de l' ventro pro tio, ke ĝi estas pli granda ol la kapo aŭ la okulo. Certe sen la okulo homo povas vivi, sed tiu vivo en la ĉiama malumo malmulte valoras. Pro tio nur iu frenezulo povas al si elŝiri la okulojn, kiel sen necesaj.

Io simila estas dirinda ankaŭ pri la homaro. Kiel la homa korpo konsistas el harmonie kunigitaj malegale grandaj membroj, el kiuj ĉiu havas sian funkciadon kaj estas bezona por plena vivo, tiel ankaŭ la homaro konsistas el diversaj malegale grandaj nacioj, el kiuj ĉiu havas sian historian taskon, kaj pro tio estas necesa por plena devamaniera vivo de l' homaro. Do la neniigo de ia ajn nacio, pretekstante ĝian malgrandecon aŭ nekulturecon estas tiel same sensenca krimo, kiel la fortranĉo de ies nazo aŭ orelo je la preteksto, ke tiuj membroj estas ja „malgrandetaj“.

Dank' al Dio la fortranĉado de homaj nazoj aŭ oreloj estas nun leĝe malpermesita. Sed la distranĉadon de vivaj sociaj organismoj — nacioj la Eŭropa politiko toleras ĝis nun. Ĝi faras eĉ multe pli, permesante al grandaj nacioj forglutadi la malgrandajn, ilin eĉ ne distranĉante. Bela progreso: la individua kanibalismo estas malpermesata, sed en nacia kanibalismo oni vidas nenian krimon, kontraŭe la jaŭdindan nacian politikon! . . .

La temo pri grandaj kaj malgrandaj nacioj, estante tre vasta, povus plenigi la tutan libron. En mallonga artikolo ĝi estas neelĉerpebla. La supra nia diritaĵo enhavas nur kelkajn ĝeneralajn konsiderojn. Tamen el ili, ŝajnas, oni povas eltiri kelkajn gravajn konkludojn. Ili estas jenaj:

1. La nacioj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj, estas membroj de la tutmonda vivanta homaro.

2. Kiel tiaj, ili havas egalan rajton ne sole ekzistadi, sed ankaŭ esti politike sendependaj, paroli

sian nacian lingvon, kredi sian kredon, krei sian literaturon, evoluadi, progresadi kulture, ekonomie k. t. p.

3. Nenia nacio, eĉ la plej granda, havas la rajton perforte sklavigi al si alian nacion, eĉ la plej malgrandan, ĝin „asimiligi“, ĝin ekspluati k. t. p. Se ia ajn granda nacio tion farus, ĝi pro tio perdus sian nomon de nacio civilizita kaj fariĝus nacio — barbara, nacio — kanibalo.

4. La grandaj nacioj, permesintaj al siaj malgrandaj kondukantoj organizi la grandan tutmondan hombuĉadon kaj fini ĝin per maljustega Versailles'a pactraktataĉo, estas morale grandaj kulpuloj, des pli plendindaj, ĉar ne sentantaj sian kulpon kaj sin preparantaj al nova hombuĉado.

5. La sensenca antagonismo de grandaj nacioj estas la plej granda baro al la deva evoluo kaj progreso de l' homaro. Kial tia, ĝi devas esti forigita kaj anstataŭigita per la principo de ĉiunacia solidareco. Ĝi povos esti atingita nur per la kreo de Unuigitaj Eŭropaj Ŝtatoj, al kiuj volonte aliĝus ankaŭ ĉiuj novaj post la mondmilito kreitaj respublikoj.

6. La Amerikaj kaj Eŭropaj Unuigitaj Ŝtatoj, kiel tempaj etapoj, alkondukos fine al la lasta ĉiunacia organizaĵo en la formo de Tutmondaj Unuigitaj Ŝtatoj. Tiu fina lega organizaĵo en la civila sfero ludos rolon analogian al la rolo de la Eklezio en la religia sfero.

7. Per ambaŭ tiuj tutmondaj organizaĵoj estos evidente elmontrita, ke la homaro ne estas ia fikcio, sed vera kaj viva estaĵo, havanta multe pli da realeco ol ĉiu aparta nacio, eĉ la plej granda.

Prof. A. Dombrovski.

Regno de Kulturo.

De Prof. A. Dombrovski (Dambrauskas).

I.

La ideo de kulturo estas tre larĝa kaj pro tio al multaj homoj — malklara. Per tiu ĉi vorto estas ja signifataj la plej diversaj objektoj — terlaborado, brutedukado, industrio, sciencoj, belarto, politiko, bonfareco, unuvorte ĉio, kio donas al la homa vivo pli da enhavo, da belo kaj da feliĉo.

Deziri la feliĉon, zorgi kaj labori pri la plibonigo de sia vivo la homoj emas laŭnature. El la Biblia rakonto ni vidas, ke eĉ la prapatro de l' homaro en la paradizo mem havis jam la devon de kultura laboro (ut operaretur et custodiret illum Gen. II). Des pli necesa estas tiu ĉi laboro al lia posteularo, perdinta sian primitivan perfektecon. La laboro estas nepra kondiĉo de kulturo, kiel la kulturo estas la kondiĉo de progreso. Sen kulturo la vivo estus senvalora, oni eĉ ne povas ĝin imagi. Tial la homo per sia penado ĉie kreas la kulturon, ĉar per si mem ĝi nenie fariĝas.

En tiu kreado de la kulturo povas partopreni sociaj atomoj — apartaj personoj, sociaj molekuloj — familioj, sociaj membroj aŭ organoj — nacioj, kaj, fine, la universa socia organismo — la homaro. La kulturo de apartaj personoj kaj familioj estas individua, de nacioj -- partikulara, de la tuta homaro -- universala. El kulturoj individuaj devenas kulturoj partikularaj, la partikularaj estas metintaj la fundamenton por la kulturo universala.

La antikvan epokon antaŭ la Kristnasko oni ĝuste nomas periodo de kulturoj partikularaj. Laŭ-nombre ili estis multaj; el la historio ni ja scias la kulturojn de Ĥinoj, de Hindujo, de Egipto, de Asirio, de Hebreoj, de Greklando, de Romo; sed ili ĉiuj estas naskiĝintaj sendepende unu de alia; ili kreskis kaj vastiĝis, oni povas diri, paralele, unu la alian preskaŭ nerenkontante, malmulte unu la alian influante; tial ili ĉiuj estis siamaniemaj, originalaj, unu al alia nesimilaj kaj preskaŭ nenion komunan havantaj.

De la apero de l' kristanismo komenciĝas la penado krei unu, universalan, kristanan kulturon. Tiu laboro mezepoke estis jam sufiĉe progresinta. Ĝia ĉefgvidanto kaj organizanto estis la katolika Eklezio kaj tial sur la tuta tiutempa kulturo estis enpresita signo de katolikismo. Tio al multaj homoj ne plaĉis. Tial aperis forta opozicio, kiu elmetis novan devizon de la „sekularizo de kulturo“ kaj de ĝia „liberigo el sub Eklezia influo“. La ĉefgvidanto kaj organizanto de la nova sekularizita kulturo fariĝis la ŝtato, kiu, fortiĝinte en Eŭropaj landoj, kvankam ne sukcesis plene neniigi la antaŭan Eklezian laboron kaj forigi ĝian influon je la kreado de kulturo, tamen nemalmulte ĝin malgrandigis kaj eĉ en duagradan rangon ĝin forpuŝis. En la agada regiono efektiviĝis la pli ĝusta labordivido. La Eklezio prenis sur sin la taskon konservadi la Dian tradicion kaj virtigadi la homaron, la ŝtato sin okupis pri la ordigo de la estanteco kaj de la civilizo de la regnanoj.

Bedaŭrinde, la politikistoj-gvidantoj de ŝtatoj ne estis sufiĉe kapablaj efektiviĝi devamaniere tiun ĉi taskon. Malŝatante la virtigan influon de la Eklezio je la vivo de nacioj, ili provis starigi ĉion sur la sola fundamento de pura raciismo kaj per

tio helpis la plifortigon de materialismo, kiu fine ekfloris per al ĉiu bone konataj floroj de kapitalismo, militarismo kaj socialismo. El ili la kapitalismo fariĝis la plej granda forto; la politikistoj de ĉiuj ŝtatoj kliniĝis al ĝi kaj gvidis la ŝtatojn laŭ postulo de kapitalistoj. Tiuj lastaj fakte tenis la direktilon de ŝtatoj en siaj manoj pacatempe; ili, kiam la kapitalaj interesoj tion postulis, kontraŭ volo de nacioj kaj sen ilia scio preparadis la novajn militojn, ili ekbruligis ankaŭ la lastan tutmondan militon.

Hodiaŭ la nacioj de l' mondo komencas pli klare kompreni tiun ĉi fakton¹⁾ kaj unu post la alia konvinkigas, ke tiel ne devas plu esti. Ili mem provas nun preni sian sorton el la manoj de politikistoj-dungituloj de l' kapitalismo. Tio estas rimarkebla el la pli kaj pli multigantaj voĉoj, montrantaj al la homaro, ke niaj ĝisnunaj ŝtatoj, kvankam „sekularizitaj“ ne plenumis konvene sian rolon, ĉar ili alkondukis la homaron al infera buĉado de la mondmilito. (1914—1918.)

Tial ne estas mirinde, ke troviĝas nun pli profundaj pensuloj, alvenintaj al la konvinko, ke la ĝisnuna sociala ordo estas neperfekta kaj nesufiĉa, ke krom la du ĝisnunaj plej grandaj socialaj organizoj — la Eklezio, kiel etika asocio por virtigado de la homaro kaj la ŝtato, kiel jura asocio por ordigo de la kuranta vivo de homoj, estas necesa ankaŭ la tria ideala asocio por gvidi la homaron al pli bona estonteco.

La pola filozofo H. Wronski proponis al tiu asocio la nomon de absoluta aŭ mesieca unuigo (Union absolue ou messianique). La rajton ĝin

¹⁾ Legu pri tio la eldonitan en Parizo 1911 broŝuron de Delaisi: „La guerre qui vient“, kiu ankaŭ ekzistas en esperanto-traduko.

eniri kiel membroj, laŭ Wronski, havas nur la plej instruitaj kaj la plej noblaj homoj de ĉiuj nacioj; ili devus gvidi la homaron al ĝia fina celo sur la tero. Kaj unu el nuntempaj germanaj verkistoj H. Nienkamp, moviginta en sia fama verko „Senkronaj Princoj“¹⁾ la saman demandon, imagas tiun unuigon kiel novan „Regnon de Kulturo“. Ĝia celo, laŭ lia opinio, ne estas anstataŭigi malnovajn regnojn, sed starigi flanke de la Eklezio kaj la ŝtato kiel la tria universala institucio por la ordigo de l' homara vivo kaj por la agado laŭ principoj de l' saĝo, superante la egoismajn postulojn de la kapitalo. Kvankam la verko de Nienkamp estas nomita „preskaŭ romano“, tamen en ĝi estas pli da pura, viva, objektiva vero, ol en iu dika sociologia lernolibro. Konatigi la legantojn kun la enhavo de tiu ĉi verko estas la ĉefa celo de nia artikolo.

II.

La ĉefpersono en la Nienkamp'a verko estas juna, tre kapabla kaj profunde klera amerikano, idealisto Richard Fry. Post subita morto de la patro John Benjamin Fry, li apenaŭ 25 jara heredas liajn miliardajn riĉaĵojn, malmultigitajn per neniuj testamentaj donacoj por bonfarecaj celoj. La morto de maljunulo Fry donas okazon al la gazetoj de diversaj direktoj esprimi siajn opiniojn pri la kolektistoj de kapitalo ĝenerale kaj pri la Fry'a familio speciale. La katolikaj organoj riproĉas al la mortinto lian avarecon kaj senkorecon, la socialistaj — mokante esprimas deziron, ke eĉ la juna Fry iru patrapiede, ĉar tielaj kolektistoj de

¹⁾ Fürsten ohne Krone. Fast ein Roman von Heinrich Nienkamp. Vita, Berlin-Charlottenburg.

kapitalo laboradas por la plirapidigo de l' fina socialisma triumfo. La burĝaj gazetoj — por klarigi la Fry'ajn financajn kapablecojn disvastigas la famon, ke Fry'a prapatro estis hebreo Frey, havinta en suda Germanujo nur etan butikon.

La disvastigitaj en la preso sciigoj pri la hereda Fry'a miliarda riĉaĵo ne restas sen efiko. El ĉiuj regionoj de la mondo amase venas miloj da leteroj je la Fry'a nomo. En ili oni ordinarie petas subtenon, sed ne mankas ankaŭ tiaj, en kiuj oni donadas konsilojn, kiel Fry devus plej konvene ekuzi sian grandegan kapitalon. Tiu fakto devigas Fry'on deklari en la gazetaro la peton, ke oni haltigu la skribadon al li pri tiuj du aferoj, ĉar li jam havas sian planon por la uzo de sia kapitalo, kune garantiante, ke tiu kapitalo estos uzata por celoj de kulturo. Li ne intencas donadi subtenojn al privataj personoj, ĉar volante kontentigi ĉiujn petantojn, li elspezus la tutan kapitalon sen ia profito por la homaro. Tial nun li havas la zorgon ne malgrandigi sian kapitalon, sed kiom eble ĝin pligrandigi, por ke li povu tiamaniere pli bone servi la tutan homaron; kiam venos la tempo, li mem invitos kunlaborantojn.

Tiu ĉi anonco faras impreson. Dum la tuta semajno en privata interparolado, kaj en la gazetaro oni diskutadas nur pri la demando: kion oni povus fari havante Fry'an kapitalon. La konservativistoj esprimas en siaj organoj la opinion, ke plej bone estus la Fry'ajn miliardojn oferedoni por la batalo kontraŭ la socialismo. Laŭ opinio de katolikoj, Fry, kiel katoliko, sian riĉaĵon devus donaci al la Papo. La antisemitaj gazetoj proponas fondi per Fry'aj miliardoj la apartan ŝtaton de hebreo, kaj tien devige transporti la filojn de Izraelo el la tuta mondo. La pacifistaj organoj

elkalkulis, ke Eŭropo por sia armigo elspezas ĉiujare duoble tiom, kiom atingas la tuta Fry'a riĉaĵo. Se oni el tiu por kontraŭkulturaj celoj destinata kapitalo kreus ian internacian monprovizon kaj se la ŝtatoj ekkonsentus ĝin pligrandigi, pagante ĉiujare destinitan por la armigo monon, oni fine alvenus al tia kapitalo, kiu donus al la homaro la eblon facile forpeli la barbarecon de militoj kaj ordigi la vivon de l' homaro laŭ postuloj de l' saĝo.

La Fry'a ideo, de neniu divenita, estis post nelonge partume de li mem klarigita al unu gazeta korespondanto jenmaniere. La kulturo estas la homa kaj per la homoj al la vivo aplikita saĝo. La homo estas la plej alta celo kaj la plej grandvalora ilo de kulturo. La plej ĉefa tasko de kulturo estas kiom eble limigi regadon de l' blinda okazo. Kompare kun la pasintaj tempoj la homaro, vere, estas antaŭen rimarkeble progresinta. Ĝi eltrovis kompason, fulmoforigilon, ĝi sin sekuras kontraŭ hajlo, fajro, morto kaj aliaj, devenantaj de la okazo, malfeliĉoj. Oni ellernis laŭcele kreadi tion, kion la naturo hazarde kreas. Estas perfektigitaj la specoj de kreskaĵoj kaj de bestoj, eltrovita estas la maniero produkti valorajn ŝtonojn, oni kreis eĉ lingvon internacian, tute ne malplibelan ol la naturaj. Sed ĝis nun ne ekzistas la maniero savi la talentajn homojn de la spirito pereiganta mizero kaj konvene ekuzi ilin por la socia bono. Naskiĝis iu en reĝa palaco, li estu eĉ malfortsaĝa kaj malfortvola — tutegale, fariĝinta plenaĝa, li estros la ŝtaton, gvidos sian nacion, kien al li plaĉos, eĉ en abismon. Naskiĝis iu en kabano de kamparano — mizerulo, li estu eĉ geniulo, pro la malriĉeco li restos malklerulo kaj por sia socio ne povos esti utila. La homa sorto ĉe la nuntempa ordo dependas

de naskaj cirkonstancoj, kiuj siavice estas pura produkto de blinda hazardo. Al tiu hazarda regado oni devas deklari batalon, por ke la kapablaj, talentaj homoj povu okupi devan lokon en la vivo kaj tie trovi kondiĉojn por fruktodona uzado de siaj spiritaj fortoj. Estas necese forpeli eraran opinion pri la homoj: ili estas tre diversaj, ne egalaj. En la homaro estas kaŝitaj grandaj spiritaj trezoroj.

Unu homo, siatempe en konvena loko starigita, povas doni al la homaro tiom da valoraj pensoj kaj verkoj, ke por ilia rekompenco eĉ la tutmonda oro ne sufiĉus.

Demandita, kiamaniere li tiujn siajn ideojn intencas enkorpi, li respondis, ke tion klarigi estas tro frue, ĉar multaj homoj ankoraŭ ne komprenus ilin kaj eĉ ridindigus. Li aldonis nur tion, ke lia plano estas fari tion kun helpo de nova speciala organizo. Kia estas potenco de organizo, li ĝin komprenis, konatiginte pli proksime kun la gvidado de patraj aferoj.

Tiu ĉi Fry'a interparolo denove donas al la gazetaro okazon por esprimi diversajn rimarkojn pri la projekto de Amerika miliardulo. La organoj de junkroj mokante rimarkigas, ke Fry estus socialisto, se li ne havus postlasitan de l' patro kapitalon. Al socialistoj malplaĉis la substrekita de Fry neegaleco de homoj. La neegaleco, laŭ li, estas faktoro, diferenciganta la homojn; la vera socia laboranto devas sin apogi sur tio, per kio la homoj estas egalaj kaj servi la popolamasojn. La naciistoj, ekkoninte, ke Fry revas pri internacia lingvo Esperanto, montras la danĝeron de la malbonaj influoj el parto de la fremdaj nacioj kaj el la potenco de la internacia kapitalo.

Ankaŭ al katolikaj organoj la Fry'a projekto ŝajnas el religia vidpunkto suspektinda.

III.

Dum la disputado de la Eŭropaj gazetoj el Ameriko disvastiĝas telegramo, anoncanta, ke Richard Fry edziĝis kun Evelino Cardon, filino de miliardulo, — reĝo de amerikaj fervojoj — kaj prepariĝas kun la edzino viziti Eŭropon. Tiu ĉi sciigo faras impreson. La gazetoj komencas sekvi ĉiun paŝon de la geedzoj Fry'. Oni ekscias, ke Fry decidis pli longan tempon haltiĝi en Parizo; por tio li luis tie belan loĝejon. Post kelke da tagoj la Telegrafa Oficejo anoncas: En Parizo estas fondita „Interhelpa Societo de Eŭropo“, nomita per esperanta nomo „Ligilo“. Ĝia fundamenta kapitalo estas belega sumo de 100 milionoj da frankoj; 51 milionoj enmetis Fry mem kun siaj amikoj; la restantajn 49 milionojn la plej eminentaj Eŭropaj bankoj. La morgaŭaj gazetoj donas pli detalajn sciigojn pri tiu nova societo. Oni ekscias, ke Fry, ĝin fondante, havis originalan celon por doni subvenciojn al tiuj kapablaj homoj, kiuj estas eltrovintaj aŭ elpensintaj ion bonan, sed ne havas necesan kapitalon por efektiviĝi siajn ideojn kaj ne povas ĝin prunti de skeptikuloj-bankistoj. Tiujn subvenciojn „Ligilo“ donadas ne laŭ bonfarecaj, sed pure laŭ ekonomiaj principoj. „Ligilo“ subtenas nur tiujn eltrovojn kaj elpensojn, kiuj estas profitaj al plialtigo de kulturo kaj estante realigitaj promesas al la eltrovintoj kaj al ilia helpanto societo „Ligilo“ nemalgrandan profiton. La centrejo de „Ligilo“ estos en Parizo, ĝiajn filiojn oni intencas fondi en ĉiuj pligrandaj Eŭropaj urboj: en Parizo, Amsterdamo, Berlino, Petrogrado, Konstantinopolo, Vieno, Milano. Por gvidi tiun internacian organizon estas invitetaj la plej eminentaj, bone pagataj specialistoj, konataj en la tuta mondo.

Fry post nelonge eldonas samtempe Esperante-france-angle-kaj-germanlingve broŝuron, nomitan „Kultura Organizo“. Li parolas en ĝi pri la rilatoj inter ekonomia vivo kaj la kulturo. La fundamentaj pensoj de tiu ĉi verketo estas jenaj. La homo ne devas esti nur ilo de la produktlaboro. La kulturo ne estas profitakirado kaj kolektado de oro. La homan personon la oro ne plialtigas; ĝi estas nur senpersona ilo de regado. La kultura kreado sen persona karaktero estas neebla. Por la kulturo necesaj estas diferencoj, tamen ne laŭ tio, kiom iu havas, sed laŭ tio, kio iu estas. La nuntempa stato, ĉe kiu eĉ en la plej grandaj centroj de kulturo ne mankas mortantaj pro malsato homoj, - ne estas kultura stato. Eĉ prizorginte la mizerulojn per nutraĵo, vestoj kaj loĝejo ni ne multe plialtigus la kulturon. En la homo, krom korpaj bezonoj, estas ankaŭ la pli altaj spiritaj postuloj, kiujn reguligas ne ŝtataj kondukantoj, ne popolamaso mem, sed la apartaj noblaj personoj, vera spirita aristokrataro. Tiaj vere ŝatindaj homoj ĉie estas trovataj, sed aparte ili ne multe povas fari. Certe, por perfektigo de la kulturo ne mankis organizoj. Sed ili, neatentante la realajn ekonomiajn rilatojn de l' vivo, postulante tro da oferdonoj de la homaro, — kio al homa naturo estas malagrabla, plej ofte sin apogadis nur sur la idealismo. En la estonteco, kreante tiajn organizojn, oni sin apogu sur la natura neegaleco de l' homoj. Oni devas krei rimedojn por eligi la pli kapablajn homojn el la popolamaso kaj eliginte, doni al ili la eblecon dece disvolvi siajn spiritajn fortojn, kiuj poste povos esti uzataj por la kultura laboro.

Por popularigi kaj disvastigi tiujn ideojn en la mondo Fry samtempe kreas specialan organon, nomitan „Kultur-Gazeto“ kaj eldonatan nur Espe-

randlingve. Tio estas farita — por malgrandigi la elspezojn de propagando, kaj — por fari la anoncatajn en la gazeto ideojn al ĉiuj nacioj alireblaj. Jara abonprezo de „Kultur-Gazeto“ estas difinita 25 frankoj. Sed la plej grava sciigo estis metita en la redakcia anonco, ke post la fino de jaro inter la geabonantoj de „Kultur-Gazeto“ estos dividita belega sumo de 200 milionoj da frankoj per premioj, povantaj en apartaj okazoj atingi eĉ unu milionon da frankoj.

La Fry'a broŝuro kaj lia projektata neregule eliranta organo donas al la Eŭropa preso okazon por esprimi pri tiuj du aferoj diversajn opiniojn. Iuj tie trovas nenion novan, aliaj vidas saĝan profitakiradon, la triaj mokante ŝanĝas la nomon „Ligilo“ en „Judilo“, kompreniigante per tio, ke la tuta afero estas nur projekto de la profitavidaj hebreoj.

Dume la Fry'aj ideoj komencas sufiĉe rapide disvastiĝadi. Fondita de li societo „Ligilo“ fondas en la pli grandaj urboj unu post la alia siajn filiojn. Jen, ekz., kiel aspektas, laŭ gazetoj, la Berlina centrejo de „Ligilo“.

Ĝia loĝejo okupas preskaŭ apartan kvartalon kaj ankoraŭ ne ĉiuj institucioj tie povis trovi lokon. Ne malmulte da tempo oni bezonas nur por ĝin ekstere trarigardi. Antaŭ ĉio ni trovas la salonojn por legado. Ĉi tie estas abonataj ĉiuj plej eminentaj gazetoj de Germanujo kaj kelkaj alinaciaj. La legejoj estas ĉiutage malfermitaj por la publiko; la biletprezo por unufoja eniro estas ne alta. Ĉe la legejo troviĝas la olicejo de informoj kaj de tradukado. La tuta korespondado estas gvidata esperantlingve.

Plimalproksime estas jura fako. Ĉi tie bone pagataj juristoj donas informojn pri la lokaj kaj

alilandaj legoj kaj por speciale destinita honoraro, kiu fluas en la komunan kason de „Ligilo“; al procesantoj oni donas ĉiaspecajn konsilojn.

En aparta komerca fako oni povas ricevi informojn pri ĉiuj demandoj de aĉetado, vendado, luado, dungado kaj pruntado.

El ĝi oni transiras en la teknikan fakon: Ĉi tie ĉiuj teknikaj branĉoj havas siajn ekspertojn — maŝinistojn, elektroteknikistojn, geologiistojn, inĝenierojn kaj aliajn specialistojn. Ankaŭ tiu fako al publiko estas alirebla. Ĉi tie oni diskutadas pri novaj eltrovoj kaj plibonigoj; netaŭgaj estas forĵetataj, la utilajn oni financas kaj efektivigas.

La literatura fako — estas ne malpli interesa. Ĉi tie oni trarigardas kaj taksas literaturajn verkojn de la mallonga felietono ĝis la plej dika libro. La forĵetitajn manuskriptojn, kiuj pro la legoj de ŝtato ne povis esti eldonitaj, — oni transdonas por denova trarigardo al la speciala komisiono, kiu konsistas el personoj senpartiaj kaj la aferon bone konantaj. La aprobitajn por presado verkojn „Ligilo“ eldonas siakoste, interkonsentiĝinte kun la aŭtoroj, kaj partoprenas en la profito ricevata de eldonajo.

Ĉe la literatura fako estas ankaŭ teatra kaj muzika, kie oni taksas verkojn destinitajn por la opero aŭ por koncertoj, decidante la kondiĉojn de ilia prezentado.

Fine ĉi tie estas ankaŭ nemalmulte da aliaj helpaj institucioj, kiel fako de korespondajoj, propra centrejo de telegrafoj kaj telefonoj, diversaj salonoj por kunsidoj, kunvenoj, interparoladoj; bufedoj, registrejoj kaj t. p. . .

La bankoj komence malkonfide rigardas la Fry'an „Ligilon“ kaj ne volas aliĝi al ĝi, ĉar ili sentas, ke tie ili ne povos havi la decidan voĉon.

Sed aliflanke, sentante ke Fry eĉ sen ili povos krei la egan financon institucion, kiu al ili mem povus fariĝi danĝera, fine ili ankaŭ aliĝas. Post tio, kiam la akcioj de „Ligilo“ komencas donadi bonajn dividendojn, la nombro de bankoj aliĝintaj al la „Ligilo“ komencas rapide kreski. En Germanujo fondiĝas el ili aparta sindikato de Bankoj, kiu kreas novan financon institucion „Germana Banko de Deponaĵoj“ kun la miliarda fundamenta kapitalo. La celo de tiu ĉi banko estas — asekuri tiujn samajn bankojn de bankroto.

IV.

Kun la „Ligilo“ egalrapide disvastiĝas ankaŭ la de Fry fondita „Kultur-Gazeto“. La celo de la eldonanto estas klarigita en la enkonduka artikolo jene: „El la abonantoj de ĉi tiu gazeto mi volas krei grandegan, tutan Eŭropon ampleksantan societon, al kiu mi intencas transdoni ĉiujn miajn riĉaĵojn kaj ankaŭ tiujn kapitalojn, kiuj, kiel mi esperas, alfluos el flanke. La administrado kaj dividado de tiuj ĉi riĉaĵoj dependas de tiu sama societo post kiam ĝi organiziĝos laŭ mia plano. Al mi mem mi rezervas en ĝi tiom da rajtoj, kiom havos ĉiu alia ĝia membro.“

Mallonge dirante, mia celo estas krei la spiritan aristokrataron, kiu altirus la pasivan, propran opinion nehavantan, popolamason al la universala kultura laboro. Kaj mia deziro estas helpi, por ke tiu aristokrataro povu fariĝi, sin organizi, akiri la aŭtoritaton.

Por tio antaŭ ĉio devas formiĝi la ĝermoj de organizo — malgrandaj rondetoj, el kiuj poste devos sin formi grandega Regno de Kulturo. Tial tiu, kiu volas partopreni en la heredo de miaj riĉaĵoj, eniru la rondetojn, kiujn dume mi nomos

„Societoj de Kulturo“. La gelegantoj de tiu ĉi gazeto en ĉiu loko kreu unu aŭ pli da tiaj kulturaj organizoj. La nombro de membroj en ili devas esti ne malplimulta ol 10 kaj ne plimulta ol 100. La regulojn tiu ĉi organizo difinas mem, komence laŭ sia bontrovo, poste laŭ la principoj akceptitaj de la tuta organizo. Ĉiu societo el siaj membroj elektas prezidanton. La prezidantoj sciigas la plej proksiman filion de „Ligilo“ pri fondiĝo de societo kaj anoncas nomaron de aliĝintaj al ĝi membroj“.

Krom tiu ĉi programata artikolo en la unua numero de „Kultur-Gazeto“ troviĝas ankaŭ kvin artikoloj, skribitaj de diversnaciaj aŭtoroj, mallongaj aforismoj kaj sciaĵoj. Sed ĝia pli granda parto estas destinita por anoncoj. Ĉar antaŭvidante, ke tiu ĉi gazeto havos milionojn da legantoj, eĉ la grandegaj mondfirmoj kaj malpligrandaj naciaj afable konsentis anoncadi en ĝi. Tial malgraŭ la malfavora rilato al nova gazeto de katolikoj, al kiuj ĝi, kiel predikanta la tro grandan konfidon je homaj fortoj, ŝajnis esti danĝera al religio, kaj de socialistoj, kiuj en la kreado de nova spirita aristokrataro ekvidis la konspiron kontraŭ la proletariaj rajtoj, Fry en unu el sekvantaj numeroj de „Kultur-Gazeto“ povis sciigi, ke de li fondita gazeto havas jam pli ol 6 milionojn da legantoj, el kiuj estas formiĝintaj 150 000 „Kultur-Societoj“. Por plua ordigo de la organizo li dividis Eŭropon en 50 landojn; iliaj limoj estas montritaj en la aldonita geografia karto. Tiuj limoj preskaŭ koincidas kun la limoj de mezgrandaj ŝtatoj: la malpligrandaj ŝtatoj estas kunigitaj en unu landon kaj la grandaj dividitaj en kelkajn landojn.

La societoj de kulturo en ĉiu lando devas krei landan Asocion. Ĉiu landa Asocio devas ĉirkaŭpreni, laŭ montritaj en geografia karto limoj,

10 Provincajn Asociojn. Ĉiun Provincan Asociion ekfaras 10 Distriktaj Asocioj, kiuj havas preskaŭ egalan nombron da lokaj asocioj. Tiamaniere ni ricevas 50 Landajn Asociojn, 500 Provincajn Asociojn kaj 5000 Distriktajn Asociojn.

La loka „Ligilo“ ricevinte la sciigon pri la nove fondiĝintaj en la distrikto „Societoj de Kulturo“ invitas en la daŭro de du monatoj la prezidantojn de tiuj societoj al kunveno, en kiu oni elektas la Prezidanton de Asocio. Post du monatoj kunvenas ĉiuj Prezidantoj kaj el sia mezo elektas provincan Prezidanton. Similmaniere la provincaj Prezidantoj elektas landan Prezidanton. Tiuj elektoj estas provizoraj; la finaj elektoj devos okazi nur post unu jaro.

Al tiu ĉi deklaro estis almetita ankoraŭ jena anonco:

„Promesante en la fino de jaro dividi inter la legantoj de „Kultur-Gazeto“ 200 milionojn da frankoj mi ne havis la celon per la espero de profito allogi la popolamasojn al la legado de mia gazeto. Mi volis nur prepari organizon, en kiu la kapablaj kaj noblaj homoj povu plejfacile levigi el malsupro supren. Mian monon devas ricevi nur tiuj, al kiuj ĝi estas plejbezona aŭ kiuj povos ĝin plejbone laŭ mia penso ekuzi.

Al dek montritaj landaj prezidantoj, — la plej kapablaj kaj plejmulte meritintaj — mi destinas po 1 miliono da frankoj — tio ekfaras 10000000 da fr.

| | | | |
|---------------------------------------|----------|-----------------|--------|
| al restantaj 40 po 200000 . . . | 8000000 | „ | „ |
| al 500 provincaj prezidantoj po 40000 | 20000000 | „ | „ |
| al 5000 distriktaj | 10000 | 50000000 | „ |
| | | <u>88000000</u> | da fr. |

De 200000000 restas 112000000 da fr.

Al tiu sumo mi aldonas ankoraŭ 38 milionojn da frankoj, tial por la pluaj bezonoj de organizo

restos 150 000 000 da frankoj — tiu ĉi sumo devas esti egale dividita inter la lokaj societoj de kulturo, por ke ĉiu el ili komence havu certan kapitalon kaj povu kovri siajn elspezojn.“

La deklaro finiĝas per Fry'a dankodiro al ĉiuj, kiuj per iu ajn maniero helpis lian projektitan kulturan laboron.

V.

La unua kongreso de la landaj Prezidantoj okazas nelonge poste en Parizo, en la loĝejo de l' parlamento. La publiko alvenis en nekalkulebla amaso. Inter 50 landaj prezidantoj sin trovas 4 virinoj. Multaj prezidantoj estas la homoj jam antaŭe mondfamaj per siaj meritoj, 20 el ili ĝis nun estas tute nekonataj. Post mallonga internacilingva alparolo al kunvenintoj Fry, esprimante la ĝojon pro ilia elekto, salutas ĉiun persone kaj transdonas al ĉiu paperujon, ornamitan per Fry'aj monogramoj kun ĉeko, montranta la akiritan el Fry'a oferdonita kapitalo sumon. Multaj ankoraŭ neniam estis vidintaj tiel grandan sumon, tial oni facile povas imagi ilian ĝojon, kiam ili ekvidis sin subite milionuloj. En tiu nombro da elektitoj sin trovas ankaŭ spertinta multe da mizero Giuseppe Ferrari — aŭtoro de la konata himno „Al Dio de estonteco“, al kiu ĉiuj esprimas grandan estimon. La disdonado de premioj finiĝas per sekvanta Fry'a alparolo:

„Miaj amikoj kaj kunlaborantoj! Kuniĝis Vi, Sinjoroj, el ĉiuj landoj de Eŭropo kaj, se ni ne havus la internacian lingvon, mi ne scius per kia lingvo Vin, Sinjoroj, alparoli. Multaj el Vi scias nur Vian nacian lingvon, kiun mi ne komprenas aŭ komprenas ne sufiĉe por ke mi povu per ĝi klarigi la gravajn aferojn, pro kiuj mi Vin, Sinjoroj, ĉi tien invitis. En la sekvontaj tagoj ni devos ne

malmulte prilabori kaj estus al mi tre malagrable, se, ekz., nia amiko Ferrari, kiu scias nur italan lingvon, devus sidi en kunveno kiel mutulo“

Per honorigaj vortoj al la eltrovinto de la internacia lingvo kaj per deziroj de sukceso al la komunaj laboroj Fry finas la unuan publikan kunsidon.

En la dua konsiliĝa kunsido Fry ekparolas preskaŭ per tiuj vortoj:

„Estas al mi tre agrable ekparoli al la parlamento, komenconta la novan en la historio de kulturo periodon. Vi, Sinjoroj, kuniĝintaj el ĉiuj landoj, estas la plej bela floro de la homaro. La princoj de spirito kaj de koro, Vi alvenis ĉi tien ne por solvado de diplomataj problemoj, ne por diskutado pri la apartaj spiritaj kaj ekonomiaj demandoj, sed por meti fundamenton al la loĝejo, mi eĉ dirus, al la homara templo. Vi devos helpi min en la kreo de la regno de kulturo, nescianta iujn ajn ŝtatajn limojn, en la kreado de la superŝtato, en kiun eniros la plej bonaj homoj de ĉiuj landoj. Mi ne havas la celon kuntiri ĉiujn naciojn en unu amason, tio estas revo, kiun eĉ mi ne nomus bela. Mia regno devas esti la regno de la plej bonaj. Tiu regno de kulturo, tiu superŝtato ne similos al simplaj ŝtatoj. Ĉi tiuj estas organizoj de perforto, en kiuj plej ofte la plej kapablaj homoj ne trovas konvenan al si lokon kaj laboron. Nia organizo sin apogos sur la libereco: kiu ne volos — povos ne aliĝi al ĝi, aŭ kiu aliĝis libere, povos eksiĝi. Nia plej ĉefa tasko estos krei la plej taŭgan konstitucion kaj leĝaron por ĝi.

Aliflanke, la ŝtatoj ne povas elektadi al si la ŝtatanojn. Naskiĝis en iu ajn ŝtato iu malsaĝulo, kanajlo, maldiligentulo — li havas egalajn rajtojn kun la plej honesta homo, kun la plej kapabla laboristo. Ne malofte la ŝtataj leĝoj al malsaĝuloj

kaj kanajloj donas plimulte da rajtoj, la okazon havi plimulte da influo, ol al bonaj kaj plej kapablaj homoj, ĉar en la ŝtato regnas principo de la egaleco, kiu pro natura neegaleco de homoj fariĝas ofte la plej granda maljustaĵo. Ni elektados niajn regnantojn laŭ principo de neegaleco, tamen tiun ĉi neegalecon ni ne serĉos en riĉaĵoj, en titoloj, en situacioj de homoj, sed en iliaj naturaj spiritaj kapablecoj kaj talentoj. Ju pli multe da tiuj talentoj iu el ili havos, des pli alta loko en nia regno al li estos destinata.

En la ordinaraj ŝtatoj regas blinda hazardo, kiu malsaĝulojn kaj friponojn levigas en nekonvenajn al ili altecojn, la kapablajn do kaj honestajn — piedpremas en la koton. La tasko de nia regno de kulturo estos senĉesa batalo kontraŭ la regado de tiu blinda hazardo en la homara vivo.

Fine la ordinaraj ŝtatoj per siaj limoj estas sin barintaj kvazaŭ per muroj kaj ofte ekster tiuj limoj loĝantaj najbarojn malame rigardas. El tio ĉi devenis multaj militoj. Nia superŝtato al la kulturaj diferencoj de ŝtatoj favore rilatos, la iliajn malamikajn kontraŭaĵojn ĝi penados per vojo de plialta kunigo forigi kaj inter ili pacon subtenadi.

Sendube, tiu nia superŝtato estas ankoraŭ malproksima, sed mi esperas, ke ni preparos la vojojn al ĝi. Nur estas necese tuj komenci la laboron.“

Ĉi tie la parolanto dankeme memorigas du virojn: sian patron, kiu, kolektante por tiu ĉi alta celo destinitan kapitalon, laboris senripoze, kaj sian amikon prof. Linnert', kiu tiun ĉi altan celon pli klare formuligis. Post la Fry'a parolado parolas prof. Linnert preskaŭ tiel:

La modelo por la regno de kulturo devas esti la katolika Eklezio. Ĉi el propravole en ĝin eniĝantaj membroj fariĝis la superŝtata organizo, al

kiu eĉ princoj kaj reĝoj kliniĝis. Kiel en la Eklezio la ordinara pastro per gradoj povas aliri ĝis la kardinala kaj eĉ ĝis la papa alteco, tiel devas esti ankaŭ en la regno de kulturo. Ĉe la nuntempa ordo la reĝa filo, estu li eĉ malsaĝulo, heredas patran seĝon kaj kronon; tiu do, kiu ne naskiĝis en reĝa loĝejo, estu li eĉ geniulo, ne havas rajton okupi la reĝan seĝon. Tiamaniere la plej bonaj kaj la plej kapablaj homoj pereas al homaro nefarinte tiom da bono, kiom ili estus povintaj fari; la homoj do de malforta saĝo kaj de malforta volo, kronitaj degeneruloj administras naciojn kaj regnojn kaj gvidas ilin nemalofte en abismon. Se la plej saĝaj kaj la fortkarakteraj homoj fariĝus plimulte ŝatataj kaj povus plisukcese influi la vivon de la societo, nia kulturo levigus rapide supren. Sed ordinare ili estas nekuraĝaj, cedemaj, ili ne scias flati la potenculojn de tiu ĉi mondo, tial plej ofte ili restas depuŝitaj malsupren per la senvaloraj karieristoj.

En la regno de kulturo tio ne estos: ĉi tie la plej kapablaj kaj plej noblaj de ĉiuj landoj homoj per la vojo de elektado havos okazon okupi la reĝajn lokojn. Fry donos al ili da havaĵo, por ke ili povu vivi laŭreĝe. Tiamaniere kreiĝos la nova spirita aristokrataro, kiu poste akiros eĉ la universalan rekonon de la mondo.

La voĉo de la prezidantoj de kulturo estos aŭskultata en Eŭropo, kaj ilin elektinta kaj subtenanta el ĉiuj nacioj formiĝinta organizo donos al iliaj vortoj decidan valoron. La apartaj princoj de kulturo fariĝos centroj, ĉirkaŭ kiuj kolektiĝos la kultura vivo, kaj ilia influo, ĉiufoje kreskante, eĉ en la sferoj malfavoraj al societoj de kulturo, pli-grandigos.

La regno de kulturo havos siajn gazetojn, per kiuj ĝi disvastigos la ideojn de kulturo kaj la tutan homaran vivon povos direkti en la konvenan sulkon.

Pensi, ke la regno de kulturo detruos nuntempajn regnojn, estus eraro. Kiel homoj, tiel ankaŭ la ŝtatoj estas neegalaj, tial ili povas kreadi siajn kulturojn nur aparte. Sed tiuj ĉi diferencoj de ŝtatoj ne malhelpos al ilia kunigo en la pli vastajn eĉ en tutmondajn unuiĝojn, kio parte jam nuntempe okazas (ekz. unuiĝoj: poŝta kaj telegrafa, Ruĝa Kruca k. a.). Tiamaniere la regno de kulturo per si mem devos disvastiĝi super la ŝtatoj. Ĝi estos la pera ĉeno inter la ŝtato kaj la Eklezio. Aparta homo estas membro de unua kaj de dua, sed nek la unua nek la dua ampleksas plene lian vivon. Ankoraŭ restas en la vivo sufiĉe vasta sfero, en kiu homo al si mem estas lasita, kie li vivas per siaj personaj idealoj kaj interesoj. Kaj ĉi tiun, ĝis nun de neniu ordigatan sferon volas okupi la regno de kulturo.

Ĝi per siaj organizoj penados kunigi homojn per tiuj samaj kulturaj idealoj, plifortigi ilian agadon, helpi al ili la efektiviĝadon de iliaj projektoj kaj fari ilian vivon plej fruktodona por la bono de la homaro.

Fry, kompletigante ĉi tiun Linnert'an paroladon, alparolas denove la ĉeestantojn. Li deklaras, ke por la kreo de la regno de kulturo estas necesaj du objektoj: kapitalo kaj organizo. La kapitalon donas li mem kaj ĝiaj solaj procentoj garantias por unu jaro sufiĉan monon por la komenco. Ĉi tiun sumon pligrandigos ankoraŭ la profito de „Kultur-Gazeto“ kaj ankaŭ la oferdonoj, kotizoj kaj aliaj enspezoj. Ankaŭ tiu ĉi mono estas uzota por subteni kapablajn verkistojn, teknikistojn, eltrovintojn kaj scienculojn, tamen kun kondiĉo, ke

la eldonitajn subvenciojn post finigo de siaj studoj kaj provadoj ili redonu kaj ankaŭ parton de la estonta profito de siaj kreaĵoj ĉiujare ili enportu en komunan kason de la regno de kulturo.

Plue, el tiu samā kapitalo estos fondataj specialaj lernejoj por kapablaj infanoj de malriĉaj gepatroj, kiuj povos poste al la regno de kulturo alporti iom da utilo kaj povos la elspezojn por ilia instruado redoni kun profito.

Plue, li montras la gravecon de societoj de kulturo kaj la principojn de ilia kreo. La ĉefa principo estas libereco. La societoj de kulturo povos havi la plej diversajn formojn. La sobruloj havos sian societon, la katolikoj sian, la framasonoj k. t. p. Ĉiu el tiuj societoj havos sian prezidanton. Laŭ supre montrita maniero de elektado poste estos ankaŭ elektataj la distriktaj, provincaj kaj landaj prezidantoj. En mia por 12 jaroj difinita budĝeto estas destinitaj salajroj: al landaj Prezidantoj po 1 miliono da frankoj, al Provincaj Prezidantoj po 100 000 da frankoj kaj al Distriktaj Prezidantoj po 20 000 da frankoj.

Por la regado de la tuta regno de kulturo la landaj prezidantoj el sia mezo elektas unu ĉefprezidanton de la regno, la 50 landaj prezidantoj formas la plej altan Konsilantaron de la Regno de Kulturo. Krom tio estos organizataj apartaj juĝejoj, kiuj, agante laŭ la plialtaj principoj de libereco kaj justeco, post la profunda esplorado de afero deklarados la kondamnitajn de ŝtatoj homojn senkulpaj aŭ la senkulpigitajn de ŝtatoj — kulpaj. La ĉeftasko de tiuj juĝejoj estos gardadi, por ke la plialtaj oficoj en la regno de kulturo ne estu donataj al neindaj homoj.

La ĉefurbo de la regno de kulturo estos elektata Haago; tie loĝos la prezidanto de la regno. De

tempo al tempo estos tien invitataj por diskuto kaj decido de komunaj aferoj la landaj prezidantoj.

Ĝis nun la kulturalan progreson malhelpis pleje du kaŭzoj: unue la manko da saĝo ĉe sufiĉa kapitalo, aŭ manko da kapitalo ĉe alta saĝo. Nun ĉi tiuj baroj estas forigitaj. Ĉiu, kiu havas bonan projekton, povas anonci ĝin en Kultur-Gazeto al la tuta mondo kaj, se tiu ĉi projekto estos aprobita de specialistoj kiel utila, en nia regno de kulturo li trovos ĉiam sufiĉe da mono por ĝia efektivigo.

Post tio, montrante la gravecon de kultura organizo, la bezonon krei Eŭropajn Unuigitajn Ŝtatojn, la barbarecon de militoj, la neprokrasteblecon disigi la ŝtaton kaj la Eklezion, parolas diverslandaj reprezentantoj (de Francujo, Svedujo, Italujo kaj Rusujo). Al ĉiuj respondante, Fry ankoraŭ substrekas, ke laŭ lia opinio la plej ĉefa tasko de la regno de kulturo estas — kunigi la plej kapablajn por kulturo homojn kaj ne permesi, ke ili pereu senutile. Ĉiuj aliaj idealoj, ĉu ili estas politikaj ekz. monarĥio aŭ respubliko, ĉu religiaj: jesiga aŭ nea rilato al la Eklezio estas demandoj dua-gradaj; poste ili per si mem trovos devan solvon. Nune do oni devas sin apogi sur la principoj de libereco kaj ne malŝati iun ajn personan konvinkon.

VI.

La Pariza kongreso donas al la Eŭropa preso okazon plilarge preparoli la nove fonditan regnon de kulturo. La liberalaj organoj riproĉas al Kongreso, ke ĝi ne havas klaran por sia plua agado programon; la konservatistoj vidas en la projektataj kulturaj juĝejoj danĝeron por la ŝtata ordo kaj konsilas fermi la societojn de kulturo — kiel la vekantajn ian novan malklaran „konsciencon de kulturo“, disvastigantajn la pacifismon. La el-

metita ideo de internaciismo, kiu povas, laŭ naciistoj, senfortigi naciajn idealojn, timigas ilin. Tial naciistoj laŭ Fry'a maniero proponas organizi ankaŭ naciajn societojn, por ke ĉi tiuj batalu kun la Fry'aj. La socialistoj indignas pro Fry'a projekto krei novan, per milionaj salajroj pagatan, spiritan aristokrataron kaj timigas laboristojn, ke tiuj milionoj devos esti per ilia sanga ŝvito kunmetotaj. Ankaŭ la katolikaj organoj estas nesufiĉe kontentigitaj de Fry'a organizo, ĉar kvankam ĝia kreanto imitis la modelon de la katolika Eklezio kaj inter 50 landaj prezidantoj estas kelkaj katolikoj, tamen la en Pariza kongreso tusita de ruso Lubeznikov demando pri disigo de la Eklezio kaj la ŝtato, al la katolika preso ŝajnas esti des pli danĝera, ke Fry mem en sia respondo substrekis nur, ke la preparolata disigo ne eniras en la programon de lia organizo. Tial poste, kun la ŝanĝo de la personaro, laŭ ili, povas leviĝi al la Eklezio „ne malgranda danĝero en la formo de nova kulturkampfo“.

La Virina gazeto ne vidas danĝeron kaj esprimas ĝojon, ke la Fry'a organizo ankaŭ al virinoj ne baras la vojon al la partopreno en la komuna kultura laboro kaj permesas al ili okupi en la regno de kulturo eĉ la plej altajn oficojn de prezidantinoj. Fry juste levis la principon de homa neegaleco, ĉar ĉu povas esti pligranda neegaleco ol tiu, kiu estas inter la viro kaj la virino. Tiun naturan neegalecon oni ne devas forigi. Tial la viroj disvolvigu sian virecon, la virinoj sian virinecon. Al la kulturo ambaŭ estas egale utilaj.

Certe, en la nombro de herooj pli multe estas da viroj. Tamen herooj talentoj ne estas transdonataj al la idaro. Krom tio multaj herooj restas eĉ needzigintaj. Sed laŭ historia atesto ili havis

kapablajn patrinojn. Tial la rolo de virino, kiel de patrino, estas treege grava. Sed la blinda fatalo kun la virinoj agas pli kruele ol kun la viroj. La stultaj anserinetoj edziniĝas, okupas altajn rangojn en la societo, la kapablaj fraŭlinoj, pro malriĉo depuŝitaj en ian ajn fabrikon aŭ eĉ en la pli abomenan lokon, devas velki. La virina movado ĉi tie malmulte helpis. La Fry'a organizo povos servi al ili pli bone kaj pli trafe.

Ankaŭ la junulara gazetaro Fry'an organizon entuziasme akceptas; ĝi instigas kuniĝi en societojn de kulturo, ĉar al ĉiu kapabla junulo ili donas okazon leviĝi supren kaj okupi konvenan laŭ siaj kapablecoj lokon en la societo.

La Fry'a „Kultur-Gazeto“ notinte tiujn diversajn opiniojn de la Eŭropa preso, ankoraŭ unu fojon substrekas, ke la Fry'a organizo ne estas ia utopio kaj ke oni ne povas rigardadi ĝin kvazaŭ ian ajn politikan partion. La partio zorgas pri akiro de potenco en la ŝtato kaj pri atingo de materiala profito. Ĉi tie estas grava la nombro de anoj, sed ne ilia boneco. En la Fry'a organizo la plej grava afero estas — disvolvigi la personajn kapablecojn kaj ilian influon je la komuna kulturo. Tial ĉi tie la lokojn de princoj de kulturo povas okupi ne la trudemaj karieristoj, sed nur la homoj de kulturo. Krom tio oni ne devas forgesi, ke la nombro de princoj de kulturo estas limigita. Ekz. London'o kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj ekfaras apartan landan unuigon, tial ĝi havas nur unu reĝon de kulturo, 10 princojn de kulturo kaj 100 grafojn de kulturo. Sed tie estas 3000 da societoj de kulturo; tiamaniere unu grafon de kulturo elektas 30 societoj. Tial estas neniu danĝero, ke la oficojn de grafoj de kulturo aŭ eĉ pli altajn povu okupi neindaj homoj, despli, ke la princoj de kulturo devas zorgi,

por ke ĉiuj Fry'aj societoj fariĝu veraj kultur-societoj, sed ne iaj ajn profesiaj aŭ partiaj kluboj.

Kvankam ĉi tiuj vortoj de la oficiala organo montras, kio la societoj de kulturo ne estas, tamen per tio ne estas dirite, ke ili neenmiksiĝos tute en la politikon. Kontraŭe, sciante, ke la politiko estas unu el la plej grandaj faktoroj de la kulturo, la Fry'a organo nelonge poste instigas siajn glegantojn arigi en la parlamentoj de la tuta mondo kaj ekfaradi specialajn „partiojn de kulturo“ por akiri pli multe da influo je la loka vivo. Tiuj novaj partioj, el unu flanko sin apogante sur tiel potenca internacia organizo, kia estas „Ligilo“, el la dua, havante tian tutmondan organon, kiel „Kultur-Gazeto“ fariĝas baldaŭ ĉie la forto, kun kiu devas kalkuli ĉiuj malplijunaj partioj. La „partioj de kulturo“ enportas projekton de la universala „kultura depago“, kiu estas uzota nur por bezonoj de kulturo. La preso tion taksas diversmaniere. Al unuj tio ŝajnas esti ŝarĝo, kiu falas sur la ŝultrojn de laboristoj, aliaj ĉi tiun projekton subtenas sin apogante sur tio, ke la kulturo estas nek internacia nek nacia, sed homa, kaj postulante nur, ke tiu „kultura depago“ estu libera, nedeviga, kaj ke la kolektita tiamaniere mono estu metata ne en ŝtatan kasejon, sed transdonata al lokaj regionaj „organizoj de kulturo“.

VII.

La plua disvastiĝo de kulturo iras per si mem kaj nelonge poste ĉirkaŭprenas la tutan kulturan mondon. Ĉiuj plej grandaj ŝtatoj havas po unu reĝo de kulturo, po kelkdekoj da princoj kaj po kelkcentoj da grafoj. Tiuj ne laŭ naskiĝo, sed per personaj meritoj kronitaj homoj akiras ne malpli grandan valoron kaj honoron ol la ŝtataj estroj

kaj iliaj helpantoj. Samtempe kun tio en ĉiuj landoj kreskas ankaŭ la forto de kulturaj societoj. Tiu forto en sia esenco estas morala, sed en la bezono ĝi montriĝas ankaŭ en la politika sfero sufiĉe forta. Kiel tiu forto estas uzebla por kulturaj celoj, oni povas kompreni el sekvanta fakto okazinta en Rusujo.

Kiam la rusa caro Petro IV malpermesis la societojn de kulturo kaj ekziligis en Siberion unu princon de kulturo, aliaj kulturaj princoj de Rusujo sendas al Fry, kiel al la prezidanto de la regnoj de kulturo en tuta Eŭropo, la kolektivan plendon. Fry en ĝentila formo skribas al la caro publikan leteron kaj en la nomo de 20 milionoj da rusoj, kiuj per la cara ordono sin sentas ofenditaj, petas lin forigi malpermesantan la kulturajn societojn ordonon kaj liberigi la ekzilitan kulturajn princon Paul'on Neruŝkin'on.

La caro publike deklaras, ke ĉefa estrapotenco en Rusujo estas en liaj manoj kaj ke neniu havas rajton enmiksiĝi en rusajn aferojn.

La tutmonda preso ĉi tiun caran paŝon kondamnas kaj komencas instigadi siajn estrarojn, por ke ili subtenu Fry'an justan plendon. La caro, laŭ ili, povas la Fry'an plendon forjeti, sed la voĉon de la Eŭropaj ŝtatoj li ne povas malŝati. En Petrogrado la ambasadoroj de Eŭropaj ŝtatoj, petinte aŭdiencon de l' caro, en la nomo de siaj ŝtatoj atentigas lin, ke la Fry'a organizo estas internacia kaj ke ĝin gardas la tuta Eŭropo, tial la subteno de Fry'a peto estas ilia devo. La caro malvarme respondas, ke la estro de sia ŝtato estas ne Fry, sed li mem.

Ĉi tiu fiera respondo ofendas la Eŭropajn estrarojn. Anglujo kaj Germanujo malkaŝe deklariĝas kiel kontraŭuloj de cara potenco. Nelonge poste

Francujo ankaŭ aliĝas. Tiamaniere la tuta Eŭropo ribelas kontraŭ la caro. Tiu ĉi ektimis kaj, anoncante, ke li ne volis ofendi la tutan Eŭropon, sed nur volis sin defendi de la Fry'a atenco je siaj suverenaj rajtoj, moliĝas. Por ekmontri sian bonan volon li ordonis, ke Neruŝkin estu liberigita, sed forigi la malpermeson de la societoj de kulturo, li ne povas konsenti, ĉar tion postulas la ordo kaj paco de sia ŝtato.

Tiam la reĝoj de kulturo de ĉiuj landoj pro Fry'a nomtago kunveturas Haagon por konsiliĝi, kiel oni devas rilati al la senkulpigo de Rusa caro. La konsiliĝoj finiĝas per rezolucio-liberigi la tutan nacion de cara despotismo kaj Eŭropon de la danĝero minacanta al ĝia kulturo. La ŝtatoj devas esti ne estroj de kulturo, sed ĝiaj servistoj. Tial oni kunsentis kun la metita devizo: „La Unuigitaj Eŭropaj Ŝtatoj, batalu kontraŭ la cara potenco.“

Dum la Haagaj konsiliĝoj komenciĝas ĉe la rusa-fina limo ribeloj. Japana-fina armeo en kelkaj lokoj transiras limon de Rusujo. La Petrograda estraro malesperas. La caro revokas sian malpermeson de la societoj de kulturo. En Moskvo ankaŭ ribelas. La popolamaso postulas respublikon. La militistaro rifuzas pafi la homojn. Revolucio ampleksas la tutan Rusujon. La caro, nevidante eliron, rezignas la tronon. La elektita rusa reĝo de kulturo Neruŝkin kreas provizoran estraron. Oni redonas al la preso plenan liberecon.

Dum Neruŝkin konsiliĝas, kian formon de regado alpreni al la estonta Rusujo: monarhion aŭ respublikon, kunvenintaj en Parizo diplomatoj diskutas alian pli gravan demandon pri la pli intima kunigo de Eŭropaj ŝtatoj kaj pri la kreado de komuna armeo kontraŭ la leviganta en la Oriento fina-japana danĝero. La devizo de Eŭropaj Unuigitaj Ŝtatoj

neestas jam konsiderata utopio, oni serĉas nur al tiu kofinna ŝtata organizo la plejtaŭgan formon. La germanaj gazetoj por ordigi la estontajn Eŭropajn Unuigitajn ŝtatojn konsilas preni modelon el Germanujo, en kies konstitucio trovas plenan garantion de siaj rajtoj kaj la grandegaj regnoj, kiel Bavarujo kaj Saksajo, kaj la malgrandaj princlandoj kaj eĉ la respublikoj. Sed al kiu komisiu la regadon de Eŭropaj Unuigitaj Ŝtatoj, kiu devus esti la reĝo de la tuta Eŭropo? Ĉi tiu demando aperas multe pli malfacila. La angloj diras, ke en tiu alta loko al ili estus agrable vidi sian estron. La katolikoj proponas la Roman Papon. Laŭ aliaj opinioj la plej inda homo de tiu honoro estas la prezidanto de kultura regno, sinjoro Fry. Tamen ĉi tiu la prezidantecon rezignas kaj tiu alta loko transiras al la fama Rusa reĝo de kulturo, sinjoro Neruŝkin. Kaj por la estonto estas decidita, ke la respektiva prezidanto de kultura regno estu samtempe ĉefo de Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo. Alie en Ameriko.

* * *

Per tio finiĝas tiu ĉi originala Nienkamp'a preskaŭ romano.

Al la originaleco de enhavo konforma estas ankaŭ la originala formo de Nienkamp'a verko. Ĉar ĉi tie ĉio estas prezentita ne per maniero de sencese dauriga rakontado, sed per la helpo de intence metitaj eltranĉaĵoj el diversaj gazetoj. Per tio oni atingas du celojn: ĉiun en la libro tuŝitan demandon oni lumigas el diversaj flankoj kaj samtempe la rakontadon oni faras pli similan al vero. La leganto instinkte antaŭsentas, ke se la Fry'a regno de kulturo iam ajn komencos formiĝi, la organoj de diversaj direktoj devos ĝin rigardadi tiel, ne alie. La talento de aŭtoro ĉi tie aperigas

precipe en la lerteco, kun kiu li priskribas la ideologion de ĉiu direkto, substrekante en ĉiu estantan relativan veron.

VIII.

Prezentante la enhavon de sufiĉe dika (de 380 da paĝ. in -8) Nienkamp'a libro, ni penis, kiel eble, la aferon mallongigi. Tial nevolante tromulte deklinigi flanken, ni ellasis multe da interesaj epizodoj, ekz. pri la atenco de unu sektistofanatikulo, dezirinta mortigi Fry'on, pri la procesoj solvataj en kulturaj juĝejoj, pri kelkaj interesaj demandoj, pritraktitaj en „Kultur-Gazeto“ k. t. p. Nia plejĉefa tasko estis la sola lumigo de la genezo kaj de la organizo de la regno de kulturo. Tiu sama afero ekinteresis ankaŭ la aliajn legantojn de „Senkronaj Princoj“. Ĉi tiu libro en Germanujo faris grandan impreson. La viroj kaj la virinoj, la politikistoj kaj la publicistoj, la riĉuloj kaj la mizeruloj trovis en ĝi multe da taŭgaj kaj kunsentindaj opinioj, sed samtempe ili trovis ankaŭ kelkajn malklarajn demandojn, kiuj naskis diversajn dubojn. Por forpeli tiujn dubojn oni sin turnadis al la aŭtoro per privataj leteroj kaj per gazetoj. Kaj li ricevis grandan nombron da tiaj leteroj kaj demandoj. Unuj la aŭtoran celon nomis neefektivigebla utopio, aliaj riproĉadis la verkiston, ke li ne komprenas la rolon de mono en la socia vivo, triaj—la adeptoj de etika kulturo—indignis, ke la aŭtoro volas per la mono levi la moralecon k. t. p.

Ne povante respondi al ĉiu aparte, Nienkamp eldonis nelonge poste novan verkon, nomitan: „Grundlagen der Fürsten ohne Krone. Leitsätze zur Reform der Gesellschaft“ (Vita, Deutsches Verlagshaus Berlin, Charlottenburg, 129 paĝoj in -8). En ĝi la aŭtoro ne disputas pro nomo de utopiisto, sed montras nur, ke li diferencigas de tiuj utopiistoj,

kiuj volas aliigi homojn ne konsiderante rilatojn de la vivo, aŭ reformi nur rilatojn de la vivo ne-konsiderante la homojn. Unuj diras, ke estas necese la homojn perfektigi, kreskigi en ili kompatemon, amon je la proksimulo, virtecon, piecon, tiam la rilatoj de vivo pliboniĝos per si mem kaj sur la tero fondiĝos Dia regno. La aliaj proklamas: difinu la ŝtato nur plibonan manieron por divido de riĉaĵoj, enkonduku la pli taŭgan teran reformon, malpermesu la procentojn, ekŝtatumu la terkulturon de regiono, permesu al popolo pli multe partopreni en la administrado de regiono, tiām—la krimoj ĉesos kaj la homoj fariĝos pli bonaj, pli feliĉaj... Fine la anarhistoj esperas alporti paradizon al la homaro, kiam post la pereado de ŝtato kaj de Eklezio, ĉia estraro kaj perforto plu ne ekzistos. La aŭtoro ne pensas ion similan; ion detruiri ne eniras en lian programon. Li ne promesas reformi la homojn aŭ la ŝtatojn; li prenas la homojn kaj la ŝtatojn kun ĉiuj iliaj perfektecoj kaj difektoj—tiajn, kiaj ili estas, kaj volas nur kun helpo de speciala organizo kaj kapitalo, kiel rimedoj, liberigi de servado al kapitalo la noblajn kaj kapablajn homojn kaj tiamaniere prepari al la homaro la vojon al pli bona kaj pli kultura estonteco.

Ke tiu lia celo estas certe ebla kaj plene efektivebla, tion la aŭtoro elmontras per vere konvinkantaj argumentoj; samtempe li montras ankaŭ la organizon de siaj societoj de kulturo, ilian dividon, ordigon, iliajn organojn de administrado, la manierojn de ilia elektado k. t. p. Ĉio estas priskribita klare, sisteme kaj praktike. Ĉi tiu verko finiĝas per larĝe ellaborita regularo por la societoj de kulturo, konsistanta el 51 §. Elmontrinte, ke tiaj societoj estas eblaj teorie, Nienkamp, estante certa pri ilia graveco, komencis ilin efektivigadi ankaŭ

en la praktiko. Lia fondita societo „Ligilo“ jam komencis agadi. Kiu volas havi pri tio pli detalajn sciojn, sin turnu laŭ tiu ĉi administreja adreso: „Geschäftsstelle der „Ligilo“, Gemeinnützliche Vermittlungsgesellschaft m. b. H., Berlin SW 68, Charlottenstrasse 82“.

Nienkamp por disvastigi siajn ideojn kreis en 1918 jaro specialan neperiode elirantan organon, nomigitan: „Mitteilungen des Deutschen Frey-Bundes für seine Mitglieder und andere Kulturfreunde“. La celo de tiu ĉi gazeto estas la pli detala diskutado de la fundamentaj kulturorganizaj demandoj, pri kiuj estis parolita en la libro „Fürsten ohne Krone“, la informado de gelegantoj pri germanaj Frey'aj unuiĝoj kaj pri disvastiĝo de „Ligilo“, la donado de sciigoj pri nova, al tiuj demandoj dediĉita literaturo, la notado de voĉoj de la preso k. t. p. En unu numero de tiu ĉi gazeto estas presita interesa versaĵo de germana poeto Grillparzer, kiu jam longe antaŭ Nienkamp revis pri unu internacia etika kaj kultura ordeno. (Internationale Orden für Ethik und Kultur.) Jen teksto de tiu versaĵo:

Mi nur elpensis la ordenon novan,
Kiun nek nasko nek la glavo donas;
Nomiĝu packreantoj ĝin portantoj.
El la plej bonaj viroj de la mondo
Elektos ilin mi, ne al si mem servantaj,
Sed al la fratoj en akraj doloroj,
Por ke tra l' mondo ili dissemitaj
Batalu plue kontraŭ la malpaco,
Kiun la avareco kaj la falsa gloro
Naskas en ĉiuj ŝtatoj de la tero, —
Kaj kreu de publika rajt' juĝejon ¹⁾.

¹⁾ Ich hab' erdacht im Sinn nur einen Orden,
Den nicht Geburt und nicht das Schwert verleiht,

Nienkamp, juste nomata „sociale-teknika eltrovinto“, pozitive formuliginte tion, pri kio Grillparzer, kiel poeto, nur revis, nuntempe jam komencas ĝin efektiviĝi. Kaj ĉar Berlin'o estas tre proksima de Litovujo kaj ĉar la litovoj estas favoraj al ĉiuj novaj ideoj, sendube, la projektitaj de Nienkamp societoj de kulturo post la milito komencos fondiĝi ankaŭ en pligrandaj urboj de Litovujo. Pro tio oni povas vere ĝoji, se nur ili iros per montritaj de Nienkamp kulturaj vojoj. Jen estis la ĉefa motivo iginta nin prezenti ĉi tie kelkajn informojn pri la geniala Nienkamp'a ideo kaj pri liaj unuaj paŝoj, faritaj por ĝin efektiviĝi.

Ĉu lia „Regno de Kulturo“ fariĝos vera reguligilo de l' homara vivo kun la ŝtato kaj la Eklezio—tion respondi hodiaŭ estas malfacile. La pliprofunde pensantaj filozofoj jam antaŭ longa tempo konsentis, ke la ideoj estas la fortoj (idées-forces). Kaj tiu ĉi milito ĝin plene konfirmis, ĉar la finaj iloj de venko en ĝi estis ne pafitegoj nek kuglojetiloj, sed la ideoj. Tial oni povas esperi, ke la Nienkamp'aj ideoj iam ankaŭ enkorpiĝos. Al ni restas esprimi nur la deziron, por ke ĝi efektiviĝu plej baldaŭ.

Tradukis R. Blažys.

Und Friedensrichter soll die Schar mir heißen.
Die wähl' ich aus den Besten aller Länder,
Aus Männern, die nicht dienstbar ihrem Selbst,
Nein, ihrer Brüder Not und bitterm Leiden;
Auf dass sie, weithin durch die Welt zerstreut,
Entgegenreten jedem Zwist,
Der Ländergier und, was sie nennen Ehre,
Durch alle Staaten sät der Christenheit, —
Ein heimliches Gericht des offenen Rechts!



Pri la litova arto.

De Ignas Šlapelis.

I.

La malnova litova popolo sendube havis ankaŭ sian malnovan arton, ĉar ĝis nun estas trovita neniuj popolo, kiu ne estus havinta pli aŭ malpli alte disvolvitan arton.

La granda inklino al arto de nuntempaj litovoj igas nin supozi, ke ankaŭ la antikvaj litovoj tre emis sin okupi pri arto.

Sed el plej antikva idolana tempo postrestis preskaŭ neniuj artobjektoj, almenaŭ en regiono de plastiko, ĉar la apostoloj de Litovujo, disvastigante la kristanismon, tiel fervore ekstermadis ĉion, kio memorigadis pri la idolanismo, ke eĉ restaĵojn de arto ili ne indulgis, ĉion neniiĝis.

Se ni hodiaŭ tamen ion scias pri la idolana arto de litovoj, tion ni ŝuldas al postvivintaj en kristana arto elementoj de idolana arto. Ĉar estas ja certe, ke en Litovujo ne alie okazis, ol en aliaj landoj, nome, en malnovajn formojn estis metita nova enhavo, kiel ni tion vidas en la frua kristana arto en Romo. Tiajn ekzemplojn ni povas trovi ankaŭ en Litovujo; ekzemple, la krucoj, starigataj sur la tomboj, iom similas urnojn, kio signifas rememoron pri tiuj tempoj, kiam litovoj forbruligadis siajn mortintojn kaj metis ilian cindron en urnojn kaj starigis sur tomboj.

Krom tio, pri litova arto kaj ĝia karaktero en idolana tempo ni povas ekscii el artrestaĵoj de niaj pli feliĉaj najbaroj, kiaj estis la finnoj, ĉar kiel pravas

la kompara folkloro de la litovoj kaj finnoj, inter tiuj ĉi du popoloj estis multe da komuneco. La plej grava estas la pruvo, ke iam finnoj kulture staris pli malalte ol tiamaj litovoj, kaj kiel tiaj, starante kulture pli malalte, multon ili prunteprenis de litovoj, inter alie ankaŭ la artoformojn. Tial la antikvaj artrestaĵoj de finnoj estas atestantoj pri tio, kia estis tiutempa litova arto, aŭ almenaŭ kiaj estis kelkaj formoj de tiama litova arto. .

Ĉiuj artrestaĵoj, kiuj konserviĝis ĝis hodiaŭ, devenas el pli malfruaj, kristanaj tempoj, kaj tio atestas, ke litova popolo vivis per arto kaj inter artaĵoj; en pli malfrua tempo la situacio ŝanĝiĝas, kaj kiel ĉie en Eŭropo, tiel ankaŭ en Litovujo la vivo malproksimiĝis de la arto.

La arto plej necesa al la vivo kaj plej firme kun ĝi ligita, estas dekorativa aŭ aplika arto. La ornamado estas la ĉefa elemento de simplepopola arto, tial nur ĝi prosperadis dum ĉiuj epokoj en Litovujo. En la ĉiutaga vivo ekzistas neniu aĵo, kiun la popolo ne ornamus. Estas mirige, ke tre ofte la produktajoj de iu metiisto, destinitaj por la ĉiutaga uzado, surhavas stampon se ne de genulo, tiam almenaŭ de granda talento, kaj ni trovas en ili mirindan harmonion, lertecon kaj virtuozecon de plenumo, kaj samtempe ankaŭ seriozan kaj noblajn belon.

Ŝajnus, kian intereson povas havi vilaĝano por la arto, kaj tamen la arto en vilaĝoj disvolviĝadis kaj floris ne por montro en muzeoj, sed por uzado en la vivo mem, komencante de ŝpinilo, tolajlavilo kaj rastilo, finante per preĝejo.

En la dekorativa arto oni povas ĉiam diferencii du direktojn: la arto en plej larĝa vortosenco estas la arto de vivbezonaĵoj, ĉar ĉi tie la artisto kaj konsumanto kutime estas la sama persono. Tia

estas, oni povas diri, la tuta „popola arto“. La aliaj artobjektoj estas destinitaj por la specialaj vivokazoj, kiel ekzemple, preĝejo; en ĉi tiu artregiono ni renkontas jam apartajn nomojn de artistoj.

Ambaŭ ĉi tiuj branĉoj de la arto fluas el la sama fonto kaj diferencigas unu de alia nur per la kvalito de aplikata materialo kaj per la perfekteco de ĝia prilaboro.

Kvankam ĉi ambaŭ branĉoj historie estas firme interligitaj, tamen ĉiu el ili havas siajn apartajn disvolviĝvojojn kaj sian historion.

Kompreneble, la nacian arton plej bone karakterizas la simplepopola arto, ĉar ĝi estas plej memstara, fluanta el profundaĵoj de nacia spirito, kaj plej malmulte infektita per fremda influo. Kvankam la influo de najbaroj kaj de fremdaj stiloj ĉi tie ankaŭ estas iom sentata, sed tamen en la kreaĵoj de simpla popolo flanke de novaĵoj ni renkontigas kun plej malnovaj tradicioj kaj eĥoj de travivaĵoj en plej malproksimaj estintaj epokoj.

La tutan litovan simplepopolan arton oni povas dividi en du grandajn partojn: lignan skulpturon kaj teksaĵojn. Krom tiuj du sekcioj ni trovas ankoraŭ pentrarton, kies apliko en la artproduktoj de litova simpla popolo tamen ne estas granda: ĝin ni renkontas nur en ornamado de veturiloj, mebloj, ovoj kaj aliaj. La preĝeja pentrarto en Litovujo ne havas multon komunan kun simplepopola arto, ĉar la preĝejajn laborojn kutime plenumas majstroj, malproksimiĝintaj de simplepopola vivo, uzantaj fremdajn modelojn kaj sekvantaj fremdan guston.

Do, la tutan preĝejan arton ni ne povas alkalkuli al simplepopola arto, sed estas sendube, ke eĉ fremdaj majstroj baldaŭ subiĝas al la in-

fluo de simplepopola arto de tiu lando, kie ili konstruadas preĝejojn.

La plej belaj monumentoj de simplepopola arĥitekturo estas la ĉe vojoj starigataj kapeletoj kaj krucoj kun tre riĉaj arĥitekturaj motivoj kaj plej diversaj ornamantoj komencante de geometriaj kaj finante per kreskajaj kaj simbolaj. La plej ŝatataj simbolaj motivoj de la litovoj estas serpento—signo de prudento; ĝi, eble, rememorigas ankaŭ la malnovajn tempojn, kiam litovoj ĝin adoradis; krome, ofte oni renkontas birdon, precipe kolombon, kiel simbolon de senkulpeco.

En preĝeja arĥitekturo oni rimarkas grandan influon de gotika, romana kaj baroka stiloj. Kvankam la stiloj ĉi tie estas jam konsiderinde ŝanĝiĝintaj, miksiĝintaj kun la loka popola arto, tamen oni renkontas tre belajn modelojn de gotiko, ekzemple, la preĝejo de Sankta Ano en Vilnius, konstruita en la XIV jarcento, sed sian nunan aspekton ricevinta en la XVI jarcento. Pri la beleco de ĉi tiu preĝejo atestas la fakto, ke ekvidinte ĝin Napoleono bedaŭris, ke li ne povas sur sia manplato ĝin transporti en Parizon.

De romana kaj baroka stilo en Litovujo ni havas multajn plej belajn ekzemplojn, inter kiuj la unuan lokon okupas la preĝejo de instruistinoj monaĥinoj (de sta Kazimiro) en Paŝasliai proksime ĉe Kaunas. Ĝi estas plensence ĉefverko de baroka stilo. En ĝi ni trovas tiajn detalojn de baroko, kiuj aliloke apenaŭ estas troveblaj. Ĉi tiu monaĥejo estas konstruita en la tempoj de episkopo Paco kun helpo de el Italujo invititaj arĥitekturistoj kaj pentristoj.

La litova skulpturo, precipe la popola skulpturo, estas plej parte ligna kaj treege interesa. Ĝiaj motivoj estas preskaŭ senescepte religiaj: la

suferoj de Kristo, Sankta Johano Baptisto, starigata ĉe riveretoj, kaj ĉiuj aliaj sanktuloj. Multaj ekzemploj de ĉi tiu skulpturo kuraĝe povus konkuri kun plej bonaj italaj skulptaĵoj rilate al primitiva esprimmaniero kaj al virtuozece de plenumo.

Inter la multaj direktoj en ĉi tiu skulpturo estas menciindaj du klaraj direktoj: naturalista kaj idealista.

En la litova simplepopola arto tre gravan lokon okupas la teksaĵoj. Ili estas produkto de litovaj virinoj, kiuj ĝis la lasta tempo plej ofte ne povis skribi kaj ofte eĉ legi. Malgraŭ tio per siaj produktajoj ili elmontras nekutimajn kapablecojn, senkompare disvolvitan guston pri harmoniigo de koloroj kaj grandan komprenon pri komponado. La suda parto de Litovujo produktas plej multe da teksaĵoj kun multkoloraj desegnaĵoj. Desegnaĵoj aŭ ornamantoj estas uzataj plej diversaj; inter ili estas tre multe da kreskajaj motivoj, prenataj el la loka floraro. Ĉi tiuj artaj teksaĵoj estas uzataj ĉefe por antaŭtukoj, juĝoj, litkovriloj. Kaj ĉar ilia produktado estas tre malfacila kaj postulanta multe da tempo, tial ĉi tiu artspeco iom post iom malaperas. La fabrikaj produktajoj baldaŭ ilin forpuŝos el la vivo. Nuntempe multaj junaj virinoj jam ne pli scipovas ilin fari, sed la maljunaj des pli multe ilin ŝatas. Ofte oni povas vidi, kiel iu maljunulino pro neniam konsentas fordoni sian belan antaŭtukon, konservante ĝin por sia postmorta enterigo.

Baldaŭ la artaj produktajoj de maljunulinoj fariĝos maloftaĵoj, pagata per multe da mono. La nuntempaj produktajoj, kvankam penantaj imiti la malnovajn modelojn, tamen neniel povas atingi la altecon de antikvaj, ĉar mankas al ili la kuraĝo kaj harmonio je akordigo de koloroj.

Unuvorte, la litova nacia arto estas granda art-trezoro kaj samtempe fonto, kiu povus revivigi la mizeriĝintan nuntempan arton. Se nuntempe oni povas esperi la reviviĝon de la arto, tiam tiu reviviĝo povos deveni nur el simplepopola arto. Ĉirilate la litovoj estas pli feliĉaj ol multaj aliaj nacioj, ĉar ili havas ne makulitan de viva arto fonton, kiun jam ne plu havas multaj aliaj okcident-eŭropaj popoloj.

La litova simplepopola arto, precipe ĝia ligna skulpturo kaj teksaĵoj, povos kun la tempo servi ankaŭ por reviviĝo de la Eŭropa arto, nur, kompreneble, oni devas ĝin bone kompreni, trapenetriĝi per ĝi, trovi la ŝlosilon, per kiu oni povus malfermi la aliron al ĝiaj trezoroj.

II.

La litova pura arto estas ankoraŭ tute juna frukto, ĵus komencanta maturiĝi. Ĝi ekestis nur kelkaj jaroj antaŭ milito, do, ĝia historio estas ankoraŭ tro mallonga kaj ĝia karaktero ankoraŭ tro nedifinita.

Efektive, en la XVIII jarcento en Vilnius estis artlernejo, sed en ĝi tre malmulte estis de litoveco.

Ĝis la rusa-japana milito Litovujo estis tiom despote premata, ke arto ne povis ĉi tie eĉ ekĝerini.

Nur post reakiro de rajto presadi litovajn librojn kaj jurnalojn, la litovoj povis pli facile ekspiri kaj ankaŭ ilia plastika arto komencis rapide progresadi.

Tuj, kiam estis permesite krei litovajn organizaĵojn, en Vilnius fondiĝis la Arta Asocio, kiu komencis aranĝadi artekspoziciojn, de kiuj antaŭ milito estis kvar. Bedaŭrinde, la mondmilito dezertigis, ruinigis Litovujon kaj haltigis ĝian kulturenan disvolviĝon.

Por fondo de Artasocio kaj por aranĝo de unuaj artekspozicioj la plej grandajn meritojn havas la arkeologo Tadas Daugirdas kaj pentristo Antanas Ŝmuidzinavičius. Ŝmuidzinavičius estas unu el la unuaj niaj protagonistoj kaj tre sperta organizanto. Daugirdas, mortinta en la 1920 jaro, dum sia maljuneco multe sin okupis pri arkeologio kaj la unua turnis ĉies atenton al popola arto kaj ĝia valoro. Laŭ sia tuta scipovo li penadis uzi la motivojn de popola arto en aplika arto. Liaj produktajoj estas konservataj en muzeo de Kaunas.

Antanas Ŝmuidzinavičius kiel pentristo apartenas al malnova generacio, havinta multon komunan kun rusa pentrista grupo „peredvijniki“. Li estas sufiĉe supraja naturalisto, nur pli poste konatiĝinta kun Eŭropa arto. En liaj kreaĵoj estas forte sentebla la influo de franca pentristo Millet, kiun nia pentristo ofte eĉ tute senceremonie imitas. Ŝmuidzinavičius plej bone sukcesas pentrante pejzaĝojn: liaj pejzaĝbildoj estas tre sinceraj kaj humorplenaj. En aliaj kreadsferoj, kiel portretfarado kaj komponado, li estas supraja kaj malvarma. Litovoj konsideras lin nacia pentristo, sed tian pentriston Litovujo ĝis nun ankoraŭ ne havis, eble escepte M. K. Ĉiurlionis.

Al la nombro de unuaj litovaj artistoj oni devas alkalkuli ankaŭ Adomas Varnas. Li ankaŭ estas bona pejzaĝisto. En ĉi tiu artsfero li estis lernanto de la pola pentristo Stanislauski, kies influo estas sentebla en liaj unuaj produktajoj. En siaj pli malfruaj produktajoj li estas pli memstara, forta, sed ankaŭ pli malvarma, pli pensanta kaj malpli sincera. A. Varnas faris multe da bonaj portretoj. Oni devas konsenti, ke kiel portretisto Varnas estas plej forta inter la litovaj artistoj. Nuntempe, penante tro sintezi, li fariĝis tro multe pensanta,

tro artefika, malpli laŭsenta. Rilate al tehniko li ĉie montriĝas bona majstro. Varnas estas unu el plej bonaj litovaj karikaturistoj. En siaj kreaĵoj Varnas estas nacia pentristo, tre ofte pentranta en siaj pejzaĝoj litovan nubkovritan naturon, ĝian malĝojon.

Simila al Žmuidzinavičius kaj Varnas estas ankaŭ pentristo Petras Kalpokas, kiu kvankam plejparte vivis en eksterlando, tamen restis sufiĉe memstara. Liajn kreaĵojn oni povas vidi en eŭropaj bildogalerioj. Li ankaŭ estas bona portretisto, pejzaĝisto kaj karikaturisto, bone li estras la tehnikon de olea kaj akvarela pentrado.

Krom ĉi supre nomitaj pli maljunaj pentristoj estas menciinda tuta vico de pli junaj artistoj, kiel Justinas Vienožinskis, Ignas Šlapelis, Jonas Šileika, Juozas Kodis (jam mortinta), Vaitiekas Staneika, Mackevičius, H. Kairiukštis, Kajetonas Sklerius (skulptisto), Vytautas Bičiunas, Vilius Jomantas (afiŝisto kaj grafikisto), Adomas Galdikas (pentristo kaj grafikisto), Jonas Jaroŝevičius, Janulis — originala aŭtodidakto, Kazys Šimonis kaj ceteraj. Ĝis nun mi ankoraŭ ne menciis la plej grandan kaj plej originalan pentriston de Litovujo M. K. Ĉiurlionis, mortinta en la jaro 1911.

M. K. Ĉiurlionis estas unu el plej originalaj pentristoj ne nur de Litovujo, sed ankaŭ de tuta Eŭropo. Li apartenas al neniuj skolo de nuntempa pentrarto, li estas tute memstara, iranta sian propran vojon.

M. K. Ĉiurlionis sian tutan mallongan vivon — li vivis nur 37 jarojn — okupis sin je muziko, studis ĝin en Varsovia konservatorio, poste en Leipzigo, kaj studis ĝin kun tuta sinfordono kaj granda sukceso.

Pri pentrarto li okupis sin nur la lastajn siajn kvin jarojn, sed kun plej granda sukceso li trovis ĉi tie sian propran vojon kaj iris ĝin, kreante tute eksterordinarajn, mirindajn bildojn ĝis psika. mal-sano ĉesigis lian vivon. Li pensis kaj sentis kiel muzikisto kaj kreis bildojn en plastiko. Kvankam li neniam pensis pri la lastatempe moda problemo pri artsintezo, sed tamen en tiu direkto li multon atingis. En sian pentradon li enportis multe da muzikaj elementoj rilate al harmonigo de kompozicio kaj koloroj, per kiu li ĉarmas la rigardanton. Kaj ankoraŭ pli li alproksimiĝas al muziko en sia pentrado — se oni ĝin povas nomi pentrado — per tuta kunfandigo de formo kaj enhavo, kio ja estas idealo de ĉiu artobranĉo kaj nur de muziko estas pli facile atingebla. Kelkaj liaj bildoj laŭ sia efiko je rigardanto estas tiom proksimaj al muziko, ke ili povas tutmerite havi ankaŭ la nomojn, uzatajn en muziko, kiel ekzemple „Sonato de maro“, „Sonato de serpentoj“, „Sonato de Somero“ k. t. p. kun ĉiuj partoj de tiuspeca muziko.

La aldonataj ĉi tie kelkaj reproduktajoj de liaj bildoj¹⁾ donas nur tre malproksiman komprenon pri lia kreado, ĉar en lia pentrado tre gravan rolon ludas la koloroj. Plej ofte li uzas kolorojn tre delikatajn, mildajn. Flugante per sia fantazio en senlimaj kosmospacoj, li tamen enkorpiĝas siajn viziojn en formojn tre realajn, pro kio la rusa kritikisto V. Ivanov nomis lin plej profunda realisto. Se tio estas vera, tiam M. K. Ĉiurlionis pentradas realaĵojn, kiuj kaŝiĝas sub la trompa eksteraĵo, kiun ni vidas ĉiutage.

La kreitaĵo de Ĉiurlionis estas interesa laŭ diversaj vidpunktoj kaj estas profunde ŝtudinda, kio

¹⁾ Bedaŭrinde, pro neatendita malhelpo ni lastmomente devis rezigni je ilustrigo de nia libro. La eldonantoj.

certe okazos en plej proksima estonteco, kiam liaj kreaĵoj fariĝos por ĉiuj atingeblaj. Dume, kvankam la plimulto de liaj kreaĵoj estas aĉetita de litova ŝtato, tamen pro manko de loko en Kaunas liaj plej multvaloraj 179 pentraĵoj kaj 38 belaj grafikajoj kuŝas enpakitaj, atendante, kiam ni povos reveni en nian sufiĉe grandan ĉefurbon Vilnius, kiun nun tenas polaj okupintoj.

Nian Ĉiurlionis ni povas nomi vere nacia pentristo, kiu ĉerpis la inspiron por siaj vizioj el la litova nacia arto kaj el sia mistera animo.

En regiono de skulpturo la litovoj havas malpli da laboristoj. Estis du grandaj skulptistoj, kiuj mortis dum la mondmilito, nome: Vielionskis kaj Antanas Vivulskis, kreinto de Jogajlo monumento en Krakovo. Sed ili estis litovoj de pola kulturo kaj laboris ĉefe en fremdlando kaj por fremduloj.

El nuntempe ankoraŭ vivantaj skulptistoj estas konataj jenaj: Petras Rimša, Juozas Zikaras, Kaje-tonas Šklerius, Blažejevičius, Eidukevičius kaj Aleksandravičius.

La plej granda kaj originala estas P. Rimša. Lia plej bona skulptaĵo estas nomita „Litova lernejo dum la jaroj 1864—1904“. Ĝi reprezentas litovan maljunulinon ŝpinantan per ŝpinilo kaj samtempe instruantan sian filon legi el preĝlibro. Ĝi memorigas al ni tiujn por Litovujo plej malfacilajn tempojn, kiam rusoj malpermesis al litovoj havi siajn lernejojn kaj eĉ presigi ion ajn en litova lingvo. Tiam sole la patrino povis instrui siajn infanojn. Ĉi tiu skulptaĵo laŭ ideo kaj plenumo estas tre perfekta. Krom ĉi tiu skulptaĵo ne malpli bonaj estas liaj „Plugistoj“ kiel simbolo de Litovujo — lando de terkulturistoj. Kiom J. Zikaras, K. Sklerius kaj Aleksandravičius estas akademianoj, haltigintaj en sia kreado, tiom P. Rimša estas ne mal-

juniganta, ne kontentiganta je siaj sukcesoj, ĉiam ion serĉanta, ĉiam antaŭen iranta. Li estas tre originala en siaj lastatempaj kreaĵoj, kiujn oni povas nomi grafikoj en skulpturo, kiel „Doloro“ kaj aliaj, montritaj dum nunjara ekspozicio.

Ĝenerale estas necese atentigi, ke kvankam la litovaj artistoj pli aŭ malpli estas dependaj de diversaj fluoj en Eŭropa arto, tamen la ekstremaj fluoj kiel futurismo, ekspresionismo, dadaismo kaj aliaj en Litovujo ne trovas eĥon kaj la litova arto disvolviĝas en serioza direkto. La kondiĉoj por disvolviĝo de la arto en Litovujo estas ankoraŭ pli malbonaj ol aliloke. Aristokrataro, kiu en ĉiuj tempoj estis apoganto de la arto, en Litovujo ne ekzistas, ĝi longe jam denaciigis kaj pri litova arto tute ne interesiĝas, kiel entute ĝi ne zorgas pri bonfarto kaj kulturo de Litovujo.

Burĝaro, kiu en aliaj landoj ankaŭ ne malmulte apogas arton, en Litovujo estas ne litova, sed ĉefe hebrea, por kiu Litovujo nur tiom estas necesa, kiom ĝi donas al ili la eblon rapide riĉiĝi. Da litova burĝaro estas ankoraŭ ne multe, sed ĝi kiom nur povas jam subtenadas arton, aĉetante la en ekspozicioj elmontritajn artobjektojn.

Malgraŭ ĉiuj ĉi malfacilaj cirkonstancoj inter la litovoj estas tre multaj artamantoj, tre multaj artotalentoj, aperantoj ofte en plej malriĉaj klasoj de la loĝantaro, kion pruvas, ekzemple, la fakto, ke vesperajn lecionojn en Arta Lernejo vizitas 70 personoj, el kiuj 90% havas tagan servolaboron. Vidante tian sindediĉon de litova junularo al la arto ni povas esperi, ke ĵus sereniĝos la ĉiam ankoraŭ per nuboj kovrita politika ĉielo de Litovujo, tuj bele ekfloros ĝia kultura floro — la arto.

Tradukis J. Maĉernis.



La kooperacia movado en Litovujo.

De P. Šalčius.

La reciproka helpo de homoj unu al alia en la bezonoj de ekonomia vivo estas tiel malnova, kiel la homaro mem. Sed la formoj de tiu reciproka helpado dependas de la ekonomia stato de iu lando. La kooperativa laboro antaŭ ĉio aperas en tiuj landoj, kie la terkulturo estas ĉefokupo de la loĝantaro; poste sekvas la landoj, en kiuj la ĉefan rolon ludas la bestbredado kaj fiŝkaptado.

Litovujo estas ĉefe terkultura lando. 86% de ĝia loĝantaro vivas en vilaĝoj, bienoj aŭ farmoj, kaj nur 14% loĝas en urboj kaj urbetoj.

Jam de la plej antikvaj tempoj en Litovujo estas konata unu speco de terkultura kooperado, nomata „talka“.

Kiam vilaĝano ne povas sole kun sia familio kaj dum tuta jaro ĉe li laborantaj dungitaj laboristoj plenumi iun terkulturan laboron, ekzemple, rikolti la sekalon, forveturigi sterkon aŭ fari iun alian laboron, postulantan multajn laboristojn kaj ĉevalfortojn, tiam li invitas siajn najbarojn helpi al li. Pro tiu donita al li helpo poste li helpos al siaj najbaroj. Tiu reciproka helpo de litovoj estas nomata „talka“. En talka partoprenas ĉefe junularo, kiu, volante montri sin brava antaŭ fremduloj, laboras tre fervore kaj rapide finas la urĝan laboron. Post fino de la laboro, la mastro bone regalias la invititojn, kiuj malgraŭ laciĝo kaj ofte malfrua

noktotempo finas „talkon“ per kantoj kaj ludoj. Dum la vilaĝanoj vivis en grandaj vilaĝoj, „talka“ ludis pli gravan rolon; nun, de post kiam ĉiam pli da vilaĝoj disigās por formi apartajn farmojn, ankaŭ la signifo de talka malpliigās.

La kooperado en Litovujo dum la rusa regado.

La kooperado kiel moderna formo de ekonomia vivo, bazita sur la principoj de „Rochdale Society of Equitable Pioneers“, aperis en Litovujo kompare kun aliaj landoj nur malfrue. En jena tempo, kiam la nomitaj principoj fariĝis konataj (1843) kaj oni komencis laŭ ili en Anglujo kaj aliaj landoj fondi kooperajn societojn, nia patrujo suferis ankoraŭ sub la jugo de la rusa caro. La rusa oficisto kaj pola terposedanto estis regantoj de nia lando. Ĉiu provo organizi la fortojn de la popolo por kulturaj aŭ ekonomiaj celoj estis plej kruele subpremata. En 1863 la rusa registaro malpermesis presigi en litova lingvo ion ajn kaj tiamaniere plej barbare sufokis nian kulturan vivon por jardekoj. Sed malgraŭ tiuj ĉi reakciaj penadoj de la rusa registaro kaj malgraŭ plej atenta observado de nia vivo en nia popolo tamen iom post iom enradikiĝis la koopera movado. La unua konsumista societo estis fondita en 1881, kaj de tiu tempo komenciĝas la malrapida disvolviĝo de la kooperacio en Litovujo, kiu trovas kunlaborantojn kiel inter vilaĝanoj kaj laboristoj, tiel ankaŭ inter pastro kaj inteligentularo. Sed ĉar estis malpermesitaj preso kaj kunvenoj — iloj da propagando, — tial la movado povis disvastiĝi nur tre malrapide. Ĉe manko de pli vigla komunikado inter la loĝantaro ne povis esti eĉ penso pri fondo de pli grandaj

kooperaj organizaĵoj, kiel ekzemple de societoj de komuna pogranda varaĉetado.

Pli vigla koopera movado komenciĝas nur de 1904, kiam estis nuligita la barbara malpermeso de la litova preso, kaj de la rusa revolucio en la jaro 1905, post kiu la subigitaj de rusoj popoloj povis iom pli facile ekspiri.

Antaŭ la mondmilito en Litovujo estis

- ĉirkaŭ 200 konsumaj societoj,
- „ 112 kredito-societoj kaj
- „ 80 terkulturaj societoj.

La spezoj de konsumaj societoj en unu jaro estadis ĉirkaŭ 5 000 000 da rubloj. La kreditaj societoj en 1912 havis ĉirkaŭ 3 milionojn da deponitaj rubloj.

Sed malgraŭ la iom pliboniĝintaj vivcirkonstancoj la kooperacio antaŭ la milito ne povis dece ekflori, ĉar ĉiam ankoraŭ ne estis nuligita la malpermeso je kuniĝo de distriktaj kaj regionaj kooperaj societoj. Kaj kiel konate, iu koopera unuo ne povas prosperi sen interrilatoj kun aliaj kooperaj organizaĵoj. Tial al la litova kooperacio restis nur atendi pli bonajn tempojn.

La koopera movado kaj la milito.

En 1914 komenciĝis la terura mondmilito, grandegaj fremdaj armeoj invadis nian landon, detruante kaj ruinigante ĉion sur sia vojo. Estas memkompreneble, ke la milito, ruinigante la tutan ekonomian vivon, mortigis ankaŭ la kooperacion. Kelkaj kooperaj vendejoj estis elrabitaj de venintaj germanaj soldatoj, aliaj—de la forkuranta rusa armeo, kaj la restaĵo pereis en flamoj de milit-brulegoj, kies ofero fariĝis tre multaj litovaj urboj kaj urbetoj. En 1915 germanoj okupis la tutan litovan teritorion kaj sub ilia regado apenaŭ povis

vegeti kelkaj kooperaj vendejoj. En 1916 germanoj enkondukis en Litovujo treege despotan militistan-polican regadon kaj senindulge ĉion rekvizadis de lokaj loĝantoj. Nur kun grandega peno kaj kun vivdanĝero sukcesadis pli ruzaj vilaĝanoj kaŝi iom da manĝaĵo por sia familio, enfosante ĝin en la teron. Germanoj tion sciis, kaj vidante, ke ili ne ĉion povas depreni de la loĝantaro perforte, ruze elpensis logi ilin en kaptilon—ili komencis fondadi konsumajn societojn tiamaniere, ke vilaĝanoj liverante lardon, buteron, ovojn kaj aliajn manĝaĵojn povu intersaĝe ricevi salon, feron kaj sukerojn. Tamen nur tre malmultaj vilaĝanoj lasis sin tiamaniere trompi kaj la fondataj de germanoj vendejoj havis neniun sukceson.

La kooperado sub la litova regado.

De post kiam en la jaro 1918 la sendependeco de litova ŝtato estis proklamita kaj agnoskita, litova kooperacio jam ne plu subpremata de fremduloj povis libere disvolviĝi. Antaŭ la litova kooperacio aperis grandegaj taskoj: ĝi devis normaligi la terure pro la milito kreskintajn prezojn, devis helpi al senigitaj de sia havaĵo urbaj kaj vilaĝaj loĝantoj, devis protekti vilaĝanojn kontraŭ ekspluato de peraj komercistoj.

La kreskadon de kooperacio en la pasinta jaro montras jena tabelo:

| | Estis la 1. I. 1922 | 1. I. 1923 |
|--------------------------------|---------------------|------------|
| 1. Konsumaj societoj | ? | 364 |
| 2. Produktaj kooperacioj . . . | 38 | 41 |
| 3. Kreditaj kooperacioj . . . | 95 | 121 |
| 4. Kooperacioj por konstruado | — | 2 |
| 5. Terkulturaj kooperacioj . . | — | 56 |
| | | <hr/> |
| | | Entute 584 |

La konsumaj societoj.

La anaro de konsumaj societoj konsistas ĉefe el vilaĝanoj. Tial la celo de niaj konsumaj societoj estas de unu flanko la havigo al la vilaĝanoj de por ili plej bezonaj aĵoj kiel salo, fero, sukero, terkulturaj maŝinoj kaj instrumentoj, artefarita sterko, koloniaj varoj, de alia flanko niaj konsumaj societoj donas al vilaĝanoj la eblon pli profite vendi siajn produktajn: grenon, brutaron, ovojn, linon, buteron k. t. p.

La societa kapitalo estas formata per enpagoj de la anoj po 25 lidoj (du kaj duono da amerikaj dolaroj). Por kolektita tiamaniere kapitalo societo aĉetas varojn kaj ilin vendadas al siaj membroj laŭ la tagaj foiraj prezoj. Je la fino de la jaro la societo dividas la ricevitan profiton laŭ tio, por kiom da mono iu membro aĉetis da varoj. Por la de membroj enmetita mono fine de la jaro estas elpagata la kutima procento, sed ne pli ol 8%. Unu konsumata societo enhavas meznombro 300 membrojn. Do, la kunmetita societa kapitalo ne estas granda. Por pligrandigi siajn monrimedojn la societo ofte prunteprenas de siaj anoj.

Jam en la jaro 1919, ĵus kiam estis fondiĝinta pli granda nombro da konsumaj societoj, oni komencis akceladi ilian unuigon. Sed en tiu tempo Litovujo estis turmentata de Bermontaj bandoj kaj de poloj, pro tio ofte tutaj provincoj estis apartigitaj unu de alia kaj tial memkompreneble ne povis fondiĝi tutŝtata unuigo de kooperaciaj societoj. Oni komencis unuigi en distriktajn, regionajn unuigojn. Por ke tiu laboro fariĝu laŭ unueca plano, la 15 de aprilo 1919 en Kaunas okazis la unua kongreso de litovaj kooperistoj, dum kiu estis elektita speciala komisiono por ellabori unuecan agadplanon kaj statuton. Post tiuj preparaj

laboroj dum nova kunveturo de reprezentantoj de diversaj kooperaciaj societoj la 2 de jano 1919 estis fondita la unua litova kooperacia unuigo „Kauno Kooperacijos Bendrovių Sąjunga“. Oni devas rimarki, ke ĉi tiu unuigo tuj trovis ĉe la loĝantaro grandan konfidon. Ĉar tiu unuigo komence havis tute malmulte da mono, ĝi devis turni sin al siaj anoj petante pri pruntedono. La rezulto estis ne atendite bona: dum du semajnoj venis unu kaj duonmiliono da markoj. Baldaŭ fondiĝis regionaj unuigoj ankaŭ en aliaj pli grandaj regionaj urboj, kiel Šiauliai, Panevėžys, Keidainiai, Vilkaŭiškis kaj aliaj. Sed jam de la komenco de la agado de regionaj unuigoj fariĝis klare, ke ili ne povos prosperi sen pli intimaj inter si komercaj rilatoj. Por reguligi tiun aferon estis kunvokita kunveno de reprezentantoj de regionaj unuigoj. La 1 de Oktobro 1919 en Kaunas kolektigis reprezentantoj de 8 regionaj unuigoj kaj decidis fondi centran oficejon de litovaj kooperaciaj unuigoj (Lietuvos Kooperacijos Sąjungų Biuras). Ĝia celo estis jena: 1. Koncentrigi la aĉetadon de varoj kaj organizi la necesan por tio aparaton; 2. reprezenti litovan kooperacian unuigon interne de la ŝtato kaj en eksterlando; 3. komenci organizi propran varproduktadon kaj 4. gvidi la tutan kooperacian movadon laŭ unueca plano kaj zorgi pri la propagando de koopera ideo. Sed tiu centra oficejo estis fondita nur provizore ĝis estos sukcesinte centraligi la tutan kooperan movadon fondante tutŝtatan unuigon de ĉiuspecaj kooperaciaj societoj. La centra oficejo estis komisiita prepari kongreson de reprezentantoj de ĉiuj kooperaj societoj.

Ĉi tiu kongreso daŭris de 21 ĝis 23 de marto 1920 en Kaunas kaj okupis sin pri ĉiuj fundamentaj demandoj de koopera organizado. La rezulto de la

kongreso estis fondo de tutŝtata unuiĝo de kooperaj societoj „Lietuvos Kooperacijos Bendrovių Sąjunga“. Ĉiuj regionaj unuiĝoj aliĝis al ĝi kun ĉiuj siaj membroj (kooperaj societoj) kaj ĉe tio la regionaj unuiĝoj de Kaunas, Kedainiai, Vilkaviškis kaj Panevėžys transdonis al unueca unuiĝo sian tutan havaĵon, dum la unuiĝo de Šiauliai konservis por si la rajton en la limoj de sia regiono memstare gvidi siajn aferojn.

La 1 de januaro 1923 L. K. B. S. havis 242 membrojn, kiuj pagis siajn kotizojn en du ĉefajn unuiĝojn (Kaunas kaj Šiauliai). Sed ankaŭ la ĝis nun ne aliĝintaj al L. K. B. S. kooperaj societoj aĉetadas varojn po grande en ĝiaj deponejoj.

La unuiĝa kapitalo konsistas el traprenita havaĵo de regionaj unuiĝoj kal el membraj kotizoj po 500 lidoj.

En 1922 L. K. B. S. havis 30000000 da lidoj de spezoj. En diversaj partoj de Litovujo (Vilkaviškis, Kedainiai, Ukmergė, Panevėžys, Rokiškis) ĝi havas grandajn deponejojn, kiuj prizorgas per varoj la al L. K. B. S. ankoraŭ ne aliĝintajn societojn. En Panevėžys ĝi posedas porkobuĉejon kaj fabrikon de kolbasoj; do, ĝi havas la eblon liveri al konsumsocietoj proprajn viandproduktaĵojn.

Ankaŭ la unuiĝo de Šiauliai pligrandigis sian agadkampon en la norda parto de Litovujo, fondante en la jaro 1921 siajn filiojn en Mažeikiai kaj Kretinga.

Ĝenerale oni devas konstati, ke malgraŭ sia juneco la kooperaj societoj havas jam grandan influon al ekonomia vivo, jam konsiderinde forigante la perajn komercistojn kaj malaltigante la prezojn.

Por la propagando de koopera ideo la unuiĝo eldonas ĵurnalon „Talka“, kiu aperas monate trifoje. La unuiĝo de Šiauliai eldonas similan ĵurnalon „Sietynas“.

La terkulturaj kooperaj societoj.

Litovujo estas preskaŭ senescepte terkultura lando kaj tial la zorgo pri intensigo de terkulturo estas tre grava. En pasintaj du jaroj oni komencis fondadi specialajn terkulturajn kooperajn societojn.

Jam de 1921 en Kaunas havas sian sidejon la litova terkultura koopera unuiĝo, kies ĉefa tasko estas la plialtigo de terkulturo en Litovujo per enkonduko de pli bonaj brutospecoj, birdaro, semoj, artefaritaj sterkoj kaj per fondo de grenpurigaj stacioj.

Ĉi tiu koopera unuiĝo aranĝis en Septembro 1922 jaro la unuan post la milito terkulturan ekspozicion en Kaunas kaj por tiu celo konstruis konvenajn ejojn. La terkultura ministerio ĝin apogas per monrimedoj; ĝi havas jam 27 filiojn.

Komence de 1923 en Šiauliai organiziĝis unuiĝo de terkulturaj kooperoj sub la nomo „Produktanto“ (Gamintojas), kiu alceladas la saman celon, kiel la suprenomita unuiĝo en Kaunas; sed krom tio ĝi precipe atentis la plibonigon de eksporto de terkulturaj produktajoj. Dum tute mallonga tempo „Produktanto“ sukcesis aranĝis 36 staciojn por purigado de greno, venigis el eksterlando pli bonajn semospecojn, aranĝis modelan provkamaron, organizis paroladojn pri terkulturaj demandoj kaj jam eksportis al Anglujo pli ol 1050 tunojn da purigita greno. La unuiĝo havas jam 16 membrojn, plejparte terkulturajn kooperajojn.

Nun estas jam farata la prepara laboro por koncentrigi ĉiujn fortojn de terkulturaj kooperoj kaj per unuigitaj fortoj fondi modernajn elevatorojn, kiuj helpos reguligi la eksporton de la ĉefa litova eksportajo — la greno.

La kreditaj kooperaj societoj.

Nuntempe en Litovujo estas ĉirkaŭ 150 kreditaj kooperaj societoj (1923, 1. I estis 126). La komencon faris loĝantoj de malgrandaj urbetoj — hebreoj — fondante tiel nomatajn popolajn bankojn por subteno de metiistoj kaj malgrandaj komercistoj. Da tiaj bankoj nuntempe ekzistas 88, kiuj unuiĝis en unu hebrean Centran Bankon por subteno de kooperaj societoj. Iom pli poste ankaŭ vilaĝanaro komencis fondi kreditajn kooperojn por subteno de terkulturo, precipe en la lasta tempo post enkonduko de propra firma valuto, bazanta parte sur firma ora fondo kaj parte sur firma amerika dolarprovizo. Litova monunuo estas „litas“ — lido, entenanta 100 cendojn. 10 lidoj egalas unu amerikan dolaron kaj en nia lando estas plena pariteto inter ĉi tiuj du monumoj.

Ĝis Oktobro 1922 jaro en Litovujo cirkuladis germana mono, amase postlasita dum okupado, kaj pro senĉesa falado de la markkurzo niaj kreditaj kooperoj havis multe da malprofito kaj tial ne povis disvolviĝi. Nun, post enkonduko de firma valuto, la tuta ekonomia vivo komencas rapide saniĝi.

Por havigi al la kooperaj societoj la necesan krediton estis fondita en 1920 Litova Koopera Banko, kiu dum la jaro 1921 povis jam vaste disvolvi sian laboron kaj jam havis 66 membrojn. La 1 de nunjara Januaro bilanco de ĉi tiu banko estis 625 497 lidoj kaj ĝiaj spezoj dum la pasinta jaro estis 1 427 421 367 germ. markoj kaj 3 174 791 lidoj. Krom tio la katolika politika partio de vilaĝanoj havas Popolan Bankon por terkultura kooperado; al tiu banko apartenis en la jaro 1922 naŭ kooperaj kreditaj societoj.

La koopera konsilantaro.

La koopera kongreso elektis en 1922 specialan kooperan konsilantaron, kies tasko estas pridiskuti ĉiujn rilatajn al la kooperado demandojn, statutaferojn, aranĝi kongresojn de kooperaj reprezentantoj k. t. p.

La sidejo de Litova Unuiĝo de Kooperaj Societoj (Lietuvos Kooperacijos Bendrovių Sąjunga) estas Kaunas, Vytauto prospektas. L. K. B. S. korespondas en Esperanto, volonte donas informojn pri sia agado, same volonte aŭdos ankaŭ pri sukcesoj kaj spertoj de alialandaj kooperistoj kaj precipe pri iliaj proponoj komenci senperajn komercajn rilatojn.

Trad. J. Mačernis.



La proprecoj de la historia sorto de Litovujo.

De Prof. D-ro St. Šalkauskis.

(Fragmento.)

Litovujo estas lando de historiaj paradoksoj. Ĉi tion oni devas bone atenti por ĝuste kompreni ĝian vivon. Ĉi tiu ĝia eco estigas la plej diversajn prijuĝojn de litova nacio. Ekzemple, dum A. F. Kotzebue trovis la historion de Litovujo inda je liro de Homero kaj plumo de Tacito, A. Brückner ne ĉesas pruvadi, ke en la vivo de litova nacio estas nenio inda je precipa atento.

Volante havigi al si bone fundamentitan konkludon pri tia nacio, estas necese ekkoni la proprecojn de ĝia sorto. Nur tiam estas eble diveni la enigmon, kiun prezentas ĝia historio.

Videble, Kotzebue eldirante sian opinion komence de la XIX jarcento, havis por tio la necesan fundamenton, ĉar la okazajoj de la vivo baldaŭ brile pravigis lian eldiron. Nome, la juna pola romantismo interesigis pri litova arkeologio, etnografio kaj historio pli ol pri similaj aferoj de pola nacio¹⁾. En la sama tempo unu el la plej grandaj poetoj de la XIX jarcento, Adamo Mickevičius, trovis en litova historio kaj vivo sufiĉe da nutraĵo por sia inspiro.

Kaj de alia flanko, A. Brückner povus ankoraŭ provi pravigi sian opinion pruvante, ke la litova nacio en unu aŭ alia sfero de civilizacio produktis nenion, kion povus ĝui la tuta mondo.

Sed estas unu punkto, pri kiu jam de unua ekrigardo ĉiuj devas konsenti, nome tio, ke la litova nacio neniam estis tio, kio ĝi povis esti. Certe, ĉi tio estas stranga, preskaŭ nekredebla, sed tamen ĝi estas historia fakto.

Elirinte el la lulilo de popoloj — Azio, la litova nacio ekloĝis en Eŭropo multe pli frue, ol multaj aliaj popoloj, kaj tamen sur la scenejo de Eŭropa vivo ĝi montriĝis pli malfrue. Ĝis la XI jarcento ĝi vivis preskaŭ nekonata de siaj najbaroj kaj nur post kiam ĉi tiuj najbaroj maltrankviligis ĝian izolitan vivadon, ĝi forŝiris la kurtenon, kiu kaŝadis ĝian vizajon, kaj montris al la mondo la duvizaĝan bildon de Januso.

Ĉi tiu nacio, inklina al profunda tradiciismo, konservis en sia lingvo, religio kaj moroj klaran stampon de antikva Oriento. En la XIII jarcento ĝi fondis sendependan ŝtaton, al kiu estis destinita ankoraŭ unu kaj duonjarcenton resti fidela al siaj dioj. Largezone disetentiĝinte de Balta ĝis Nigra

¹⁾ Fr. Augustaitis, *Pierwiastki litewskie we wczesnym romantyzmie polskim*, 22 p. Kraków, 1911.

maro ĉi tiu idolana ŝtato plenumadis rolon de peranto inter kristana Oriento kaj Okcidento. La aliĝo per la bapto al kristana civilizacio de Okcidento signifis por ĝi komencon de malproksima fino: la fremda influo komencis nun pli intense subfosadi tiun nacian individuecon, per kiu ĝi estis fundamentita. Sed ju pli malfortigadis la litova elemento interne de la ŝtato, des pli kreskis ĝia signifo en najbaraj popoloj.

En la XVI jarcento la nacia litova spirito produktis juran kodekson, kiun povis envii multaj tiutempaj popoloj, konsiderataj tiam kiel kulturaj. Sed ĝuste tiu ĉi XVI jarcento estis por la litova nacio tempo de tiu krizo, kiu preparis ĝian pereon en la XVIII jarcento.

En la fino de la XVIII kaj komenco de la XIX jarcento la sama nacia litova spirito inspiras kaj per nekutima lumo vivigas la kulturalan kreadon de sia aliancano kaj oferas al ĝi siajn plej bonajn intelektajn fortojn, — kaj samtempe la litova popolo mem travivas plej danĝeran horon por sia plua vivo.

Kaj kiam pli poste la najbaroj de oriento kaj okcidento komencis solvadi la kulturalan problemon, kiu ricevos ĝian historian heredajon, ĝi subite levigis de sia agonikuŝejo kaj deklaris al la mirigitaj najbaroj, ke ĝi eĉ ne intencis morti kaj des malpli ĝi konsentas rezigni je iaj-ajn siaj rajtoj. Kaj ĉi tiu nacio, kiu iam tute neatendite fondis inter Okcidento kaj Oriento de Eŭropo potencon ŝtaton, nuntempe same neatendite esprimis sian firman decidigon krei sian nacian civilizacion, en kiu la elementoj de la civilizacioj de Oriento kaj Okcidento akiru la sintezan ekvilibron.

Ĉi tia paradoksa skemo de la litova historio en siaj ĝeneralaj trajtoj estas videbla tuj post la unua

ekrigardo. Ĝia paradokseco dependas de tiu kontrasto inter eblecoj kaj faktoj, je kiu estas plena la tuta historio de la litova nacio. De ĉi tio dependas tiu ŝanceliĝo inter grandeco kaj senpovo, kiu ĉiam elmontriĝadis en la litova vivo kaj kiu ne lasis historiistojn egale taksi la litovan historion.

La litova nacio ne estas avare dotita de la naturo. En sia pasinteco ĝi havis sufiĉe da intelektaj kaj materialaj fortoj por krei grandan nacian civilizacion. En apartaj ĝiaj entreprenoj klare estas videbla gesto de grandeco. Sed en la pasinto ĝi ne sukcesis krei tutecan nacian civilizacion, ĉar al ĝi ekmankis tiu organizemo, kiu estas propra al konscia nacia individueco. Tial al la litova nacio ne estis destinite ludi en universala historio la rolon, konforman al ĝiaj fortoj, kaj ĝia nacia civilizacio ne akiris mondsignifon.

Sed tamen la litova nacio konservis siajn fortojn por ekuzi ilin ĉe la unua bona okazo. Estas vere, ke la historio ne staras sur unu loko, kaj tio, kio estis ebla hieraŭ, ne estos plu ebla morgaŭ, ĉar la eblecoj preteriras kune kun la tempo. Ĉi tion oni devas precipe diri pri la eblecoj, rilatantaj materialan flankon de la vivo, ĉar ili estas limigitaj per formoj, de kiuj ne tiagrade dependas la spirita vivo.

Tial, taksante nun la vivon de la litova popolo, ni devas diferenci ĝian materialan potencon, kiu esprimiĝas reale, kaj spiritan potencon, restantan en potenciala stato. La sorto deziris, ke la unua malgrandiĝu laŭ tio, kiel kreskis la alia. Almenaŭ ĉi tiun lastan la litova nacio konservas netuŝita. Ĉi tio donas pli altan valoron al ĝia sendependa vivo kaj plifortigas en ĝi la komprenon pri ĝia indeco: ĝi sentas la tragedion de sia historio kaj samtempe esperas solvi grandan problemon de

nacia civilizacio. Neniu povas sufoki la konfidon al estonteco en nacio, kiu en tempoj de plej granda mizero kaj malfeliĉoj ne ĉesas gloradi sian patrujon, kiel „landon de herooj“.

Al ĉi tiu nacio, kiu komence adoradis fajron kaj akvon, poste—krucon kaj florojn, ne estas fremda la soifo al kosma grandeco. Ekmankinte la materialan potencon ĝi per ĉiuj fortoj pene alceladas la idealon de pli alta civilizacio. Ĉi tiun generalan tonon de la litova nacia revekigo bone priskribas la fama litova verkisto Vydunas per jenaj vortoj: „Nia tuta vivo estas plena je doloro kaj ĝojo. Sed ĝuste ĉi ĉio esprimas la grandan, potencon kaj eternan senton de nia viveco. Kaj senfine bela ĝi estas kun sia doloro kaj ĝojo kaj sia nobleco . . . Ni devas esti grandaj, ni devas lerni esti grandaj. Tiam ĉiuj niaj vivcirkonstancoj heligos per alia lumo. Kaj nia tuta vivo el mizera fariĝos granda. La grandeco de animo kaj spirito—jen kio estas al ni necesa“. (Vydunas, Vairas No. 1, 1914, 13 p.)

Tradukis J. Maĉernis.



La historio de Polaj invadoj Litovujon.

(El New Jorka ĵurnala „The Nation“ de la 24a de Majo de 1922 jaro.)

Antaŭ nelonge unu franca gazeto aperigis sciigon, ke la Poloj estas formale aneksintaj urbon Vilnius (Vilno). Tio plej bone montras la senforton de la Ligo de Nacioj. Sed oni devas pli profunde ekrigardi la aferon. De la komenco de la dekkvara jarcento ĝis la 1795 jaro, kiam Lito-

vujo estis aligita al Rusujo, Vilnius estis la ĉefurbo de Litovujo. Ĝi estas la plej grava fervoja centro inter Petrogrado kaj Varŝavo. Antaŭ la mondmilito la nombro da loĝantoj en Vilnius estis ĉirkaŭ 200 000, el kiuj la plej granda parto estis hebreoj kaj litovoj, blankrusoj kaj poloj estis en egalaj nombroj. Nuntempe la nombro de loĝantoj falis ĝis 120 000. Ĉiuj litovoj opinias, ke Vilnius kiel en la politika, tiel ankaŭ en la ekonomia rilato nepre estas bezona al la vivo de la sendependa Litovujo.

Post la finiĝo de la milito (la 11 an de Novembro 1918) la urbon Vilnius okupis bolŝevikoj. Novorganizita militistaro de Litovujo komencis ataki Vilnon de la okcidento. Sed polaj regimentoj, kondukataj de Pilsudski, pli rapide atingis Vilnon kaj okupis ĝin la 20 an de Aprilo de la 1919 jaro. Plua eniĝado de pola armeo kaŭzigis la sangverŝan renkonton flanke de Litova militistaro inter linio Grodno—Vilno—Dvinsko kaj pli malproksimen al sudo kaj al okcidento en Suvalka provinco.

La delegitaro de Litovujo tuj protestis en Paca Konferenco kontraŭ la Pola okupo de Vilnius. La Plejalta Konsilantaro de „Entente'o“ komprenis, ke „en ĉirkaŭaĵoj de Grodno kaj Vilno, kie la pola kaj litova militistaroj sin trovas en kontakto, la situacio fariĝas tre serioza“. La Konsilantaro alvenis al jena konkludo: „Apelacii al la registaroj de Polujo kaj Litovujo, ke ili pacmaniere solvu tiujn seriozplenajn malkompreniĝojn kaj evitu armajn interpuŝojn, ĉar kooperado de tiuj ambaŭ ŝtatoj estas nepra kiel baro kontraŭ danĝero de bolŝevikoj“. La delegitaro de Litovujo konsentis ĝistempne ne kontraŭbatali tiun okupacion. Kompreneble, tiu konsento estis apogita je tio, ke la Konsilantaro opiniis tiun polan entreprenon esti necesa pro milita operado kontraŭ bolŝevikoj. Sed poste Litova

delegacio komunikis al la Konsilantaro, ke estas tute neeble aliri al pactraktado kun Poloj (la 23an de Majo 1919).

La 13an de Junio 1919 Litova registaro donigis al la Plejalta Konsilantaro la proteston kontraŭ Pola plua eniĝado en Litovujon okcidente kaj petis la Konsilantaron, ke ĝi influu la Polojn por pertraktado kun celo starigi demarkacian linion. Tiu linio komenciĝis ĉe Germanuja urbo Lyck kaj tra Aŭgustovo, Ratniko, Asovo kaj je fervojo Vilno—Dvinsko iris ĝis Dvinsko. Tiamaniere en Pola kontrolo restis kvinkilometrlarĝa teritorio okcidente de la fervojo. El plej gravaj punktoj en Litova flanko restis Suvalki (Suvalkai), Sejny (Seinai) kaj Punska (Punskas).

En tiu tempo estis ankoraŭ en povagado la ĉefa ŝtabo de „Entente'o“ kaj marŝalo Foch estis ĉefestro de Polaj kaj ankaŭ Entante'aj armeoj. La 10an tagon de Julio Litova registaro komunikis al la marŝalo Foch, ke Poloj transiris la linion demarkacian kaj okupis novajn teritoriojn. Marŝalo Foch ordonis al Poloj, ke ili forlasu okupitajn teritoriojn, sed la ordono ne estis plenumita. Do Plejalta Konsilantaro ne subtenis la Foch'an ordonon, sed neatendite starigis novan demarkacian linion kaj pri tio komunikis al Litova registaro la 27an de Julio 1919. Laŭ tiu nova reordigo la Litovujo perdis urbon Suvalki, kaj Poloj ricevis novan 12-kilometrlarĝan teritorion okcidente de fervojo Vilno—Dvinsko. La 30an de Aŭgusto la Poloj transiris urbon Seinai (Sejny). La 30an de Aŭgusto la Poloj transiris la duan demarkacian linion en norda parto kaj okupis Turmont. La 8an de Decembro 1919 la Plejalta Konsilantaro anoncis novan t. n. Curzon'an demarkacian linion. La Poloj per tio ankaŭ ricevis novajn teritoriojn en Suvalka pro-

vinco, kvankam al la Litova registaro ne estis oficiale komunikita pri la starigo de nova demarkacia linio.

La starigon de demarkaciaj linioj kaj nehaltigo de Poloj oni povas nomi la unua parto de historio de batalo por Vilnius.

La dua parto de la historio komencas en la somero de 1920 jaro, kiam la Rusoj ekatakis la Polojn. La de Poloj okupita parto de Litovujo fariĝis kampo de batalado.

La pactraktato inter Litovujo kaj Rusujo, subskribita la 12an de Julio 1920, starigis la linion inter tiuj du ŝtatoj. Dum la pertraktado, Rusa delegitaro sendis al Litovujo jenan noton: „Konsiderante, ke inter Rusujo kaj Polujo ankoraŭ estas militsituacio kaj ke la lasta estas okupinta la teritoriojn, kiuj laŭ la pactraktato apartenas al Litovujo, la Sovjeta registaro trovas bezone raporti jenon: ĉar pro la militaj kaj strategaj devoj la militoperacioj ne povas esti haltigitaj ĉe la limoj de Litovujo, tial en la nomo de Federacia Respubliko Rusujo ni deklaras, ke la okupadon de Litovaj teritorioj, fordonitaj al Litovujo laŭ la pactraktato, la registaro de Litovujo ne devas trakti kiel malamikan akton kontraŭ Litovujo nek kiel rompon de la pactraktato“. Litovujo estis devigita akcepti la kondiĉojn de Rusujo, ĉar la Poloj estis okupintaj tiujn novajn teritoriojn, kiujn la Rusojn volis liberigi. Tio estis sola rimedo por resti neŭtrala. Tamen la delegitaro de Litovujo en Moskvo ricevis jenan konsenton: „La Rusa militistaro forlasos la okupitajn teritoriojn, kiam ĝia restado el milita kaj stratega vidpunkto jam ne estos bezonaj“.

La Sovjeta armeo okupis Vilnon la 14an de Julio 1920, kaj la 15an de Julio malgranda parto de Litova militistaro eniris en la urbon kaj en la

nomo de Litova registaro prenis sur sin la gardadon de regnaj institucioj. Post kelke da tempo, laŭ la traktato, la Rusoj forlasis la Vilnon kun nordaj kaj centraj teritorioj, el la suda parto ili devis eliri ĉirkaŭ la komenco de Septembro pro Pola kontr-offensivo.

En la somero de la jaro 1920 la militaj operacioj — tiel dirante — detruis la demarkaciajn liniojn, starigitajn antaŭ la jaro de Plejalta Konsilantaro de „Entente'o“. La Pola militistaro forlasis la teritoriojn, kie estis la demarkaciaj linioj. La partoj de Litova militistaro ekposedis la Suvalkan provincon ĝis la urbo Aŭgustovo, kaj la 27an de Aŭgusto registaro de Litovujo ekproponis al Poloj starigi mallongan demarkacian linion. La Poloj je tio respondis nenion. La 30an de Aŭgusto apud la Aŭgustovo okazis forta kunpuŝo inter la partoj de Pola kaj Litova militistaroj. Litovoj malsukcesis, do Poloj la 2an de Septembro okupis Sejny kaj Punska (Punskas).

En tiu tempo la Ligo de Nacioj aperas en la scenejo, kaj komenciĝas la tria parto de historio de batalo por Vilnius. La 17an de Septembro s-ro Paderevski, la pola delegito en la Ligo de Nacioj, petas la Konsilantaron, por ke ĝi devigu la Litovojn forlasi la nelegale ekposeditajn teritoriojn kaj sin haltu je la Curson'a linio. Litovujo, kvankam ĝi ankoraŭ ne estis ano de la Ligo de Nacioj, kunsentis plenumi la postulon, kaj la 20an de Septembro la Konsilantaro ekrekomendis al la ambaŭ ŝtatoj: Unue, tuj ĉesi militi; due, akcepti la Curson'an linion, kiel la provizoran demarkacian linion; trie, Polujo devas ne tuŝi la Litovajn teritoriojn je la oriento de tiu ĉi linio, se Litovujo ricevos el Rusujo jeson, ke rusoj ne iros en tiujn teritoriojn; kvare, estos farata Kontrolo

Komisiono, kiu rigardos, ke ĉi tiuj decidoj estu realigataj. La ambaŭ registaroj konsentis, do la 28an de Septembro Ĉiĉerin komunikis al la registaro de Litovujo, ke Rusujo nerompos la neŭtralecon de Litovujo, se tion ne faros ankaŭ la Poloj.

Kiam ĉesis la bataloj, la 29an de Septembro en Suvalki komenciĝis la pertraktoj de la delegitaroj de Polujo kaj Litovujo. La 7an de Oktobro estis subskribita la traktato. Laŭ ĝi la demarkacia linio estis farita ĝis la stacio Bastuny de fervojo Vilno—Lida, je 60 kilometroj sude de Vilno. Tiel la ĉefurbo Vilnius (Vilno) kun ĝiaj ĉirkaŭaĵoj restis en posedo de Litovujo. Sed tiun saman tagon, kiun estis la traktato subskribita, Pola generalo Ŝeligovski ekatakis la litovojn apud Varėna (Orany) kaj post du tagoj ekokupis Vilnon. La Pola delegitaro en Suvalki tuj diris, ke tio estas farata laŭ la decidoj de ĉefa ŝtabo por la operacioj kontraŭ Rusoj. Kaj Pola ministro de eksteraj aferoj s-ro Sapieha komunikis al la registaro de Litovujo, ke Pola ĉefa ŝtabo ne estas ordoninta ataki Vilnon. La 14an tagon de Oktobro la Pola registaro anoncis, ke generalo Ŝeligovski estas ribelanto kaj ke li estos fordonita por militita esploro. La Konsilantaro de la Ligo de Nacioj ankaŭ eldonis similan komunikon. Apogante sin sur tiuj komunikoj, la registaro de Litovujo la 25an de Oktobro sendis al la Ligo de Nacioj proteston kontraŭ tio, ke Poloj sendadas al Ŝeligovski la fortigojn.

En tia situacio de afero la 28an de Oktobro 1920 la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj donis novan proponon: Ke oriente de Curzona linio, en kontrolo de la Ligo de Nacioj, estu farita plebiscito kaj loka loĝantaro mem decidu, al kiu ŝtato ĝi volas aparteni — al Polujo aŭ al Litovujo. La proponon akceptis ambaŭ partoj. Sed Litovujo

faris rimarkon, ke plebiscito estu farata ankaŭ en teritorioj, ne transdonitaj al Litovujo per Suvalka traktato. Litovujo ankaŭ diris, ke ĝia situacio estas tre neoportuna, ĉar ĝi, Litovujo, ankoraŭ ne estas de grandaj regnoj agnoskita de jure.

La 29an de Novembro la delegitoj de Litovujo, Polujo kaj de Želigovski subskribas la traktaton por ĉesi batalojn. Laŭ tiu traktato la Poloj devis elkonduki ilian militistaron el Vilno kaj ĝia teritorio.

En la komenco de Decembro de 1920 jaro en Genevo okazis ĝenerala kunveno de la Ligo de Nacioj. Al la delegito de Litovujo estis komunikita, ke la Konsilantaro rajtigis regimentestron Chardigny, la estron de la Kontrola Komisiono en Litovujo, makleri al la Litovoj kaj la Poloj por fiski la limojn al tiuj teritorioj, kie devos okazi la plebiscito. La delegito de Litovujo respondis, ke Litovujo ne povas konsenti por la plebiscito en iu teritorio, kiu estas per Rusa traktato fordonita al la Litovujo, kaj, laŭ la originala propono, tiujn limojn fiksu la Konsilantaro mem.

La 8an kaj 14an de Decembro la delegito de Litovujo raportis al la Konsilantaro, ke Želigovski senĉese ricevas el Polujo novajn militistojn kaj aliajn necesajn objektojn kaj ke lia militistaro eniĝas en neŭtralan zonan, fiksitajn la 29an tagon de Oktobro. La sama raporto estis sendita ankaŭ al la Polaj delegitoj en Kontrola Komisiono de Chardigny.

En tiu tempo la Konsilantaro de la Ligo decidis sendi en Vilnon 1500 militistojn, kiuj zorgu tie pri la ordo dum la plebiscito. La registaro de Sovjeta Rusujo ekprotestis kontraŭ la estado de Želigovski en Vilno, rimarkante, ke la estado de militistoj de aliaj ŝtatoj en tiu teritorio rompas la Litovan-Rusan pactraktaton. Laŭ tiu traktato estas malpermesite al fremdaj ŝtatoj, kiuj batalas kontraŭ Rusujo aŭ

Litovujo, teni la militistaron aŭ fari ian militan operacion en dirita teritorio.

La 20an de Decembro la sekretario Drummond sendis preskaŭ de la sama enhavo la notojn al la Pola kaj Litova delegitoj. En tiuj notoj estis dirita, ke la Konsilantaro post longa diskutado decidis realigi la plebisciton kaj sendi armeon, kaj demandis, ĉu la Konsilantaro povas konfidi, ke Litovujo kaj Polujo helpos realigi tiun projekton. En la noto estis ankaŭ almetita: „Ĉu la Konsilantaro povas konfidi, ke Pola registaro devigos Želigovski'n konsenti kun la rimedoj de la Konsilantaro, kiuj povas aperiĝi pro la senarmigo de liaj militistoj kaj elsendo de ili el Vilnius?“

La Pola delegito respondis, ke registaro de Polujo „subtenos la Konsilantaron morale“ por ricevi el Želigovski la konsenton.

La 31an de Januaro de 1921 jaro Litova registaro respondis, ke ĝi konsentos je la plebiscito laŭ tiuj kondiĉoj: 1. la Polaj militistoj devas esti forigitaj el plebiscita zono; 2. la ordon devas prizorgi tiuj ŝtatoj, kiuj ne estas interesigitaj en la diskuto; 3. la Poloj devas garantii, ke en la estonto ne estos ripetita ago de Želigovski; 4. la plebisciton prokrasti ĝis tiam, ĝis kiam malaperos la sekvoj de Pola propagando; 5. agnoski Litovujon de jure; 6. la Poloj devas ricevi de Rusujo konsenton je tiu plebiscito.

S-ro Bourgeois telegrafis al la regimentestro Chardigny: „Ĝis tiam ebleco realigi plebisciton, ĝis kiam Poloj ne forprenos Želigovski kaj ne demobilizos liajn militistojn. Ni opinias, ke oni devas ekuzi severajn rimedojn rilate Pola registaro. La respondeco de Polujo pro la estiĝinta situacio devas esti montrita al ĝi.“

Sed en la sama tempo Želigovski siavole anoncis en „meza“ Litovujo la elektojn, kiuj la 3an de Februaro, pro la peto de Pola registaro, estis prokrastitaj por la nefiksita tempo.

La 15an de Februaro la registaro de Svisujo rifuzis tralasi tra sia teritorio „internacian armeon“ por Vilnius.

En la monato Marto de 1921 jaro la Konsilantaro de la Ligo definitive rifuzis la plebisciton, anoncinte, ke pro la estado de militistaro de Želigovski oni havas nenian esperon realigi la justan kaj senpartian plebisciton. Anstataŭ tio la Konsilantaro ekproponis al la ambaŭ registaroj la senperajn pertraktadojn. Kiel maklero estis ekproponita s-ro Paul Hymans, kiu, laŭ la raporto de la Ligo, estis tre zorge studinta la aferon de Vilnius. La pertraktadoj devis solvi ne nur la disputon pri Vilnius, sed ankaŭ forigi ĉiujn malkompreniĝojn inter Litovoj kaj Poloj. La militistaro de Želigovski devis esti tenata en „regulara disciplino“ kaj plimalgrandigita ĝis 15000 viroj. La proponon Litovujo akceptis la 12an, la Polujo — la 19an de Marto.

En la monato Majo de 1921 jaro komenciĝis la Litova-Pola konferenco en Bruxelles. Hymans diris al la delegitaroj, ke estas dezirinde fari el tiuj du landoj federacion, apogitan sur la ekonomiaj, militaj kaj eksteraj aferoj. Li proponis la projekton de tiu ĉi enhavo: 1. Litovujo devas esti dividita je du aŭtonomaj kantonoj laŭ la Svisa modelo; unuan kantonon faras okcidenta Litovujo kun Kaŭnas kiel ĉefurbo, duan — „meza“ Litovujo kun Vilnius, kiu servas al tuta ŝtato kiel federacia ĉefurbo; 2. komuna konsilantaro por eksteraj aferoj; 3. defensiva milita unuiĝo; 4. ekonomia traktato kun Polujo; 5. Polujo ricevas la rajton ĉiatempe uzi

riveron Nemunas (Niemen) kaj Klajpedan (Memelan) havenon. S-ro Hymans lasis kompreni, ke se tiuj kondiĉoj estos akceptitaj de ambaŭ flankoj, tiam Litovujo ricevos ne nur Vilnon, sed ankaŭ Klajpedon (Memel).

La delegitaro de Litovujo akceptis la ekproponitan projekton kiel bazon por pertraktadoj. La Pola delegitaro ekpostulis, ke partoprenu en la konferenco la delegitoj ankaŭ el la „meza“ Litovujo. Pro neakcepto de tiu postulo s-ro Hymans interrompis la konferencon kaj tutan aferon fordonis al la Ligo de Nacioj. La Konsilantaro esprimis sian opinion pozitively por la proponita projekto (la 28an de Julio 1921) kaj ankoraŭ aldonis, ke seĝmo, elektita de tuta loĝantaro de „meza“ Litovujo, povu akcepti aŭ malakcepti tiun de Litovoj kaj Poloj faritan traktaton; la militistaro de Ŝeligovski devas esti forigita el Vilno, kaj la ordon prizorgos el loka loĝantaro farita milicio el 5000 viroj sub la senpera kontrolo de la Ligo.

La 15an tagon de Julio Polujo akceptis tiun proponon, sed Litovujo rifuzis ĝin, motivante tiun sian faron per tio, ke, donante al la „meza“ Litovujo tiajn rajtojn, fakte estas transdonata al ĝi tuta ebleco difini la sorton de tuta Litovujo. Tiam s-ro Hymans ekpetis, ke ambaŭ ŝtatoj alsendu siajn delegitojn por aparta konsiliĝo kun li. La 3an de Septembro de 1921 jaro komenciĝis la konferenco. Al la ambaŭ delegitaroj s-ro Hymans donis nove ellaboritan traktatprojekton, kiu fakte estis la sama el Bruxelles, nur laŭ sia formo ŝajnis aliigita. La 12an de Septembro la delegitaro de Litovujo akceptis la projekton, sed la Poloj ĝin rifuzis, klariginte, ke ili estas akceptintaj Bruxelles'an projekton kaj la rezolucion de la Konsilantaro de la 12a de la Junio.

La Konsilantaro de la Ligo en monato Septembro akceptis la Hymans'an projekton kun unu korektaĵo — nome, ke la traktaton ratifiku ne seĵmo de la „meza“ Litovujo, sed speciale elektita seĵmo, konsistanta el deputatoj de ĉiuj partoj de Litovujo. Tamen la seĵmo (konstituanto) de Litovujo malakceptis la projekton, ĉar ĝi ne volis eniri kun Polujo en tian unuiĝon, kiu estas danĝera por la sendependeco de Litovujo. Tiam la Litova ministro de eksteraj aferoj raportis al la Ligo de Nacioj, ke iam akceptita projekto dank al malakcepto de seĵmo perdis sian valoron, kaj, krom tio, li proponis, ke la Konsilantaro preparolu la Vilnan aferon en monato Januaro de 1922. La Konsilantaro respondis nee.

Tiamaniere finigis la tria parto de Vilna historio.

La 16an de Oktobro la seĵmo de Polujo akceptis rezolucion, ke en distrikto de Vilnius estu anoncitaj la elektoj de loka seĵmo, kiu decidu, al kiu apartenos Vilnius. La 30an de Novembro Želigovski aŭ lia anstataŭinto anoncis, ke Vilnaj elektoj okazos la 8an de Januaro de 1922 jaro. La litovoj, blankrusoj kaj hebreeoj en la elektoj ne partoprenis. La 21an de Februaro elektita Vilna seĵmo decidis per 96 voĉoj kontraŭ ses, ke Vilna distrikto estu eterne aligita al Polujo.

En la komenco de Februaro Litova registaro ekproponis pertraktadon por fiksi la limojn inter ambaŭ regnoj sur la fundamento de la demarkacia linio, ekzistinta antaŭ aventuro de Želigovski. La Poloj malakceptis la proponon. Tiam Litova registaro ekproponis, ke decidoj de Suvalka konferenco estu transdonotaj por solvo al la Internacia Tribunalo de la Ligo. La Pola registaro malakceptis tiun proponon, almetinte, ke la demando de Vilnius jam estas definitive solvita, ĉar Vilna seĵmo

Vilnan distrikton aligis al la Polujo (la 16an de Marto de 1922 jaro).

La 5an de Majo la deligitaro de Litovujo estis movinta la Vilnan demandon en Genua konferenco. Tamen tiu demando tie ne estis pritraktita. Dume en la komenco de Aprilo Pola registaro aneksis Vilnon. Ke tio estas ankoraŭ ne lasta parto de Vilna historio, montros la proksima estonteco.

Tradukis S. Tijnaitis.



La kvarjara jubileo de la sendependeco de Litovio.

La 16a de februaro estas notinda por historio de Litovio. Tiun ĉi tagon en 1918 jaro estis proklamita la sendependeco de Litovio. Tiam ankoraŭ regis en tuta Litovio la germanoj, kiujn estis alkondukinta al Litovio la mondmilito. Ĝis fino de 1918 jaro litovoj ne povis ankoraŭ administri mem, ĉar germanoj ne estis ankoraŭ forlasintaj Litovion kaj malhelpis al litovoj preni en siajn manojn la kondukilojn de administrado kaj regado. Sed litovoj aktive preparadis sin al memadministro kaj memdefendo.

En la komenco de 1919 jaro ankoraŭ ne estis foririntaj partoj de germana armeo. Dum tiu ĉi tempo en orienta kaj norda parto de Litovio aperas granda danĝero por Litovia sendependeco, nome—rusa ruĝarmeo, kiu estis preta por disrabi la landon. Sed litovoj ne perdis la kuraĝon: ili streĉis ĉiujn siajn fortojn por defendi sian sendependecon kaj decidis pli bone morti, ol doni sian patrujon por fremdaj enmigrintoj. Kaj miloj da junuloj—volon-

tuloj formas la unuajn vicojn de litova armeo, kiu fortikiĝinte forpelas el Litovio malamikojn kaj tiamaniere liberigas sian patrujon.

En 1920 jaro la 15an de Majo kunvenas Konstituantaro (Steigiamasis Seimas). Dum tiu ĉi jaro, la 12an de Julio, estis subskribita la packontrakto kun Rusio. Poste estis trakondukita la limo inter Litovio kaj Latvio. Konstituantaro, aŭ Sejmo, tiutempe estis okupita per eldonado de novaj leĝoj.

Kiam ekbrulis la milito inter Rusio kaj Polio, Litovio anoncis sian neŭtralecon. Dum tiu ĉi milito komence estis venkita pola armeo, kiu estis devigita tute forlasi antaŭe okupitan parton de orienta Litovio. Litovoj tiamaniere povis de nun administri jam tutan teritorion de Litovio. Sed post kelka tempo, kiam rusa armeo estis venkita de poloj, ekaperis fama nun aventuristo gen. Želigovski, kiu havante pli grandan polan armeon komencis la atakojn kontraŭ litova armeo. Litova armeo tiamaniere estis devigita retiriĝi kaj forlasi Vilnan regionon. Tiun maljustan paŝon de Želigovski mallaŭdis tuta civilizita mondo.

Dezirante solvi tiun ĉi disputon kun Polio, Litovio transdonis tutan disputeblan aferon al Ligo de Nacioj. Tamen Ligo de Nacioj, kiu estis mallaŭdinta la konduton de Želigovski, proponis pro tiu ĉi demando kelkajn projektojn, laŭ kiuj Litovio estu kunligita kun Polio per diversaj konvencioj. Litova nacio, kiu multe batalis por sia libereco, ne trovis eble konsenti kun tiuj proponoj de Ligo de Nacioj, ĉar vidis en tio la perdon de suverenaj rajtoj de Litovio.

Dum 1921 jaro ĝenerala situacio de Litovio pliboniĝis en tiu rilato, ke Litovio estis akceptita en Ligon de Nacioj kaj samtempe agnoskita de facto kaj de jure de multaj Eŭropaj ŝtatoj.

Batalante por sia libereco kaj sendependeco, Litovio ankaŭ zorgis pri siaj internaj aferoj. Antaŭ kvar jaroj litovoj komencis sian organizan laboron kun malgranda kvanto da fortoj. Sed hodiaŭ tiu ĉi kvanto estas milfoje pligrandiginta. La inteligentularo ankaŭ estas fortikiĝinta.

En ekonomia kaj kultura sfero oni ankaŭ vidas grandan progreson. La mondmilito estis detruinta ĉefan havaĵon de la lando: ĝi ekstermis multe da agrikultura inventaro, ĝi detruis multe da urboj kaj vilaĝoj. Sed nuntempe post fervora kvarjara laboro la multo estas rekonstruita kaj oni alproksimiĝas al normala stato. Samtempe kun agrikultura produktado plivigliĝas la komerco kaj industrio.

A. Klimas.



Kelkaj sciindaĵoj pri Litova lando.

Limoj kaj areo. Konsiderante la limojn de Litovio tiajn, kiuj estis fiksitaj laŭ packontrakto kun Rusio la 12an de Julio 1920, areo de Litova lando okupas ĉirkaŭ 85000 kv. kilometrojn. En tutan tiun ĉi areon eniras iama Kaunas'a (Kovna) gubernio, Vilna gubernio sen Disna kaj Vileika distriktoj, Suvalka gubernio sen sudokcidenta parto, la parto de Gardina (Grodna) gubernio kaj Klaipeda regiono germane: Memelgebiet, kiu laŭ ekonomia vidpunkto estas nedetranĉebla de Litovio. Klaipeda (Memel) estas sola haveno por Litovio ĉe Balta maro kaj komence de nuna jaro estas rekonita la suvereneco de Litovio je tiu ĉi lando.

Supraĵo. Supraĵo de Litovio estas distrancita per multaj riveroj, riveretoj kaj lagoj—lagoj; ĝi estas pli montetara ol ebena. La plej malaltaj plataĵoj troviĝas en Klaipėda regiono, la plej altaj altaĵoj en sudokcidenta parto kaj apud urboj Vilnius (Vilno) kaj Vileika. Tiuj altaĵoj atingas 300 metrojn super mara nivelo.

Arbaroj. 20,5% da tuta areo okupas la arbaroj (antaŭ 50 jaroj ĝi egaligis al 35%). La plej grandaj arbaroj troviĝas en orienta kaj suda partoj de Litovio, sed ili ne mankas ankaŭ en aliaj lokoj. Laŭ speco la arbaroj prezentas tian konsiston: 80% estas koniferaj (pinglaj) kaj 20% foliarbaroj. El koniferaj arbaroj distingiĝas 60% da pinoj kaj 20% da abioj. Krom tio, laŭ packontrakto kun Rusio 100 000 hektaroj da arbaro en Rusa lando apartenas al Litovio.

Tero. 6,5% da tuta areo estas sentaŭga tero por la agrikulturo. Tiun sentaŭgan teron konsistigas plej parte sablaro. Ĉirkaŭ 24% estas herbejoj kaj paŝtejoj. La restanta tero estas kulturata (aŭ plugata). La tavolo de kulturata tero en Litovio plej ofte konsistas el argilo, kalkargilo, humo kaj sablo—plej ofte kunmiksita kaj plej malofte en pura formo. La sablaro troviĝas precipe en Vilna kaj Gardina regionoj.

Klimato. Meza jara temperaturo estas 6,4° ĝis 6,8° laŭ C. Plej malvarma estas Januaro, plej varma—Julio monato. Konsiderante apartajn okazojn, dum vintro iajoje estas pli ol 25 gradoj de malvarmo, kaj dum somero pli ol 25 gradoj de varmo. Malsekaĵo por jaro atingas 590—610 milimetrojn.

Komunikiĝaj vojoj. La fervojoj en Litovio (sen Klaipėda regiono) havas 2500 kl. da longeco (1900 ordinaraĵoj aŭ larĝaj, kaj 600 klm.—mallarĝaj fervojoj). El akvovojoj unu Nemunas'a riveraro

havas 8000 klm., el kiuj 5800 klm. taŭgas por flosado de arboj kaj 1900 klm. por vaporsipveturado. La navigacio en Nemunas'a riveraro daŭras ĉirkaŭ 230—270 tagoj dum tuta jaro.

Loĝantaro. Okupiĝo, nacieco kaj religio. Antaŭ mondmilito en Litovio loĝis 4500000 homoj kaj sur unu kv. kilometro estis 53 loĝantoj. Loĝantoj de urboj kaj urbetoj konsistigis 14%. La plej grandaj urboj estis: Vilnius (200000 loĝantoj), Kaunas (90300 loĝ.), Gardinas (61000 loĝ.), Šiauliai (31000 loĝ.), Klaipėda (32000 loĝ.).

Laŭ okupiĝo—72% laboras je terkulturo kaj arbaroj, 6%—servistoj en diversaj lokoj, do la restantan nombron 8% konsistigas oficistoj, homoj de liberaj profesioj kaj tiel plu. En Klaipėda regiono okupiĝas je industrio kaj komerco ĉirkaŭ 18%, tial pli malmulte je agrikulturo.

La plimulto da loĝantoj (ne malpli ol 3—3,5 milionoj aŭ ĉirkaŭ 75—80%) konsistas el litovoj. Ĉirkaŭ 13% aŭ 0,5 miliono formas hebreoj, ĉirkaŭ 2,5% poloj, do ĉiuj aliaj nomas sin blankrusoj, germanoj k. t. p. Laŭ religio antaŭ mondmilito estis 80% da katolikoj, ĉirkaŭ 13% da izraelidoj, ĉirkaŭ 3% da protestantoj kaj reformatoj, ĉiuj aliaj pravoslavoj aŭ malnovkleziuloj k. t. p.

Virinoj en Litovio konsistigas pli grandan kvanton ol viroj. Por ĉiu milo da viroj estas 1050 da virinoj. Virinoj havas tute egalajn kun viroj rajtojn.

Agrikulturo. Antaŭ la mondmilito el 8,5 milionoj hektaroj apartenis al bienposedantoj 40%. Tie ĉi bienposedantoj estas nomataj tiuj, kiuj havas pli ol 100 hektaroj. 10% da tero apartenis al rigistaro aŭ eklezio kaj 50% al vilaĝanoj, el kiuj 30% havis da tero pli malmulte ol 3 ha, 66% havis de 10 ĝis 50 ha, 3% de 3 ĝis 10 ha, do 50—100 ha havis nur 1%. 17% da vilaĝanaj lo-

ĝantoj konsistas el senteruloj. En estinta Suvalka gubernio kaj ankaŭ en nordokcidenta parto de Litovio kamparanoj loĝas en apartigitaj terbienoj, sed en aliaj lokoj troviĝas ankoraŭ vilaĝoj, kies terbienoj estas unuigitaj. Antaŭ la mondmilito tiuj vilaĝoj jam estis pretaj por apartigi siajn bienojn. Nuntempe Litova registaro tiun laboron de apartigo daŭrigas. Dum 1919 jaro estis tiamaniere apartigitaj 27 vilaĝoj kun 8 700 ha, dum 1920—80 vilaĝoj kun 18 000 ha kaj dum 1921 ankoraŭ pli granda nombro. Tie ĉi oni konsideras nur tiun areon, kiu estas sub la regado de Litova registaro, tio estas 52 000 kv. klm., ĉar la cetera areo de Litovio estas okupita de poloj, kiuj starigis sian bazon en Vilnius (Vilno).

Konsiderante nur kulturatajn kampojn, vilaĝanoj antaŭ la mondmilito prilaboradis 75% da tuta plugata tero, do bienposedantoj 25%.

Laŭ la nuna terposeda reformo la senteruloj povos ricevi teron kaj havos eblecon memstare mastrumadi.

El grenoj oni kulturigas sekalon, avenon, hordeon, tritikon, pizon k. t. p. Sed plej multe — da sekalo kaj terpomo.

Brutaro. El tuta areo de Litovio, t. e. el 85 000 kv. klm., senpere apartenas al dispono de Litovia registaro ĉirkaŭ 52 000 kv. klm., ĉar alia parto, ĉirkaŭ 35 000 kv. klm., estas okupita de poloj. Sur areo de 52 000 kv. klm. antaŭ la mondmilito estis: ĉevaloj 495 000, kornhava brutaro 948 000, kaproj kaj ŝafoj 720 000, porkoj 1 350 000. La mondmilito multajn ĉevalojn kaj bovojn ekstermis, sed nuntempe la kvanto alkreskas kaj baldaŭ atingos la antaŭmilitan staton. Nuntempe estas pli granda kvanto, ol antaŭ mondmilito, da porkoj, ŝafoj kaj kaproj.

A. Klimas.



La enhavo.

| | paĝo |
|---|------|
| 1. Prof. A. Dambrauskas, Litova arto kaj literaturo | 3 |
| 2. Litova kaj esperantista eminentulo, Prof. A. Dambrauskas | 9 |
| 3. Poeziaĵoj (el litova poezio) | 11 |
| 4. Vincas Krėvė, Tombejo de herooj | 40 |
| 5. Vincas Krėvė, La sorto de l' pego | 63 |
| 6. Vaižgantas, Napoleono Ŝeŝjavilkis | 67 |
| 7. Lazdynų Pelėda, Džiugas | 78 |
| 8. M. Pečkauskaitė, La rajtoj de virinoj | 82 |
| 9. I. Biliūnas, Lumigilo de feliĉo | 97 |
| 10. Jononis, Bildeto | 102 |
| 11. Prof. D-ro St. Šalkauskis, La problemo de nacia civilizacio en Litovujo | 103 |
| 12. L. G. Enkonduko kaj disvastigo de katolikismo en Litovujo | 145 |
| 13. S. Tijunaitis, Evoluado de litova lernejo | 158 |
| 14. Prof. D-ro St. Šalkauskis, La vera patriotismo kaj la formoj de ĝia esprimigo | 179 |
| 15. Prof. A. Dambrauskas, Grandaj kaj malgrandaj nacioj | 207 |
| 16. Prof. A. Dambrauskas, Regno de Kulturo | 212 |
| 17. I. Ŝlapelis, Pri la litova arto | 243 |
| 18. P. Ŝalčius, La kooperacia movado en Litovujo | 254 |
| 19. Prof. D-ro St. Šalkauskis, La proprecoj de la historia sorto de Litovujo | 263 |
| 20. La historio de Polaj invadoj Litovujon | 267 |
| 21. La kvarjara jubileo de la sendependeco de Litovio | 278 |
| 22. Kelkaj sciindaĵoj pri Litova lando | 280 |

Listo de la litovaj bankoj kaj firmoj,

kiuj per mono helpis la eldonon de „Litova Almanako“.

1. Lietuvos Ukio Bankas, Kaunas, Laisvės Aleja, unu el plej grandaj bankoj de Litovujo, havanta siajn filiojn preskaŭ en ĉiuj pli grandaj urboj kaj urbetoj de nia lando.
2. Lietuvos Prekybos ir Pramonės Bankas (Kaunas, Laisvės Aleja), ankaŭ havas multajn filiojn.
3. Lietuvos Komercijos Bankas.
4. Lietuvos Tarptautinis Bankas.
5. Centralinis Lietuvos Žydų Bankas.
6. Lietuvos Kredito Bankas.
7. Lietuvos Kooperatyvų Bankas.
8. Bankinė Kontora Bartnikaičių.
9. Banko Nomas Fränkel.
10. Banko Kontora Mišelskis ir Burginas.
11. Banko Kontora Svirskis ir Čarny.
12. Asekura Asocio „Lietuva“ (Apdraudimo draugija).
13. Asekura Asocio „Lietuvos Lloydas“.
14. Lietuvos Kooperacijų Bendrovių Sąjunga.
15. Fabriko de terkulturaj maŝinoj „Nemunas“.
16. Fabriko de maĵloj, ŝrauboĵ k. t. p. de fr. Tillmanns.
17. Ligno-komerca firmo de Leo Ožinskis.
18. Ligno-komerca firmo de Soloveičik.
19. Bierfarejo de Volfas.
20. Komercedomo de terkulturaj maŝinoj Navratil.
21. Oleo-fabriko „Ringuva“ en Ŝanĉiai apud Kaunas.
22. Ŝnurfabriko „Kabla“ en Ŝanĉiai apud Kaunas.
23. Tehnika kontoro de Karnatz.
24. Meblo-fabriko „Venta“ en Kaunas kaj Ŝiauliai.
25. Lignaj-fabriko „Eglynas“.
26. Konserv-fabriko de Rozmarin.

Ĉi ĉiuj bankoj kaj fabrikoj troviĝas en Kaunas.

Por korespondo kun ili sufiĉas nomi firmon kaj adresi al Kaunas.

Krome al ni helpis jenaj firmoj en provinco:

1. La unuiĝo de kooperaj societoj en Ŝiauliai „Ŝiaulių Vartotojų Bendrovių Sąjunga“.
2. Unuiĝo de terkulturaj kooperaj societoj „Gamintojas“ en Ŝiauliai.
3. Lineksporta firmo „Semlin“ en Ŝiauliai.
4. Ledfabriko de Frenkel en Ŝiauliai.
5. Amerikos Lietuvių Prekybos Bendrovė en Ŝiauliai.
6. Lietuvių Bankas en Klaipėda.

Interrilatante kun ĉi supre nomitaj firmoj bonvolu aldoni, ke pri ilia ekzisto eksciis el „Litova Almanako“.

ORIENTO!

„La Bulgara lando kaj popolo“ — „El la proksima Oriento“
(pri la najbaroj de Rusio).

Ambaŭ kun koloraj etnografiaj kartoj en Esperanto.
Haveblaj je rabatita prezo da 4 sv. fr. por ambaŭ
ĉe l' aŭtoro: IVAN H. KRESTANOFF, Wintergarten-
strasse 9, Dresden - A. 16 (Germ.)

N.B. Baldaŭ aperos: **Bulgara Antologio**, prozo kaj
poezio (ĉ. 500 p.).



Laike Kauno
Žemės Ukio
pàrodos gauta
dvi sidabrinės
medalės.

Dum Kauna Terkultura ekspozicio estas
ricevitaj 2 arĝentaj medaljoj.

M. O. HESSE

KAUNAS, ŠIAULIŲ G. No. 14

Atstovauja
firmas: Gross-Motorenwerke
Deutsche Kabel-Industrie
Reprezentas
la firmojn: „Dr. Paul Meyer“-Zähler
„Philips“-Lampen
Eulenburger Motoren
Naphta



Broliai Tillmanns ir Ko.

Kaune

Fabriko por diversspecaj ŝraŭboj, ŝraŭbinoj,
boltoj, najloj k. t. p.

Korespondado en Esperanto

ALPHONSE SCHICK

A. B-vè

Geriausi Konjakai ir Likeriai
Cognacs and Liquors of best Quality
Beste Kognake und Liköre

KAUNAS — ŠANČIAI

Telegr.: Vinoschick, Šančiai
Tel.: Šančiai 2

La unua aŭtomata tabaka fabriko de

H. ZIVAS

Kaunas, Nemuno kranto g. No. 17

Mi liveras

tabakon: „Litovan“, „Ukrajnan“, „Ottoman“
kaj cigaredojn: „Java“, „Piek“, „Osman“,
„Kometa“ kaj „Alfa“,

faratan el plej bonaj turkaj kaj orientaj
tabakospecoj

KASTANTAS NORKUS

Amerikos Valdžios laivyno
United States Lines New York


Generalinis atstovas
Lietuvai

KAUNAS
LAISVĖS ALEJA

KASTANTAS NORKUS

Generala reprezentanto por Litovujo
de Amerika ŝtata ŝiparo
United States Lines New York

Presejo Albert Hille, Dresden-N.



30' -

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000678311

